

eLIBRO

B. Traven

Mortula șipo

I N K O

B. Traven

MORTULA ŜIPO

Rakonto de usona maristo

El la germana tradukis Hans Georg Kaiser

Lingve reviziis Gary Mickle

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-137-2

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

JULIO 2003

Enhavo

Tri devizoj	4
Enkonduko I	5
Enkonduko II	15
UNUA LIBRO	22
DUA LIBRO	203
TRIA LIBRO	430
ALDONOJ	473
Resumo de la romano	474
Glosaro	481
Malgranda marista terminaro	488

Tri devizoj

Sed mi diras al vi: Vivas mortuloj, en kiuj estas pli da vivo ol en vivantoj; kaj loĝas vivantoj inter vi, kiuj estas mortaj jam ekde la unua lerneja tago, kvankam ili diras al vi: 'Ni vivas, ĉar ni havas la potencon!'

RET MARUT

Oni devigis min esti ribelulo kaj revoluciulo. Revoluciulo pro amo al la justeco, pro helpopreteco por la ŝarĝitoj kaj ĉifonuloj. Devi rigardi maljustecon kaj senkompaton faras ĝuste tiom da revoluciuloj kiom malkontento kaj malsato.

B. TRAVEN

Jesuo respondis kaj diris al ili: Kvankam mi atestas pri mi mem, tamen mia atesto estas vera; ĉar mi scias, de kie mi venis, kaj kien mi iras; sed vi ne scias, de kie mi venis, nek kien mi iras.

(SANKTA JOHANO 8/14)

Enkonduko I

(de la tradukinto)

La mortula ŝipo kaj B. Traven

En la jaroj 1925 kaj 1926 la redakcioj de germanaj gazetoj kaj ĵurnaloj de tempo al tempo ricevis rakontojn kaj aliajn kurtajn tekstojn de iu B. Traven. Ĉiuj temis pri la lando Meksiko kaj ties enloĝantoj. Nur malmultajn oni eldonis, sed la plej multajn rifuzis pro ne-taŭgeco.

Poste tiu Traven — ankoraŭ tute nekonata — forsendis al diversaj gazetoj la manuskripton "La ponto en la ĝangalo". Ankaŭ tiu romanteksto ne trovis la aplaŭdon de la redakciuloj. Ili opiniis ĝin tro brutala por esti prezentinda al la legantaro. Nur en 1927 gazeto en Lipsiko aperigis ĝin felietone. En 1926 oni rifuzis la romanon "La trezoro de la Sierra Madre", kiu poste, interalie pro la samtitola filmo kun Humphrey Bogart, monde famiĝis. Mankus la intereso pri virinoj, iu riproĉis. Kelkajn monatojn antaŭ tiu rifuzo aperis la romano "La kotonplukistoj" en la gazeto "Vorwärts" (Antaŭen) en Berlino.

Jam post tri daŭrigoj Ernst Preczang petis de tiu gazeto la adreson de la aŭtoro. Preczang, kiu mem verkis

romanojn, tiutempe laboris kiel redaktoro kaj editoro de la eldonejo "Büchergilde Gutenberg" (Librogildo Gutenberg) en Berlino, kiu estis entrepreno de la Germana Libropresista Sindikato. Preczang informis Travenon en letero pri la baza ideo, kiu formis la fundamenton de la Librogildo.

La Librogildo, fondita en la jaro 1924, estis librokoooperativo, kiu celis vendi malkarajn, sed tamen bonkvalitajn librojn al laboristoj. Antaŭ la fino de la Respubliko de Weimar tiu libro-kooparativo havis 85000 membrojn. Kiam la faŝistoj transprenis la politikan potencon, oni persekutis la socialdemokratajn fondintojn kaj redaktorojn. Kelkaj forlasis Germanion. Kiel ekzilitoj ili provis daŭrigi la tradicion de la Gildo kaj eldonadis en Prago, Vieno kaj Zuriko. La unua libro, kiu aperis eksterre de Germanio, estis libro de B. Traven: "La marŝo en la regnon de l' mahagono".

Klarigante la bazan ideon de la eldonejo al Traven, Preczang demandis tiun, ĉu li eble konsentus proponi sian sekvontan romanon al la Gildo. Traven skribis pri tio iam poste: "Per malmultaj vortoj en via letero vi sukcesis tiel entuziasmigi min por la ĵus naskita entrepreno, ke mi tuj sidiĝis kaj reverkis germane la manuskripton *La mortula ŝipo* kaj proponis ĝin al la Librogildo Gutenberg. Ĉu la libro vere iam estus eldonita en Germanio, ja

ĉu ĝi efektive iam estus ekvidinta la lumon de la mondo en presita formo, ne tute certas.”

La laborista eldonejo proponis ampleksan financon helpon al la nekonato, kaj tuj post unu monato, en oktobro de la jaro 1925, la manuskripto *La mortula ŝipo* alvenis. Post kvar tagoj — la 19-an de oktobro en tiu jaro — B. Traven en Meksiko ricevis la telegrafan respondon: ”MORTULA ŜIPO AKCEPTITA PRECZANG.”

En aprilo 1926 *La mortula ŝipo* aperis kiel la unua romano de B. Traven en libra formo. Ĝi eniris la oceanon de la literatura mondo kun blua kovrilo kaj surprisita ora ŝipeto. La veturo fariĝis eksterordinara sukceso en la tuta mondo. La unua eldono kun milcent ekzempleroj vendiĝis en kvar semajnoj. Tiam sekvis eldono post eldono, ne nur ĉe la Librogildo, sed ankaŭ ĉe aliaj germanaj eldonejoj. Tiutempe kaj poste la libro estis tradukita en pli ol dudek lingvojn.

Kiel Traven mem menciis, li reverkis germane la libron en dudek tagoj. Sed la antaŭhistorio de *La mortula ŝipo* estas longa; necesis vivospertoj kaj vasta studado de tre diversaj temoj, por verki tian libron.

De 1907 ĝis 1915 Ret Marut — jen la antaŭa pseŭdonomo de Traven — estis aktoro kaj reĝisoro en diversaj teatroj de Germanio. Jam en tiu tempo li verkis multajn rakontojn kaj eĉ romanon. La fruaj rakontoj evidentigas lian fervoran studadon de la plej diversaj aŭtoroj, de fi-

lozofoj kaj de historiaj eventoj. Pro sia profesio li konatiĝis kun multaj urboj kaj regionoj de Germanio, kaj ofte li faris ekskursojn.

Mi supozas, ke fruaj instigoj por *La mortula ŝipo* troviĝas kaj en broŝuro de Hans Christian Andersen kaj en bildo de la pentristo Pieter Bruegel. Aludoj pri la du famuloj troviĝas en la verkoj de B. Traven.

En la priskribo "Vojaĝaj ombroj de ekskurso al Harco kaj Saksa Svisujo somere de 1831" Hans Christian Andersen rakontas pri ŝipvojaĝo sur la rivero Trave al Lübeck en Ŝlesvig-Holstinio en la nordo de Germanio. Andersen volis fari tute novan specon de vojaĝpriskribo. Ĝi jam entenis kelkajn motivojn de *La mortula ŝipo*. Li volis verki satiron, volis enplekti dogandomon; fremdaj urboj kun fremdaj homoj sinsekvas unu post la alia. Li skribas pri la granda vojaĝo, kiun ĉiuj faras finfine, li skribas, ke eĉ la mortintoj en siaj tomboj kun la Tero flugas ĉirkaŭ la sunon. Li skribas pri la ŝtormoj de la vivo, enestas ampoemo laŭ la maniero de la enkonduka poemo de *La mortula ŝipo*. Grava afero estas, ke li karakterizas la riveron Trave granda rivero de la vivo "kie ni tiam esploras, ĉar ni malesperas pri la stiristo, ĉar la celo de niaj deziroj, tiel kiel Lübeck, ludas kaŝludon kun ni". Li skribas, "ke tamen estas la ĝusta vojo, kiun ni iras, sed ni ne konas la veran vojon de la rivero, ĉar ni nur unufoje velas sur la Trave de la vivo." Andersen post la ŝip-

vojaĝo kompreneble vizitis la "Preĝejon de S-ta Maria" en Lübeck kaj rigardis tie la bildojn "pri la danco de l' skeletulo." (Vidu en la rimarkoj pri la ĉapitroj 19/6 kaj 45/1)

Sur la pentraĵo "Triumfo de l' morto" de la fama nederlanda pentristo P. Brueghel (1525–1569) videblas jam minaca nigra mortula ŝipo. En ĝia fajrolumo montriĝas kelkaj nigraj krucoj, sed ne nur tio. Videblas rivereto, tiel serpentuma kiel la rivero Trave, aperas la mortula ĉaro kun du skeletuloj, unu el tiuj videble ludas la mortulan dancon, la alia mantenas la vivoluman lanternon, re-koneblas pendumiloj kaj multaj aliaj motivoj el *La mortula ŝipo*. Pri Brueghel estas interese, ke li havis kontaktojn kun la sekto de la anabaptistoj, ke li pentris kunvenon de tiuj radikalaj prakristanoj sur la bildo 'Prediko de Johano Baptisto'.

Irene Mermet, batalkunulino de Ret Marut el la tempo de "La brikofaristo" (vidu pri tio en la rimarkoj. pri ĉap. 11/1, 13/4 kaj 43/9), kiu sekvis Traven al Meksiko kaj, kiu ne sciis multon pri la vivo de Marut, supozis, ke li devenis el Lübeck. La usona Traven-esploristo Karl. S. Guthke efektive trovis en Ŝlesvig-Holstinio la du vilaĝnomojn Travental kaj Marutendorf. La pentristo Pieter Brueghel nomiĝis laŭ la vilaĝo Brueghel ĉe Breda.

En la eldono de "La brikofaristo" de la 21-a de decembro 1921 en la 'sep vizaĝoj de la tempo' troviĝas deseg-

naĵo de la pentristo Franz Wilhelm Seiwert (1894–1933), kiu montras interalie vaporŝipon kun kruceca masto kaj trastrekita suno, kio supozigas, ke la ideo pri *La mortula ŝipo* efektive ekzistis jam en tiu tempo. Seiwert estis tiel bona amiko de Ret Marut, ke li nomis tiun: ”parto de mia mi”.

Pri la aŭtoro Marut/ Traven Karl S. Guthke skribis, ke verŝajne eĉ B. Traven mem ne precize sciis, kiu li estas. Kie kaj kiam, kiel filo de kiu, en kiu socia tavolo, en kiu konfeso estis naskita la aŭtoro de *La mortula ŝipo* kaj de multaj aliaj libroj, scias neniu. Laŭ Guthke almenaŭ estas certe, ke tiu, kiu en Meksiko nomis sin B. Torsvan, Traven Torsvan ktp. kaj pli poste Hal Croves, identas kun la germanlingva aktoro, ĵurnalisto, verkisto kaj revoluciulo Ret Marut. La identecon de B. Traven kaj Ret Marut pruvis la esploristo Rolf Recknagel el Lepsiko en la libro ”Kontribuoj pri la biografio de B. Traven” el la jaro 1966. En angla versio de *La mortula ŝipo*, ankaŭ kun rigardo al la esploristoj, Traven mokis: ”Mi ne bezonas pasporton. Mi scias, kiu mi estas.” B. Traven pasie defendis sian anonimecon. Estis parto de lia vivkoncepto, ke ne estu kiu ajn aŭtoritato. Sed eble tio havis ankaŭ aliajn kaŭzojn, ĉar jam la aktoro Ret Marut vivis kun pseŭdonimo. Kvankam tute ne eblas verki precizan biografion de la aŭtoro kaj eĉ lia naskiĝjaro pridubindas, estas

sufițe da faktoj, kiuj helpas pli bone kompreni la aŭtoron.

Post la revoluciaj okazaĵoj en Munkeno la unuan de majo en la jaro 1919 Ret Marut devis forlasi la urbon, ĉar li estis serĉata ŝtatkrimulo. (Vidu ankaŭ pri 13/3 kaj 43/3 kaj 43/9) La verkisto Oskar Maria Graf (vidu ankaŭ pri 15/1) rimarkis, ke Marut, kiu kiel aktoro foje eĉ transprenis la rolon de baletdancisto, forlasis Munkenon en la vestaĵoj de virino. Kelkajn monatojn, eble eĉ jarojn, Marut ankoraŭ kaŝe restis en Germanio. Ĉu ankaŭ kiel kunbatalanto de la armita taĉmento de la anarkiema komunisto Max Hoelz? Pliaj numeroj de lia gazeto "Der Ziegelbrenner" (La brikofaristo) estis eldonitaj, kvankam li — kiel persekutato — devis "fuĝi pro kuloj".

Sed iam poste li forlasis la landon. En la jaroj 1923 kaj 1924 li reaperis en Londono. (Vidu pri 3/1 kaj 40/1) Ret Marut frekventis tie en la havena regiono "East End" anarkikomunistajn rondojn, kiuj eldonis la gazeton: "Freedom" (libero). Estis la sama aĉa "East End", kiun jam la usona verkisto Jack London vizitis en 1902. Li skribis pri tio en sia libro "Homoj de l' abismo". Estas verŝajne, ke Ret Marut tie konatiĝis kun la libro "Situaĉio de la laboranta klaso en Anglio" de Friedrich Engels, kiu pro multaj rilatoj al *La mortula ŝipo* meritas nian atenton. Baldaŭ leviĝis la suspekto de la Londona polico kontraŭ Marut pro liaj tieaj kontaktoj. Ĉar li ne regist-

rigis sin  e policejo, li estis kondamnita al deporti o, sed anta e oni metis lin en prizanon. Post la ellaso el la prizono li fine dungi is kiel subhejtisto sur la norvega  ipo "Hegre", sed — li ne kunveturis. La nomo sur la  ipana-ra listo estis trastrekita. Tion la FBI ne sciis. Marut/Traven plian fojon fu is en la protektantan nenion de anonimulo . . .

La manskribita praversio de *La mortula  ipo* trovi as en la postlasa o  e Rosa Elena Lujan, kiu estas la vidvino de Hal Croves/ B. T. La   i la manuskripto ekestis en la londona prizona tempo inter 1923 kaj 1924. La germana eldono el la jaro 1926 bazi as sur tiu teksto.  i estas angle skribita kaj plena de germanismoj. La dufragmenta manuskripto konsistas el kvardek pa oj. La usona esploristo Karl S. Guthke aperigis  in en sia tre detalri a libro "B. Traven: Biografio de enigmo".

Erich M hsam (vidu pri 10/1 kaj 13/3 kaj 15/1 kaj 43/3 kaj 43/9) post la apero de la unua eldono de *La mortula  ipo* tuj supozis, ke  i estas verko de Marut. Sed B. Traven tion energie kontestis preska  dum sia tuta vivo. Nur horojn anta  sia morto en la jaro 1969 — se Croves vere estis Traven — li konfesis al sia edzino Rosa Elena Lujan, ke li efektive estas anka  Ret Marut.

Mi tradukis la unuan eldonon de la Librogildo Gutenberg. Mi havis la ambicion redoni la spiriton kaj la precizan enhavon de tiu unua eldono,  ar preska   iuj tra-

dukoj tiel aŭ alie deflankiĝis de tiu germana teksto. Tio ofte okazis kun la konsento de la aŭtoro mem, kiu pretendis esti usonano. Li lasis forstreki tekstajn rilatojn al Germanio kaj enmetis ampleksajn novajn partojn. Ankaŭ pliaj germanaj eldonoj ofte diferencas disde la unua, ĉar B. Traven ankaŭ en tiu rilato ŝatis konfuzi. Se mi ne sciis kiel traduki tion aŭ jenon, mi uzis por komparoj la anglan tekston, unue eldonitan ĉe Jonathan Cape en Britio. Tiun tekston oni eldonis nur post ampleksa prilaboro pere de Bernard Smith, kiu estis editoro ĉe la filio de la usona eldonejo Alfred A. Knopf en Londono. Traven post komenca hezito konsentis la necesan prilaboron, kiu kondukis al lingvaj ŝanĝoj en kvarono de la teksto, ĉar la proponita angla versio de Traven entute tro germanecis. Fine li estis tre kontenta pri la bonega laboro de Smith.

Miaj rimarkoj pri la libro estas prenitaj el la verkoj de la plej fidindaj Traven-esploristoj kaj parte el libroj pri la historio de la marveturado. Ĉar mi mem esploris pri la aŭtoro kaj la libro, mi povis aldoni kelkajn interesajn konsiderindajn novaĵojn, kiuj ĝis nun ne estas publikigitaj, plej grava estas tiu pri la rilato de *La mortula ŝipo* al la libro de F. Engels, "Situacio de la laboranta klaso en Anglio".

Fremdlingvajn tekstopartojn mi tradukis en la rimarkoj, sed diversajn Esperantajn vortojn, kiuj gravas por la

plena kompreno de la libroteksto, mi enmetis en la Glosaron kaj en la Malgrandan Maristan Terminaron.

Hans-Georg Kaiser

Enkonduko II

(de la aŭtoro B. Traven)

”Mia romano — La mortula ŝipo”

el la gazeto ”Die Büchergilde”, Berlin, kajero 3/ 1926

Mia deziro estis verki bonan kaj amuzan rakonton. Mi pensas, ke la rakonto pro tio bonas kaj amuzas, ĉar mi ne plukis ĝin el la kunkudroj de miaj pantalonoj, ĉar mi ne elpensis ĝin.

Se oni verkas veran rakonton, oni ne longe cerbumas pri la artformo. Oni simple rakontas, kaj oni tiel rakontas, kiel oni vidis kaj sentis ĝin. Alia homo tute alie verkus la saman rakonton. Okazaĵojn, kiujn mi devis emfazi kaj substreki, li apenaŭ perceptus, li eble eĉ tute ellasus ilin, sed li redonus interparoladojn, kiujn mi ne atentis, ĉar mi opiniis ilin negravaj.

En ĉi tiu lasta frazo jam ĉio enestas, kion mi povas diri pri mi mem. Tiu, kiu celas la postenon de noktogardisto aŭ de lanternisto, devas skribi biografieton, kaj li devas prezenti ĝin ene de certa tempo. De laboristo, kiu kreas spiritajn valorojn, oni neniam postulu biografion. Tio malĝentilas. Oni tentas lin mensogi. Precipe tiuka-

ze, se li supozas pro iuj kaŭzoj, ke lia vera biografio seniluziigus la homojn. Tiurilate mi kompreneble ne celas min mem. Mia biografio ne seniluziigus. Sed mia vivo estas mia privata afero, kiun mi volas reteni por mi. Ne pro egoismo. Sed tiom pli pro la jena deziro: esti en mia propra afero mia propra juĝisto.

Mi nun tute klare parolos. La biografio de homo, kiu kreas, estas absolute negrava. Se homo ne rekoneblas en siaj verkoj, jen aŭ tiu homo aŭ liaj verkoj valoras neniun. Tial la homo, kiu kreas, devus havi neniun alian biografion ol siajn verkojn. En siaj verkoj li ekspozicias sian personecon kaj sian vivon antaŭ la kritiko.

la mortula ŝipo estas ŝipo, kiu havas mortulan, fantoman ŝipanaron. Tiuj ĉi mortuloj spiras kaj laboras, sed tamen mortas. Ili mortas kiel povas morti nur homo, kiu ne havas plu rilaton al la vivantoj, al la vivanta mondo.

Sur tiu ĉi flanko de la Atlantika Oceano, kie mi vivas, oni ja eĉ nun plu asertas, ke oni entreprenis la grandan militon pro la libero, demokratio kaj sendependeco de la popoloj. Tiel, kiel post la eŭropa Liberiga milito de 1813 ĝis 1815, ankaŭ post tiu granda liberiga milito la libero de la individuaj homoj fariĝis predo de la diablo. Tio evidente estas parto de liberigaj, religiaj kaj revoluciaj militoj.

Antaŭ tiu granda milito sufiĉis vaka leterkoverta kun surskribita adreso kaj stampita poŝtmarko, por povi ve-

turi de Berlino al Filadelfio, de Hamburgo al Borneo, de Bruselo al Nov-Zelando. De kiam la granda milito estis gajnita, ĉiuj landoj starigis ĉinajn murojn, kies pordegojn oni ne rajtas trapasi sen pasportoj, sen vizo, sen naskiĝatesto, sen polica konduta atesto, sen eksedziĝa papero, sen geedza licenco. Sed kiam oni starigis tiujn murojn, kiam la burokratoj de ĉiuj landoj fariĝis gravaj personoj, al kiuj oni cedis preskaŭ pli da potenco ol havis la eksigitaj reĝoj, jen kelkaj miloj da homoj restis ekstere, ekstere de la muroj. Ili ne povis trapasi la pordegojn, ĉar la papero fariĝis pli grava ol la homo, ĉar la atesto pri naskiĝo ricevis pli altan valoron ol la fakto, ke homo vivas.

En mondo, en kiu la burokratoj kun siaj registaroj kaj registraj formularoj decidas kiel la aferoj marŝas, homo, kiu ne kapablas registri sin, ne havas vivorajton. Estus facile mortbati ĉiujn ĉi homojn, por ke la "ŝtata servo" povu procedi trankvile kaj laŭregulare. Sed la naskiĝa kvoto pli kaj pli malkreskas, kaj plie la milito glutis milionojn da homoj, kaj tial oni ne povas dronigi en la Pacifiko tiujn ĉagreninfanojn de la burokratismo.

Kiom ni devas danki al la kapitalismo, ke ĝi zorgas pri tiu homrubaĵo! Ĝi faras tion ne pro kompatato. Ĝi lernis de la nafto kaj de la ŝtonkarbo, ke la subproduktoj povas ebligi pli grandan profiton ol la esencaj produktoj.

Al tiuj ruboproduktoj, al tiuj mortuloj, al tiuj fantomoj oni lasas la kredon, ke ili tute libervole eniras la arenon, por batali kiel la modernaj gladiatoroj. Por ke ili ne sentu, kiel multe ili estas la kompatindaj, nelibervolaj viktimoj de abomeninda sistemo. Ke ili konvinkiĝas esti "liberaj" laboristoj, tion mi rigardas la majstroverko de la moderna kapitalismo, kiu verdiktas militon kaj pacon, senarmigajn planojn kaj popolajn aliancojn, revoluciojn kaj kontraŭrevoluciojn, intercivitajn militojn en Ĉinio kaj organizitan amasorabmurdon en Maroko kaj Sirio kontraŭ la homaron, ne kaprice kaj arbitre, sed pro la nura kaj pura profito.

En Germanio oni ja ne pensu, ke la usonaj laboristoj pli liberas ol la germanaj. Tion oni nur imagas. Pro la iom pli bona vivnivelo, en kiu ili vivas — en kiu ili supozas vivi — ili estas pli sklavigitaj ol la germanaj laboristoj.

Povas ŝajni troigite, ke en la romano aperas du okazaĵoj, kiuj ŝajne preskaŭ samas. Mi celas la okazaĵojn ĉe la usonaj konsuloj. Sed mi intencas montri per tio, ke la usonaj oficistoj en sia lando kaj ekster sia lando provas eĉ superi la modelajn imperiestrajn germanojn aŭ reĝajn rusajn oficistojn pri sencerba burokrateco. La konsulo en Nederlando estas la sama burokrato kiel la konsulo en Francio, kiel la konsulo en Italio, kiel preskaŭ ĉiu oficisto. Kaj la germana konsulo en Anglio parolas la saman lingvon kiel la pola konsulo en Hamburgo. La ofi-

cistoj kaj la burokratoj estas internacia kaj sekreta frataro, kiu starigis al si la taskon amarigi la vivon de la homoj. Iliaj demandoj, gestoj, konceptoj, konsiloj kaj minacoj ĉiuj sekvas la samaman kodon.

Facile mi estus povinta ellasi iun konsulon. Sed tiukaze estiĝus la impresoj, ke la nemenciita konsulo estas escepto. Inter tiuj oficistoj, al kiu ajn nacio ili apartenas, ne ekzistas escepto, ĉar ili sentas sin pedante ligitaj al instrukcioj kaj reprezentas sian ŝtaton laŭlitere. Tiel la humaneco ĉie devas perdi. Tion mi volis emfazi.

Oni atentigis min pri tio, ke la fino alvenas tro senpere, ke la meznivelan leganton turmentos la demando, kio okazos al la rakontinto, kiu en katenoj drivas plu sur la akvo.

Estas malfacile por mi, kontentige respondi tion. Se mi estus verkinta la romanon kun la intenco antaŭmeti ĝin al la kutima legantaro, la verko jam en la unua ĉapitro havus alian formon. Sed mi ne rigardas la membrojn de la Büchergilde (Librogildo) meznivelaj legantoj, sed tiaj, kiuj post la legado de libro ankoraŭ havas sufiĉe da spirita elasteco, por povi mem mediti, kaj kiuj do ankoraŭ posedas sufiĉe da fantazio por povi mem elpensi "finon lastfinan" — kondiĉe, ke ili deziras tian finon. Mi ne pensas, ke tiuj romanoj plej bone estas, kiuj postlasas tute lacigita la leginton, kiuj ne lasas por pripensado ion.

Aldone mi devas konfesi, ke mi tute serioze ne povas klarigi, kial mi elektis ĝuste tiun kaj ne alian finon. Laŭ mia sento alia fino ne estis allasebla. Se mi ŝanĝintus la finon, mi estus perfidinta mian senton. Mi pensas, ke tiu, kiu povus verki alian finon, neniam estis soleca ŝip-pereulo, kies lastan kamaradon la ondoj ĵus forlavis. Sed eĉ, se mi lasus paroli ne mian senton, sed mian klaran sobran menson, eĉ tiukaze mi ne povus ŝanĝi la finon. Mi povus eble forpreni nur la noton, kiu povas vekti religian sentimentalan subsonon. Sed tiu religia sentimentaleco aŭtentikas. Oni edukis la virojn en tia religia sentimentaleco. Kaj se eĉ ĉia sentimentaleco en la jaroj de laboro malaperis, en tiu lasta momento ĝi ekflamas denove. Ĝi tamen ne sufiĉe fortas por tiel plenigi la lastajn sekundojn, kiel pia kredanto volonte vidus tion. Sed la ekflamanta religia sentimentaleco miksiĝas kun la sopiro pri "fidinda" ŝipo, pri bona afabla kapitano, pri pureco kaj trankvilo, kiujn la maristo deziras plej profunde en sia animo, se li troviĝas sur "de Dio malbenita ratokesto".

La romano *La mortula ŝipo* kun tiu fino vere finiĝas. *La mortula ŝipo* kun sia brutaleco kaj krudeco estas estingita. La transvivintoj eniris staton, en kiu ili ne plu pensas pri la brutaleco de la Mortula ŝipo, sed nur pri la aĉa kafo, pri la mizera manĝo, kion oni donis al la laboristoj sur *La mortula ŝipo*. Sed en sia nuna situacio ili rigardas

la aĉan manĝaĵon, kiun eĉ la ratoj ne tuŝus, la plej bele-
ga, kvazaŭ dia manĝaĵo. Tia ŝanĝo de la opinio estas
pensebla nur, se oni jam venkis la morton. *La mortula
ŝipo* aperas ankoraŭfoje kun sia tuta brilo kiel vizio de
februlo kaj soifa mortanto. Kio nun okazos al la rakont-
into, ĉu li pereos aŭ iel transvivos, tio tute ne plu havas
rilaton al *La mortula ŝipo*. (Tiu, kiu rakontas, certe ankaŭ
vivas.) La linio, kiu sekvas, estus la komenco de nova
romano.

B. TRAVEN¹ — LA MORTULA ŜIPO²

UNUA LIBRO

Song of an American Sailor³

*Now stop that crying, honey dear,
the Jackson Square remains still here
in sunny New Orleans,
in lovely Louisiana.*

*She thinks me buried in the sea,
no longer does she wait for me*

1. la nomo B. Traven: la signifo de la pseŭdonimo estas duba. En la praa angla marista slango la nomo signifas 'vojaĝanto', kio pensigas ankaŭ pri la angla vorto traveller. Se oni rigardas ĝin anagramo, ĝi legeblas kiel NEV ART B., tio estus NEW ART B., do NOVA ARTO de B. Se pravas mia supozo pri la rilato al la rivero Trave en Ŝlesvig-Holstinio ĉe Lübeck, pri kiu mi skribis en la enkonduko pri la libro kaj la aŭtoro, Traven ankaŭ estus simbolo por la vivo kontraŭ la morto. La usona Traven-esploristo Karl. S. Guthke trovis en Ŝlesvig-Holstinio la du vilaĝnomojn Travental kaj Marutendorf. La esploristo Baumann asertis, ke Traven estas la nomo de almenaŭ du personoj.
2. la titolo: la vortkombino 'mortula ŝipo' por certa speco de ŝipoj estas elpensajo de B. Traven, kiu tamen tre realas. Temas

*in sunny New Orleans
in lovely Louisiana.*

*The death-ship is it I am in,
all I have lost, nothing to win
so far off sunny New Orleans,
so far off lovely Louisiana.
Kanto de usona maristo*

*Nun jam ne ploru, karulin',
cê Jackson plac' atendu min
en suna Nova Orlean'
en rava Luiziano.*

*Ŝi kredas min sur l' grund' de mar',
ne plu atendas en la ar',
en suna Nova Orlean'
en rava Luiziano.*

pri kargoŝipoj, kiujn la kompanio aŭ la posedanto tiom longe ne prizorgas kaj riparas, ĝis ili sinkas aŭ ĝis oni eĉ sinkigas ilin por enkasigi la asekursumon. La maristoj sur tiaj ŝipoj estas mortontoj, maristaj gladiatoroj.

3. la komenca kanto: "Estis mia intenco skribi amrakonton. Vi vidas tion ĉe la enkonduka kanto. Sed neniam mi sukcesas fari per miaj figuroj, kion mi volas . . . kaj tamen ĝi estas la granda neeldirita amrakonto de tiu, kiu ne povas reiri al sia amatino."

(B.T. en letero el la jaro 1925)

*Mi mortis ne țe iu rif',
veturas sur mortula șip'.
Ve, for de l' suna Nova Orlean'.
Ve, for de l' rava Luiziano.*

Ĉapitro 1

De Nov-Orleano ni estis transportintaj plenan ko tonkargon trans la maron al Antverpeno, sur la S. S. Tuscaloosa⁴.

Ĝi estis bona ŝipo. Mil diabloj, estas vere. *First rate steamer, made in USA*⁵. La hejmlanda haveno: Nov-Orleano. Ho, sunplena ridanta Nov-Orleano, tiel malsimila al la sobraj urboj de la glaciigintaj puritanoj kaj sklerozaj kotonkomercistoj de la nordo! Kaj kiaj belegaj kajutoj por la maristaro. Finfine ŝipkonstruisto, kiu havis la revolucion ideon, ke la maristaro ankaŭ estas homoj, kaj ne nur manoj⁶. Ĉio estas pura kaj afabla. Banejoj kaj

4. Tuscaloosa: urbo en la okcidenta Alabamo, fondita en 1816 sur la tereno de indiana vilaĝo, la nomo de indiana tribestro; ankaŭ la nomo de fama oceana vaporŝipo.
5. *First rate steamer, made in USA* (angle): Vaporŝipo plej alkvalita, produktita en Usono
6. homoj kaj ne nur manoj: "Li (la kapitalisto) ne povas kompreni, ke li havas ankoraŭ alian rilaton al la laboristo krom tiu de vendo kaj disvendo, li ne rigardas ilin homoj, sed 'manoj' (hands) . . .", skribis Friedrich Engels (1820–1895) en sia unua libro 'Situacio de la laborista klaso en Anglio', el la jaro 1845. Ĉiuj pliaj citaĵoj de Engels estas el tiu libro. Tiu grandioza verko de la junulo Engels, tute preteratendita de

multe da pura tolaĵo, kaj ĉio moskitorezista. La manĝo bone gustis kaj abundis. Kaj ĉiufoje oni disdonis purajn telerojn, lavitajn tranĉilojn, forkojn kaj kulerojn. Tie estis negroknaboj, kiuj devis fari nenion alian ol teni puraj la kajutojn, por ke la maristoj restu sanaj kaj en bona humoro. Finfine la kompanio eltrovis, ke bone humora maristaro pli enspezigas ol ĉifonula.

Dua Oficiro, mi . . . ? Ne, sinjoro. Mi ne estis la Dua Oficiro en tiu ladokesto. Mi estis simpla ferdeklaboristo, tute simpla laboristo. Pripensu, sinjoro, maristoj ja preskaŭ ne plu ekzistas, kaj ankaŭ ne estas postulataj plu. Tia moderna kargoŝipo verdire ne plu estas ŝipo. Ĝi estas flosanta maŝino. Nu, ke maŝino bezonas maristojn por la servado, vi certe mem ne kredus, eĉ se vi sciis nenion plian pri ŝipoj. Laboristojn tia maŝino bezonas,

Traven-esploristoj, pri la frukapitalismo en Anglio estis la plej grava fonto por la verkinto de la Mortula Ŝipo.

Cetere, B. Traven, Jack London kaj F. Engels havas ankaŭ alian komunecon: La cindro de B. Traven estis ĵetita el aviadilo sur la indianan regionon Chiapas en Meksiko. La cindron de Jack London oni forsendis en leteroj al amikoj. Kaj tiun de Engels oni ĵetis en la kanalon inter Calais kaj Dover.

Ankaŭ la usona verkisto Jack London — London estas pseŭdonimo — uzis ĝin por sia libro "Homoj de l' abismo" pri la loĝkvartalo East End de Londono. En ĉifonoj kaj aspektanta kiel senhejmulo li faris en tiu urbokvartalo praktikajn esplorojn por la libro. Antaŭ sia aresto kaj poste Ret Marut loĝis en tiu havena regiono.

kaj inĝenierojn. Ankaŭ la ŝipestro, la kapitano, nuntempe estas nur inĝeniero. Kaj eĉ la A. B.⁷, staranta apud la rudro, kiun oni certe povis rigardi dum la plej longa tempo kiel mariston, nuntempe estas nur maŝinisto, kaj ne pli. Li havas nur la taskon funkciigi la levilojn, kiuj komunikas la turndirekton al la rudromaŝino. La romantiko de la marrakontoj jam delonge pasis. Mi opinias eĉ, ke tia romantiko neniam ekzistis. Nek sur la velŝipoj nek sur la maro. Tiu romantiko ekzistis ĉiam nur en la fantazio de la aŭtoroj de tiuj marrakontoj. Tiuj mensogaj rakontoj forlogis sufiĉe multajn bravajn knabojn al vivo kaj medio, en kiu ili devis pereii korpe kaj anime, ĉar ili kunportis nenion pli ol sian infanan kredon pri la honesto kaj veramo de tiuj rakontistoj. Eblas, ke romantiko iam ekzistis por kapitanoj kaj rudristoj — por la ŝipanoj neniam. La romantiko de la ŝipanoj ĉiam estis nur: supermezure kruela laboro kaj besteca traktado. Kapitanoj kaj rudristoj aperas en operoj, romanoj kaj baladoj. La gloran kanton pri la herooj, kiuj faris la laboron, oni kantis neniam. Tiu glora kanto ja estus tro brutala por entuziasmigi tiujn, kiuj volis, ke oni kantu ĝin. Jes, sinjoro.

Ĝustadire, mi estis ne pli ol simpla ferdeklaboristo, nur tio. Mi devis fari ĉiun necesan laboron. Por diri la tutan veron, mi estis nur farbisto. La maŝino iras per si

7. AB, able-bodied seaman (angle): plene lerta maristo

mem. Kaj ĉar necesas doni al la laboristoj okupon kaj alia laboro estas nur en esceptaj okazoj, kiam kargoholdoj estas purigendaj aŭ io estas riparenda, oni ĉiam farbas ion. De matene ĝis vespere, kaj tio neniam ĉesas. Ĉiam estas io, kio bezonas farbon. Iun tagon oni konsterniĝas tute serioze pri tiu eterne daŭranta farbado, kaj oni tute sobre konvinkiĝas, ke ĉiuj ceteraj homoj, kiuj ne marveturas, nenion alian faras ol produkti farbojn. Tiam oni sentas profundan dankemon al tiuj homoj. Se ili iam rifuzus plu fari farbojn, la ferdeklaboristo ne scius, kion fari, kaj la Unua Oficiro, sub kies komando la ferdeklaboristoj troviĝas, baldaŭ malesperus, ĉar li ne scius, kion ordoni al la ferdekuloj. Ili ja ne povas ricevi la monon por nenio. Ne, sinjoro.

La salajro ne estis tro multa. Tion mi ne povus aserti. Sed, se mi elspezus dum dudek kvin jaroj neniun cendon, se mi zorgeme ŝparus unu monatan salajron post la alia kaj ne estus sen laboro, tiukaze mi — post la paso de tiuj dudek kvin jaroj da nelaca laboro kaj ŝparado — efektive ne jam povus pensiiĝi, sed post pliaj dudekkvin jaroj da laboro kaj ŝparado mi povus alkalkuli min kun certa fiero al la suba tavolo de la meza klaso. Al tiu tavolo, kiu rajtas diri: "Dank' al Dio mi ŝparis rezervan groŝon por pluvaj tagoj." Kaj ĉar tiu popoltavolo estas ĝuste la laŭdata tavolo, kiu konservas la ŝtaton en ĝiaj fundamentoj, tiam oni povus diri pri mi, ke mi fariĝis

valorplena membro de la homa socio. Por atingi tiun celon, kvindekjara laboro kaj ŝparado ne estas tro multa. La transmondon oni tiel certigas al si kaj la ĉitium al aliaj.

Mi tute ne emis rigardi la urbon. Mi tute ne ŝatas Antverpenon. Tie vagas tiom da fiaj maristoj kaj similaj fastrasuloj. Jes, sinjoro.

Sed la aferoj en la vivo ne ruliĝas tiel glate. Ili nur malofte konsideras tion, ĉu oni ŝatas aŭ ne ŝatas ion. Ne estas la rokoj, kiuj regas la iradon kaj karakteron de la mondo, sed la etaj ŝtonoj kaj sableroj.

Ni ne ricevis kargon, kaj oni ordonis, ke ni veturu hejmen kun balasto. La tuta maristaro iris en la urbon, en la lasta vespero antaŭ la hejmveturo. Mi estis tute sola sur la antaŭferdeko. Tro mi legis kaj tro mi dormis kaj mi ne sciis, kion entrepreni? Jam tagmeze ni ĉesis labori, ĉar tiam la vaĉoj estis jam disdonataj por la veturo. Ĝuste tial ĉiuj iris en la urbon, por ankoraŭ iom tralavi la gorgon, kion ni hejme ne povus fari pro la benata prohibicio.

Jen mi kuris al la balustrado por kraĉi sur la akvon, jen mi rekuris al la kajutoj. Pro la ĉiama observado de la vakaj kajutoj kaj pro la ĉiama gapado al la enuigaj havenaj instalaĵoj, deponejoj, staploj kaj al la tristaj kontorĉeloj kun siaj obskuraj fenestroj, tra kiuj nenio alia videblis ol leteraj kolektoj kaj montoj da plenaskribitaj nego-

caj paperoj kaj frajtleteroj, mi baldaŭ sentis min mize-rega. Ĝi estis tiel neeldireble trista. La vespero proksimiĝis kaj videblis apenaŭ iu homo en tiu parto de la haveno.

Venkis min tute stulta sopiro al la sento de firma tero sub miaj piedoj, sopiro al strato kaj homoj, kiuj promenas babilante sur strato. Jen la afero: Mi volis vidi straton, ĝuste straton, nenion alian. Straton, kiun ne ĉirkaŭas akvo, straton, kiu ne ŝanceliĝas, kiu tute firmas. Mi volis fari donaceton al miaj okuloj, volis grati ilin per la okazo rigardi straton.

"Pro tio vi devus esti veninta pli frue," diris la oficiro, "mi nun ne donos monon."

"Sed mi nepre bezonas dudek dolarojn antaŭpage."

"Kvin vi povas havi, sed ne unu cendon pli."

"Per kvin mi tute ne povas entrepreni ion. Mi devas havi dudek, alie mi morgaŭ malsanus. Kiu tiam farbu la kuirejon? Ĉu vi eble scias tion? Mi devas havi dudek."

"Dek. Sed tio estas nun mia lasta vorto. Dek aŭ neni-on entute. Mi ĉiukaze ne havas la devon doni al vi eĉ nur kvincendon."

"Bone, donu dek. Tio estas ja fia avaro, praktikata kontraŭ mi, sed ni ja ĉion devas toleri, al tio oni nun jam kutimiĝis."

"Subskribu la kvitancon. Ni transskribos ĝin morgaŭ sur la listojn. Tion mi nun ne emas fari."

Tiel mi nun ekhavis la dek. Mi entute volis nur dek. Sed, se mi estus dirinta dek, li sub nenio cirkonstanco donintus pli ol kvin, kaj pli ol dek mi ne bezonis, ĉar mi ne volis pli elspezi; ĉar tio, kio jam enpoŝas, ne revenos hejmen, se oni iris en la urbon.

”Ne ebriiĝu, la loko estas malica,” diris la oficiro, kiam li prenis la kvitancon al si.

Tio estis impertinenta ofendo. La ŝipestro, la oficiroj kaj la inĝenieroj dufoje ĉiutage ebriiĝis en la tuta tempo, kiam ni nun ankrumis en ĉi tiu haveno, sed al mi oni predikas, ke mi ne ebriigu min. Mi eĉ ne pripensis fari tion. Ja kial? Estas tiel stulte kaj neprudente.

”Ne,” mi respondis, ”mi neniam akceptas eĉ guton de tiu veneno. Mi scias, kiom mi ŝuldas al mia ŝtato, eĉ en fremda lando. Jes, sinjoro, mi estas abstina, seka kiel osto. Pri tio vi povas fidi, tia mi estas. Mi kredas je la sankta prohibicio.”

Tuj mi elestis kaj forsaltis de la kesto.

Ĉapitro 2

Estis longa bela somera krepusko. Mi trotis kontenta pri la mondo tra la stratoj kaj ne povis imagi, ke iu estas en la mondo, al kiu tiu mondo ne plaĉas. Mi rigardis la montrofenestrojn kaj mi rigardis la homojn, kiujn mi renkontis. Lindaj knabinoj, ĉe la diablo, estas vere! Kelkaj kompreneble tute ne atentis min, sed ĝuste tiuj, kiuj min alridis, plej ĉarmis. Kaj kiel afable ili povis ridi! Tiam mi venis al domo, kies fasado estis pompe orumita. Tiel gaje tio aspektis, la tuta domo kaj la orumaĵo. La pordoj vaste malfermis kaj diris: "Volu enveni, amiko, nur por iom da tempo, sidiĝu, konduitu kiel hejme kaj forgesu viajn zorgojn."

Mi tute ne havis zorgojn, sed estis tamen gajige, ke iu petis min forgesi la zorgojn. Estis tiel afable. Kaj ene de la domo jam troviĝis amaso da homoj, kaj ĉiuj tre gajis, forgesis la zorgojn, kantis kaj ridis, kaj sonis tie tia plezuriga muziko. Nur por rigardi, ĉu la domo ankaŭ interne havas orumaĵon kiel ekstere, mi eniris kaj sidiĝis sur seĝo. Tuj venis knabo al mi, alridis min kaj metis botelon kaj glason rekte antaŭ mian nazon. Evidente oni vidis ĝin sur mia vizaĝo, ĉar li alparolis min tuj en la angla:

"Bonvolu priservi vin, *mon ami*¹, kaj plezurigu vin kiel ĉiuj aliaj."

Nur gajaj vizaĝoj en la rondo, post semajnoj kun nenio alia antaŭ la okuloj ol akvo kaj fetoranta farbo. Do mi plezuriĝis, kaj ekde tiu momento mi ne povas rememori ion konkretan. Mi ne riproĉas la afablan knabon, sed certe la prohibicion, kiu faris nin tiel feblaj kontraŭ tentoĵoj. Leĝoj ĉiam febligas, ĉar apartenas al la homa naturo, transpaŝi leĝojn, kiujn faris aliaj.

La tutan tempon tre kurioza nebulo estis ĉirkaŭ mi, kaj malfrue en la nokto mi trovis min en la ĉambro de beleta ridanta knabino.

Finfine mi diris al ŝi: "*Well, Mademoiselle*², kioman horon ni nun havas?"

"Ho," ŝi diris kun sia afabla rido, "bela knabo —" Jes, ĝentlemanoj, tion la *Mademoiselly* diris al mi, "bela knabo, ho, bela knabo," ŝi diris, "ne estu plezurfuŝanto, estu kavaliro, ne lasu sola delikatan junan damon je nokto-mezo. Jen eble proksimas rompŝtelistoj, kaj mi tiel terure timemas, la rompŝtelistoj eble povus eĉ murdi min."

Nu, mi ja konas la devon de ruĝsanga usona knabo en tiaj cirkonstancoj, se li estas petata protekti senhelpan feblan damon. Ekde mia unua enspiro oni predikis al mi: Kondutu ĝentile en la ĉeesto de damoj, kaj se damo pe-

1. *mon ami* (france): mia kara

2. *Well, Mademoiselle*: bone, fraŭlino

tas pri io, jen vi devas hasti kaj fari, eĉ se tio kostus vian vivon.

Nu, tre frue matene mi kuregis al la haveno. Sed tie la Tuscaloosa ne videblis. La loko, kie ĝi ankrumis, vakis. Ĝi hejmeniris al la suna Nov-Orleano, hejmiris sen kunpreni min.

Mi vidis infanojn, kiuj devojiĝis kaj ial apartiĝis de la patrino; mi vidis homojn, kies dometo forbrulis aŭ fordrivis en inundo, kaj mi vidis bestojn, kies kunulo estis forpafita aŭ forkaptita. Ĉio ĉi estis tre malĝoja. Sed la plej malĝoja el ĉiuj aferoj estas maristo en fremda lando, kies ŝipo ĵus forveturis sen kunpreni lin. La maristo, kiu restas. La maristo, kiu postrestas.

Ne la fremda lando premas lian animon kaj incitas lin larmi kiel infaneto. Li kutimas fremdajn landojn. Ofte li libervole postrestis kaj ofte li finis la kontrakton, maldungiĝis pro ia kialo. En tiuj kazoj li ne sentis malĝojon aŭ animpremon. Sed, se la ŝipo, kiu estas lia hejmo, forveturas sen kunpreni lin, aldoniĝas al la sento de senpatrieco la mortiga sento de superflueco. La ŝipo ne atendis pro li, ĝi povas aranĝiĝi sen li, ĝi ne bezonas lin. Malnova najlo ie elfalinta kaj postrestanta povas fariĝi fatalejo por la ŝipo; la maristo, kiu ankoraŭ hieraŭ taksis sin tiel grava por la prospero kaj la veturado de la ŝipo, nun malpli valoras ol tiu malnova najlo. La najlon oni ne povus rezigni, la mankon de la maristo, kiu postrestis,

oni ne sentas. La kompanio ŝparas lian salajron. Maristo sen ŝipo, maristo, kiu ne apartenas al ŝipo, malpli valoras ol polvo sur strato. Li apartenas al nenie, neniu volas havi kontakton kun li. Se li nun ie saltus en la maron kaj dronus kiel kato, neniu rimarkus lian mankon, neniu serĉus lin. "Nekonato, evidente maristo," jen ĉio, kion oni dirus pri li.

Kiel karese, mi pensis, kaj mi tuj donis al tiu ondo de ektimo rapidan kaj solidan baton sur la kreston, tiel ke ĝi fuĝis. Faru la plej bonan el la malbono kaj la malbono tuj malaperos.

Egale, Satano prenu tiun malnovan najlokeston, estas aliaj ŝipoj en la mondo, la oceanoj ja tiom grandas kaj tiom vastas. Venos alia, venos pli bona. Kiom da ŝipoj estas en la mondo? Certe duono de miliono. El ili unu certe iam bezonos ferdeklaboriston. Kaj Antverpeno estas granda haveno, ĉi tien tiu miliona duono da ŝipoj sendube iam venos, iam kaj iun fojon certe. Oni devas havi nur paciencon. Mi ja ne povas atendi, ke jam tie sur la akvo tia kesto ankrumas kaj la kapitano en mortotimo krias: "Sinjoro ferdeklaboristo, venu tuj supren al mi, mi bezonas ferdeklaboriston, ne iru al la najbaro, mi petas vin surgenue."

Tiel multe min efektive ne turmentis la malfidela Tuscaloosa. Kiu pensintus tion pri tiu belulino? Sed tiaj ili ĉiuj estas, ĉiuj, ĉiuj. Kaj ĝi havis tiajn purajn kajutojn kaj

tian bonan manĝaĵon. Ĝuste nun ili matenmanĝas, tiuj malbenitaj kanajloj. Mian porcion de ovoĵoj kaj ŝinko ili manĝas aldone. Se almenaŭ ne Slim ricevus ĝin, ĉar al tiu hundo de iu Bob, mi ne emas cedi la plezuron. Sed li certe estos la unua, kiu trafos mian havaĵon kaj elserĉos la plej bonan el ĉio al si, antaŭ ol oni forŝlosos la tuton. Tiuj banditoj tute ne forŝlosos la aĵojn, ili glate dividos ilin inter si kaj diros, ke mi havis nenion, tiuj banditoj kaj friponoj. Ankaŭ al Slim oni ne povas fidi, li ja jam antaŭe ĉiufoje ŝtelis la tualetsapon de mi, ĉar li ne volis lavi sin per ordinara sapo, tiu danda *Broadway*³-stalono. Jes, sinjoro, tion tiu Slim faras; vi ne kredus tion, se vi vidus lin.

Vere ne, tiom mi ne maltrankviliĝis pro la forkurinta kesto. Sed, kio serioze ĉagrenis min, estis, ke mi ne havis eĉ unu favan cendon en mia poŝo. Tiu linda knabino rakontis al mi en la nokto, ke ŝia korege amata patrino tre malsanas, kaj ke ŝi ne havas monon por aĉeti medikamentojn kaj fortikigan manĝaĵon. Mi ne volis respondi la morton de la patrino⁴, kaj tial mi donis al la ĉarma knabino la tutan monon, kiun mi havis ĉe mi. Mi

3. Broadway: granda strato de Nov-Jorko, konata pro siaj multnombraj teatroj

4. Mi ne volis respondi la morton de la patrino: "En Hamburgo, tie mi estis, kun veluro kaj silko min vestis. Mian nomon mi ne rajtas diri, ĉar mi estas, ho ve, damo por mon'. Mia frato skribis: Ho, fratino, ho, venu hejmen! Nia patrino

ricevis riĉan pagon en la formo de mil feliĉaj dankesprimoj de la knabino. Ĉu io estas en la mondo, kio pli feliĉigas ol la mil dankesprimoj de ĉarma knabino, kies amantan patrinon oni ĵus savis de la morto? Ne, sinjoro.

kuŝas tre malsana. Ŝi ploras pro vi, sian solan feliĉon. Jen mi skribis al li: 'Ho, frato, mi ne povas reveni. Mia honoro en Hamburgo restis. Hejmlande mi ne trovos la feliĉon.'"

(Havena kanto, ne rimita de mi)

Ĉapitro 3

Mi sidiĝis sur grandan keston, kiu tie troviĝis, kaj imagis la Tuscaloosa sur la vojo trans la maron. Mi esperis kaj deziris, ke ĝi krake surveturu rokon kaj pro tio devu reveni aŭ almenaŭ per boatoj elŝipigi kaj resendi la maristaron. Sed ĝi ĉirkaŭveturis elegante la rifojn, ĉar mi ne vidis ĝin reveni. Ĉiukaze mi elkore deziris al ĝi ĉiujn katastrofojn kaj pereojn, kiuj entute povas trafi ŝipon. Sed tio, kion mi plej klare revis estis, ke ĝi falu en la manojn de marrabistoj, kiuj de supre ĝis sube elrabu la ŝipon kaj forprenu de la bestaĉo Bob mian tutan havaĵon, kiun li certe jam alproprigis al si, kaj ke ili tiel forte surdraŝu lian rikanan grimacilon, ke la rikanado kaj mokemo forlasu lin por la tuta cetera vivo.

Ĝuste kiam mi komencis iom endormiĝi kaj sonĝi pri tiu belulino, iu frapis min sur ŝultron kaj vekis min. Li tuj komencis tiel fulmrapide paroli al mi, ke mi ekhavis kapturnojn.

Mi furioziĝis kaj diris kolere: "Ĉe l' ratoj, lasu min en paco, mi ne ŝatas vian babilaĉon. Krome, mi ne komprenas eĉ vorton el via parolaĉo. Foriru al la Satano."

"Vi estas anglo, ĉu ne?" li nun demandis angle.

"No, Yank."

"Ha, do usonano."

"Jes, kaj nun lasu min en paco kaj ekiru vian vojon. Mi tute ne volas paroli kun vi."

"Sed mi al vi, mi estas policisto."

"Fortuno vin gardas, kara amiko, bona posteno," mi respondis.

"Kio do? Ĉu vi sidas en la kaĉo, aŭ ĉu vi havas aliajn zorgojn? Maristo, ĉu ne?" li demandis plu.

"Yes, old man. Ĉu vi eble havas postenon por mi?"

"De kiu ŝipo?"

"Tuscaloosa el Nov-Orleano."

"Ĝi eliris je la tria matene."

"Mi ne bezonas vin, por ke vi rakontu tion al mi. Ĉu vi ne scias pli bonan ŝercon? Tiu estas jam malnova kaj fetoras."

"Kie vi havas viajn paperojn?"

"Kiujn paperojn?"

"Vian maristan dokumenton."

Aj ĉokolada kremo kun poma saŭco! Mia marista dokumento? Tiu estis en mia jako kaj la jako estis en mia vestosako, kaj mia vestosako mole kuŝis sub mia dormbreto en la Tuscaloosa, kaj la Tuscaloosa estis . . . , jes ja, kie ĝi nun estas? Se mi nur scius, kian matenmanĝon ili ricevis hodiaŭ! La negro certe denove bruligis la lar-

don, nu, mi foje diros mian opinion al li, kiam mi farbos la kuirejon.

”Nu, via marista dokumento. Vi ja komprenas pri kio temas, ĉu?”

”Mian maristan dokumenton. Se vi celas tiun, do mian maristodokumenton. Jen mi efektive devas konfesi la veron al vi. Mi ne havas maristodokumenton.”

”Neniun maristdokumenton?” Tion oni devus aŭskulti, per kia perpleksa tono li diris tion. Proksimume kva-zaŭ li volus diri: ”Kiiiio? Vi ne kredas, ke ekzistas mara akvo?”

Estis tute neimageble por li, ke mi ne havas maristodokumenton, kaj li demandis pri tio la trian fojon. Sed dum li demandis ĝin ĉifoje, evidente tute maŝinece, li jam supervenkis sian miron kaj aldonis: ”Neniujn aliajn paperojn? Pasporton aŭ identigilon aŭ ion similan?”

”Ne.” Mi diligente traserĉis miajn poŝojn, kvankam mi tre bone sciis, ke mi ne havas eĉ vakan leterkoverton kun mia nomo ĉe mi.

”Kuniru kun mi!” respondis la viro.

”Kien kuniri?” mi demandis, ĉar mi tamen volis scii, kion la viro celas, kaj sur kiun ŝipon li volas fortreni min. Sur rumboaton mi ne reiros, tion mi jam nun povas deklari al li. Tien eĉ dek ĉevaloj ne plu tiros min.

”Kien? Tion vi tuj vidos.” Ke la viro eksterordinare afablas, mi ne povus aserti, sed la dungomastroj nur

tiam afablas kiel mielo, se ili efektive ne povas trovi iun por kesto. La ŝipo, al kiu li volis konduki min, ŝajne estis sufiĉe brava boateto. Mi ne pensis, ke mi tiel rapide venos sur alian keston. Fortunon oni bezonas, kaj ja ne ĉiufoje tuj malesperi.

Finfine ni albordiĝis. Kie? Vi bone divenis, sinjoro, en policejo. Jen oni tuj ĝisfunde ekzamenis min. Post kiam ili jam traserĉis min multfoje kaj neniu kunkudro plu estis sekreto por ili, la viro tute seke demandis min: "Neniu armoj? Neniu iloj?" Nu, en tiu momento mi vere volonte tuj pafus pugnon al li. Kvazaŭ mi povus kaŝi maŝinpafilon en la supra duono de la naztruo kaj levstangon sub palpebro! Sed tiaj estas tiuj homoj. Se ili ne trovas ion, ili asertas, ke oni kaŝis ĝin; ke oni ne posedas tion, kion ili serĉas, ili ne povas kompreni, kaj neniam lernos kompreni. Tiutempe mi ankoraŭ ne sciis tion.

Poste mi devis stariĝi antaŭ pupitro, malantaŭ kiu sidis viro, kiu fikse rigardis min, kvazaŭ mi estus ŝtelinta lian palton. Li malfermis dikan libron, kiu enhavas multajn fotojn. La viro, kiu akompanis min ĉi tien, ludis la interpretiston, ĉar alie ni ne povus interkompreniĝi. Kiam ili bezonis niajn knabojn, en la milito, ili komprenis nin; nun tio delonge pasis, kaj tial ili ne plu devas kompreni ion.

La altranga pastro, tiel li ja aspektis malantaŭ sia pupitro, ĉiufoje rigardis la fotojn kaj poste min, aŭ pli precize, mian vizaĝon. Tion li faris pli ol centoble kaj liaj kolaj muskoloj ne laciĝis, tiom li al kutimiĝis al tiu laboro. Li havis multe da tempo, kaj li disponis pri ĝi tute senĝene. Ja la aliaj devas pagi tion. Do, kial rapidi?

Finfine li balancis la kapon kaj klake fermis la libron. Evidente li ne trovis mian foton. Cetere, mi ne povis rememori, ke mi iam lasis foti min en Antverpeno¹. Fine mi iĝis hunde laca pro tiu enuiga afero kaj diris: "Nun mi ja malsatas. Mi ankoraŭ ne matenmanĝis hodiaŭ."

"Konsentite," diris la interpretisto kaj kondukis min en malvastan ĉambron. Multe da mebloj ne enestis, kaj tiuj, kiuj enis, ne estis faritaj en artmetiejo.

Sed kio estas tio ĉe la fenestro? Strange, ĉi tiu ĉambro ŝajnas kutime servi por konservi la belgan ŝtatan trezoron. La ŝtata trezoro kuŝas ĉi tie sekura, ĉar de ekstere certe neniu povas enveni, tra la fenestro certe neniam, ne, sinjoro.

Mi volus scii, ĉu vere la homoj ĉi tie nomas tion matenmanĝo. Kafo kun pano kaj margarino. Ili ankoraŭ ne

1. . . . lasis foti min en Antverpeno: Tio povus esti, sed en Londono li devis allasi, ke la polico fotas lin en la prizono de Brixton la 1-an decembro 1923. Sur la policaj serĉlistoj de la gvidintoj de la bavara konsilia respubliko en Munkeno mankis la foto de Ret Marut.

venkis la sekvojn de la milito. Aŭ ĉu male la milito estis farita nur por havigi pli grandajn matenmanĝojn? Tiu-kaze ili certe ne gajnis ĝin, kion ajn la ĵurnaloj skribu pri tio, ĉar ili certe jam antaŭ la milito nomis tiujn kelkajn panerojn matenmanĝo, kiu ja prezentas la minimumon de kvalito kaj kvanto, kiun oni ĝuste ankoraŭ kaj nur tial rajtas nomi matenmanĝo, ĉar oni ricevas la manĝeton matene.

Ĉirkaŭ la tagmezo oni denove kondukis min al la al-tranga pastro.

"Ĉu vi deziras iri al Francio?" Tion oni al mi demandis.

"Ne, mi ne ŝatas Francion. La francoj ĉiam devas okupi ion kaj ne povas okupiĝi pri io. En Eŭropo ili ĉiam devas okupi ion kaj en Afriko ĉiam okupe lupi. Kaj tia okupiteco nervozigas min, ili eble povus bezoni tre rapide soldatojn, kaj min, ĉar mi ne havas maristodokumenton, erare trakti kiel aliulon, kiel unu el siaj okupuloj. Ne, al Francio mi iros en neniuj kazo."

"Kiel vi pensas pri Germanio?"

Kiom multe tiuj homoj volas scii pri mi!

"Al Germanio mi same ne ŝatus iri."

"Kial? Germanio estas ja rava lando, kaj tie vi facile retrovos ŝipon."

"Ne, mi ne ŝatas la germanojn. Se oni prezentos la kalkulojn al ili, jen ili estos minacataj de l' okupolupo,

kaj se ili ne povos pagi la kalkulojn, jen ili fariĝos la okupitoj. Kaj ĉar mi ne havas maristodokumenton, ankaŭ tie oni erare povus preni min aliulo, kaj mi devus kunpagi. Tiom da mono mi ja neniam povus perlabori kiel ferdeklaboristo. Tiel mi neniam povus suprengrimpi en la plej suban tavolon de la meza klaso kaj fariĝi valora membro de la homa socio.”

”Kial vi tiel multe babilas pri ĉio? Diru koncize, ĉu vi volas iri tien, ĉu ne?”

Ĉu ili komprenas, kion mi diras, mi ne scias. Sed ŝajnas, ke ili havas multe da tempo kaj ĝojas, ke interparolo okazas.

”Do, traktite kaj paktite, vi iros al Nederlando,” diris la altranga pastro kaj la interpretisto diris al mi.

”Sed mi ne ŝatas la nederlandanojn,” mi respondis, kaj tuj mi volis diri kial, kiam oni diras al mi: ”Ĉu vi ŝatas aŭ ne ŝatas la nederlandanojn, tio tute ne estas nia afero. Diskutu tion kun la nederlandanoj. Francio estus la plej bona rifuĝejo por vi. Sed tien vi ne volas iri. Al Germanio vi same ne volas iri, tio ne estas sufiĉe bona por vi, kaj nun vi simple iros al Nederlando. Fino kaj punkto. Alian landlimon ni ne havas. Pro vi ni ankaŭ ne povas serĉi alian najbaron, kiu eble povus perlukti vian estimon, kaj en la akvon ni ankoraŭ ne volas ĵeti vin. Jen la sola limo, kiu restas al ni kiel lasta. Iru do al Nederlan-

do kaj nun punkton. Ĝoju, ke vi tiel facile eliĝas el la afero.”

”Sed sinjoroj miaj, vi eraras, mi tute ne volas iri al Nederlando. La nederlandanoj okupas . . .”

”Silentu. La demando estas decidita. Kiom da mono vi havas?”

”Vi ja traserĉis ĉiujn miajn poŝojn kaj vestajn kunkudrojn. Kiom da mono vi trovis?” Kiel ne koleriĝi en tia momento? Ili traserĉas dum horoj kvazaŭ per lupeo min, kaj poste ili eĉ farisee demandas, kiom da mono mi havas.

”Se vi ne trovis monon, mi ne havas monon,” mi diris.

”Estas bone. Tio estas ĉio. Rekonduku lin en la ĉelon.”
La altranga pastro per tio finis sian ceremonion.

Ĉapitro 4

En la malfrua posttagmezo oni kondukis min al la stacidomo. Du viroj, unu el ili la interpretisto, akompanis min. Evidente ili pensis, ke mi neniam en mia vivo veturis trajne, ĉar mi ne rajtis fari ion sola. Unu el ili aĉetis la biletojn, dum la alia restis tuj apud mi kaj atentis, ke ne tamen iu ŝtelisto ŝarĝu sin per la vana laboro ankoraŭfoje traserĉi miajn poŝojn. Ĉar tie, kie la polico traserĉis poŝojn, eĉ la plej lerta poŝoŝtelisto ne plu trovus kupreron.

La viro, kiu aĉetis la biletojn, ne donis mian bileton al mi. Verŝajne li supozis, ke mi tuj vendus ĝin. Ili poste tre ĝentile akompanis min al la kajo kaj kondukis min al mia kupeo. Mi supozis, ke ili tie adiaŭos min. Sed tion ili ne faris. Ili sidiĝis apud mi en la kupeo, kaj por protekti min kontraŭ falo el la trajno, ili sidigis min meze de si. Ĉu belgaj policaĵ oficistoj ĉiam estas tiel ĝentilaj al homoj, mi ne scias. Mi mem ne povis plendi pri ili. Ili tiam donis cigaredojn al mi. Ni fumis kaj la trajno ekvaporis. Post nelonga veturo ni forlasis la trajnon kaj venis en urbeton. Denove oni kondukis min al policejo. Mi devis sidiĝi sur benko en tiu ĉambro, kie restadis ĉiuj ĉi poli-

caj oficistoj, kiuj tenis sin deĵorpretaj. La du viroj, kun kiuj mi venis, rakontis pri mi grandan historion. La ceteraj bastonuloj, aŭ pli bone dirite, la aliaj policaj oficistoj, algapis min el la tuta vico, kelkaj kun tia intereso, kvazaŭ ili vidis neniam tian viron, kaj aliaj, kvazaŭ mi ie estus entrepreninta duoblan rabosuicidon.

Ĝuste tiuj, kiuj tiel fatale fikse rigardis min, kiuj konsideris min kapabla je la plej hororaj krimoj, kies farintojn oni ankoraŭ ne kaptis, kaj kiuj opiniis min kapabla estonte eĉ multe pli grave krimi, ol mi jam krimis laŭ ilia netrompebla opinio, subite enfluigis al mi la penson, ke mi atendas ĉi tie la ekzekutiston, kiu videble ne estas hejme kaj kiun oni tial unue devas serĉi.

Neniu kaŭzo por ridi, ne, sinjoro. Estis tre serioza afero. Oni devas nur iom primediti tion. Mi ne havis maristodokumenton, mi ne havis pasporton, mi ne havis identigilon, mi ne havis iun alian paperon, kaj ankaŭ mian foton la altranga pastro ne trovis en sia dika libro. Se tie almenaŭ mia foto enus, tiukaze li ja tuj scius, kiu mi estas. Ke ili postrestis pobe de la Tuscaloosa, tion povus rakonti kiu ajn, kiu vagabondas tie. Loĝejon mi havis nenie en la mondo. Aŭ ladokesto aŭ marista domo. Ankaŭ membro de iu komerca ĉambro mi ne estis. Mi ja estis neniulo. Nu, nun mi demandas vin, kial la povraj belgoj almoznutru neniulon, dum ili jam nutras tiom da neniulaj infanoj, kiuj ja almenaŭ duone apartenas al tie.

Sed mi apartenis per neniun duono tien. Mi estis nur plia kaŭzo por denove devi prunti monon de Usono. Pendigi min, estis la plej abrupta kaj simpla metodo por liberiĝi de mi. Mi eĉ ne povis kondamni ilin pro tio. Neniu homo zorgis pri mi, neniun homon demandus pri mi, eĉ mian nomon ili ne devus enskribi en siajn dikajn librojn. Kaj tute certe mi estis pendigota. Ili nur atendas la ekzekutiston, kiu regas la metion, alie tio estus ja neleĝa ago kaj murdo.

Kiom mi pravis! Jen la pruvo. Unu el la bastonuloj proksimiĝis kaj donis al mi du dikajn cigaredoskatolojn, la lastan donaĵon al la kompatinda pekinto. Poste li donis ankaŭ alumetojn, sidiĝis flanke de mi kaj per misa lingvo alparolis min, ridis kaj afablis, frapis mian ŝultron kaj diris: "Ne estas tiel terure, amiko, ne faru tragedion el ĝi. Fumu, por ke la longa tempo ne enuigu vin. Ni devas atendi ĝis noktiĝos, alie ni ne povus bone fari ĝin."

Ne fari el tio tragedion, se la pendumilo atendas min! Ne tiel terure! Mi volus scii, ĉu oni jam provis tion kun li, ke li tiel decide povas diri: ne tiel terure, kaj atendi ĝis malhelas. Klare, dum la taga helo mankas al ili iom la kuraĝo, ni ja eble povus renkonti iun, kiu konas min, kaj tiam la plezuro estus fuŝita. Sed ne havas sencon jam nun lasi la kapon pendi, sufiĉe baldaŭ ĝi pendos per si mem en la maŝo. Kaj antaŭ ĉio mi fumas nun kiel fabri-

ka kamentubo, por ke ili finfine ne ŝparu eĉ la cigaredojn.

La cigaredoj gustas je nenio. Nura pajlo. Fulmotondro! Mi ne volas pendii. Se mi nur scius kiel tiri min el ĉi tio. Sed ili sen interrompo ĉirkaŭas min. Kaj ĉiu novulo, post la deĵortransdono envenanta, alĝapas min kaj volas scii de la aliaj, kiu mi estas, kial mi estas ĉi tie, kaj kiam oni pendigos min. Kaj poste ĉiu rikanas per la tuta vizaĝo.

Naŭza popolo. Mi volus scii, kial ni helpis al ili.

Pli poste mi ricevis mian lastan manĝon. Sed pliaj tiaj avaruloj sur la tuta mondo ne ekzistas! Tion ili do nomas ekzekuta manĝo: terpoma salato kun peceto da hepata kolbaso kaj kelkaj pantranĉaĵoj kun margarino. Mi povus verŝi larmojn pro tio. Ne, la belgoj ne estas bonuloj, kaj nur je haro mi evitis vundiĝon, kiam ni devis tiri ilin el la kaĉo kaj perdis nian monon. Tiu, kiu donis al mi la cigaredojn kaj provis persvadi min, ke ne estas tiel terure esti pendigita, nun diris: "Nu, vi estas bona usonano, vi ne trinkas vinon, ĉu?" Kaj ĉe tio li alridetis min. Je la diablo, se li ne estus tia hipokritulo kun sia "ne tiel terure," oni povus preskaŭ kredi, ke ekzistas ankaŭ simpatiaj kaj afablaj belgoj.

"Bona usonano? Merdon sur Usonon! Mi trinkas vinon, kaj multe."

”Tion mi ja tuj pensis,” ridetante diris la bastonulo. ”Vi estas sincera. Tio estas nura oldulina idiotaĵo, via tielnomata prohibicio. Vi lasas vin komandi de onjoj kaj preĝinoj. Min tio ja ne koncernas. Sed ĉi tie ĉe ni ankoraŭ la viroj portas la pantalonon.”

Dio, jen finfine iu, kiu vidas la dornon en la karno. Tiu viro ne povas perdiĝi, tra malklara akvo li povas rigardi ĝis la fundo. Domaĝe por la viro, ke li estas bastonulo. Sed, se li ne estus bastonulo, mi verŝajne neniam estus rigardinta tiun gigantan glason da bona vino, kiun li nun antaŭmetis al mi. La prohibicio estas grava hontindaĵo kaj peko, kiu estu lamentita al Dio. Mi certas, ke ni iam kaj ie krimis teruraĵon, ĉar ili forprenis de ni tiun delektindan donacon de Dio.

Ĉirkaŭ la deka vespere la donacinto de la vino diris al mi:

”Do, nun estas nia tempo, maristo, venu kun mi.”

Kiun sencon havus krei: ’Mi ne volas esti pendigita!’, se dekkvar viroj ĉirkaŭas min, kaj ĉiuj dekkvar reprezentas la leĝon. Jen la sorto. Nur du horojn la Tuscaloosa bezonintus atendi pro mi. Sed du horojn mi ne valoras, kaj ĉi tie mi eĉ multe malpli valoras.

Sed pensi pri tiu senvaloreco tamen indignigis min, kaj mi diris:

”Mi ne kuniros, mi estas usonano, mi plendos pri tio.”

”Ha!” unu el ili moke alkriis min. ”Vi ne estas usonano. Do pruvu tion. Ĉu vi havas maristodokumenton? Ĉu vi havas pasporton? Nenion vi havas. Kaj kiu ne havas pasporton, estas neniŭ. Ni povas fari al vi, kio plaĉas al ni. Kaj tion ni nun faros, sen demandi vin. For la bubon!”

Ne necesis, ke mi provoku eĉ baton sur la kranion, ĉar fine ja nur mi estus la stultulo. Tial mi devis ektroti.

Maldekstre de mi iris la gajulo, kiu mise parolis la anglan, kaj dekstre de mi iris alia. Ni forlasis la urbeton kaj baldaŭ ni troviĝis sur vastaj kampoj.

Regis timiga tenebro. La vojo, kiun ni iris, estis nur malglata, radspurumita kampvojo, sur kiu oni nur streĉe povis paŝi. Volonte mi estus sciinta, kiom longe ni tiel migros, ĝis ni atingos la tristan celon.

Nun ni forlasis eĉ tiun aĉan vojon kaj devojiĝis sur herbejan padon. Dum sufiĉe longa tempo ni iris tra herbejoj.

Nun venis mia momento por elhaŭtiĝi¹. Sed tiuj uloj videble estis telepatiuloj. Ĝuste, kiam mi volis delikate svingi brakon al la mentono de unu el miaj apuduloj, la viro kaptis mian brakon kaj diris: ”Nun ni alvenis. Nun ni devas adiaŭi unu la alian.”

Kia hororsento, kiam oni tiel klare kaj reale vidas alrampi la lastan minuton. Eĉ ne alrampi. Ĝi sobre staris antaŭ mi. Tre sekis en mia gorĝo. Volonte mi estus trin-

1. elhaŭtiĝi (slange): fuĝi, foriĝi

kinta gluton da akvo. Sed nun ja eĉ pri akvo pensi ne plu eblis. Tiujn kelkajn minutojn mi ja eltenos sen akvo, tion ili certe dirus al mi. Pri la donacinto de la vino mi ne supozis antaŭe, ke li estas tia hipokritulo. Ekzekutiston mi imagis alia. Kia senhonora kaj fia metio, kvazaŭ ne ekzistus aliaj profesioj. Fi, ĝuste ekzekutisto, bestaĉo, kaj tio eĉ profesie.

Neniam antaŭe en la vivo mi tiel forte sentis, kiel grandioze bela estas la vivo. Grandioza kaj senmezure bela la vivo eĉ tiam estas, kiam oni venas laca kaj malsata al la haveno kaj eltrovas, ke la ŝipo estas for, kaj ke oni postrestis sen maristodokumento. Vivi ĉiam estas bele, kiom ajn trista ĝi ŝajnas. Kaj tiel simple esti forviŝita en tia nigra nokto sur vasta kampo, kvazaŭ oni estus ne pli ol vermo! Tion mi ne atendis de la belgoj. Sed kulpas tion la prohibicio, kiu tiom febligas la homojn kontraŭ tentoj. Se mi havus ĉi tie inter miaj manoj, ĝuste nun, tiun *Mr. Volstead*! La edzino de tiu viro tre verŝajne pli ol nur malicis, ke li povis elpensi kaj elfetori ion tian! Kaj tamen mi ĝojas, ke tiuj milionoj da sakroj, kiuj ŝargas la vivon de tiu viro, ne tondras sur min.

"*Oui*², *Mister*, ni devas adiaŭi. Eble vi estas tre simpattia homo. Sed momente ni tute ne bezonas vin."

Sed tial ili ja ne devas tuj pendigi min.

2. Oui (france): jes

Li levis brakon. Evidente por ĵeti la ŝnuron ĉirkaŭ mian kolon kaj strangoli min. Ili ne faris al si la penon konstrui eŝafodon. Tio kostus tro multe.

”Jen,” li nun diris kaj montris per etendita brako, ”tie transe, ĝuste kien mi montras, estas *Netherlands*³. Vi certe jam aŭdis pri ĝi, ĉu?”

”Jes.”

”Nun iru rekte en tiu direkto, kiun mi signas per la brako. Mi ne supozas, ke vi nun tie trafos kontroloficiston. Ni informiĝis. Sed, se vi vidos iun, penu preteriri lian vojon. Post horo de irado, ĉiam en tiu direkto, vi venos al la fervojlinio. Sekvu tiun linion ankoraŭ dum iom da tempo en la sama direkto, kaj tiam vi atingos la stacion. Restu proksima al ĝi, sed ne montru vin. Ĉirkaŭ la kvara matene venos multaj laboristoj, kaj tiam iru al la giĉeto kaj diru nur: *’Rotterdam, derde klasse’*⁴, sed ne diru eĉ unu vorton pli. Jen kvin guldenojn por vi.”

Li donis al mi kvin monbiletojn.

”Kaj jen ankoraŭ iom da manĝo por la nokto. Ne aĉetu ion en la stacio. Baldaŭ vi estos en Roterdamo. Tiom longe vi certe eltenos.”

Nun li donis al mi pakaĵeton, en kiu laŭ la ekstera ŝajno enestis buterpanoj. Poste mi ricevis ankoraŭ pakaĵon da cigaredoj kaj skatoleton da alumetoj.

3. Netherlands (angle): Nederlando

4. Rotterdam, derde klasse (nederlande): Roterdamon, tria klaso

Kion diri pri tiuj homoj? Ili estas senditaj por pendi mi kaj donas al mi eĉ monon kaj buterpanojn, por ke mi povu forkuri. Ili havas tro bonan koron por tiel fridsange mortigi min. Kiel ne ami la homojn, se oni trovas tiajn bonulojn eĉ inter policistoj, kies koroj pro la ĉiama homĉasado tute ŝtoniĝis? Mi skuis tiel forte la manojn al ambaŭ, ke ili ektimis, mi volus forporti la manojn.

”Ne tiel spektaklu, iu transe eble eĉ aŭdos vin, kaj tiam ĉio estos en la kaĉo. Kaj tio ne estus bona, tiukaze ni povus komenci denove.” La viro pravis. ”Kaj nun bone aŭskultu, kion mi diras al vi.” Li parolis duonlaŭte, sed penis ekzakte ĉion klarigi al mi per tio, ke li ripetis plurfoje la eldirojn. ”Nur ne venu denove al Belgio, pri tio mi avertas vin. Se ni trovos vin ankoraŭfoje interne de niaj limoj, vi povas fidi je tio, ke ni metos vin por la tuta vivo en prizanon. Por ĉiam prizono. Kara amiko, tio signifas multon. Do, mi eksplicite avertas vin. Ni ja ne scias, kien sendi vin. Vi ne havas maristodokumenton.”

”Sed eble mi al la konsulo . . .”

”Silentu, mi petas, pri via konsulo. Ĉu vi havas maristodokumenton? Ne. Nu do. Tial via konsulo elĵetos vin tiel, ke krakos, kaj tiam vi sidos sur nia nuko. Vi nun scias, pri kio temas. Por ĉiam en prizono.”

”Tute certe, sinjoroj miaj, mi promesas tion. Mi ne denove enpaŝos vian landon.” Ja kial? Ligis min nenio al

Belgio. Por diri la veron, mi ĝojis eliri. Nederlando multe pli bonas. La nederlandanojn oni komprenas almenaŭ duone, dume ĉi tie oni ne komprenas eĉ vorton de tio, kion la homoj diras, kaj kion ili celas.

”Bone do. Nun vi estas avertita. Do, hop! Kaj estu memgarda. Se vi aŭdos paŝojn, kuŝiĝu surtere ĝis la paŝoj pasos. Ne lasu vin kapti, alie kaptos ni vin, kaj tiam via vivo aĉos. Feliĉan vojaĝon.”

Ili formarŝis kaj lasis min sola. Tiam mi ekmigris, feliĉa kiel tajloro. Ĉiam en tiu direkto, kiun ili montris al mi.

Ĉapitro 5

Roterdamo estas ĉarma urbo, se oni havas monon. Mi eĉ monujon ne havis, en kiun mi povus meti ĝin, se mi havus monon.

Tie en la haveno estis eĉ ne unu ŝipo, kiu bezonus ferdeklaboriston aŭ Unuan Inĝenieron. En tiu tempo estis tute egale al mi. Se oni postulus sur iu ŝipo Unuan Inĝenieron, mi akceptus la postenon. Tuj. Sen eĉ palpebrumi. La spektaklo ekus ja nur, se la ŝipo veturus surmare. Kaj tiam ili ne tiel simple povus ĵeti min en la maron. Ĉiam io estas farbenda, jam troviĝus la ĝusta laboro. Mi finfine ne estas tia homo, kiu insistus ĝis murdo kaj ĝis morto la salajron de la Unua Inĝeniero. Mi ja povas rabati iomete. Je Dio, en kiu butikoj oni ne foje marĉandas la prezon suben, eĉ se la pentrita afiŝo "Fiksaj prezoj" pendas kiom ajn granda?

Spektaklo tute certe estus okazinta; ĉar tiutempe mi povis distingi nek krandon disde valvo nek bielon de ŝafto. Tio evidentiĝus ĉe la unua signalo, kiam la ŝipestro sonorilus suben "helike lante" kaj la ladokesto eksagus antaŭen, kvazaŭ devigita gajni je morto kaj vivo la Bluan Rubandon. Amuzaĵo estus tamen. Sed ne depen-

dis de mi, ke mi ne povis elprovi la ŝercon, ĉar neniŭ serĉis Unuan Inĝenieron. Estis serĉata neniŭ, sur neniŭ ŝipo. Mi estus akceptinta ĉion inter kapitano kaj kuireja knabo. Sed eĉ ne kapitanon ili bezonis . . .

Vagadis tie tiom da maristoj, kiuj ĉiuj atendis ŝipon. Spite tion ankoraŭ eĉ kapti ŝipon, kiu transveturos al la Ŝtatoj, tio estas pli ol nur senespera. Ĉiuj volas suriri keŝton, kiu transveturos, ĉar ili ĉiuj volas ĵeti tie la ankron kaj poste elsalti pobe¹. Ĉar ĉiu el ili supozas, ke trans la oceano oni nutras la homojn per sekvinberoj, ke ili devos nur malfermi la bekon. Sed merdo. Kaj poste sidas milopoj da ili en la havenoj kaj atendas ŝipon, kiu portos ilin hejmen, ĉar tamen ĉio montriĝis tute alia ol ili imagis. La ora epoko pasis, alikaze neniŭ estus trovinta min sur la Tuscaloosa, kie mi estis ferdeklaboristo.

Sed la du afablaj belgaj bastonuloj donis al mi konsilon: Mia konsulo. Mia! Ambaŭ bastonuloj ŝajne pli bone konis mian konsulon ol mi. Strange. Estas ja mia devo pli bone koni lin, ĉar li estas mia. Pro mi li estas en la mondo. Pro mi li ricevas sian pagon.

La konsulo anoncas dekojn da ŝipoj por la landlima imposto, do li certe ankaŭ ion scias pri bezonataj ferdeklaboristoj, des pli, se mi ne havas monon.

”Kie vi havas vian maristodokumenton?”

”Mi perdis ĝin.”

1. elsalti pobe (slange): fuĝi

”Ĉu vi havas pasporton?”

”Ne.”

”Ateston de ŝtataneco?”

”Neniam havis.”

”Ja kial do vi venis ĉi tien?”

”Mi pensis, ke vi estas mia konsulo, kaj ke vi helpos al mi.”

Li rikanis. Strangas, ke la homoj ĉiam rikanas, se ili volas doni baton al iu.

Kaj kun tiu rikano sur la lipoj li diris: ”Via konsulo, ĉu? Tion vi devas pruvi al mi, kara viro, ke mi estas via konsulo.”

”Sed mi ja estas usonano kaj vi estas usona konsulo.”

Tio certe estas vera.

Sed ŝajne tamen ne estis vera, ĉar li diris: ”Usona konsulo, eĉ se ĉimomente ankoraŭ ne la Unua, mi efektive estas. Sed ĉu vi estas usonano, tion vi devas ankoraŭ pruvi al mi. Kie vi do havas viajn paperojn?”

”Mi ja diris al vi jam, ke mi perdis ilin.”

”Vi perdis ilin. Kiel oni povas perdi siajn paperojn? Tiujn oni ja ĉiam portas ĉe si, tiom pli, se oni troviĝas en fremda lando. Vi ja eĉ ne povas pruvi, ke vi efektive estis sur la Tuscaloosa. Ĉu vi povas pruvi tion?”

”Ne.”

”Do, kial vi venis ĉi tien? Eĉ se vi veturis sur la Tuscaloosa, eĉ se pruveblus, ke vi vere veturis sur la ŝipo, tio

estus eĉ ne la plej malgranda pruvo, ke vi estas civitano. Sur usona ŝipo ankaŭ hotentotoj povas labori. Do, kial vi venis ĉi tien? Cetere, kiel vi venis sen paperoj de Antverpeno ĉi tien al Roterdamo? Tio estas neordinara.”

”La polico min ja . . .”

”Mi tre petas vin, ne venu al mi ankoraŭfoje kun tia rakonto. Kie oni iam aŭdis tion, ke ŝtataj oficistoj sendis iun per tia neleĝa vojo trans limon en fremdan landon? Sen paperoj? Tiel vi ne povas trompi min, kara viro.”

Kaj ĉion tion li diris rikanante kaj kun eterna rideto, ĉar usona oficisto ĉiam devas rideti, eĉ se li anoncas mortkondamnon. Tio estas lia respublika devo. Sed kio plej multe incitis min, estis, ke li ludis dum sia parolado ĉiam per krajono. Jen li zigzagis per ĝi sur la tabloplato, jen li gratis per ĝi en sia hararo, jen li tamburis per ĝi *”My old Kentucky home²”*, kaj jen li klakis per sia krajono tiel sur la tablo, kvazaŭ li volus per ĉiu klako firmnajli vorton.

2. My old Kentucky home (angle): Mia malnova hejmlando
Kentucky, usona popolkanto.

Strofo:

*La negroj ĝojas en la Kentucky-land’,
ĉar brilas somera la sun’.
Herbejoj floras, kaj el la foliar’
sonas ĉiam birdaj kantoj nun.
Infanoj ludas senzorge ĉe l’ kaban’,
gajege, sen melankoli’;*

Plej volonte mi estus ĵetinta la inkujon sur lian vizaĝon. Sed mi devis pacienci, kaj tial mi diris: "Eble vi povas havigi al mi alian ŝipon, por ke mi venu hejmen. Ja povas esti, ke iu ŝipestro bezonas ankoraŭ viron aŭ, ke iu malsaniĝis."

"Ŝipon? Sen paperoj ŝipon? Ne de mi, tiukaze tute ne peni reveni al mi."

"Sed kie mi ricevu paperojn, se vi ne donas paperojn al mi?" mi demandis.

"Ĉu tio eble estas mia afero, kie vi ricevu paperojn? Ja mi ne forprenis ilin. Ĉu ne? Jen ĉiu vagabondo, kiu ne pli bone atentis pri siaj paperoj, povus veni kaj postuli paperojn."

"Sinjoro," mi tamenis je tio, "mi supozas, ke ankaŭ jam aliaj homoj, kiuj ne estas laboristoj, perdis siajn paperojn."

"Vi pravas, sed tiuj homoj havas monon."

"Ha, tiel!" mi kriis laŭte. "Nun mi komprenas."

*sed iam frapos malĝojo al la pord'
nur pro vi, Kentucky-land', pro vi!
Ploru ne, negrino,
ĉe la kampara rand'
Sed eksonu kanto por la Kentucky-hejm',
por la kara, malproksima land'!*

trad. Paul Bennemann

”Nenion vi komprenas,” li rikanis, ”mi volas diri, ke temas tiukaze pri homoj, kiuj posedas kromajn legitimaĵojn, homoj, pri kiuj neniu dubo eblas, homoj, kiuj havas hejmon, kiuj havas adreson.”

”Do estas mia kulpo, ke mi havas nek vilaon nek hejmon nek alian adreson ol mian laborlokon?”

”Tio ne estas mia afero. Vi perdis la paperojn. Zorgu do, ke vi ricevu aliajn. Mi devas agi laŭ miaj direktivoj. Ne estas mia kulpo. Ĉu vi jam manĝis?”

”Mi ja ne havas monon kaj mi ne petis almozon ĝis nun.”

”Atendu momenton.”

Li ekstaris kaj iris en alian ĉambron. Post kelkaj minutoj li revenis kaj donis al mi karton.

”Jen manĝokarto por tri kompletaj tagoj en la marista domo. Se ĝi estos elĉerpita, venu senĝene ankoraŭfoje. Provu denove, eble vi trovos alian ŝipon, ŝipon de alia nacio. Kelkaj ne tiel precize kontrolas. Mi ne rajtas fari aludojn. Vi mem devas eltrovi tion. En tiu ĉi kazo mi estas absolute senpotenca. Mi estas nura servisto de la ŝtato. *’m sorry, old fellow, can’t help it. Good bye and g’d luck!*^B”

3. *’m sorry, old fellow, can’t help it. Good bye and g’d luck*
(angle): Mi bedaŭras, amiko mia, mi ne povas helpi al vi.
Adiaŭ kaj multe da feliĉo.

Eblas, ke la viro pravas. Eble li tute ne estas tia bestaĉo. Kial homoj estu bestaĉoj? Preskaŭ mi supozas, ke la ŝtato estas la bestaĉo. La ŝtato, kiu forprenas la filojn de la patrinoj, por ĵeti ilin antaŭ la idolojn. Ĉi tiu viro estas la servisto de la bestaĉo, tiel kiel la ekzekutisto estas la servisto de la bestaĉo. Ĉion, kion la viro diris, li lernis parkere. Certe li devis lerni tion, kiam li trapasis la ekzamenojn por fariĝi konsulo. Tio glitis tute glate el li. Al ĉiuj miaj eldiroj li havis konvenan respondon, kiu tuj ŝtopis mian buŝon. Sed kiam li demandis: "Ĉu vi malsatas? Ĉu vi jam manĝis?" li subite fariĝis homo kaj ĉesis esti bestaĉservisto. Havi malsaton estas io homa. Havi paperojn estas io malhoma, io kontraŭnatura. Tial la diferenco. Kaj jen la kialo pro kio homoj pli kaj pli ĉesas esti homoj kaj fariĝas figuroj el papermaĉaĵo. La bestaĉo ne bezonas homojn; tiuj kaŭzas tro multe da laboro. Figuroj el papermaĉaĵo pli bone lasas sin starigi en vicoj kaj meti en uniformojn, por ke la servistoj de la bestaĉo povu vivi pli oportune. Yesser⁴, Jes, sinjoro.

4. Yesser: la angla parolkuntiro de Yes kaj Sir, do: Jes, sinjoro

Ĉapitro 6

Tri tagoj ne ĉiam estas tri tagoj. Estas tre longaj tri tagoj kaj estas tre kurtaj. Ke tri tagoj povus esti tiom kurtaj kiom tiuj tri tagoj, en kiuj mi havis bonan manĝon kaj liton, mi ne estus kredinta. Mi volis sidiĝi unuafoje por matenmanĝo, kaj jam la tri tagoj pasis. Sed eĉ se ili daŭrus la dekoblan tempon, al la konsulo mi ne reirus. Ĉu mi eble denove aŭskultu liajn parkere lernitajn ekzamenajn demandojn? Ion pli bonan ol antaŭe li ankaŭ nun ne scius. Ŝipon li ne povis havigi al mi. Do, kiun sencon havus permesi, ke li verŝu sur min siajn paroladojn? Eble li denove estus doninta al mi karton. Sed ĉifoje certe jam kun gesto kaj mieno, kiuj kunpremigus al mi jam la gorgon, antaŭ ol mi metus kuleron en la supon. La tri tagoj fariĝus eĉ multe pli kurtaj ol la antaŭaj.

Sed la plej grava kialo estis, ke mi ne volis perdi el mia memoro la etan pecon da homo, kiu li estis okaze de mia unua vizito en tiu momento, kiam li zorgis, ke mi bone fartas. Certe li ĉifoje transdonus la karton al mi kun la plena supereco de bestaĉservisto kaj kun moralornamitaj paroloj, ke ĉi tiu fojo devos esti la lasta fojo, ke venas tro multaj kaj ke oni ne ripozu kun tio, ke oni

mem faru ion por antaŭeniri. Prefere mortaĉi, ol iri plian fojon tien.

Ho, amata animo de maristo, kiom mi malsatis! Tiom mi malsatis, ke Dio indulgu. Kaj tiom laca pro la dormado en pordegaj vojoj kaj anguloj, ĉiam ĉasate dum facila dormo de la noktpolico, kiu per poŝlampoj enlumigis en la pordegajn vojojn kaj angulojn. Ĉiam devi memgardi, dum dormo devi aŭskulti la patrolon je kvindekpaŝa distanco, por sufiĉe frue eklepori. Esti kaptita de ili signifus la labordomon.

Kaj en la haveno neniuj ŝipo, kiu bezonus iun. Tie tiom da centoj de maristoj el la propra lando estas surpiede, kiuj serĉas ŝipon kaj havas bonajn paperojn. Kaj neniuj laboro en la fabrikoj, neniuj laboro en iu vendejo. Eĉ se laboro estus, la viro, kiu donas la laboron, tute ne rajtus doni ĝin al mi. Ĉu vi havas paperojn? Ne? Domaĝe, mi ne rajtas dungi vin. Vi estas eksterlandano.

Kontraŭ kiuj la pasportoj kaj enirvizoj estas direktataj? Kontraŭ la laboristoj. Kontraŭ kiuj celas la limigado de enmigroj en Usonon kaj en aliajn landojn? Kontraŭ la laboristoj. Kaj je kies instigo kaj pro kies potenca subteno ofte estas kreitaj tiuj leĝoj, kiuj neniigas la liberon de la homoj, kiuj devigas ilin vivi tie, kie ili ne volas vivi, kiuj malhelpas ilin iri al tiu parto en la mondo, en kiuj ili ŝatus vivi? Je instigo kaj pro subteno de la laboristaj organizoj. Bestaĉo en la bestaĉo: Mi gardas mian klanon;

tiu, kiu ne apartenas al mia klano, povas pereĵi, se tiu pereas, tiom pli bone, ĵen unu rivalo malpli. Jes, sinjoro.

Tiom malsata kaj tiom laca! Poste venas la tempo, en kiu oni ne plu pensas pri tio, ĉu faras diferencon, erare interŝanĝi la monujon de alia, kiu ne malsatas, kun la propra ne ekzistanta monujo. Oni ne devas erare interŝanĝi ilin, oni komencas, sen intenci tion, pensi pri la monujo de homo, kiu ne malsatas.

Sinjoro kaj damo staris antaŭ montrofenestro, kiam mi preteriris.

La damo diris: "Ja diru do, Fibby, ĉu tiuj beletaj retikuloj ne vere tre ĉarmas?"

Fibby diris tra la dentoj ion, kio povis esti aŭ konsento aŭ la malo, sed ankaŭ bone eblis, ke tio signifis: Lasu min trankvila kun viaj banalaĵoj!

La damo: "Mi diras, ke vere, ili vere ravas, estas originala pranederlanda metia artaĵo."

"Klare," Fibby nun seke diris, "aŭtentika pranederlanda, kopirajtita en 1926."

Tio estis por mi muziko de la sferoj. Nun mi konvinkiĝis. Mi nun tre rapidis kaj ne perdis plian sekundon. Jen ja la pura oro kuŝis antaŭ mi meze de la strato.

Ŝajnis al mi, ke Fibby multe pli amuziĝis pri tio, kion mi rakontis al li, ol pri tio, kion rakontis lia edzino aŭ lia amikino aŭ lia . . . nu, sinjoro, ne estas mia afero, en kiu rilato de parenceco ili ambaŭ troviĝis, sed ĉiuokaze li

delekte amuziĝis pri mia rakonto. Li ridetis, poste li ridis, kaj fine li kriis tiom, ke la homoj ekhaltis. Se mi ne estus aŭdinta tuj pro lia "Tsat so¹!", kiam li unue intonaciis ĝin, de kie li venis, jam perfidus lin lia nebridebla ridado. Tiel povas ridi nur usonano, jes ja, ili povas ridi.

"Do bubo, vi prezentis grandioze vian rakonton." Kaj jam li denove ridis. Antaŭe mi supozis, ke li eklarmos pro mia trista rakonto. Nu, li ja ne estis en mia haŭto. Li rigardis ĉion ĉi de la komika flanko.

"Nu diru do, Flory," li turnis sin al sia akompanulino, "ĉu tiu birdeto, falinta el la nesto, ne efektive grandioze prezentis sian rakonton?"

"Efektive, tre amuze. De kie vi estas? El Nov-Orleano? Tio ja estas tute rava. Tie loĝas eĉ nun onklino de mi, Fibby. Ĉu mi ne jam rakontis pri onklino Kitty el Nov-Orleano, Fibby? Mi kredas, ke jes. Vi ja scias, tiu, kiu ĉiam tiel komencas ĉiun frazon: 'Kiam avĉjo ankoraŭ loĝis en *South Carolina* . . . '

Fibby tute ne atentis, kion diris lia Flory, li lasis ŝin paroli, kvazaŭ ŝi estus akvofalo, al kiu li kutimiĝis. Li fingrumis en siaj poŝoj kaj aperigis dolarbileton: "Ne estas por via rakonto mem, amiko mia, sed estas por tio, ke vi tiel majstre prezentis la rakonton. Bone scipovi prezenti rakonton, kiu ne veras, tio estas talento, amiko

1. Tsat sol!: nenorma parolmaniero de la angla: That's so!,
Esperante: Tiel estas!

mia. Vi estas artisto, ĉu vi scias tion? Por diri la veron, estas domaĝe, ke vi tiel vagabondas en la mondo. Vi povus enspezi multe da mono, kara amiko. Ĉu vi scias tion? Ĉu li ne vere estas artisto, Flory?” li turnis sin denove al sia . . . nu, ni diru, edzino; ne estas mia afero, ili certe havas sian pasporton tia, kia ili bezonas ĝin.

”Vi ja pravas, kompreneble, Fibby,” Flory respondis en ekstazo, ”vi pravas, ke li estas granda artisto. Mi havas ideon, Fibby, tuj demandu lin, ĉu ni povus havi lin por nia vespera festeno. Certe, tiel ni povus superatuti la Pennington’ojn, tiun favan bandon.”

Do, estas efektive lia edzino.

Fibby dediĉis eĉ ne la plej minimuman atenton al la akvofalo. Li ridetis kaj ridis plu. Li denove fingrumis en siaj poŝoj kaj venigis plian fojon dolarbileton en la taglumon.

Nun li donis al mi ambaŭ biletojn kaj diris: ”Vidu, la unua estas por tio, ke vi tiel majstre prezentis vian rakonton, kaj la alia estas por tio, ĉar vi donis al mi brilan ideon por mia gazeto. En miaj manoj ĝi valoras kvinmilon, en viaj ne eĉ cendon. Sed mi pagas vin nun per cendo kun dividendo. Multan dankon por via peno, *good-bye*² kaj multe da feliĉo.”

Tio estis la unua mono, kiun mi ricevis por la prezento de rakonto. Jes, sinjoro.

2. good-bye (angle): adiaŭ

Mi eksaltis al monŝanĝejo. Je dolaro ĉirkaŭ du kaj du-onon da guldenoj, por la du dolaroj sekve ĉirkaŭ kvin guldenojn. Bela sumeto. Post kiam mi donis tie la biletojn, la ŝanĝisto amasigis ĉirkaŭ kvindek guldenojn antaŭ mi. Tio estis surprizo. Fibby donis al mi du dekojn, kaj mi supozis ilin, ĉar mi ja ne volis scivoleme disfaldi dum lia ĉeesto la ĉifitajn biletojn, unudolaraj. Fibby estas nobla animo. *Wall Street*³ benu lin. Estas tute nature, ke dudek dolaroj estas tre multe da mono. Se oni posedas ilin. Se oni devas ilin elspezi, oni lernas subite, ke dudek dolaroj estas nenio. Des pli, se oni pasis vicon de malsataj tagoj kaj senlitaj noktoj. Antaŭ ol mi povis ekaprezi la valoron de la mono, ĝi jam estis foruzita. Nur la homoj, kiuj havas sufiĉe da mono, scias la valoron de mono, ĉar ili disponas pri la tempo por povi taksi la valoron. Kiel oni lernu scii la valoron de aĵo, se aliaj ĉiufoje tuj denove forprenas ĝin? Sed oni predikas, ke nur tiu, kiu havas nenion, scias, kion cendo valoras. Pro tio la klasaj kontraŭdiroj.

3. Wall Street: strato kun multaj bankoj kaj borsoj en Nov-Jorko, kvartalo Manhattan

Ĉapitro 7

Pli frue ol mi supozis, venis mateno, kiu estis, se juĝi laŭ la ŝajno, dum certa tempo la lasta mateno, kiu salutos min en lito. Mi traserĉis miajn poŝojn kaj trovis en ili ĝuste tiom da cendoj por ebligi neabundan matenmanĝon. Neabundaj matenmanĝoj ne trovas mian aplaŭdon. Ili ĉiam estas la antaŭludo de tagmanĝoj kaj vespermanĝoj, kiuj ne aperos. Iun Fibby oni ja ne trovas ĉiutage. Sed, se mi trafos denove iun, tiam mi prezentos mian rakonton tiom komike kiom eblas. Tiam li eble ploros kordisŝire kaj ekhavas la kontraŭideon de la kvinmildolara ideo de Fibby. El ideo ĉiam eblas elpremi monon, egale ĉu ĝi plorigas aŭ ridigas. Ekzistas precize tiom da homoj, kiuj volonte ploras kaj pagas kelkajn dolarojn por la eblo plori, kiom da homoj ekzistas, kiuj prefere komplezas siajn ridmuskolojn.

. . . komplezas . . . Nu, pri kio nun denove temas? Ĉu oni eĉ ne rajtas dormi iom trankvile en la lito por la lasta elspezita guldeno da dormpago, antaŭ ol oni devas forlasi ĝin?

"Lasu min dormi, damne. Mi pagis hieraŭ vespere antaŭ ol mi iris supren." Kiel ne furioziĝi tiurilate? Sen interrompo oni krake bategas la pordon.

Kaj tuj denove frapas.

"Fulmotondro, ĉu vi ne aŭskultis? Ke vi forportu vin, mi petas! Mi volas dormi." Se ili nur malfermus la pordon! Mi pafus boton mezen de iliaj grimaciloj. Tiaj sentaŭgaj kaj impertinentaj kanajloj.

"Malfermu. Jen la polico. Ni deziras paroli kun vi momenton."

Mi tute serioze dubas, ke ie en la mondo plu estas homoj, kiuj ne estas policanoj. La polico zorgu por paco, sed neniu pli perturbas la pacon, neniu pli molestas la homojn, neniu pli da homoj pelas en la frenezon ol la polico. Tute certe, neniu kaŭzis pli da malfeliĉo en la mondo ol la polico, ĉar ja ankaŭ la soldatoj estas nuraj policistoj.

"Nu, kion vi deziras de mi?"

"Ni volas nur iom paroli kun vi."

"Tion vi povus fari ankaŭ tra la pordo."

"Ni volas vidi vin persone. Malfermu aŭ ni rompos la pordon."

Rompi la pordon! Kaj tiuj gardu kontraŭ rompŝtelistoj.

Bone, mi malfermas. Sed apenaŭ mi malfermis la pordon nur fendete, jam unu el la buboj enpremas piedon.

La malnova artifiko, pri kiu ili ĉiufoje denove fieras. Tio ŝajne estas la unua artifiko, kiun ili devas lerni.

Ili envenas. Du viroj en civilaj vestoj. Mi sidas sur la litrando kaj komencas vestiĝi.

La nederlandan mi regas sufiĉe bone. Mi veturis sur nederlandaj ŝipoj kaj nun ĉi tie lernis iom aldone. Sed la du birdoj ankaŭ iom regas la anglan.

”Vi estas usonano, ĉu?”

”Jes, mi pensas, ke jes.”

”Montru vian maristan dokumenton.”

La marista dokumento ŝajnas esti la meza punkto de la universo. Mi certas, ke la milito okazis nur tial, por ke oni ĉiulande povu esti pridemandata pri la maristdokumento aŭ la pasporto. Antaŭ la milito neniu demandis pri la marista dokumento aŭ pri la pasporto, kaj la homoj estis feliĉaj. Sed militoj, entreprenataj por la libero, por la sendependeco kaj por la demokratio, ĉiam estas suspektindaj. Suspektindaj ekde tiu tago, kiam la prusoj kondukis siajn Liberigajn Militojn kontraŭ Napoleono. Se oni venkas en Liberigaj militoj, tiam la homoj post la milito perdas ĉiun liberon, ĉar la milito gajnis la liberon. Jes, sinjoro.

”Mi ne havas maristan dokumenton.”

”Vi ne haaaaavas maristan dokumenton?”

Tiun perpleksan tonon mi jam iam aŭdis, kaj ankaŭ ĝuste en momento, kiam mi volis dolĉe ekdormeti frumatene.

"Ne, mi ne haaaaavas. Neniun, neniun maristan dokumenton."

"Tiukaze montru vian pasporton."

"Mi ne havas pasporton."

"Neniun pasporton?"

"Ne, neniun pasporton."

"Ĉu ankaŭ ne identigilon de la ĉi tieaj policaĵ instancoj?"

"Ne, ankaŭ ne identigilon de la ĉi tieaj policaĵ instancoj."

"Vi certe scias, ke vi ne rajtas restadi ĉi tie en Nederlando sen paperoj kun la vizo de niaj instancoj, ĉu?"

"Tion mi ne scias."

"Tiel do? Tion vi ne scias, ĉu? Ĉu vi do eble vivis dum la lastaj monatoj kaj jaroj sur la luno?"

La du birdoj opiniis tiun ŝercon tiel bona, ke ili laŭte ekridis.

"Vestiĝu kaj kuniru!"

Scii mi volus, ĉu oni ankaŭ ĉi tie estu pendumita, se oni ne povas montri maristan dokumenton.

"Ĉu unu el la sinjoroj eble havas cigaredon?" mi demandas.

"Cigaron vi povas ricevi, cigaredon mi ne havas. Ni povas aĉeti ilin survoje. Ĉu vi volas havi la cigaron?"

"La cigaron mi prefere prenas."

Dum mi vestas kaj lavas min, mi fumas la cigaron. La du sidiĝas, sed proksime al la pordo. Mi ne tro rapidas. Sed eĉ se oni vestas sin tiom lante kiom eblas, iam oni tamen vestas sin ĝisfine.

Ni formarŝis kaj kie albordiĝis? Vi ĝuste divenis. En policejo. Unue oni nun denove ĝisfunde traserĉis min. Ĉifoje ili pli sukcesis ol iliaj fratoj en Antverpeno. Ili trovis en miaj poŝoj kvardek kvin nederlandajn cendojn. La monon por la matenmanĝo. Tion mi nun povis ŝpari.

"Kio? Pli da mono vi ne havas?"

"Ne, pli da mono mi ne havas."

"De kio vi do vivis ĉi tie la multajn tagojn?"

"De tio, kion mi nun ne plu havas."

"Jen vi do havis monon, kiam vi venis ĉi tien al Roterdamo, ĉu?"

"Jes."

"Kiom da?"

"Tion mi jam ne scias tiel precize. Cent dolarojn proksimume, eble ankaŭ estis ducent."

"De kie vi do ricevis la monon?"

"La monon mi simple ŝparis."

Tio videble estis denove bona ŝerco, ĉar la tuta bando kolektiĝinta ĉirkaŭ mi en la pridemanda ĉambro,

eksplode ekridis. Sed ĉiuj atentis, ĉu ankaŭ la altranga pastro ridis. Kaj kiam li ekridis, ankaŭ ili ekridis, kaj kiam li ĉesis ridi, ili tiel subite ĉesis ridi, kvazaŭ trafus ilin apopleksio.

”Kiel vi do envenis Nederlandon? Tute sen pasporto. Kie vi do travenis?”

”Mi simple iel envenis.”

”Kiel?”

La konsulo ne kredis al mi, kiel mi envenis. Tiuj des pli ne kredus al mi. Mi ankaŭ ne rajtis fuŝi la plezuron de tiuj afablaj uloj el Belgio.

Mi do diras: ”Per ŝipo mi venis.”

”Per kiu ŝipo?”

”Per la . . . per . . . per la Georgo Vaŝington¹.”

”Kiam?”

”Tion mi jam ne plu scias tiel precize.”

”Ĉu tiel? Do, per la Georgo Vaŝington vi venis. Tio estas ja sufiĉe mistera Georgo Vaŝington. Ĝi laŭ nia scio neniam estis en Roterdamo.”

”Ne estas mia kulpo. Mi ne respondekas pri la ŝipo.”

”Vi do tute ne havas paperon, tute ne legitimaĵon, nenion ajn, per kio vi povus pruvi, ke vi estas usonano?”

”Ne, sed mia konsulo . . .”

1. Vaŝington: unua prezidento de Usono, tiel skribita de Z. en la Fundamento de Esperanto

Ŝajne mi faris bonajn ŝercojn. Denove ekis monstra ridado.

”Viiia konsulo.”

Tiun ’via’ li tiel longigis, kvazaŭ ĝi devus sufiĉi por ses monatoj.

”Vi ja ne havas paperojn. Kion en tiu kazo viia konsulo faru por vi?”

”Li ja donos al mi paperojn!”

”Via konsulo, ĉu? La usona konsulo? Usona konsulo? Ne en nia jarcento. Ne sen paperoj. Ne sen tio, ke vi, ni diru, vivas en bona stato. Ne al tia vagabondo.”

”Sed mi estas ja usonano.”

”Eblas, sed tion vi devas pruvi al viia konsulo. Kaj sen viaj paperoj li ne kredos al vi. Sen viaj paperoj li eĉ ne kredos, ke vi estas naskita. Mi volas ion diri por via instruo. Ŝtataj oficistoj estas ĉiam burokratoj. Ankaŭ ni estas burokratoj. Sed pli fiaj estas tiuj, kiuj nur de hieraŭ burokratas. Kaj la plej fiaj burokratoj el ĉiuj estas tiuj, kiuj heredis la burokratismon de la prusoj. Ĉu vi komprenas, kion mi celas diri?”

”Mi supozas, ke jes, sinjoro.”

”Kaj se ni nun kondukus vin tien, al via konsulo, kaj vi ne havas paperojn, tiukaze li transdonos vin oficiale al ni, kaj ni povus neniam plu liberiĝi de vi. Ĉu vi ankaŭ tion komprenas?”

”Mi pensas, ke jes, sinjoro.”

”Ja kion fari kun vi? Tiu, kiun oni kaptas sen pasporto, devas iri por ses monatoj en prizonon, kaj poste sekvas la deporto al la hejmlando. Via hejmlando estas kontestata, kaj tial ni devas meti vin en internigejon. Ni ja ne povas mortbati vin kiel hundon. Sed eble tiaj leĝoj ankoraŭ venos. Kial ĝuste ni satigu vin ĉiutage? Ĉu vi volas iri al Germanio?”

”Mi ne ŝatas Germanion. Se oni prezentas al la germanoj la kalkulon . . . ”

”Do ne al Germanio, tion mi povas kompreni. Sufiĉas por nun.” Jen oficisto, kiu evidente multe pensis aŭ legis multajn bonajn librojn.

Li nun alvokis bastonulon kaj diris: ”Konduku lin al la ĉelo, donu al li matenmanĝon, iru aĉeti anglan gazeton kaj ĵurnalon, por ke li ne enuu. Ankaŭ kelkajn cigaredojn.”

Ĉapitro 8

Malfrue posttagmeze ili denove kondukis al la ofisto, kaj oni diris al mi, ke mi sekvu la du ofistojn en civilaj vestoj. Ni eniris la stacidomon kaj ekveturis. Ĉe urbeta stacio ni forlasis la trajnon kaj iris al la policejo de la urbo. Tie mi sidis sur benko, kaj ĉiuj bastonuloj, kiuj finis sian vaĉon, rigardis min kvazaŭ mi estus besto en zoologia ĝardeno. De tempo al tempo ili ankaŭ alparolis min. Kiam estis ĉirkaŭ la deka, du viroj diris al mi: "Venis la ĝusta tempo, ni iru."

Ni iris tra kampoj kaj sur herbejaj padoj. Finfine la du ekhaltis, kaj unu el ili parolis kun memgarda voĉo: "Iru tien en tiu direkto, kiun mi montras al vi, ĉiam rekte. Vi ne trafos iun. Sed se vi vidos iun, ne krucu lian vojon aŭ kuŝigu vin, ĝis li preterpasis. Irinte dum kelka tempo, vi alvenos fervojlinion. Sekvu la fervojlinion, ĝis vi alvenos la stacion. Restadu proksime ĝis la mateno. Tuj kiam vi vidos, ke oni pretigas trajnon por la ekveturo, iru al ĝiĉeto kaj diru: 'Une troisième Anvers¹.' Ĉu vi povas memorteni tion?"

1. Une troisième Anvers. (france): Bileton triaklasan al Anvers.

”Jes, tion mi povas. Estas tre facile.”

”Sed parolu krom tio neniun vorton. Vi ricevos tiam vian veturbileton kaj veturos al Antverpeno. Tie vi facile sukcesos pri ŝipo, ĉar oni ĉiam bezonas maristojn. Jen iom por manĝi, kaj jen ankaŭ iom por fumi. Aĉetu nenion, ĝis vi estos en Antverpeno. Jen tridek belgaj franĝoj.”

Li enmanigis al mi pakaĵeton da buterpanoj, papersaketon kun cigaroj kaj skatolon da alumetoj, por ke mi ne devu peti iun pro fajro.

”Neniam revenu Nederlandon. Atendos vin ses monatoj en prizono kaj poste internigejo. Do, ni eksplicite avertis vin, antaŭ atestanto. Good-bye kaj multe da feliĉo.”

Jen mi staris nokte sur kampo sub la ĉielo. Multe da feliĉo! Dum iom da tempo mi iris nun en la montrita direkto, ĝis mi konvinkiĝis, ke ambaŭ ne plu povas vidi min, aŭ ke ili estas jam for. Poste mi haltis kaj komencis pripensi.

Ĉu al Belgio? Tie atendus min tutviva prizono. Ĉu ree al Nederlando? Tie atendus min nur ses monatoj en prizono. Tio ja malpli kostus. Poste sekvus aldone la internigejo por senpasportuloj. Mi bedaŭris, ke mi ne demandis, kiom longe la internigejo daŭrus. Verŝajne tutan vivon. Ja kial en Nederlando kostu malpli ol en Belgio?

Mi fine decidis, ke Nederlando en ĉiu kazo malpli kostos. Ankaŭ tial estis pli bone, ĉar mi tie povus elturniĝi lingve, dum en Belgio mi povus paroli nenion kaj kompreni eĉ malpli.

Mi nun une iris por certa tempo flanken, proksimume tridek minutojn. Kaj poste rekte trans la kampojn reen al Nederlando. Tiu 'tutvive' vere tro amaris.

Iris sufiĉe glate. Nur ĉiam brave antaŭen!

"Haltu! Ekstaru! Aŭ ni pafos!" Tre agrable, se subite iu elvokas el la nigra nokto: "Ni pafos."

La viro ja ne povas celi kaj vidi min li same ne povas. Sed ankaŭ necelita kuglo povas trafi. Kaj tio finfine tamen pli fias ol 'tutvive'.

"Kion vi faras ĉi tie?" Du viroj elvenis el la mallumo kaj al mi. Unu el ili demandis min.

"Mi promenas iom, mi ne povas dormi."

"Kial vi promenas ĝuste ĉi tie sur la limlinio?"

"La limon mi ne vidis, mankas ja barilo ĉi tie."

Du akre brilaj poŝlampoj celis al mi, kaj oni traserĉis min. Kial tiuj homoj ĉiam devas traserĉi? Mi supozas, ke ili ĉie serĉas la perditajn dek kvar punktojn de Wilson². Ĉiukaze, mi ne havas ilin en la poŝoj.

2. la perditaj dekkvar punktoj de Wilson: proklamo de la usona prezidento Thomas Woodrow Wilson je la 8-a januaro 1918, kiu celis pacon kaj novan mondan ordon inter la militpartoprenantoj

Kiam ili nun trovis nenion krom la buterpanojn, la tridek frankojn kaj la cigarojn, unu el ili restis staranta apud mi, dum la alia iris prilumi iom la vojon, sur kiu mi venis. Verŝajne li esperis tie trovi la mondopacon, kiu estas serĉata en la tuta mondo, de kiam niaj knaboj batalis kaj sangis por tio, ke tiu milito estu la milito lasta.

”Kien vi volas iri?”

”Mi volas reiri Roterdamon.”

”Ĉu nun? Kial ĝuste noktomeze kaj kial ĝuste ĉi tie tra la herbejo? Kial vi ne iras sur vojo?”

Kvazaŭ oni ne rajtus iri nokte sur herbejo! Tiuj homoj havas strangajn vidpunktojn. Kaj ĉiam ili tuj suspektas, ke oni eble krimis ion. Mi rakontis nun, ke mi venis el Roterdamo kaj kiel mi venis ĉi tien. Sed tio nun kolerigis ilin kaj ili diris, ke mi ne mistifiku ilin. Estas ja tute klare, ke mi venas de Belgio kaj volas ŝteliri en Nederlandon. Kiam mi nun diris, ke la tridek frankoj ja pravas, ke mi diris la veron, ili koleriĝis eĉ pli kaj asertis, ke tio estu ĝuste la pruvo, ke mi volas trompi ilin. Laŭ ili la frankoj estu la pruvo, ke mi venas el Belgio, ĉar oni ne havas frankojn en Nederlando. Kaj nun eĉ aserti, ke nederlandaj oficistoj donis al mi tiun monon kaj deportis min meze en la nokto per eksterleĝa vojo trans la limon, tio devigus ilin aresti kaj akuzi min pro insultado de ŝtataj oficistoj. Sed ili diris, ke ili ankoraŭfoje volas indulgi min, ĉar videble mi estas kompatindulo, kiu ne havis la

intencon kontrabandi, do ili volas rekonduki min sur la ĝustan vojon, per kiu mi povos reveni al Antverpeno.

Tiel bonaj tiuj homoj estis al mi . . .

Nun mi vere devis iri al Belgio, nenio helpus kontraŭ tio. Se nur la 'tutvive' ne estus.

Unu horon mi nun migris en la direkto al Belgio.

Mi laciĝis kaj stumblis antaŭen. Plej volonte mi kuŝigus kaj dormus. Sed tamen mi opiniis pli bone pluiri por forlasi la zonon de danĝero, kie ili rajtas pafi al iu, kiu ne havas la rajton pafi.

Jen iu subite ekkaptas min je kruro. Mi pensas, ke estas hundo. Sed kiam mi ektuŝas ĝin, estas mano. Kaj jen jam poŝlanterno ekflamas. Tiu ĉi objekto estas plia inventaĵo de Satano, kiun oni vidas ĉiufoje nur tiam, kiam ĝi troviĝas proksime antaŭ la okuloj.

Du viroj nun ekstaras. Ili kuŝis tie sur la herbejo kaj mi glate iris en iliajn brakojn.

"Nu, kien vi volas iri?"

"Al Antverpeno."

Ili parolas nederlande aŭ, pli bone, flandre.

"Al Antverpeno vi volas iri, ĉu? Nun en la nokto? Nu, kial vi ne iras sur laŭorda vojo, kiel decas ĉe honestaj homoj?"

Mi rakontas nun, ke mi ne venis libervole, kaj mi rakontas, kiel okazis, ke mi devas vagabondi ĉi tie.

”Tiajn fabelojn vi povas rakonti al aliaj. Ne al ni. Ion tian ŝtataj oficistoj ne faras. Vi faris iun fiaĵon en Nederlando kaj nun vi volas transiri ĉi tie. Sed tio ne eblas. Unue ni traserĉu la poŝojn por ekscii, kial vi iras meze de la nokto tra herbejoj kaj ĉiam landlime.” Ili trovis en miaj poŝoj kaj en la kunkudroj de miaj vestaĵoj ne tion, kion ili serĉis. Mi volus scii, kion la homoj serĉas ĉiufoje, kaj kial ili ĉiam devas trafosi miajn poŝojn. Estas malica kutimo de tiuj homoj.

”Ni ja scias, kion ni serĉas. Pri tio ne zorgu.”

Ankaŭ nun mi ne scias pli. Sed ili trovas nenion. Mi estas konvinkita, ke ĝis la fino de la mondo estos duono de la homoj, kiuj devas traserĉi poŝojn, kaj ke estos alia homarduono, kiu devas toleri la traserĉadon de la poŝoj. Eble la tuta kverelado de la homaro koncernas nur tion, kiu rajtas traserĉi poŝojn, kaj kiu devas toleri kaj eĉ pagi tion.

Post kiam la oficialaĵoj finiĝis, unu el ili diris al mi: ”Jen, tie transe estas la direkto al Roterdamo, tien vi nun rekte marŝos, kaj ja ne montru vin denove ĉi tie. Kaj se vi denove renkontos la limpolicon, ne azenigu ilin kiel vi azenigis nin. Ĉu vi tie en via freneza Usono ne plu havas ion por manĝi, tiel, ke vi ĉiuj devas transveni ĉi tien, por forvori la iomon da nutraĵoj, kion ni mem bezonas por niaj homoj?”

”Sed mi ja tute ne libervole estas ĉi tie,” mi kontraŭdiris, kaj mi plej bone sciis, kiom mi pravas.

”Strange, tion diras ĉiu el vi, kiun ni kaptas ĉi tie.”

Tio estas ja io tute nova. Sekve mi do eble ne nur mi devas vagabondi ĉi tie en fremda kontinento.

”Nun forportu vin kaj ne plu iru superfluaĵn kromvojojn. Baldaŭ heliĝos, kaj tiam ni bone observos vin. Roterdamo estas bona loko. Tie estas multaj ŝipoj, kiuj ĉiam bezonas iun.”

Kiel ofte oni jam rakontis tion al mi. Per la ofta ripetado ĝi devus jam esti scienca vero.

Per la tridek frankoj mi ne povis entrepreni ion en tiu urbeto, ĉar tio certe tuj vekus atenton.

Sed venis laktokamiono, kiu kunprenis min ioman vojon. Kaj poste venis alia kamiono, kaj tiu dum certa tempo kunprenis min. Kaj poste venis kamparano, kiu veturigis porkojn al urbo. Tiel mi proksimiĝis mejlon post mejlo al Roterdamo. Tuj se la homoj ne apartenas al la polico, kaj tuj se ili ne volas esti alkalkulitaj al la polico, ili komencas esti tre simpatiaj estaĵoj, kiuj tute normale povas pensi kaj senti. Mi tute sincere rakontis al la homoj, kion mi travivis, kaj ke mi ne havas pape-rojn. Kaj ili ĉiuj tiel afablis, donis al mi manĝon, donis al mi varman, sekan angulon por dormi, kaj donis al mi bonajn konsilojn pri tio, kiel plej lerte preteriri la vojon de la polico.

Estas tre strange. Neniu ŝatas la policon. Kaj ĉe rompŝtelo oni vokas nur tial la policon, ĉar ne estas permesite mem draŝi la felon de la rompŝtelinto kaj forpreni mem la predon de li.

Ĉapitro 9

La nederlandaj guldenoj, kontraŭ kiuj mi ŝanĝis la tri-dek frankojn, ne tro helpis. Ĉar oni tute ne povas fidi monon, se oni ne havas ion kroman.

La kroma io venis en posttagmezo, tuj poste. Mi vagabondis laŭlonge de la haveno, kaj tie mi vidis proksimiĝi du virojn. Kiam ili proksimis, mi kaptis orele iom el ilia babilaĉo. Estas tiel drole aŭskulti paroli anglon. La angloj ĉiam asertas, ke ni ne ĝuste povas paroli la anglan; sed tion, kion tiuj homoj parolas, certe ne estas la angla. Tio tute ne estas lingvo. Nu, ne gravas, mi eĉ ne emas flari tiujn ruĝkapulojn. Sed nin ili ja same ne povas digesti. Tiel la afero denove ekvilibrigas. Tiel tio iradas nun jam de cent kvindek kaj mi ne scias kiom da jaroj.

Nun la tuta supo kompreneble des pli superbolis, de kiam la granda skandalo komenciĝis.

Oni venas ekzemple al haveno, kie ili dike sidas kiel la beroj sur rubuso. En Aŭstralio, aŭ eble en Ĉinio aŭ Japanio. Kiel ĝuste la hazardo ludas. Oni emas iom tralavi la gorĝon kaj englitas en havenan tavernon. Tie ili sidas kaj

staras nun, kaj apenaŭ oni eligis vorton, tuj la amuzo ekas: "Hej, *Yank*¹."

Oni tute ne atentis pri la bovkapuloj, oni eltrinkas sian brandeton kaj intencas foriri.

Kaj subite bruas voĉo el angulo: "*Who won the war? Kiu gajnis la militon, Yank?*"

Scii mi volus, kial tio estu mia afero. Mi mem ne gajnis ĝin, tion mi certe scias. Kaj tiuj, kiuj vere opinias sin la gajnintoj, ankaŭ ne havas kaŭzon por ridi kaj ĝojus, se neniuj parolus pri tio.

"Hej, *Yank, who won the war?*"

"Kion oni nun diru, se oni tute solas kaj tie estas du dekduoj da ruĝkapuloj? Se mi diras: 'Ni!', jen ili draŝos min. Se mi diras: 'La francoj!', jen ili draŝos min. Se mi diras: 'Mi!', ili ridos, sed tamen tradraŝos min. Se mi diras: 'La dominioj, Kanado, Aŭstralio, Nov-Zelando, Sudafriko!', ili draŝos min. Se mi diras nenion, tio signifas: 'Ni, la usonanoj!' kaj ili draŝos min. Sed diri: 'Vi gajnis ĝin', tio estus impertinenta mensogo, kaj mensogi oni ne volas. Sekve oni tradraŝos min, kaj tion mi ne povas eviti. Tiaj estas tiuj bovkapuloj, kaj tamen oni diras eĉ nun: 'la kuzoj de transe'. Ne miaj. Kaj tamen ili eĉ miras, se oni sentas sin naŭzita de ili.

Sed kion mi faru?"

"Sur kiu kesto vi estas?" mi demandis.

1. *Yank* (angle; slange): jankio, t.e. usonano

"Nu, malgranda jankio, kion vi faras ĉi tie? Ni ja ne vidis ŝipon el Usono." Ili sentas sin superaj, ĉar ili jam suspektas la cinamon².

"Mi pobe elsaltis kaj nun ne povas levi la ankron."

"Neniu asekurpoliso, ĉu?"

"Vi divenis."

"Ĉu vi nun volas veturi kiel kaŝpasaĝero?"

"Mi devas. La ŝipo grundas, brulas."

"Ni estas sur skota."

"Kien vi elveturas nun?" mi demandis.

"Bulonjon, ĝis tie ni povos forstivi vin. Sed plu ne eblos. La ĉefo, la maato, estas hundo."

"Bone, tiukaze mi iros Bulonjon. Kiam vi ekos?"

"Plej bone, se vi surŝipiĝos je la oka, tiam la ĉefo drinkos. Ni staros sur la unua ferdeko. Se mi ŝovos la ĉapon al la nuko, ĉio klaras, se mi faros nenion, tiukaze atendu ankoraŭ iom. Ne tiel paradu, ne montru vin. Sed, se ili vin kaptos, tiam prefere lasu platbati vian grimacilon ol diri, kiu pilotis vin, afero de honoro, ĉu vi komprenas?"

Je la oka mi estis tie. La ĉapo estis ŝovita al la nuko. La maato ebriis kaj ne sobriĝis antaŭ Bulonjo, kaj tie mi elŝipiĝis kaj estis en Francio.

Mi ŝanĝis mian monon kontraŭ francaj frankoj. Tiam mi iris al la stacidomo, kaj tie staris la ekspresa trajno al

2. suspekti la cinamon (slange): jam antaŭsenti, pri kio temas

Parizo. Mi aĉetis bileton por la unua stacio kaj sidiĝis en la trajno.

La francoj tro ĝentilas por molesti iun dum la veturo.

Kaj jen mi subite troviĝis en Parizo. Sed tie ili kontrolis la biletojn, kaj mi ne havis bileton por Parizo.

Denove polico. Kompreneble, kiel povus funkcii sen polico? Ekis terura interbalbutado. Mi parolis kelkajn erojn de la franca lingvo, la aliaj homoj erojn de la angla. La plej multajn erojn mi devis diveni. De kie mi venis? El Bulonjo. Kiel mi venis al Bulonjo? Per ŝipo. Kie mi havas mian maristan dokumenton? Mi ne havas.

”Kio, vi ne havas maristan dokumenton?”

Tiun ĉi demandon mi nun eĉ komprenus, se oni metus ĝin al mi hindustanlingve. Ĉar la gesto kaj la intonacio tiel ekzakte samas, ke mi povus erari neniam.

”Ankaŭ pasporton mi ne havas. Mi ankaŭ ne havas identigilon. Mi tute ne havas paperojn. Neniam havis paperojn.”

Tion mi tuj diras per unu elspiro. Nun ili almenaŭ tiujn demandojn ne povas meti al mi kaj per tio pasigi la tempon. Ili efektive iom perpleksiĝas, ĉar ili nun tute perdis la fadenon. Dum kelka tempo neniu el ili scias, kion demandi aŭ diri. Feliĉe restis al ili ja la veturbileto, kiun mi ne havis. La postan tagon sekvas denove pride-mandado. Mi trankvile lasas ilin pridemandi kaj paroli kaj demandi. Mi komprenas nenion. Sed fine klariĝas al

mi, ke mi kaptis dek tagojn da prizono pro fervojtrompo aŭ io simila. Kiel mi sciis? Cetere, estis tute ne grave al mi. Tiel mi do alvenis Parizon.

La prizona kariero estis sufiĉe gajiga.

Unua tago: enprizoniĝo, banado, kontrolo de la sano, eldono de la tolaĵo, disdono de ĉeloj. La unua tago pasis.

Dua tago: veni al la kasadministranto por kvitanci la sumon, kiun mi posedis, kiam ili arestis min. Ankoraŭfoja konstato de mia persono kaj registriĝo en dikaj libroj. Posttagmeze: aŭdienco ĉe la prizona pastro. Li parolis bone la anglan. Li asertis tion. Sed tio certe estis la angla lingvo parolita, kiam Vilhelmo la Konkeranto ankoraŭ ne albordiĝis Anglujon, ĉar mi komprenis de tiu bona angla lingvo eĉ ne vorton, sed mi ne montris tion. Se li parolis pri Dio, li ĉiam diris "goat³", kaj mi opiniis, ke li parolas pri kaprino. Per tio ankaŭ la dua tago pasis.

Tria tago: Antaŭtagmeze oni demandas min, ĉu mi jam iam alkudris antaŭtukajn bendojn. Mi diris, ke ne. Posttagmeze oni informis min, ke ili min envicigos en la antaŭtukan sektion. Tiel finiĝis la tria tago.

Kvara tago: Antaŭtagmeze oni donis al mi tondilon, kudrilon, tutan kudrilon, fadenon kaj fingringon. La fingringo ne havis la ĝustan grandecon. Sed ili diris al mi,

3. goat (angle): 'kaprino', ĉar la prizona pastro misprononcis la anglan vorton 'God' (Dio)

ke ili ne havas alian. Posttagmeze ili montris al mi kiel meti la tondilon, la kudrilon kaj la fingringon ĉiam videble sur la tabureton, kaj kiel meti la tabureton en la mezon de la ĉelo, kiam mi forlasos la ĉelon por rondiro. Ekstere apud la pordo ili fiksas afiŝon kun la surskribo: "Posedas tondilon, kudrilon kaj fingringon." Tiel la kvara tago pasis.

Kvina tago: Dimanĉo.

Sesa tago: Antaŭtagmeze oni kondukas min al la laborhalo. Posttagmeze ili montras al mi mian lokon en la laborhalo. La sesa tago pasis.

Sepa tago: Antaŭtagmeze ili montras al mi la prizonulon, kiu instruu min kiel alkudri antaŭtukajn bendojn. Posttagmeze la prizonulo diras al mi, ke mi jam enkudriligu la fadenon. La sepa tago pasis.

Oka tago: La instrumajstro montras al mi, kiel li alkudras antaŭtukajn bendojn. Posttagmeze sekvas la bano kaj pesado. La oka tago pasis.

Naŭa tago: Antaŭtagmeze mi devas veni al la direktoro. Oni informas min pri tio, ke morgaŭ finiĝos mia tempo en la prizono, kaj oni demandas min, ĉu mi havas ion por plendi. Tiam mi devas skribi mian nomon en la gastlibron. Posttagmeze ili montras al mi kiel alkudri antaŭtukan bendon. La naŭa tago pasis.

Deka tago: Antaŭtagmeze mi alkudras antaŭtukan bendon. Mia instrumajstro rigardadas la alkudritan ben-

don post horo kaj duono kaj tiam diras, ke ĝi ne estas bone alkudrita, ke li devas malkudri ĝin. Posttagmeze mi denove alkudras antaŭtukan bendon. Ĝuste kiam mi alkudris unu el la finaĵoj, oni vokas min por la preparo de mia liberigo. Oni pesas min kaj kontrolas mian sanecon, mi ricevas miajn civilajn vestojn, kiujn mi rajtas surmeti, kaj poste mi povas promeni en la korto. La deka tago pasis.

La venontan tagon je la sesa ili demandas min, ĉu mi volas matenmanĝi ankoraŭ. Mi diras ke ne, kaj ili kondukas min al la kasadministranto, kie mi devas atendi kelkan tempon, ĉar li ankoraŭ ne ĉeestas. Poste mi tamen ricevas matenmanĝon, kaj fine la kasadministranto alvenas, kiu redonas mian monon, kion mi devas kvitanci. Tiam mi ricevas dekkvin centimojn por la farita laboro, ekde nun estis libera kaj povis foriri. Multajn enspezojn mi ne alportis al la franca ŝtato, kaj ĉu nun la fervojo povas imagi al si, ke ĝi ricevis la pagon, tio estas plia demando. Sed tuj ekstere la polico min denove akceptis.

Oni avertis min. Ene de dekkvin tagoj mi forlasu la landon, per la sama vojo, kiun mi envenis. En la kazo, ke oni trovos min post paso de la dekkvin tagoj interne de la landlimoj, oni procedos kontraŭ mi laŭ la determinoj de la leĝoj. Do kontraŭ min procedos. Kion tio signifas, ne estis al mi klare. Eble pendumi aŭ rosti sur ŝtiparo.

Kial ne? En tiu ĉi epoko de la perfektigita demokratio, senpasporta homo, kiu pro tio ankaŭ ne rajtas baloti, estas herezulo. Ĉiu epoko havas siajn herezulojn, kaj ĉiu epoko havas sian inkvizicion. En la nuna epoko la pasporto, la vizo kaj la enmigrada anatemo estas la dogmoj, sur kiuj sin apogas la nepoveco erari, je kiuj oni devas kredi, ĉar alie oni devas elteni la diversajn gradojn de torturoj. Pli frue la princoj estis la tiranoj, nun la ŝtato estas la tirano. La fino de tiranoj ĉiam estas detroniĝo kaj revolucio, tute egale, kiu estas la tirano. La libero de la homo estas tro praorigine ligita kun ties tuta ekzistado kaj volado, ol ke la homo longe povus elteni iun tiranecon, eĉ se la tiraneco aperus en la velure mola mensogomantelo de la kundecida rajto.

"Vi ja devus havi iun paperon, kara amiko," diris la oficiro, kiu avertis min. "Sen paperoj vi certe ne ĉiam povos vagabondi."

"Eble mi foje iru al mia konsulo."

"Al via konsulo, ĉu?"

La intonacion mi konis. Ŝajnas, ke mia konsulo estas konata en la tuta mondo.

"Ja kion vi volas ĉe via konsulo? Vi ja ne havas paperojn. Li kredos al vi eĉ ne silabon, se vi ne havas paperojn. Li nur paperojn akceptas. Pli bone, se vi tute ne irus tien, alie ni neniam povos liberiĝi de vi kaj vi ripozos dum via tuta vivo sur nia dorso."

Kiel diris la romianoj? La konsuloj atente gardu la respublikon kontraŭ malbonoj. Kaj certe povus okazi multe da malbono al la respubliko, se la konsuloj ne malhelpus, ke iu, kiu ne havas paperojn, revidas sian patrimon.

”Sed iun paperon vi certe devus havi. Vi ja ne bone povus vagabondi sen paperoj dum via tuta cetera vivo.”

”Jes, tion ankaŭ mi pensas, ke mi devus havi iun paperon.”

”Mi ne povas doni paperon al vi. Surbaze de kio? Ĉio, kion mi povas doni, estas liberiga atesto de la prizono. Tia papero ne tre taŭgas. Tiukaze prefere nenium. Kaj sur ĉiun alian paperon mi povus skribi nur, ke la mont-ranto asertas esti tiu aŭ tiu ĉi, ke li venis de tie aŭ tie. Sed tia papero estas senvalora, ĉar ĝi ne estas pruvilo; ĝi eldiras nur, kion vi diras. Kaj vi kompreneble povas rakonti tion, kion vi volas, ĉu veron, ĉu ne. Eĉ se estus la vero, necesus pruvo pri tio. Mi tre bedaŭras, mi ne povas helpi al vi. Mi avertis vin oficiale, vi devas forlasi la landon. Iru, mi proponas, al Germanio. Ankaŭ tio estas tre belando.”

Kial ili ĉiuj intencas sendi min al Germanio? Tion mi volonte scius.

Ĉapitro 10

Nun mi restis unue kelkajn tagojn en Parizo, por atendi, kio okazos. Okazaĵoj foje kaj foje pli bone povas helpi progresi ol la plej belaj planoj. Mi ja nun havis rajton rigardi Parizon. Mia veturbileto estis pagita, mian manĝaĵon en la prizono mi perlaboris. Tiel mi ne plu ŝuldis ion al la franca ŝtato kaj rajtis piedi sur francaj pavimoj.

Sed, se oni tute ne scias kion fari, oni ekhavas tre diversajn superfluajn ideojn. Tian superfluan ideon mi ekhavis en iu bela tago, kaj ĝi kondukis min al mia konsulo. Ke estas tute senespere, mi sciis jam antaŭe. Sed mi pensis, ke domaĝas neniam, se oni kolektas spertojn pri homoj. Ĉiuj konsuloj estas gisitaj en la sama muldilo kiel preskaŭ ĉiuj oficistoj. Ili uzas laŭvorte la samajn parolformulojn, kiujn ili devis prezenti ĉe siaj ekzamenoj, ili fariĝas dignaj, seriozaj, ordonemaj, devotaj, indiferentaj, enuantaj, interesiĝemaj kaj profunde malĝojaj je la samaj okazoj, kaj ili fariĝas bone humoraj, gajaj, afablaj kaj babilemaj ĉe la samaj okazoj, sendepende de tio, ĉu ili servas Usonon, aŭ Francion, Anglion aŭ Argentinon. Scii, kaj precize scii, kiam ili montru unu el tiuj emocioj,

estas la tuta saĝo, kiun bezonas tia oficisto. Sed de tempo al tempo ĉiu oficisto foje forgesas sian saĝon kaj fariĝas dum tridek sekundoj homo. Jen oni tute ne rekonas lin, tiam li komencas turni la internan haŭton eksteren. Sed la plej interesa momento estas, kiam li subite sentas, ke la interna haŭto nudas, kaj li rapide rekrustigas ĝin. Por travivi tiun momenton kaj por pliriĉiĝi je sperto, mi iris al la konsulo. La danĝero estis, ke li kontestos min, ke li transdonos min oficiale al la franca polico, ke ili forprenos de mi la eblon libere iri mian vojon, ĉar tiam la polico observus min kaj mi devus fari raporton pri ĉiu el miaj paŝoj, kiun mi faris aŭ intencas fari.

Unue mi devis atendi dum la tuta antaŭtagmezo. Poste oni fermis. Ankaŭ posttagmeze ne venis mia vico. Personoj kiel ni ja ĉiam devas atendi, kien ajn ni venas. Ĉar pri tiu, kiu ne posedas monon, oni supozas, ke tiu havas almenaŭ senmezureble multe da tempo. Tiu, kiu posedas monon, povas aranĝi aferojn per mono; kiu ne havas monon por prezenti, devas pagi per sia tempo kaj sia pacienco. Se oni eĉ ekribelas aŭ esprimas sian senpaciencon laŭ neŝatata maniero, tiukaze la oficisto scipovas iri tiom da kromvojoj, ke oni devas pagi per la kvarobla tempo. Tial oni cedas al la tempopuno, al kiu oni estas kondamnita.

Sidis tie tuta vico de tiuj, kiuj devis oferi sian tempon. Kelkaj sidis jam dum tagoj. Aliaj estis jam sesfoje sendi-

taj tien aŭ tien, ĉar tio mankis kaj tio ĉi ne havis la preskribitan formon, aŭ, pli bone, uniformon.

Jen malgranda, nekredeble dika damo enĵetiĝis, tiel nekredeble grasa. Ne imageblis, kiel grasa ŝi estis. En tiu ĉambro, kie la skeletecaj figuroj atende sidis sur la benkoj, per siaj kapmalantaŭoj preskaŭ tuŝantaj la mure fiksitajn stelflagon, kies dimensio tiel gigantis, ke ĝi pleniĝis la tutan muron. En tiu ĉi ĉambro, kie senkulpaĵoj, laborpretaj kaj laborspertaj homoj atende sidis kun vizaĝesprimoj, kvazaŭ post tiuj multnombraj pordoj oni tiumomente subskribas ilian mortkondamnon, la grasa damo efikis kiel malica ofendo. Ŝi havis peĉe nigran, olean, buklan hararon, okulfrape kurban nazon kaj tre kurbaĵajn krurojn. Ŝiaj brunaj okuloj tiel gape elrigardis el la grasa pastovizaĝo, kvazaŭ ili volus elŝveli el la kavoj en la sama momento. Ŝi estis vestita per la plej bona, kion riĉo povas aĉeti. Ŝi anhelis kaj ŝvitis, kaj sub la ŝarĝo de siaj perloĉenoj, orgarnaĵoj kaj brilantbroĉoj ŝi ŝajnis preskaŭ kolapsi. Se ŝi ne estus havinta tiom da pezaj platinringoj ĉirkaŭ la fingroj, la fingroj certe krevintus.

Apenaŭ ŝi malfermis la pordon, jen ŝi jam kriis: "Mi perdis mian pasporton. Kie estas la sinjoro konsulo? Mi tuj bezonas novan pasporton."

Ho, vidu, ankaŭ aliaj homoj povas perdi sian pasporton. Kiu pensus tion? Mi kredis, ke tio povas okazi nur al maristo. Bone, Fanny, ĝoju, la sinjoro konsulo tuj ra-

kontos al vi tekston pri nova pasporto. Eble vi alkudros la alian bendofinaĵon de la antaŭtuko. Kiel ajn malagrabla estis al mi la damo pro sia sintruda karaktero, mi sentis simpatian al ŝi, la simpatian de tiuj, kiuj estas alforĝitaj en la sama galero.

La akcepta sekretario tuj salte stariĝis: "Memkompreneble, *M'me*¹, nur momenton. Bonvolu!"

Li prenis seĝon kaj petis riverence la damon, ke ŝi sidiĝu. Li alportis tri formularojn, interparolis mallaŭte kun la damo kaj skribis sur la formularojn. La skeletecaj figuroj ĉiuj devis mem plenigi la formularojn, kelkaj kvar- aŭ kvinfoje, ĉar ili estis nebone plenigitaj. Sed la damo evidente ne kapablis skribi, kaj tial estis nur gesto de helpopreteco, ke la sekretario transprenis por ŝi tiun etan penon.

1. *M'me* (france): sinjorino. Kion Traven rakontas pri la damo estas tute reala maljustaĵo, sed ke li rakontas tion iomete antisemiteme, ne estas hazardo, sed sekvo de la miskomprenemo de Marut kaj de multaj samtempoj, ke estas io tipe juda fari negocojn. Nur en la mahagonoromanoj li tute forlasos tiujn cetere ankaŭ jam antaŭe nur tre rarajn antisemitaĵojn. Liaj plej proksimaj batalamikoj en Munkeno, Gustav Landauer, Erich Mühsam kaj dr-o Levine estis judoj. Kaj unu el liaj du plej ŝatataj germanaj verkistoj estis la judo Heinrich Heine. La alia verkisto estis Johann Wolfgang von Goethe.

Kiam la formularoj estis plenigitaj, li salte stariĝis kaj portis ilin tra unu el la pordoj, malantaŭ kiuj la mortkondamnoj estas subskribataj.

Li revenis tre rapide kaj diris duonlaŭte kaj ĝentile al la grasulino: "Mr. Grgrgrgs² deziras vidi vin, M'me. Ĉu vi havas tri fotografaĵojn ĉemane?"

La grasa nigraharara damo havis la fotojn ĉemane kaj donis ilin al la helpopreta sekretario. Tiam ŝi malaperis malantaŭ la pordon, kie oni decidas pri la sortoj de la mondo.

Nur tute malmodernaj homoj eĉ nuntempe plu kredas, ke la sortoj de la homoj decidiĝas en la ĉielo. Tio estas lamentinda eraro. La sortojn de la homoj, la sortojn de milionoj da homoj, decidas usonaj konsuloj, kiuj devas zorgadi pri tio, ke neniuj malutilo trafu la respubliko. Jes, sinjoro.

La damo ne longe enestis en tiu ĉambro de misteroj. Elvenante ŝi fermis sian retikuleton. Ŝi fermis ĝin per forta energia klako. Kaj la klako kriĉis akrevoĉe: "Dio, ni ja havas, kio necesas por tio, vivi kaj lasi vivi."

La sekretario tuj stariĝis, duone elvenis de malantaŭ sia tablo, kaj movetis la seĝon, sur kiu la damo estis sidinta. La damo sidiĝis nur rande de la seĝo, malfermis sian retikulon, traserĉis ĝin dum kelka tempo, elprenis pudroskatoleton kaj lasis kuŝi la malfermitan retikulon

2. Mr. Grgrgrgs: dadaisma nomo

sur la tablo, dum ŝi pudris sin. Kial ŝi jam denove devis pudri sin, kvankam ŝi certe nur antaŭ minuto sin pudris, ne estis tute klare.

La sekretario palpserĉis nun per siaj manoj sur la tuta tablo, por trovi iun paperon, kiun li certe metis al malĝusta loko. Finfine li trovis la folion, kaj ĉar ankaŭ la damo intertempe jam finpudris sin, ŝi prenis la retikulon al si, enmetis la pudroskatoleton kaj plian fojon tiel fermklakis la retikulon, ke la retikulo eligis la saman akran kriĉon kiel nelonge antaŭe.

La skeletecaj figuroj sur la benkoj ne aŭdis la akran kriĉon. Ili ĉiuj ŝajne estis elmigremuloj, kiuj ankoraŭ ne komprenis la mondlingvon klakan³, ĉar ili ne havis ion por povi klaki. Tial ili ja devis sidi sur la benkoj. Tial oni ja ankaŭ ne proponis kun riverenco seĝon al ili. Tial ili ja ankaŭ devis atendi, ĝis ilia vico venos, precize laŭ la numera sinsekvo.

3. mondlingvon klakan: B. T. sciis pri la "artefaritaj lingvoj", sed ne akceptis ilin. En "Lando de l' printempo" (1928) li skribis: "Kaj malhelpas la klopodoj krei novajn arte faritajn lingvojn, dume estas multe pli utile studi unu el la grandaj regantaj vivantaj lingvoj, kiuj disvolviĝis nature. En la sama tempo, dum kiu ĉiuj laboristoj de la mondo povas lerni artlingvon, ili ankaŭ lernas vivantan lingvon, la hispanan aŭ anglan, por interproksimiĝi. Ne per arte farita lingvo, sed per vivanta lingvo oni lernas kompreni aliajn popolojn."

”Ĉu vi ankoraŭfoje povus viziti nin post tridek minutoj, *M’me*, aŭ ĉu ni sendu la pasporton al via hotelo?”

Ĝentila oni estas en usona konsulejo.

”Mi alveturos post horo. Mi ja subskribis la pasporton jam interne.”

La damo ekstaris. Kiam ŝi revenis post horo, mi sidis ankoraŭ tie. Sed la grasa damo ricevis sian pasporton.

Ĉi tie mi finfine ricevos mian pasporton. Tion mi sciis. La sekretario ne devos sendi ĝin en mian hotelon, mi tuj kunprenos ĝin mem. Kaj se mi denove ricevos pasporton, tiam mi ankaŭ denove veturos sur ŝipo, se ne sur hejmlanda ŝipo, do tamen certe sur angla aŭ nederlanda aŭ dana. Almenaŭ mi ricevos denove laboron kaj havos la ŝancon, tamen iam trovi hejmlandan ŝipon en iu haveno, kie oni bezonas ferdeklaboriston. Mi ja ne nur povas farbi, mi ankaŭ scipovas poluri latunon; ĉar, se oni ne povas farbi ion, oni ĉiam poluras latunon.

Mi vere tro hastis pri mia juĝo. La usonaj konsuloj pli bonas ol ilia reputacio, kaj tion, kion diris al mi la belgaj, nederlandaj kaj francaj policistoj pri la konsuloj, estis nenio alia ol nacia envio.

Sed finfine venis la tago kaj la minuto, kiam estis la vico de mia numero kaj oni vokis min. Miaj skeletecaj benkaj kunuloj ĉiuj devis trairi alian pordon por ricevi la mortbaton. Mi estis escepto. Ili vokis min al *Mr. Grgrgrgs* aŭ kiel ajn la viro nomiĝis. Tiu ĉi estis la viro, kiun mi

elkore deziris vidi; ĉar li estis tiu, kiu vere kapablas kompreni la zorgojn de homo, kies pasporto perdiĝis. Se neniu alia en la tuta vasta mondo helpus al mi, li helpos al mi. Li helpis al la orogarnita damo, des multe pli kaj multe pli rapide li helpos al mi. Estis bona ideo de mi, kiu forlogis min ĉi tien, por ankoraŭfoje serĉi mian fortunon.

Ĉapitro 11

La konsulo estas malgranda, magra viro, kiu tute elsekiĝis dum siaj deĵoraj jaroj.

"Sidiĝu," li diris kaj mangestis al la seĝo antaŭ sia skribtablo. "Kiel mi povas servi al vi?"

"Mi deziras havi pasporton."

"Ĉu vi perdis vian pasporton?"

"Ne mian pasporton, sed mian maristodokumenton."

"Aĥ, tiel, vi estas maristo?"

Ekde tiu frazo li ŝanĝis sian paroltonon. Kaj tiu ĉi nova parolmaniero, kiu miksiĝis kun ia tre stranga suspektemo, daŭras nun dum kelka tempo kaj difinas la karakteron de nia interparolo.

"Mi perdis mian ŝipon."

"Pro ebrio, ĉu?"

"Ne. Mi tute ne trinkas tiun venenon, eĉ ne guton. Mi estas seka kiel abstemulo."

"Ĉu vi ne diris, ke vi estas maristo?"

"Tio mi vere estas. Mia ŝipo tri horojn pli frue ekveturis ol anoncote. Estis decidite, ke ĝi elveturu kun la alta tajdo, sed ĉar la ŝipo ne havis kargon, ĝi ne bezonis atenti la tajdon."

"Kaj sekve viaj paperoj restis sur la ŝipo?"

"Jes."

"Tion mi jam supozis. Kiun numeron via maristodokumento havas?"

"Tion mi ne scias."

"Kaj kie oni pretigis ĝin por vi?"

"Tion mi ne povas diri tiel precize. Mi veturis sur bordŝipoj el Boston, el Nov-Jorko, el Baltimore, el Fildelfio, sur la Golfa Fluo kaj eĉ okcidente. Mi ne povas rememori, kie la dokumento estis pretigita."

"Tion mi jam supozis."

"Oni ja ne ĉiutage rigardas sian dokumenton. Mi neniam rigardis ĝin, dum la tempo, kiam mi havis ĝin."

"Jes."

"Ĝi ĉiam estis en mia poŝo."

"Ĉu ŝtataniĝinta?"

"Ne. Naskita en la lando."

"Ĉu registrita, la naskiĝo?"

"Mi ne scias, mi ankoraŭ tro etis, kiam mi naskiĝis."

"Do ne registrita."

"Tion mi ne scias," mi diris.

"Sed mi scias tion."

"Tiukaze vi ne bezonas pridemandi min, se vi scias ĉion."

"Ĉu eble mi volas havi pasporton?" li rediris.

"Tion mi ne scias, sinjoro, ĉu vi volas havi pasporton."

”Ja vi volas havi pasporton, ne mi. Kaj se mi donu pasporton, vi certe devas permesi al mi fari demandojn. Ĉu ne?”

La viro pravis. Tiuj homoj ĉiam pravas. Tio estas tre facila por ili. Unue ili faras la leĝojn, kaj poste oni stariĝas ilin, por enblovi vivon en la leĝojn.

”Ĉu vi havas daŭran adreson en Usono?”

”Ne, mi loĝas sur miaj ŝipoj, aŭ se mi ne veturas sur ŝipoj, mi loĝas en maristaj hejmoj kaj gastejoj.”

”Do neniuj daŭra loĝejo, ĉu membro en registrita klubo?”

”Kiu, mi? Ne.”

”Gepatrojn?”

”Ne, ili mortis.”

”Parencojn?”

”Dank’ al la ĉielo, ne. Se mi havus iujn, mi forĵurus ilin.”

”Ĉu vi balotis?”

”Ne. Neniam.”

”Sekve vi ankaŭ ne troviĝas en la registroj de balotintoj.”

”Certe ne. Mi ankaŭ ne balotus, se mi estus sur firma tero.”

Li rigardas min nun dum longa tempo, sufiĉe stulte kaj perpleksa. La tutan tempon li ridetis kaj ludis kiel sia kolego en Roterdamo per krajono. Kion tiuj homoj fa-

rus, mi demandas al mi, se ne plu estus krajonoj? Sed tiukaze certe estus liniilo aŭ inksorbilo aŭ telefonŝnuro aŭ la okulvitroj aŭ kelkaj paperfolioj aŭ formularoj, kiujn oni kunfaldus aŭ malfaldus. Oficeja ĉambro estas tiel bone ekipita, ke la enestanto neniam enuas. Pensojn, pri kiuj li povas okupiĝi, li ne havas; kaj se li ekhavas iujn, li kutime ĉesas esti oficisto, kaj fariĝas societema homo. Se la fingroj iutage ne plu povus ludi per la ilaro, kiu troviĝas sur la inventarlistoj, ili eble ludus kaj borus je la fundamentoj, kaj tion la fundamentoj ne povus elteni.

”Do, mi ne povas doni al vi pasporton.”

”Kial ne?”

”Ja pro kio? Pro viaj nuraj eldiroj? Tion mi ne povas fari. Tion mi eĉ ne rajtas. Mi ja devas povi montri dokumentojn. Mi ja devas raporti, surbaze de kiuj pruvoj mi pretigis la pasporton por vi. Diru, kiel vi povas pruvi al mi, ke vi estas usonano, ke mi estas devigita okupiĝi pri vi?”

”Sed tion vi ja povas aŭskulti?”

”Kiel? Pro la lingvo?”

”Kompreneble.”

Tio ne estas pruvo. Prenu la kazon de Francio. Ĉi tie vivas miloj, kiuj france parolas kaj ne estas francoj. Ĉi tie estas rusoj, rumanoj, germanoj, kiuj pli bone kaj pli pure parolas la francan ol la francoj mem. Ĉi tie estas miloj,

kiuj naskiĝis ĉi tie kaj ne estas ŝtatanoj. Aliflanke trans la maro estas centmiloj, kiuj apenaŭ kapablas paroli la anglan kaj pri kies usona ŝtataneco ne ekzistas eĉ la plej eta dubo.”

”Sed mi ja naskiĝis en la lando.”

”Tiukaze vi kompreneble povas esti usona civitano. Sed ankaŭ en tiu kazo vi devus pruvi ankoraŭ, ke via patro ne rezervis por vi alian ŝtatanecon, kiun vi ne malektis, kiam vi plene aĝiĝis.”

”Jam miaj pragevoj estis usonanoj kaj ankaŭ jam iliaj gepatroj.”

”Pruvu tion, kaj mi devos pretigi pasporton por vi, ĉu mi volas aŭ ne. Konduku ĉi tien la pragevojn aŭ almenaŭ la gepatrojn. Sed mi volas decide plifaciligi la aferon, pruvu, ke vi estas naskita en Usono.”

”Sed kiel mi pruvu, se la naskiĝo ne estas registrita.”

”Tio certe ne estas mia kulpo.”

”Eble vi eĉ kontestas, ke mi efektive naskiĝis!”

1. ”Eble vi eĉ kontestas, ke mi efektive naskiĝis?”: Hal Croves, la viro, kiu ĉiam asertis, ke li ne estas Traven, en intervjuo diris: ” . . . Ne temas nur pri pasportoj. Temas pri tio, ke homoj sub modernaj kondiĉoj estas devigitaj . . . Se oni ne havas pasporton, ankaŭ ne plu eblas pensi pri la animo de homo, la homo estas tute perdita.” Ret Marut plurfoje en sia vivo provis ricevi pasporton: en la jaro 1914 en Barmen (?), 1915 aŭ 1916 en Kolonjo, en marto de 1917 en Munkeno kaj marte de 1924 en Londono.

”Ĝuste. Tion mi kontestas. La fakto, ke vi staras ĉi tie antaŭ mi, ne estas pruvo por mi, ke vi estas naskita. Mi devas kredi tion. Tiel, kiel mi devus kredi, ke vi estas usonano, usona civitano.”

”Do, vi eĉ ne kredas, ke mi estas naskita? Tio ja vere estas la limo de ĉio ebla.”

La konsulo ridetis sian plej belan oficejan rideton: ”Ke vi estas naskita, mi ja devas kredi; ĉar mi vidas vin ĉi tie per miaj okuloj. Se mi nun pretigus pasporton por vi kaj pravigus ĝin hejme ĉe la instancoj tiumaniere, ke mi skribus en mia raporto: ’Mi vidis la viron kaj kredas, ke li estas usona civitano!’, tiukaze facile povus okazi, ke ili eksigos min. Tion, kion mi kredas, la instancoj hejme ne volas scii. Ili volas scii nur tion, kion mi certe scias. Kaj tion, kion mi certe scias, mi ĉiam devas povi pruvi. Vian ŝtatanecon kaj vian naskiĝon mi ne povas pruvi.”

Foje kaj foje oni emas bedaŭri, ke ni ankoraŭ ne estas faritaj el papermaĉaĵo; ĉar tiel oni vidus pro la stampo, ĉu ni estas produktitaj en la fabriko Usono aŭ en la fabriko Francio aŭ en la fabriko Hispanio, kaj la konsuloj ŝparus la penon disipi sian valoran tempon pro tiaj stultaĵoj.

La konsulo ĵetis la krajonon for de si, ekstaris, iris al la pordo kaj vokis nomon. Sekretario envenas, kaj la konsulo diras al li: ”Trarigardu foje. Kiun nomon vi ha-

vas?” Li turnas sin al mi. ”Ha jes, mi jam rememoras, Gale², ĝuste. Do rigardu, tuj.”

2. Gale (angle): ventego, sed ankaŭ trovebla en la vorto Galileo, kien Jesuo foriris, ĉar profeto ne havas honoron en sia propra lando. (Sankta Johano, 4. 43-44). Ret Marut/ Traven devis forlasi Germanion, ĉar li estis serĉata ŝtatkrimulo pro la revoluciaj okazaĵoj en Munkeno en la jaro 1919. Por Marut Kristo estis ”spartakisto kaj komunisto”, ”kiu diferencis disde la komunistoj nur en tiu punkto, ke li ne bezonis Ruĝan Armeon.” Li ankaŭ skribis en sia anarkiema kontraŭmilita gazeto ’Der Ziegelbrenner’ (La brikofaristo): ”Jesuo estis homo kiel vi kaj mi, kaj tial li tiel gravas.” Gerard Gale, verŝajne konato de B. Traven, eldonis de 1917- 1921 kun sia vivkunulino Magdalena E. Gale la revolucieman gazeton ”Gale’s Monthly” en Meksiko, ĝuste en tiu tempo, kiam Marut en Germanio eldonis ”La brikofariston”. Ribelon de anglaj brikofaristoj F. Engels priskribis en la jam menciita libro ’Situacio de la laborista klaso en Anglio’. Plie la nomo Gale enestas en la vortoj galeaso kaj galero.

La nomo Marut devenas laŭ la supozo de la esploristo Rolf Recknagel verŝajne de la praa hinda literaturo, kie la marutoj aperas kiel ŝtormestaĵoj. Ili estas la kunuloj de Rudra ĉe la venko kontraŭ la demonoj. En la Rigvedo la marutoj laŭ Recknagel estas tiel karakterizitaj: ”Ilian devenon scias neniu; nur ili mem scias la naskiĝlokon unu de la alia. Kun flugiloj unu kovras la alian kaj kune ili batalas, la ventfuriozaj falkoj . . . Tial kun la marutoj la aro kapablas multon. Bela estas via sovaĝeco, kolera estas via senco, kiel de muĝanta Muni (ekstazulo) . . .” Krome oni supozas, ke Ret Marut estas anagramo por la germana ’der Traum’, la sonĝo. Sonĝoj povas esti utopiaj, sed Traven sciis ankaŭ pri taoismaj sonĝinterpretadoj, laŭ kiuj ne estas tiel certa, kio estas pli reala, la sonĝo aŭ la tielnomata reala mondo?

La viro lasas duone malferma la pordon, kaj mi vidas lin elserĉi ĉe ŝranko, kie miloj da flavaj kartoj estas stakitaj, la literon G pro mia nomo. Estas la kartoj de la deportitoj, nedeziratoj, pacifistoj kaj konataj anarkiistoj.

La sekretario revenas. La konsulo, kiu dum tiu tempo staris ĉe la fenestro kaj rigardis malsupren, turnas sin: "Nu?"

"Ne enestas."

Tion mi sciis antaŭe. Nun mi ricevos mian pasporton. Tiel rapide ne. La sekretario foriris denove kaj fermis la pordon post si. La konsulo diras nenion, sidiĝas denove ĉe sia skribotablo, rigardas min dum kelka tempo kaj ne scias plu, kion demandi? Liaj ekzamenaj demandoj sufiĉis ŝajne nur ĝis tiu punkto. Nun li ekstaras kaj forlasas la ĉambron. Ĉiukaze li serĉas konsilon en unu el la aliaj sanktaj ĉambroj. Mi ne plu havas ion por fari kaj rigardas la bildojn sur la muro. Ĉiuj montras konatajn vizaĝojn; la vizaĝo de mia propra patro ne tiel intimas al mi kiel tiuj vizaĝoj. Vaŝington, Franklin, Grant, Lincoln. Viroj, kiuj tiom hatis la burokratismon kiel hundo la katojn. "La lando estu por ĉiam la lando de la libero, kie la persekutatoj kaj ĉasatoj trovu rifuĝejon, se ili nur estas bonvolaj."

"Tiu ĉi lando apartenu al tiuj, kiuj loĝas en ĝi."

Sed kompreneble, tio ja ne povas pluiri ĝis eterne. "La lando apartenu al tiuj, kiuj loĝas en ĝi." La puritana konscienco ne permesis diri, precize kaj koncize: "La lando apartenas al ni, al la usonanoj." Jen estis la indianoj, al kiuj la lando estis donita de Dio, kaj la leĝojn de Dio la puritano devas respekti. "Kie la persekutatoj kaj ĉasatoj trovu rifuĝejon." Tute bone, se ĉiuj, kiuj tie loĝas, estas persekutatoj kaj ĉasatoj el ĉiuj eblaj landoj. Kaj la idaro de tiuj persekutitoj kaj ĉasitoj riglas la landon, kiu estis donita al ĉiuj homoj. Kaj por ĝisfine perfektigi la rigladon, por ke ankaŭ muso ne povu tragliti, ili riglas kontraŭ la propraj filoj. Sub la masko de la propra filo povus ja enŝteliĝi la filo de najbaro.

La konsulo revenas kaj residiĝas. Li trovis novan demandon.

"Vi ja eble povus esti fuĝinta prizonulo aŭ iu, kiu estas serĉata pro grava krimo. Kaj mi pretigus por vi pasporton kun la nomo nomita de vi, kaj mi protektus vin per tiu pasporto kontraŭ la justa persekuto."

"Jes, tion vi farus. Mi nun akceptas, ke mia vizito estis tute sensenca."

"Mi vere tre bedaŭras, ke mi ne povas helpi al vi. Miaj kompetentoj ne etendiĝas sufiĉe vaste por pretigi pasporton aŭ iun paperon, kiu povus servi al vi kiel legitimaĵo. Vi devintus gardi pli zorgeme vian maristodoku-

menton. Tiajn aĵojn oni ne perdu en tiu ĉi tempo, en kiu la pasporto pli necesas ol io ajn³.”

”Sed nun mi tamen ŝatus scii unu aferon.”

”Nome?”

”Estis ĉi tie tre dika sinjorino kun multaj brilantaj ringoj, kiujn ŝi apenaŭ povis porti, ja ankaŭ ŝi perdis sian pasporton, kaj vi tuj donis pasporton al ŝi. Tio daŭris nur tridek minutojn.”

”Sed tio estis ja la sinjorino Sally Marcus el Nov-Jorko, vi certe jam aŭdis la nomon. La granda banko,” li diris per gesto kaj intonacio, kvazaŭ li dirus: Tio estis ja la Princo de Kimrujo kaj ne maristo, kies ŝipo forveturis.

Li certe rimarkis je mia mieno, ke tiel rapide mi ne povis kapti la sencon, ĉar li aldonis: ”Vi certe jam aŭdis la nomon, ĉu? La granda banko en Nov-Jorko?”

Mi dubis eĉ nun kaj diris: ”Sed mi apenaŭ kredas, ke la damo estas usonanino, multe pli facile mi kredus, ke ŝi naskiĝis en Bukareŝto.”

”De kie vi scias tion? Sinjorino Marcus efektive naskiĝis en Bukareŝto. Sed ŝi estas usona civitano.”

”Ĉu ŝi havis sian ateston de ŝtataneco ĉe si?”

”Kompreneble ne. Kial?”

3. pasporto pli necesas ol io ajn alia: Bertolt Brecht skribis ironie en ”Interparoladoj de fuĝintoj”, ke la pasporto el ĉiuj partoj de la korpo estas la plej grava.

”Kiel vi do scias, ke ŝi estas usona civitano? Bone paroli la anglan ŝi ne lernis ĝis nun.”

”Por tio mi ne bezonas pruvon. La bankiero Marcus estas ja konata. Ŝi transveturis en luksokajuto sur la *’Majestic’*.”

”Nun finfine mi komprenas. Mi transveturis nur en antaŭferdeka kajuto sur frajtsĉipo kiel ferdeklaboristo. Kaj tio pruvas tute nenion. Granda banko kaj luksa kajuto pruvas ĉion.”

”La kazo estas ja tute alia, Mr. Gale. Mi diris al vi, ke mi povas fari por vi nenion. Mi eĉ ne rajtas fari ion por vi. Paperojn mi ne rajtas doni al vi. Mi persone kredas, kion vi diris. Sed se la polico kondukus vin al mi, por ke mi agnosku kaj akceptu vin, tiukaze mi glate forneus vin kaj kontestus vian ŝtatanecon. Mi ne povas fari ion alian.”

”Tiel mi do simple pereu en fremda lando.”

”Mi ne havas tian grandan povon, ke mi povus helpi al vi, eĉ se mi persone volonte farus tion. Mi donos al vi karton por hotelo por tri tagoj, kun ĉiuj manĝoj. Post paso de la tri tagoj vi rajtas reveni por dua kaj ankaŭ por tria.”

”Ne, mi tre dankas. Ne klopodu.”

”Eble bileto al la plej proksima iom pli granda haven-urbo estus pli bone por vi, kie vi eble trovos ŝipon, kiu veturas sub alia flago.”

”Ne, dankon. Mi esperas, ke mi mem trovos mian vojon.”

”Nu do. *Good bye* kaj multe da feliĉo!”

Sed jen denove la grandaj kontrastoj inter la usonaj oficistoj kaj oficistoj en aliaj landoj. Kiam mi estis surstrate kaj ĉirkaŭrigardis por trovi horloĝon, mi vidis, ke estas jam post la kvina. La deĵorhoroj de la konsulo finiĝis je la kvara; sed li eĉ ne unufoje montris iun signon de malpacienco aŭ sentigis, ke lia tempo jam delonge pasis.

Nur nun mi efektive perdis mian ŝipon.

Adiaŭ, sunplena Nova Orlean’. *Good bye and good luck to ye!*⁵

Amata, kara amatino en Nov-Orleano, nun vi povas atendi je via knabo; sur la

*Jackson Square*⁶ vi povas sidi kaj plori. Via knabo ne venos hejmen. La maro glutis lin. Kontraŭ ŝtormoj kaj ondoj mi povis batali, per farbo kaj per firmaj pugnoj; kontraŭ paragrafoj, krajonoj kaj paperoj ne. Serĉu sufiĉe

5. Good bye and good luck to ye!(angle): Adiaŭ kaj multe da feliĉo por vi!

6. Jackson Square: publika placo en Nov-Orleano, nomita laŭ la usona prezidanto Andrew Jackson

frue alian, amatino⁷. Ne disipu vian rozkoloran junecon per atendado je senpatriulo kaj nenaskito. Fartu bone! Dolĉaj estis viaj kisoj kaj ardaj, ĉar ni ne zorgis pri geedza licenco.

Forgesu la knabinon. Hoj! Hoj! Vento ekblovas. *Boys, get all the canvas set*⁸. Ĉiun eron de tolo, elprenu ĝin kaj supren!

7. "Serĉu sufiĉe frue alian, amatino": troviĝas en la danckanto de l' skeletulo' (vidu pri tio en rimarko 19/6)

8. Boys, get all the canvas set! (angle): Maristoj, hisu ĉiujn velojn!

Ĉapitro 12

La ekspresa trajno Parizo-Limoĝo. Mi sidas ene kaj ne havas bileton. Ĉifoje ili kontrolas. Sed mi malaperis senspure. Limoĝo-Tuluzo. Mi sidas ene kaj denove ne havas bileton.

Kial ili senĉese kontrolas? Ŝajnas, ke vere estas tro multaj fervojtrompisto, pro kio ili tiel ofte kontrolas. Sed ili tute pravas, se ĉiu veturus sen bileto, kiu tiukaze pagu la dividendojn? Tio ne estus allasebla. Mi malaperas senspure. Post la paso de la kontrolo mi residiĝas sur mia loko. Subite la kontrolisto revenas, laŭiras la vicojn kaj rigardas min. Ankaŭ mi rigardas al li. Tute impertinente. Li iras plu. Oni devas nur scii kiel alrigardi kontroliston, kaj jam oni venkis. Li turniĝas kaj proksimiĝas al mi. "Mi petas, kie vi intencas ŝanĝi la trajnon?"

Tre ruza bubo, tiu kontrolisto.

Mi komprenas nur la la vorton ŝanĝi en tiu momento, ĉar mi unue devas traduki enkaŭ la ceterajn vortojn. Sed tion fari mi eĉ ne sukcesas, ĉar li tuj poste diras: "Bonvolu montri, mi tre petas, vian bileton."

”Nu, amiko, kiom ajn vi ĝentilas, kaj kiom ajn ĝentile vi petas, mi tre bedaŭras, mi ne povas plenumi vian deziron.”

”Tion mi sciis,” li diris tre trankvile kaj diskrete. Mi estas konvinkita, ke la ceteraj pasaĝeroj tute ne rimarkis, kia tragedio ĉi tie deruliĝas.

La viro prenas sian notlibron, skribas ion kaj iras plu. Eble li havas bonan koron kaj forgesas min. Sed en Tuluzo en la stacidomo ili jam atendas min. Sen blovmuziko, sed kun aŭtomobilo.

Estas tre bona aŭtomobilo, sekura kontraŭ fajro kaj rompŝteloj, kaj mi ne povas elfali dum la veturo kaj mi vidas el la fenestro nur parton de la plej supraj dometaĝoj, kiujn ni fluge rapide preterpasas. Estas speciala aŭtomobilo por gastoj, kiujn oni deziras ĉi tie bonveniĝi, ĉar la tuta trafiko devas cedi lokon al mia aŭtomobilo, tiel, ke ĝi povas veturi sen malhelpo. Ĉiukaze la aŭtomobiloj en Tuluzo estas de fabrikmarko, kiun mi ne konas ankoraŭ. Nek Ford nek *Dodge Brothers* povus esperi je vendoj ĉi tie, aŭ ili devus pli akomodi sin al la lokaj postuloj.

Sed mi jam scias, kie mi albordiĝos. Se al mi iam ŝajnas strangaj la moroj kaj kutimoj en eŭropaj landoj, mi ĉiufoje estas survoje al policejo aŭ sub la flugiloj de bastonuloj. Hejme mi neniam en mia vivo havis aferon kun la polico aŭ kun kortumo. Ĉi tie mi povas sidi trankvile

sur kesto aŭ kuŝi senkulpe en lito aŭ promeni tra herbejo aŭ veturi en trajno, ĉiufoje mi albordiĝos policejon. Ne mirige, ke Eŭropo ruiniĝas. La homoj ja tute ne havas tempon por labori, sep okonojn el sia vivo ili devas disipi en policejoj aŭ kun policistoj. Tial la homoj ĉiam estas tiel incititaj kaj tiel volonte militas, ĉar ili seninterrompe devas kvereli kun la polico kaj la polico kverelas kun ili. Ni ne plu prunte donu eĉ groŝon al la eŭropaj landoj, ili nur elspezus ĝin por plimultigi sian policon. Eĉ ne groŝon plu, ne, sinjoro.

”De kie vi venas?”

La altanga pastro sidas denove antaŭ mi. Ili ĉiuj samas. En Belgio, en Nederlando, en Parizo, en Tuluzo. Ĉiam ili devas demandi, kaj ĉiam ili volas scii ĉion. Kaj mem oni faras ĉiufoje denove la grandan eraron, ke oni efektive respondas. Oni devus tute silenti, tute nenion diri kaj lasi diveni ilin. Tiel ili ĉiuj baldaŭ venus en frenezuldomon, aŭ ili ree enkondukus la torturon. Sed se oni respondus neniam, tiukaze la bastonuloj ja eĉ pli stultiĝus ol ili jam estas.

Sed tion oni eltenu, sidi aŭ stari kaj seninterrompe esti pridemandata kaj respondi nenion. La malbenita babililo parolas tute per si mem, tuj kiam alĵetiĝas demando. Tion la longa kutimiĝo kaŭzas. Estas neelteneble lasi ŝvebi en la aero demandofrazon sen restarigi la ekvilibron per respondo. Nerespondita demando ne lasas

trankvilon, ĉiam postkuras, trudiĝas en la sonĝojn kaj forrabas la serenon por labori kaj pensi. La sola vorto "Kial?" kun demandosigno estas la centra punkto de ĉia kulturo, civilizacio kaj evoluo. Sen tiu unu vorto la homoj estas nenio pli ol simioj, kaj se oni donas al la simioj tiun sorĉvorton, ili tuj fariĝas homoj. Jes, sinjoro.

"De kie vi venas, mi volas scii!"

Jen mi foje faris la provon ne respondi, sed jam nun mi ne plu eltenas. Mi devas rakonti ion. Ĉu mi nun diru, ke mi venis el Parizo? Aŭ ĉu mi prefere diru, ke mi venis el Limoĝo? Se mi diras Limoĝo, ili eble malmultekostigos la aferon je ok tagoj, ĉar Limoĝo ja pli proksimas ol Parizo.

"Mi eniris la trajnon en Limoĝo."

"Tio ne estas ĝusta, homo, vi eniris en Parizo."

Atentu, kiel bone ili povas diveni.

"Ne, mi ne eniris en Parizo, sed nur en Limoĝo."

"Sed vi havas ja kajobileton de Parizo en la poŝo."

Ili do denove traserĉis miajn poŝojn. Mi tute ne rimarkis tion, ĉar mi jam tiom kutimiĝis al tio, ke ĝi ne plu kaptas mian atenton.

"Ho, la kajobileton mi havas jam delonge."

"Kiom longe?"

"Ses semajnojn almenaŭ."

"Tio estas rimarkinda. La bileto havas la daton de hieraŭ antaŭtagmeze."

”Tiukaze oni erare antaŭdatis ĝin,” mi diras.

”Evidente. Do, vi eniris en Parizo.”

”Sed de Parizo ĝis Limoĝo mi pagis.”

”Tiel do. Kaj vi estas tia bona pagulo, ke vi aĉetis krom la veturbileto eĉ kajobileton, kiun vi tute ne bezonas, se vi havas bileton. Sed, se vi havis bileton ĝis Limoĝo, kie do estas tiu bileto?”

”Tiun mi redonis en Limoĝo,” mi respondis.

”Sed tiel vi devus havi kajobileton de Limoĝo. Sed ni lasu tion. Unue ni foje firmtenos la personajn indikojn.”

Bone, se ili firmtenos nur la personajn indikojn, mi preferas tion al tio, ke ili firmtenas min.

”Via ŝtataneco?”

Estas nun delikata demando. Ion tian mi ne plu havas, de kiam mi ne povas pruvi, ke mi estas naskita. Mi ja povus provi kiel franco. La konsulo ja rakontis al mi, ke estas miloj da francoj, kiuj ne parolas la francan kaj tamen estas francoj, se temas pri ilia ŝtataneco. Li certe ne kredos tion al mi. Ankaŭ li volos vidi pruvojn. Mi volus nur scii por kiu malpli kostas veturi en trajno sen bileto, por francoj aŭ por eksterlandanoj? Sed la eksterlandano povus ja pensi, ke oni ne bezonas biletojn en Francio, ke li agis bonafide.

Monon ili ne trovis en miaj poŝoj, kaj jam tio suspektindas.

"Mi estas germano," elfulmis el mi, ĉar tute subite kaptis min la ideo, ke mi ekvidu, kion ili faras kun *Boche*¹, do boŝo, se ili trovas lin sen pasporto kaj sen bileto en sia lando.

"Do germano. Nu! Eble eĉ el Potsdam, ĉu?"

"Ne, nur el Vieno."

"Tio estas en Aŭstrio. Sed tio estas ja ĉio la samo. Do germano. Kial vi ne havas pasporton? Diru."

"Tiun mi perdis."

Nun la tuta vico ree deruliĝis. En ĉiu lando ili havas precize la samajn demandojn. Tion kopiis unu de la alia. Elpensitaj ili estis verŝajne en Prusujo aŭ Rusujo, ĉar ĉio, kio koncernas la enmiksiĝon en la privatajn aferojn de homoj, venas el unu el tiuj landoj. Tie la homoj plej pacienas kaj akceptas ĉion, kion oni faras al ili, kaj antaŭ polurita butono ili demetas la ĉapelon. En tiuj landoj la polurita butono estas la malica Dio, kiun oni devas honori kaj adori, por ke li ne venĝu sin.

Du tagojn poste ili punis min per du semajnoj da prizono pro fervoja trompo. Se mi estus dirinta usonano, ili eble eltrovintus, ke mi jam estas unufoje punita pro trompo de la fervojo, kaj tiukaze ĝi kostus pli. Sed ankaŭ mian nomon mi ja ne diris al ili. Estas foje avantaĝe nek havi pasporton nek maristodokumenton, kiujn iu povus trovi en la poŝoj.

1. Boche (slange france): boŝo, germano

Kiam la tagoj de la preparoj jam pasis, ili asignis min al mia laborkolono. Tie estis malgrandaj strangaĵoj stan-
citaj el stanita lado. Por kio oni bezonis ilin, sciis neniu,
eĉ la gardaj oficistoj ne sciis tion. Kelkaj asertis, ke estas
parto de infanludilo, aliaj diris, ke estas parto de kirasŝi-
po, kaj ankoraŭ aliaj estis konvinkitaj, ke apartenas al
aŭtomobilo, kaj kelkaj ĵuris kaj forvetis kontrabanditan
tabakon, ke tiu ladopeceto estas grava parto de stirebla
aerŝipo. Mi firme opiniis, ke ĝi devas aparteni al skafan-
drista ekipaĵo. Kiel mi venis al tiu opinio, mi ne scias.
Sed la ideo fiksiĝis en mi, kaj krome mi iam ie legis, ke
por skafandrista ekipaĵo necesas tuta kolekto de aĵoj,
kiujn oni aliciele neniel povas utiligi.

De tiuj kuriozaj ladodetondaĵoj mi devis ĉiufoje kal-
kuli cent kvardek kvar kaj meti ilin en unu amaseton. Se
mi elkalkulis amaseton, kiu nun kuŝis apud mi, kaj vo-
lis komenci alian amaseton, la gardoficisto venis al mi
kaj demandis min, ĉu mi vere tute precize scias, ke es-
tas cent kvardek kvar pecetoj, aŭ ĉu mi eventuale mis-
kalkulis.

”Mi tute precize kalkulis ilin, estas precize cent kvar-
dek kaj kvar.”

”Ĉu tio vere certas, ĉu mi tute certe povas fidi pri tio?”

Li rigardis min tiel zorgoplene, kiam li demandis min
pri tio, ke mi sincere ekdubis, ĉu vere kaj efektive estas
cent kvardek kaj kvar pecoj, kaj mi diris, ke eble tamen

pli bone estas, ke mi ankoraŭfoje kalkulu ilin. Je tio la oficisto diris, ke mi nepre faru tion, ke tio ĉiukaze pli bone estas, por ke ja ne okazu eraro; ĉar, se ili ne estus tute precize kalkulitaj, ekestus terura skandalo, kiu povus eble eĉ kosti lian postenon, kio tre malagrablus, ĉar li devas zorgi por tri infanoj kaj maljuna patrino.

Ĝuste kiam mi nun kalkulis duan fojon la amaseton kaj trovis la sumon ĝusta, la oficisto denove proksimiĝis. Mi vidis, ke li ree zorgoplene sulkigas la frunton, kaj por ŝpari la zorgojn al li kaj por montri, kiel forte mi partoprenas liajn zorgojn, mi diris, antaŭ ol li povis malfermi la buŝon: "Mi pensas, ke mi prefere plian fojon kalkulu; eble mi tamen miskalkulis je unu aŭ eĉ du."

Sur lia zorgosulka vizaĝo en tiu momento hastis tia beata rideto, kvazaŭ iu rakontus, ke li ricevos post paso de kvar semajnoj heredaĵon kvinmilfrankan.

"Ja faru tion, pro Dio, prefere tute ekzakte kalkulu plian fojon. Ĉar, se tie troviĝus peco tro multe aŭ tro malmulte kaj la sinjoro direktoro ordonus min al si por raporto, mi ne scius, kion fari? Mi tute certe perdus mian postenon, kaj jen la kompatindaj gebubetoj, kaj ankaŭ mia edzino ne tre sanas, kaj krome mia olda patrino. Ho ve, kalkulu do tute ekzakte cent kvardek kvar, precize dekdu dekduojn. Eble vi elkalkulu la pecojn entute podekdue, jen vi ne tiel facile povus miskalkuli."

Ĝis la tago, kiam ili ellasis min, post la fino de mia prizona tempo, mi kalkulis entute tri amasetojn de la detondaĵoj. Eĉ nun mi ne scias, ĉu mi ne vere miskalkulis je unu. Sed mi dorlotas la kvietan esperon, ke la lojala oficisto kaj honesta prizorganto de sia familio ankoraŭfoje dum du semajnoj lasis kalkuli la tri amasetojn, tiel, ke mi ne devas repondecigi, se la viro tamen estas ordonita raporti.

Mi ricevis salajron de kvardek kvar centimoj. Unu afero estas certa, ke, se mi veturus du pliajn fojojn sen bileto per la franca fervojo kaj oni kaptus min, la franca ŝtato nepre bankrotus. Tion eltenas neniuj ŝtatoj, eĉ se ĝi status multe pli bone ol Francio.

Tiun damaĝon mi ne volis kaŭzi al la franca ŝtato, kaj mi ankaŭ ne volis, ke oni povu eĉ nomi min kulpa pro tio, ke la franca ŝtato ne povas interezigi la pruntitan monon.

Tial mi devis forlasi tiun landon.

Tio estas, mi ne volas prisilenti, ke ne nur miaj zorgoj pri la bona stato kaj la regulita interezopagado de la franca ŝtato instigis min pensi pri akcelita ekveturo. Ĉe mia ellaso oni denove avertis min. Ĉifoje tre serioze. Se mi en la daŭro de dekkvar tagoj ne forlasos la landon, min trafos unu jaro kaj deportiĝo al Germanio. Tio denove kostus multon al la povra ŝtato, kaj mi eksentis sinceran kompaton al tiu plagata lando.

Ĉapitro 13

Mi migris suden, sur padoj tiom aĝaj, kiom la historio de la eŭropaj popoloj. Mi restis nun ĉe mia nova nacieco. Kaj se iu demandis min, mi tute seke diris: 'boŝo'. Neniu ofendiĝis pro tio, mi ricevis ĉie manĝon kaj ĉie bonan dormlokon por nokto, de ĉiu kamparano. Ŝajnis, ke mi instinkte trafis la ĝustan. Neniu ŝatis la usonanojn. Ĉiu insultis kaj malbenis ilin. Tiuj estis por ili la rabistoj, kiuj monerigis siajn dolarojn el la sango de filoj de Francio, tiuj por ili estis la vampiroj kaj uzuristoj, kiuj nun plian fojon volas elmonerigi dolarojn el la zorgoj kaj larmoj de la postrestintaj patroj kaj patrinoj, ĉar ili neniam povas sufiĉe plene ŝtopi la faŭkon, kvankam ili jam sufokiĝas en oro. "Se ni nun havus ĉi tie unu el ili, unu el tiuj usonaj uzuristoj, ni mortbatus lin per draŝilo kiel oldan hundon, ĉar li efektive ne meritas ion pli bonan."

Mil damnojn! Jen Fortuno helpis al mi!

"Tute male la boŝoj. Bone, ni faris militon kontraŭ ili, honestan kaj ĝustan militon. Ni reprenis Alzacon de ili. Tion ili tute akceptis, tion ili komprenis. Sed nun tiuj povraj diabloj tute same sidas en la koto kiel ni. Ankaŭ

ilin la usonaj hundoj kaptis je la kolumo kaj elsuĉas eĉ la lastan rongĝitan oston. Ili ĉiuj malsatmortas, tiuj povraj boŝoj. Ni tiel volonte fordonus ion de ni, sed ni havas ja mem nur la nudan vivon, ĉar la usona diablo jam deŝiris de ni ĉion ĝis la ĉemizo. Nu, kial ili cetere transveturis al Eŭropo? Por helpi al ni? Koregan dankon! Por deŝiri ankoraŭ la lastan fadenon de sur nia korpo. Ĉar ni mem devas pagi ĉion. Ni kaj la kompatindaj boŝoj.”

”Tion oni vidas je vi kiel mizere vivas la kompatindaj boŝoj. Tute malsata vi aspektas. Manĝu diligente, prenu. Prenu la plej bonan pecon, se bone gustas al vi. Se trans la Atlantiko ili ĉiuj tiel malsatas kiel vi, jen bonan nokton. Sed ni mem ne havas multon. Kien vi nun volas iri? Al Hispanio? Tio estus ĝusta. Tio prudentas. Ili havas ankoraŭ iom pli ol ni. Ili ne havis militon. Sed ankaŭ ilin la usonanoj ja tiel superruzis pro Kubo kaj la Filipinoj. Jen vi jam denove vidas. Ĉiam la usonanoj elrabas nin, la kompatindajn eŭropanojn. Kvazaŭ ili hejme trans la maro ne sufiĉe havus. Ne, ili devas veni ĉi tien por ŝteli kaj uzuri. Manĝu diligente. Ne ĝeniĝu pro ni, ĉar ni jam ĉesas manĝi. Ni ja ankoraŭ havas iom kaj almenaŭ de tempo al tempo povas satigi nin. Sed vi povraj boŝoj, ĉe vi la etaj beboj malsatmortas en la lulilo.”

”Kaj se nun ĉi tie iu povra diablo povis ŝpari la monon kaj volas transveturi al la usonanoj por perlabori kelkajn dolarojn kaj sendi ilin al siaj gepatroj, jen ili fermas la

pordon, tiuj banditoj. Unue ili ŝtelas la landon de la kompatindaj indianoj, kaj havante ĝin, ili enlasas neniun plu, nur por ke ili tute povu sufokiĝi en la graso, tiuj malbenitaj hundoj. Kvazaŭ ili donacus ion al tiu, kiu venis. Labori li devas kaj multe. La plej aĉan laboron, kiun neniuj usonano emas tuŝi, tiun povas fari niaj viroj.”

”Nu, aŭskultu, estas ja tiel, vi povus ĉi tie tute bone labori kelkajn semajnojn. Tiel vi povus dece nutri vin, ĝissate, por ke vi refortiĝu, ĉar Hispanio ankoraŭ malproksimas. Mon dieu¹, multe pagi ni ne povas, monate po tridek frankojn, semajne po ok frankojn kaj la manĝon kaj la dormadon. Antaŭ la milito la salajro estis semajne nur po tri frankoj, sed nun ĉio tiom terure multekostas, ke estas peko. Ni havis ankaŭ dum la milito boŝon ĉi tie. Militkaptiton. Li estis tia diligenta viro, ni ĉiuj vere malgajis, kiam li devis iri hejmen. Diru, Antoine, Vilhelmo, la boŝo, li estis tre diligenta viro. Li bone laboris. Ni ĉiuj vere tre ŝatis lin, kaj la najbaroj ĉiam diris, ke ni tro bone traktas lin, sed tamen ni donis al li ĉion, kion ni povis doni. Li ricevis la saman manĝon kiel ni, tiurilate ni ne faris diferencon.”

Tie laboris nun mi, kaj baldaŭ mi lernis, ke Vilhelmo certe estis tre fervora laboristo, ĉar mi aŭdis sesfoje ĉiun tagon: ”Mi ne scias, sed Vilhelmo certe venis el tute alia

1. Mon dieu (france): Dio, mia

regiono ol vi. Tiom, kiom tiu Vilhelmo, vi ne kapablas labori. Ĉu mi pravas, Antoine?”

Kaj Antoine konfirmis: ”Jes, certe li venis el tute alia regiono, ĉar tiom, kiom tiu Vilhelmo, li ne kapablas labori. Sed verŝajne ankaŭ inter la boŝoj estas diferencoj, tiel, kiel ĉe ni.”

La ĉiama komparo kun tiu diligenta Vilhelmo, kiu certe pli ol mi estis sperta pri la agrokulturo, kaj kiu certe ankaŭ pro tio tiel ”bone” laboris, ĉar li prefere restadis ĉi tie ĉe la kamparanoj ol esti resendita en la internigejon aŭ pavimi stratojn en Alĝero, baldaŭ atakis miajn nervojn. Eĉ se mi estus laborinta la duonan kvanton, estus trioble tro multe. Tiel malmultekoste la kamparano neniam denove ricevos laboriston. Semajne po ok frankoj. Aliaj kamparanoj devis pagi semajne po dudek, dudekkvin, tridek frankojn. Mi ricevis ok. Mi estis ja la malsatega boŝo, al kiu ili devis doni abundan manĝon, por ke li ree fortiĝu.

Kiam mi forlasis ilin, klarigante, ke mi nun nepre devas ekiri Hispanion, ke mi neniel povas atendi pli da tempo, ke eble eĉ la polico venos, kiu malpermesos al mi labori ĉi tie, mi ricevis por mia sessemajna laboro entute dek frankojn. La kamparano diris al mi, ke li ne havas pli da mono. Se mi eble volus reveni post la unua tago de la nova jaro, li povos pagi la reston, ĉar li ricevos tiam la monon por la rikolto, sed nun li ne havas pli da mono.

Li aldonis, ke mi nun cetere tute sane aspektas, ke do la abunda manĝo efikis bone, kiun mi ricevis ĉi tie, ke mi cetere ankaŭ ne laboris ĝis la renversiĝo, la Vilhelmo . . .

”Jes,” mi diris, ”la Vilhelmo estis ja el Vestfalia en la okcidento, sed mi venas el Sudfalia², kaj tie oni ne tiel streĉe devas labori, ĉar ĉio kreskas per si mem, tie oni ne estas kutimiginta al tia peniga laboro.”

”Tiukaze tio tute kompreneblas,” diris la kamparano. ”Pri Sudfalia ankaŭ mi jam aŭdis multon. Tio estas ja la granda duklando, kie troviĝas tiuj multaj sukcesminejoj, ĉu?”

”Pravas,” mi diris, ”tio estas la parto de la lando, kie troviĝas la multaj altfornoj, en kiuj oni fandas la buleton laŭ Königsberg³.”

2. Sudfalia: ne ekzistanta, ŝerce uzita
3. Buletoj laŭ Königsberg: germane ”Königsberger Klops”, estas malgrandaj viandbuletoj el la regiono de la iama orientprusa urbo Königsberg, nun nomata Kaliningrad kaj enklavo de Rusio. Erich Mühsam (1878–1934), anarkiisto kaj verkisto kune kun Marut kaj Gustav Landauer unu el la aktivuloj de la unua konsilia respubliko en la jaro 1919 en Munkeno, skribis antaŭ 1919 la artikolon ”Kiel arto efikas- interparolado pri la buleto laŭ Königsberg”. Tiun ŝercan artikolon Marut eble konis. En la jaro 1926, kiam Marut jam elkokoniĝis kiel Traven kaj vivis en Meksiko, E. Mühsam estis farinta alvokon en sia gazeto ”Fanal”: ”Kie estas la brikofaristo? Ĉu neniuj el la legantoj de la ’Fanal’ scias, kie la brikofaristo troviĝas? Ret Marut, kamarado, amiko, batalkunulo, homo, informu nin,

”Kiel? La la buleto laŭ Königsberg estas farata el fero, ĉu? Mi ĉiam kredis, ke ili faras ĝin el pistita antracito.”

”Tio estas la falsita. Tiun ili efektive faras el pistita antracito,” mi rediris. ”Pri tio vi ja ne malpravas, ĝi konsistas el pistita antracito kun densigita sulfura peĉo. Sed

moviĝu, donu signon, ke vi vivas, ke vi restis la brikofaristo, ke via koro ne bonziĝis, ke via cerbo ne sklerozigis, ke viaj brakoj ne lamiĝis, ke viaj fingroj ne rigidigis. La bavaroj en 1919 ne kaptis vin; ili jam havis vin ĉe la kolumo, kaj sur la strato vi ankoraŭ fuĝis. Alikaze vi verŝajne tie kuŝus, kie Landauer kuŝas kaj ĉiuj aliaj, kiuj havis vivantan spiriton, kie ankaŭ mi kuŝus, se ili ne estus kaptintaj kaj fortrenintaj min el la murdcentro jam dekkvar tagojn antaŭe. Nun ili ne plu povas molesti vin. La amnestio de la antaŭa jaro devas validi ankaŭ por vi. Estas tempo, priskribi antaŭ la historio la ekeston kaj la iron de la bavara komunumo. Tio, kio okazis ĝis nun en tiu rilato . . . estas stulta kaj malica, maljusta aŭ aplomba. Vi estis la sola, kiu aktive staris en la aferoj kaj tamen povis vidi el certa distanco kaj alto, kiuj malbonoj okazis, kio estis bonintenca, kio estis ĝuste entreprenita, kio pli ĝuste estu entreprenita. La postlasaĵo de Gustav Landauer, liaj leteroj, liaj paroladoj, liaj efikoj en la lasta tempo tre baldaŭ estos aperigitaj por la publika kritiko. Vi staris flanke de li helpante kaj instigante, kiam li estis la popola komisaro por instruo kaj propagando. Ni bezonas vin. — Kiu konas la brikofariston? Kiu el la legantoj de 'Fanal' scias, kie Ret Marut troveblas, atingeblas? Kiu povas eltrovi lian restadejon, sendu tiun ĉi kajeron al li. Multaj demandas pro li, multaj atendas lin. Li estas vokata.” Marut ne respondis, sed salutis pere de la ŝerca vortludo pri la buleto laŭ Königsberg en la Mortula Ŝipo. Mühsam skribis pli poste entuziasman artikolon pri tiu libro kaj ĝia aŭtoro.

la veran, la aŭtentikan buleton laŭ Königsberg ili fandas en altfornoj, kaj tiu multe pli duras ol la plej dura ŝtalo. Per ĝi niaj generaloj plenigis ja la torpedojn, per kiuj ili sinkigis la kirasŝipojn. Mi mem ĉe tia alta forno laboris.”

”Vi estas ja tre ruzaj homoj, tion mi devas koncedi,” la kamparano diris. ”Sed ni gajnis la militon, kaj pro tio ni ne sentas nin ofenditaj de vi. Kaj krome la milito jam finiĝis. Kial do plu malici unu al alia? Fartu bone kaj agrable en Hispanio.”

Foje mi tamen demandos al germano, kio efektive estas buleto laŭ Königsberg. Ĉiu, kiun mi demandis, rakontis al mi ion alian, sed kompreneble, neniun el ili estis germano.

Ĉapitro 14

La pejzaĝo baldaŭ fariĝis tre soleca, nur montara tereno, mi grimpis kaj grimpis. La kamparanoj pli kaj pli raris kaj la kabanoj pli kaj pli mizeris. Akvo abundis, sed la mangaĵo magris kaj apenaŭ sufiĉis. La noktoj estis preskaŭ fridaj, nur en esceptaj okazoj troviĝis kovraĵo kaj ofte eĉ ne sako. La enmarŝo en sunajn landojn ĉiam postulas penojn, tion ne nur unuopuloj, sed ankaŭ tutaj popoloj spertis. "La landlimo nun ne plu malproksimas," estis dirite al mi, kiam mi matene forlasis la paŝtiston, en kies mizera kabano mi dormis, kaj kiu dividis kun mi sian iometon da fromaĝo, cepoj, pano kaj akveca vino.

Tiam mi troviĝis sur vojo, kiu grimpis la montojn kaj denove malgrimpis en la valojn, nur por plian fojon ascendi kaj denove descendi.

Sur tiu vojo mi venis finfine al granda alte volbiĝanta pordego, kiu aspektis tre antikva. Ambaŭflanke de la pordego etendiĝis muro, kiu aspektis same tiel grize flava kaj malnova kiel la pordego. Tiu muro ŝajnis ĉirkaŭi grandan bienon. La vojo kondukis rekte tra la pordega arko.

Por progresi sur la strato, tute ne eblis alie fari ol trairi la pordegon. Mi esperis, ke la vojo kondukos tra la bona korto kaj, ke sur la transa flanko estos simila pordego, tra kiu oni revenos sur la straton.

Mi ekmarŝis, iris tra la pordego kaj migris senflankiĝante antaŭen sen vidi iun.

Sed subite elvenas el iu angulo du francaj soldatoj kun fusiloj kaj surmetitaj bajonetoj, proksimiĝas al mi kaj demandas min pri la pasporto. Ĉi tie ŝajne eĉ la soldatoj demandas pri la marista dokumento.

Mi klarigas, ke mi ne havas pasporton. Sed tiam ili diras, ke ili volas vidi ne mian pasporton vojaĝan, kiu tute ne interesas ilin, sed nur mian pasporton pretigitan de la franca militministerio en Parizo, kiu donas al mi la rajton ĉi tie sen akompano ĉirkaŭpromeni en la remparoj.

"Tion mi ne sciis, ke tio estas remparoj," mi diras, "mi ĉiam iris sur la strato kaj supozis, ke tio estas la vojo al la landlimo."

"La vojo al la limo horon pli frue flankeniĝas dekstren. Tie estas ŝildo. Ĉu vi ne vidis tion?"

"Ne, la ŝildon mi ne vidis."

Mi nun rememoras, ke mi vidis vojon flankeniĝi dekstren. Sed mi memoras ankaŭ, ke mi vidis en la lastaj tagoj tutan aron da vojoj flankeniĝi dekstren aŭ maldekstren. Sed mi supozis, ke plej bone mi iru ĉiam rek-

te antaŭen, en la suda direkto. Tio estis por mi la celata direkto. Mi vidis tiom da ŝildoj. Sed kial ĉiuj ŝildoj koncernu min? Se ili montris la nomon de loko, mi ja ne sciis, ĉu tiu loko pli aŭ malpli proksimas al la limo. Finfine mi nur cirkle irus kaj neniam venus al Hispanio, se mi estus marŝinta laŭ ĉiuj ŝildoj. Mapon, sur kiu mi povintus legi la lokajn nomojn, mi ja ne posedis.

”Ni devas konduki vin al la deĵoranta oficiro.” La du soldatoj prenis min inter si kaj forkondukis min.

La deĵoranta garda oficiro estis ankoraŭ juna viro. Li tre serioziĝis, kiam li eksciis, pri kio temas.

Poste li diris: ”Ni devas pafmortigi vin. Ene de dudek kvar horoj. Laŭ la milita leĝo pri landlimoj. Laŭ paragrafo . . . ” Ĉi momente li diris numeron, kiu ne interesis min.

Kiam la juna oficiro diris tion, li tute paliĝis kaj apenaŭ povis eligi la vortojn. Li devis kvazaŭ elsputi ilin.

Estis permesite al mi sidiĝi, sed la du soldatoj kun la surmetitaj bajonetoj plu staris apud mi. La juna oficiro prenis folion kaj provis skribi. Sed li estis tro ekscitita kaj devis lasi tion. Fine li elprenis cigaredon el sia arĝenta skatoleteto. Li volis interlipigi ĝin, sed ĝi falis malsupren, kaj mi vidis tremi liajn manojn. Por kaŝi tion, li elprenis plian fojon cigaredon kaj metis ĝin nun per tute rigida kaj lanta brakmovo en la buŝon. La alumetoj trifoje estingiĝis. Antaŭ ol li flamigis la kvaran, li demandis

min: "Ĉu vi fumas?" Poste li premis butonon, kaj envenis servosoldato, al kiu li ordonis aĉeti du cigaredajn pakaĵetojn en la kantino, je lia nomo. Mi ricevis tiam la cigaredojn kaj rajtis fumi, dume la du soldatoj staris apud mi kiel idoloj kaj ne moviĝis.

Trankviliĝinte, la oficiro prenis libron, foliumis en ĝi kaj legis kelkajn tekstpartojn. Poste li prenis alian libron kaj ankaŭ en tiu legis, serĉante diversajn tekstpartojn, kiujn li komparis kun aliaj.

Estis strange. Mi, kiu estis la viktimo, ne sentis eĉ aludon de ekscitiĝo. Kiam la oficiro diris al mi, ke ili devas pafmortigi min ene de dudek kvar horoj, tio ne pli profunde impresis min, ol se li dirus: "Malaperu de ĉi tie, kaj rapidu."

Tio lasis min frida kiel pavimŝtono.

Fakte kaj tute senŝerce dirite, mi estis jam delonge morta. Mi ne estis naskita, ne havis maristodokumenton, neniam en mia vivo povus denove ricevi pasporton, kaj ĉiu povis trakti min laŭ sia plaĉo, ĉar mi estis ja neniu, oficiale tute ne estis en la mondo, sekve ne eblis, ke iu povus serĉi min. Se iu min mortbatus, ne estus murdo. Ĉar mi mankis nenie. Oni povas detrui la honoron de mortulo, oni povas prirabi lin, sed ne murdi.

Tio kompreneble estas enkaŭ konstruitaj imagoj, kiuj tute ne eblas, ja eĉ estus signo de frenezo, se ne ekzistus burokratismo, landlimoj kaj pasportoj. En la

epoko de la ŝtato eĉ tute aliaj aferoj eblas, kaj el la universo povas esti forviŝitaj eĉ tute aliaj aferoj ol kelkaj homoj. La plej intimaj, la plej praaj leĝoj de la naturo povas esti forviŝitaj kaj kontestataj, se la ŝtato volas ampleksigi kaj profundigi sian internan potencon koste de la ununuro, de la unuopo, kio estas la fundamento de la universo. La universo estas ja konstruita el individuoj, ne el gregoj. Ĝi ekzistas pere de la reciproka kontraŭa efikado de individuoj. Kaj ĝi kolapsas, se la libera moviĝado de la unuopaj individuoj estas limigata. La individuoj estas la atomoj¹ de la homa specio.

Eble la anoncita pafmorto ankaŭ pro tio ne postlasis impreson ĉe mi, ĉar mi jam unufoje gustumis tion, kaj

1. La individuoj estas la atomoj de la homaro: ” . . . nenio ekestas el la neestantecon. Alikaze ĉio el ĉio povus ekesti, ĉar baza ŝtofo ja ne necesus. Kaj se tio, kio perdiĝas, forirus en la neestantecon, tiukaze ĉiuj aĵoj jam delonge estus neniigitaj..”
 ”La korpoj estas . . . aŭ kunmetaĵoj aŭ ties partoj. La lastaj devas esti nedivideblaj kaj senŝanĝeblaj, se ne ĉio iru en la neestantecon, sed daŭre ekzistu spite al la dissolviĝo de la aĵoj; ĉar ili estas el solida naturo kaj tute ne povas dissolviĝi. Tiel la bazaj partoj de ĉiuj aĵoj devas esti nedivideblaj (=atomoj).”
 Kontraŭe al la ĵus citita Demokrito, kiu nur materie difinis la atomojn, Epikuro eltrovis, ke la atomoj ”deflankiĝas de la rekta linio”. Tio kondukis lin al tio, kio la juna Marx difinis la ”filozofio de la absolutecon kaj al libereco de la memkonscio”, ĉar sen tio la atomoj ja ne povus deflankiĝi dum la libera falo. (Epikuro vivis de 342/341 ĝis 271/270 antaŭ Kristo) La citaĵoj estas el ”Leteroj al Herodoto”.

tiutempe kun ĉiuj kunligitaj hororoj. Sed ripetoj mildigas, eĉ se temas pri ripetitaj mortkondamnoj. Se vi unufoje eskapis, vi ĉiam eskapos.

Kio ajn estis la motivo de mia febla percepto fronte al la minacita mortkondamno, ĉiukaze ĝi estis egala al mi kiel eluzita kaforestajo.

”Ĉu vi malsatas?” la oficiro nun demandis.

”Kiel lupo, tion vi povas kredi al mi,” mi diris.

La oficiro ruĝiĝis sur la tuta vizaĝo kaj komencis laŭte ridi.

”Vi havas bonajn nervojn!” li diris ridante. ”Ĉu vi supozis, ke mi ŝercas?”

”Pri kio?” mi demandis. ”Ne eble pri la proponita manĝo, ĉu? Tio vere ne plaĉus al mi.”

”Ne,” la leŭtenanto respondis, kaj li fariĝis iom pli serioza, ”pri la pafmortigo.”

”Tion mi prenis tiel serioze, kiel vi celis ĝin. Laŭvorte. Se tio estas skribita en via leĝo, vi efektive devas fari tion. Sed vi ja ankaŭ diris, ke laŭ la leĝo ene de dudek kvar horoj. Sed ĝis nun pasis nur kvarono de horo, kaj vi ja espereble ne pensas, ke mi malsatos dum la ceteraj dudek tri horoj kaj tri kvaronoj, nur pro la pafmortigo. Se vi volas pafmortigi min, vi povas doni al mi ankaŭ bonan manĝon. Tion mi vere ne emas donaci al via ŝtato.”

”Vi ricevos bonan manĝon. Mi ordonos tion. Dimanĉan manĝon por oficiroj, duoblan porcion.”

Mi nun vere volas vidi, kion francaj oficiroj dimanĉe manĝas. Pridemandi min aŭ demandi pri la maristodokumento, tion la oficiro opiniis ne necesa. Finfine mi foje trovis homon, kiu nenion volis scii pri miaj privataj aferoj. Eĉ miajn poŝojn ili ne traserĉis. Sed la leŭtenanto pravis. Se la pafmortigo estas enda, ne valoras la penon pridemandi aŭ trafosi poŝojn. La rezulto ja ĉiam samus.

Daŭris sufiĉe longe, ĝis mi ricevis mian manĝon. Tiam oni kondukis min en alian ĉambron, en kiu staris tablo kovrita per tablotuko, sur kiu la manĝilaro estis aranĝita laŭ alloga maniero, por faciligi kaj plibeligi al mi la manĝadon. Oni aranĝis ĉion nur por unu persono, sed teleoroj, glasoj, tranĉiloj, forkoj kaj kuleroj tiom amase troviĝis, ke ili bone sufiĉus por ses personoj.

Miaj gardpostenuloj intertempe finis sian deĵoron, mi ricevis du aliajn. Unu el ili staris nun ĉe la pordo kaj la alia malantaŭ mia seĝo. Ambaŭ kun surmetita bajoneto, kaj la fusilo ĉepiede. Sed ekstere antaŭ la fenestro mi ekrigardis ankoraŭ du pliajn, kiuj patrolis tien kaj reen kun la fusiloj sur la dorso. Honorgardo.

Ili ne bezonis timi, sed povintus trankvile iri en la kantinion por ludi kartojn. Ĝis mi ne enhavus, sub mia led-

haŭto, la dimanĉan manĝon por oficiroj, la duoblan porcion, mi forirus eĉ ne paŝon.

Se juĝi laŭ la multaj diversaj tranĉiloj, forkoj, kuleretoj, grandaj kaj malgrandaj teleroj, vitroteleretoj kaj grandaj kaj malgrandaj vin- kaj likvorglasoj, kiuj staris antaŭ mi, min ja atendis io, de kio povus forpeli min eĉ ne triobla mortkondamno. Se oni komparas kun la pelveto, en kiu oni antaŭmetis al mi la belgan ekzekutan manĝon, atendis min ĉi tie neniuj terpoma salato kun hepata kolbaso. Mi havis nur unu zorgon, kaj tiu estis, ĉu mi kapablos manĝi ĉion, ĉu mi eble tamen devos lasi nemanĝita ion, kio povus plenigi la lastan horon de mia ekzisto per la torturaj turmentoj de amara pentado, ĉar mi seninterrompe devus pensi pri tio, kiel eblis, ke mi ĝustetion lasis nemanĝita.

Fine estis la unua kaj finfine ankaŭ la unua kaj duono. Jen la pordo malfermiĝis kaj la festeno komenciĝis.

Unuafoje en mia vivo mi lernis per spertado, kiaj barbaroj ni estas, kaj kiaj kulturaj homoj estas la francoj, kaj mi aldone lernis per spertado, ke la nutraĵoj de la homoj ne estu boligitaj, frititaj, rostitaj, stufitaj aŭ bakitaj, sed preparitaj, kaj, ke tiu preparado estas arto, ho ne, ne arto, estas doto de la naturo metita en la lulilon de benato kaj selektito, pro kiu li fariĝas geniulo.

Sur la Tuscaloosa la manĝo estis bona, ja bonega. Sed post la manĝoj mi ĉiam povis diri, kion mi manĝis. Tion

mi ĉi tie ne povis diri. Tio, kion oni prezentis ĉi tie kaj kiel gustis, tio estis kiel poemo, ĉe kiu oni revas kaj eniĝas en la staton de beateco, kaj pri kiu oni poste, demandita pri la enhavo, devas konfesi kun plej eble granda miro, ke oni ne atentis ĝin.

La artisto, kiu kreis tiun poemon, estis vere granda. Li ne postlasis en mi senton de pento pro postrestintaj versoj. Ĉiu plado estis tiel zorgeme pesita kaj kunmetita kaj taksita rilate al ĉiuj valoroj de nutro kaj ĝuo, ke mi postlasis eĉ ne forkpintplenon, ke mi plu atendis la sekvontan pladon per pli intensa antaŭĝuo, kaj kiam ĝi venis, emis saluti ĝin per fanfaroj. Tiu ĉi festeno daŭris proksimume horon kaj kvaronon aŭ iom pli, ĝi povintus daŭri kvar horojn, kaj tamen mi estus postlasinta nenion. Ĉiam denove alvenis tia buŝpleno, kaj poste tia frandaĵo, tiam denove tia kandizita frukto kaj plia tia kremiĝo, kaj post ĉiu manĝmetado oni volis vidi plian. Sed kiam ĉio finfine pasis — belo ja multe pli rapide pasas ol tristo —, kiam ankaŭ ĉiuj likvoroj, vinoj, vinetoj kaj gutetoj iris la vojon de ĉiuj bonaj gutoj, kiam fine la kafo — dolĉa kiel knabino en la unua vespero, varmega kiel ŝi en la sepa kaj nigra kiel la sakroj de la patrino, kiam ŝi ekscias tion — estis trinkita, mi sentis min plenigita sako, sed mi sentis ankaŭ bonan farton kaj paradizan saton kun fajna kaj delikata aludo de sopiro pri la vespermanĝo.

Sinjoroj! Jen manĝo, kiun mi nomas artaĵo. Pro tia mi kun ĝojo lasus min ĉiutage dufoje pafmortigi.

Mi fumis cigaron, el kiu mi suĉis ĉiujn aromojn kaj sundancojn el la karibaj Antiloj. Poste mi kuŝigis min sur la soldatliton, kiu staris en la ĉambro, kaj observis la bluajn nubojn.

Ho, kiel bela estas la vivo! Belega! Tiel bela, ke oni lasas sin pafmortigi kun dankema rideto sur la lipoj, sen perturbi per grumbloj aŭ lamentoj la harmonion de la vivo.

Ĉapitro 15

Kelkaj horoj jam pasis antaŭ ol la leŭtenanto envenis. Mi ekstaris, sed li diris al mi, ke mi trankvile plu kuŝu, ke li volas informi min nur pri tio, ke la komandanto ne revenos morgaŭ vespere kiel li pli frue informis, sed jam morgaŭ matene, do antaŭ la paso de miaj lastaj dudek kvar horoj, ke tial li havas la eblon transdoni la aferon al la komandanto mem.

”Kompreneble,” li aldonis, ”vian sorton tio ne ŝanĝos. La milita leĝo tre precizas pri tiu punkto kaj ne lasas breĉon.”

”Sed la milito jam pasis, sinjoro leŭtenanto,” mi diris.

”Certe. Sed ni troviĝas ankoraŭ en la militstato, kaj verŝajne tiom longe, ĝis ĉiuj kontraktoj estos definitive regulitaj. Niaj limfortikaĵoj ankoraŭ ne ŝanĝis siajn regularojn eĉ en unu punkto, ili estas la samaj kiel dum la milito. Pro la nunaj minacaj cirkonstancoj en niaj nordafrikaj kolonioj la militministerio karakterizas la hispanan landlimon kiel pli grandan danĝerzonon ol nian orientan limon.”

Tio tre malmulte interesis min, kion li rakontis pri danĝerzonoj kaj regularoj. Kial la franca politiko koncer-

nu min? Min post mia saniga tagmeza dormo io tute alia interesis, kaj tion mi ankaŭ tuj volis sciigi al li.

Li intencis foriri, sed ankoraŭfoje rigardis min kaj poste ridete demandis: "Mi esperas, ke vi bone fartas spite la cirkonstancojn. Ĉu la manĝo bone gustis al vi?"

"Jes, dankon." Vere, mi ne povis lasi ĝin nedirita:

"Pardonu, sinjoro leŭtenanto, ĉu mi ricevos ankaŭ denove vespermanĝon?"

"Kompreneble. Ĉu vi eble pensas, ke ni lasas vin mal-satmorti? Eĉ, se vi estas boŝo, ni tamen ne lasos vin mal-satmorti. Post kelkaj minutoj vi ricevos la kafon."

Mi hezitis iomete pro ĝeniĝo, oni ja ne volas malĝentili al sia gastiganto. Sed merdon, kial mortkondamnito plu ĝentilu?"Pardonu, sinjoro leŭtenanto, ĉu mi ricevos denove oficiran manĝon, duoblan porcion?"

"Memkompreneble. Kion vi pensis? Tio estas en la regularo. Estas via lasta tago. Kun malbona memoro pri nia fortikaĵo ni vin ja ne al la, al . . . do forsendos."

"Ne zorgu pri tio, sinjoro leŭtenanto, mi tenos la fortikaĵon en bona memoro. Vi povas pafmortigi min trankvile. Nur ne ĝuste en tiu momento, kiam la oficira manĝo, la duobla porcio, kuŝas sur la tablo. Tio estus ago de barbarismo, kiun mi forgesus neniam, kaj kiun mi tuj devus raporti, kiam mi alvenos tie supre."

Kelkan tempon la oficiro rigardis min, kvazaŭ li ne bone komprenus. Efektive ne estis tiel facile klarigi al si

el miaj francaj vortfragmentoj, kion mi celis. Sed subite li kaptis la sencon kaj komprenis. Kaj tiam li tiel ridis, ke li devis iri al la tablo por povi firmteni sin je ĝi. La du soldatoj supozeble komprenis ion, sed la ĝustan sencon ili ne kaptis. Ili staris rigide kiel pupoj. Sed de la ridado de la leŭtenanto ili fine tamen infektiĝis kaj kunridis, sen scii, pri kio temas, kaj je kies kostoj okazas tiu ridado . . .

La komandanto tre frue revenis, kaj je la sepa matene ili kondukis min al li.

”Ĉu vi ne vidis la ŝildojn?”

”Kiujn ŝildojn?”

”Nu, tiujn ŝildojn, sur kiuj legeblas, ke tio ĉi estas arma tereno, kaj, ke tiu, kiun oni renkontos en tiu ĉi tereno, estos traktata laŭ la milita leĝo. Tio signifas, ke vi jam estas mortkondamnita, sen procesa debato, kaj, ke oni pafmortigos vin.”

”Tion mi jam scias.”

”Do, la ŝildojn vi ne vidis?”

”Ne. Kaj se mi vidis ilin, tiukaze mi ilin ne atentis. Mi ankaŭ ne povas legi, kio estas skribita sur la ŝildoj. Ĝustadire, mi povas legi tion, sed ne kompreni.”

”Vi estas nederlandano, ĉu ne?”

”Ne, mi estas boŝo.”

Se mi estus dirinta, ke mi estas la diablo, kiu ĵus venis laŭ la plej rekta vojo el la infero por persone forkondu-

ki la komandanton, li ne povus montri pli mirigitan vizaĝon.

”Mi supozis, ke vi estas nederlandano. Vi estas oficiro en la germana armeo aŭ almenaŭ vi estis, ĉu ne?”

”Ne, mi neniam estis soldato en la germana armeo.”

”Kial ne?”

”Mi estas C. O.¹, prokonsciencia rifuzanto, kiu dum la tuta tempo de la milito sidis enprizono.”

”Ĉar vi spionis, ĉu?”

”Ne, ĉar la germanoj supozis, ke mi ne allasas la militon. Kaj tial ili tiom timis, ke ili metis min kaj ses aliajn, kiuj same ne volis allasi la militon, en prizanon.”

”Alivorte, vi kaj la ses aliaj kunkaptitoj estus povintaj malebligi la militon?”

”Almenaŭ la boŝoj supozis tion pri mi. Antaŭe mi ne sciis, ke mi estas tia forta viro. Sed tiam mi eksciis tion, ĉar alikaze ili ja ne bezonus meti min en prizanon.”

”En kiu fortikaĵa prizono vi do troviĝis?”

1. C.O, conscientious objector (angle): militserva rifuzanto. E. Mühsam (vidu pri tio 12/4) rifuzis la servon, estis kondamnita je prizono. O. Maria Graf (vidu pri li ĉe 43/9), kiu pli poste internacie famiĝis kiel la aŭtoro kun la bavara ledopantalono, alia amiko de Marut, ludis antaŭ komisiono la idioton. Marut mem eble tial ne devis servi en la Unua Mondmilito, ĉar li ŝanĝigis sian ŝtatanecon komence de la milito al usonano. Estas alia afero, ke Ret Marut skribis kelkajn soldatrakontojn kaj eĉ novelon, kio pruvas, ke li bone konis la soldatan vivon de tiu tempo.

"En . . . en . . . en Sudfalio."

"En kiu urbo?"

"En Deutschenburg."

"Pri tiu loko mi neniam aŭdis."

"Jes, oni parolas nur malofte pri ĝi. Tio estas tute sekreta fortikaĵo, kiun eĉ la boŝoj mem ne konas."

La komandanto turnis sin nun al la leŭtenanto: "Ĉu vi scias, ke la viro estas germano?"

"Jes ja, li tuj diris tion."

"Ĉu tuj li diris, sen antaŭaj pretekstoj?"

"Jes ja."

"Ĉu li havis fotografan aparaton, mapojn, bildojn, desegnaĵojn, planojn aŭ ion tian?"

"Ne, ne videble. Mi ne ordonis traserĉi lin, li ĉiam estis observata kaj ne povis kaŝi ion."

"Bone. Ni rigardu, kion li havas."

Nun venis du kaporaloj, kaj tiuj traserĉis min. Sed ili ne sukcesis. Ĉio, kion ili trovis, estis kelkaj frankoj, disŝirita naktuko, eta kombilo kaj sapopeco. La sapon mi portis ĉe mi kvazaŭ legitimaĵo, ke mi apartenas al civilizita raso, ĉar mia eksteraĵo ne ĉiam permesis konkludi tion. Kaj legitimaĵon ja finfine ankaŭ mi bezonis.

"Entranĉu la sapon," oni ordonis al unu el la kaporaloj. Sed ankaŭ interne estis nenio alia ol sapo. La komandanto evidente supozis, ke enestas ĉokolado.

Tiam mi devis demeti la botojn kaj ŝtrumpojn, kaj ili traserĉis la plandumojn de miaj botoj.

Sed, se jam ĉiuj tiuj multaj policistoj ne trovis tion, kion ĉiuj ŝatus havi de mi, kaj ankaŭ ili ja bone scias kiel traserĉi, tiukaze la kaporaloj tiom malpli trovis ĝin. Se la homoj nur dirus, kion ili serĉas, mi volonte dirus, ĉu mi havas ĝin aŭ ne. Tiel ili povus ŝpari als si la penon. Tamen, en tiu kazo ili denove ne havus laboron kaj plian fojon ne scius, kion fari?

Tio certe estas tre valorplena objekto, kiun ili serĉas en miaj poŝoj en ĉiuj landoj. Eble la mapo de perdiĝinta orminejo aŭ de diamantkampoj, kiu sinkis en sablon. La komandanto preskaŭ perfidis ĝin, ĉar li parolis pri mapoj; sed rapide li rememoris, ke estas malpermesate perfidi la grandan profundan sekreton, kiun rajtas scii nur bastonuloj kaj soldatoj.

”Mi nur unu aferon ne komprenas,” la komandanto ree turnis sin al la leŭtenanto, ”kiel eblis, ke li sukcesis preterpasi la gardistojn de la eksteraj remparoj, sen esti rigardita kaj halitigita?”

”Dum tiuj ĉi horoj estas nur malmulte da trafiko sur la alkondukantaj vojoj. Mi aranĝis en konformeco kun la ordono de la sinjoro komandanto por tiu tempo ekzercadon sur remparo ĉe la alia flanko, kaj ĉi tie restis nur patroloj, komisiitaj observi la alkondukantajn vojojn. Certe li traglitis inter du patroloj. Se estas permesa-

te, mi volus prezenti pro tiu sperto al la komandanto la proponon entrepreni la ekzercojn nur kun triono de la trupo, por ke la nombro de gardostarantoj ne estu reduktita.”

”Ni supozis, ke neniuj alproksimiĝoj eblas. Mi devis agi laŭ la validaj instrukcioj, kies mankojn mi, kiel vi certe memoras, raportis. Mi havas nun fortan pozicion por venkigi nian koncepton. Tio havas valoron. Ĉu ne?”

Mi ne sciis, kial koncernu min, kiun koncepton ili opinias pli bona. Kial ili diskutis ĉion ĉi en mia ĉeesto? Sed, estas vere, kial ili sekrete parolu antaŭ mortulo?

”De kie vi venis?” la komandanto nun demandis min.

”De Limoĝo.”

”Kie vi transiris la landlimon?”

”En Strasburgo.”

”En Strasburgo, ĉu? Ĝi tute ne situas ĉe la landlimo.”

”Mi volis diri, ke tie, kie la usonaj trupoj havas sian bazon.”

”Vi celas la teritorion de la Mozelo, ĉu? Do vi sekve transvenis de la Saarteritorio?”

”Jes, tion mi volis diri. Mi interkonfuzis Strasburgon kaj Saarsburg.”

”Kion vi faris ĉi tie la tutan tempon en Francio? Ĉu vi petis almozojn?”

”Ne, mi laboris. Ĉe kamparanoj. Kaj ĉiufoje, kiam mi havis denove iom da mono, mi aĉetis veturbileton kaj

denove iom plu veturis, ĝis mi ree laboris ĉe kamparano kaj ree povis aĉeti veturbileton.”

”Kien vi nun volis iri?”

”Al Hispanio.”

”Kion vi volas fari en Hispanio?”

”Vidu, sinjoro komandanto, baldaŭ la vintro venos, kaj mi ne ŝparis monon por hejtaĵoj. Tial mi do pensis, ke mi prefere iru sufiĉe frue al Hispanio. Tie ankaŭ vintre tre varmas, kaj oni ne bezonas hejtaĵojn. Tie oni povas sidi trankvile sub la suno kaj manĝi dum la tuta tago oranĝojn kaj vinberojn. Ili tie kreskas sovaĝe en la apudŝoseaj fosaĵoj, oni devas nur pluki ilin, kaj la homoj ĝojas, se oni plukas ilin, ĉar tiuj estas por la hispanoj nuraj fiherboj, kiujn ili ne volas havi.”

”Do, vi volas iri Hispanion, ĉu?”

”Mi volis iri. Nun ja ne plu eblas.”

”Kial?”

”Ĉar vi pafmortigos min.”

”Se mi nun ne ordonos pafmortigi vin kaj diros al vi, ke vi reiru per la plej rapida vojo al Germanio, kaj ke vi povos foriri libere sub la kondiĉo, ke vi tuj reiros al Germanio, ĉu vi promesus tion?”

”Ne.”

”Ne?” Li strange rigardis la leŭtenanton.

”Prefere esti pafmortigita. Al Germanio mi ne iros. Mi ne kunpagos ŝuldojn. Sed nedepende de tio, mi planis iri

al Hispanio, kaj mi iros Hispanion kaj al neniuj aliaj lokoj. Se mi volas iri tien, tiam mi iras tien. Se vi pafmortigos min, mi ne povos iri tien. Hispanion aŭ la morton. Nun vi povas trakti min laŭ via plaĉo.”

La komandanto ekridis, kaj ankaŭ la leŭtenanto ridis. Kaj la komandanto diris ridante: ”Kara amiko, tio savis vin. Mi ne diru kial, por ke oni ne misuzu tion. Sed vi konvinkis min, ke mi rajtas lasi vin libere foriri, sen neglekti per tio mian devon. Kion vi diras, leŭtenanto?”

”Mi konsideras la konvinkon de la sinjoro komandanto la sole ĝusta, kaj mi trovas nenion, kio povus ŝargi mian konsciencon aŭ mian honoron.”

Poste la komandanto diris: ”Eskorto vin nun tuj kondukos al la limo kaj transdonos vin al la hispana lingardo. Mi certe ne eksplicite devas atentigi vin, ke en tiu kazo, se oni denove vidos vin en la proksimo, ankaŭ, se estus ekstere de pure armea teritorio, ne plu estos demando, kia sorto vin atendus en la du horoj post via aresto. Ĉu vi ekzakte komprenis, kion mi celis diri?”

”Jes ja, sinjoro komandanto.”

”Bone, tio estas ĉio. Tuj ekiru.”

Sed mi staris plu kaj tretumis unu piedon sur la alia.

”Ion plian?” demandis la komandanto.

”Ĉu mi rajtas demandi al la sinjoro leŭtenanto?”

Ne nur la komandanto, sed eĉ pli la leŭtenanto, preskaŭ ŝtoniĝis. La komandanto ĵetis rigardon al la leŭtenanto, kvazaŭ li jam vidus lin antaŭ la milita tribunalo.

Li ĝuste suspektis: la leŭtenanto efektive estis mia aliancano.

”Bonvolu demandi la sinjoron leŭtenanton.”

”Pardonu, sinjoro leŭtenanto, mi ankoraŭ ne matenmanĝis.”

La komandanto kaj la leŭtenanto eksplodis per laŭta ridado, kaj la komandanto kriis al la leŭtenanto: ”Nun certe ne plu estos dubo, ke la viro ne estas supektinda.”

”La dubo min jam hieraŭ forlasis,” diris la leŭtenanto, ”kiam mi demandis lin, ĉu li malsatas.”

”Bone, vi ricevu ankaŭ matenmanĝon,” la komandanto diris, eĉ nun plu ridante.

Sed mi havis plian enkoran deziron.

”Sinjoro leŭtenanto, ĉar estas jam mia lasta manĝo, mia adiaŭa manĝo, ĉu mi rajtus peti pri oficira matenmanĝo, pri duobla porcio? Mi tiel volonte deziras konservi la fortikaĵon en altestima memoro.”

La komandanto kaj la leŭtenanto tiel ekmuĝis de ridado, ke la tuta fortikaĵo ŝajnis ekstremi.

Ridante kiel urso, la komandanto elkriis la jenajn vortojn, kiujn li nur pene povis teni vice, ĉar ili denove kaj denove estis forhakitaj de lia krianta, tondranta ridado: ”Tio estas la efektiva malsatega boŝo, se li jam dronas,

se jam la maŝo estas ĉirkaŭ lia kolo, li ankoraŭ volas manĝi kaj manĝi kaj plian fojon manĝi. Tiun voreman idaron de la diablo ni neniam subigos.”

Mi esperas, ke la boŝoj por tiu bona opinio pri la germanoj, kiun mi sugestis al la du francaj oficiroj, starigos por mi indan monumenton. Nur ne en la Aleo de l’ Venkintoj², tiukaze prefere nenium. Jen la aĉa gusto en la buŝo neniam forlasus min, kaj ne sufiĉe radikalaj revolucioj aperus al mi kiel fantomoj.

2. Aleo de l’ Venkintoj: troviĝis en Berlino, sed pro la Dua Mondmilito ne plu ekzistas; restaĵoj de la damaĝitaj, parte senkapigitaj, ŝtonfiguroj staras nun antaŭ brika muro de tombejo en Berlino.

Ĉapitro 16

Du viroj kun bajonetaj fusiloj akompanis min. Tiel mi enmigris en la sunplenan Hispanion. Kun ĉiuj armeaj honoroj. La soldatoj min gvidis al la limgardo kaj tie transdonis min al la hispanaj limoficistoj.

"Paperojn li ne havas," diris la kaporalo, kiu akompanis min.

"*Es alemán?*¹" demandis la hispano.

"*Si, señor*²," mi diris.

"Estu bonvena!" la hispano respondis, kaj al la kaporalo li diris, ke estas en ordo, kaj ke li transprenas min. La kaporalo rigardis al sia horloĝo kaj poste skribis ion sur raportfolion. Tiam la du soldatoj sin turnis kaj formarŝis.

"*Good bye, France*³!"

La limo de Francio malaperis el miaj okuloj.

La hispana oficisto tiris min nun en la gardoĉambron, kie min tuj ĉirkaŭringis ĉiuj oficistoj, kaj ĉiuj skuis mian manon kaj ĉirkaŭbrakis min. Unu el ili eĉ volis kisi mi-

1. Es alemán? (hispane): Ĉu vi estas germano?
2. Si, Señor (hispane): Jes, sinjoro
3. Good bye, France! (angle): Adiaŭ, Francio

ajn vangojn. Faru militon kontraŭ la usonanoj, kaj vi ne trovos pli bonajn amikojn sur la tuta terglobo ol la hispanojn! Se ili scius, kiu mi estas, ke mi forprenis Kubon kaj la Filipinojn de ili, kaj, ke mi krimis kontraŭ ili laŭ kelkaj pliaj manieroj, ili ne mortbatus min, por diri la veron, kaj ili ankaŭ ne resendus min en tiun regioneton, kie mi neniam denove rajtas montri min, sed ili efektive traktus min fride kiel malsekaj jakoj kaj indiferentus al mi kiel malnova litopajlo.

Unue ili enverŝis vinon por mi, poste sekvis ovojn kaj delikata fromaĝo, tiam io por fumi kaj denove vino kaj denove ovojn kaj delikata fromaĝo, kaj tiam ili diris al mi, ke baldaŭ la tagmanĝo sekvos. La oficistoj ekstere deĵorintaj envenis unu post la alia. Kaj nun neniu eliris denove. Tutaj kontrabandistaj taĉmentoj nun povus veni, tio tute indiferentus al ili. Ĉi tie estis germano, kaj al tiu oni devis montri, kiel oni pensas pri Germanio kaj la germanoj. Kaj por montri tion al li tute precize, honore al li, oni forlasis ĉiujn deĵorojn.

Se juĝi laŭ mia aspekto, mi ne estis glora ekzemplo de tiu tia pura kaj pimpa germana lando kaj de ĝiaj ĉiam tiel freŝe lavitaj kaj pimpaj enloĝantoj. De kiam mia Tuscaloosa forvelis, mi ŝanĝis nek mian kostumon nek miajn botojn, nek mian ĉapelon, kaj mia tolaĵo aspektis tia, kia ĝi devas aspekti, se oni lavas ĝin ĉe riveretoj kaj riveroj, kiujn oni preterpasas, per pli aŭ malpli da sapo

pli aŭ malpli zorgeme, se oni poste pendigas ĝin sur arbusto, mem banas sin kaj fine tiel longe atendas, ĝis la tolaĵo sekigis, aŭ ĝis oni devas surmeti ĝin ankoraŭ malseka, ĉar komencas plui.

Sed mia aspekto ŝajne estis por ili la plej bona pruvo, ke mi venis rekte sen haltoj el Germanio. Tia, ili imagis, devas aspekti germano, kiu perdis la militon, kiun la usonanoj ĝisĉemize elrabis kaj la angloj elmalsatigis. Kaj mia aspekto tiel perfekte kongruis kun iliaj imagoj, ke tiukaze, se mi dirus, ke mi estas usonano, ili supozus min impertinenta mensogulo, kiu volas mistifiki ilin.

Ke iu, kiu rekte sen halto venis el Germanio, devas havi teruran kaj eĉ dum kvin jaroj ne mildigeblan malsaton, tio estis klara al ili. La tagmanĝo, amasigita antaŭ min, tiel abundis, ke mi povis kompensi senpene la kvin-jaran malsatadon.

Poste iu alportis ĉemizon, alia botojn, alia ĉapelon, alia ses ŝtrumpoparojn, alia nadtukojn, alia kolumon, alia silkajn kravatojn, alia pantalonon, alia jakon kaj tiel tio progresis seninterrompe. Mi devis ĉion akcepti kaj forĵeti ĉion, kion mi posedis ĝis tiam.

Posttagmeze ni kartludis. Tiun kartludon mi ne scipovis, sed ili instruis min, kaj baldaŭ mi ludis tiel bone, ke mi forgajnis de ili konsiderindan sumeton, kio tre plezurigis ilin, kaj kio ilin instigis ludi plu kaj plu.

Tra tiu stacio ankoraŭ neniam pasis germano, kaj tial ili feste honoris min kiel la unuan reprezentanton, la unuan aŭtentikan reprezentanton de tiu en tiu lando tiel amata popolo.

Ho, sunplena Hispanio! La unua lando, kiun mi renkontis, kie oni ne demandis pro mia marista dokumento, kie oni ne volis scii mian nomon, mian aĝon, mian korpolongon, miajn fingropremaĵojn. Kie oni ne trafosis miajn poŝojn, kie oni ne trenis min nokte al iu landlimo, kie oni ne forpelis min kiel oldan hundon, kie oni ne volis scii, kiom da mono mi havas kaj de kio mi vivis la lastajn monatojn.

Ne, ili eĉ ŝtopis miajn poŝojn, por ke finfine iu iam trovu ion en ili. La unuan tagon mi restis en la gardoĉambro, la unuan nokton mi devis dormi en la domo de unu el la oficistoj, la sekvintan tagon oni prizorgis min en lia domo. Vespere alia oficisto transprenis min. Neniam iu volis fordoni min; ĉe ĉiu mi estus devinta resti plej prefere semajnon. Sed tion tiu, kies vico nun estis, ne permesis. Kaj kiam la vico finiĝis kaj estis rekomenconta, ĉiuj loĝantoj de la landlima vilaĝeto venis unu post la alia kaj esprimis sian pretendon je mi, kaj mi devis resti ĉiun tagon ĉe alia civitano. La konkurado, por ke mi foriru de ĉiu kun la sento, ke li gastigis min multe pli bone ol la najbaro, devigis min iunokte fuĝi. Mi estas firme konvinkita, ke la homoj nun ĉiuj asertas, ke

ili ne atendis de mi tian sendankemon. Sed la morto per pafoj aŭ la pendumilo estis ja gaja komedio kompare al la turmentega morto, kiu tie atendis min, kaj kiun mi povis eviti per nenio alia ol la nokta fuĝo. Pro tiaj miskomprenoj la moroj de la homoj aĉiĝas. Mi certe plu vivas en ilia memoro kiel iu, kiu devas esti forkurinta punkaptito, ĉar mi skuis la polvon de la piedoj sub la ŝirmo de la nokto. Se venos tien denove fremdulo, ĉifoje eble ĝusta germano, tre verŝjanas, ke ili donos eĉ ne varman supon al li, aŭ, se ili tamen donos ĝin, tiukaze kun suprentiritaj brovoj kaj mieno, kiu klare montras: "Malsatmorti ni lasas neniun, kaj eĉ se estus la Satano mem." El amo povas fariĝi ne nur la malo, sed multe pli malbone, el amo povas fariĝi sklaveco. En tiu ĉi kazo estis sklaveco kun mortbato. Eĉ sur la korton mi ne povis iri sen sperti, ke tuj familiano postkuris kaj zorgeme demandis, ĉu mi havas ankaŭ molan paperon. Jes, sinjoro.

Tion neniuj homoj eltenas, aŭ nur paralizulo. Se mi estus aludinta, ke mi intencas ekvojaĝi, la homoj katenintus min. Mi pensas, ke certe iu prudentulo vivas inter tiuj homoj, kiu vidas mian malican agon en pli malda lumo.

Ĉapitro 17

Tuj kiam Sevilla komencis enuigi min, mi formarŝis al Cadiz, kaj tuj kiam en Cadiz la aero ne plu eltenebulis, mi migris reen al Sevilla, kaj kiam en Sevilla la noktoj ne plaĉis al mi, mi ekiris al Cadiz. Tiel pasis la vintro, kaj mian sopiron al Nov-Orleano mi estus povinta glate vendi kontraŭ kvarondolaro, sen senti pro tio konsciencajn riproĉojn. Kial devas esti ĝuste Nov-Orleano?

Mi havis eĉ ne unu etan paperon pli en la poŝo ol en tiu delonge pasinta tago, kiam mi enmigris en tiun landon. Kaj neniam iu bastonulo interesiĝis pri miaj paperoj aŭ pri mia de kie, kien aŭ por kio. Ili havis aliajn zorgojn. Senpasportaj kompatinduloj estis ilia plej malgrava zorgo. Se mi ne havis monon por dormejo kaj kuŝigis min en iu angulo, mi kuŝis la postan matenon ĝuste tiel trankvile kaj senkulpe kiel mi kuŝigis min vespere. Kaj centfoje bastonulo preterpaŝis, kaj centfoje li bone atentis, ke neniu erare forŝtelu min. Mi tute ne kuraĝas pensi pri tio, kio okazus al aliaj landoj, se povra junulo aŭ eĉ tuta familio dormus sur pordega trairejo aŭ pasigus la nokton sur benko sen esti arestitaj kaj malaperintaj pro

vagabondado kaj senhejmeco en prizonon aŭ en labor-domon. Germanion certe tuj detruus tertremo kaj diluvo Anglion, se tia viro, kiu kuraĝas senhejmi, ne estus arestita kaj ĵetita en karceron por sufiĉe longa tempo. Ekzistas ja tuta vico de landoj, kie senhejmeco kaj senrimedeco estas krimo; tio estas hazarde la samaj, en kiuj energia rabo, se ili nur ne kaptas vin, ne estas krimo, sed la unua paŝo al estimata civitano.

Kiam mi kuŝis sur benko, okazis, ke bastonulo vekis min por diri, ke tuj pluvos, ke mi agus bone, se mi irus al la transa pordega vojo aŭ al la remizo ĉe la alia fino de la strato, kie pajlo estas, kie mi pli bone povus dormi kaj kie ne enpluvos.

Se mi malsatis, mi iris en panvendejon kaj diris al la viro aŭ al la virino, ke mi ne havas monon, sed tiom pli da malsato, kaj mi ricevis panon. Neniu naŭzigis al mi la ekziston per la enuiga demando: "Kial vi ne laboras? Vi estas ja forta kaj sana viro!"

Tion ili konsiderus grava malĝentileco. Estis ja tiel, se mi ne laboris, mi certe havis bonajn kialojn por tio; kaj demandi min pro tiuj kialoj, tion ili konsideris malĝentila.

Kiom da ŝipoj tie elveturis! Kelkajn tagojn eĉ ses. Certe estis laboro sur tiu aŭ alia. Sed mi ne zorgis pri tio. Mi ne postkuris la laboron. Ja kial? La hispana printempo alvenis.

Pri la laboro mi zorgu? Mi estis en la mondo, mi vivis, vivoplenis, mi spiris la aeron. La vivo tiel mirinde belis, la suno tiel oris kaj varmis, la lando tiel fabelece ĉarmis, ĉiuj homoj tiel afablis, eĉ se ili iris en ĉifonvestoj, ĉiuj homoj tiel ĝentilis, kaj pli ol ĉio alia estis tie tiom multe da vera libero. Ne estis miraklo. La lando ja ne partoprenis en la milito por la libero kaj la demokratio en la mondo. Tial la milito ĉi tie ne gajnis la liberon, kaj la homoj ne perdis ĝin.

Estas tiel neimageble ridinde, ke ĉiuj landoj, kiuj asertas pri si, esti la plej liberaj landoj, donas en la realo al siaj loĝantoj la plej limigitan liberon kaj tenas ilin dum la tuta vivo sub kuratoreco. Suspektinda estas ĉiu lando, en kiu oni tiom parolas pri la libero, kiu laŭdire troveblas interne de ĝiaj limoj. Kaj se mi vidas dum la enveturo en havenon de granda lando gigantan statuon de la Libereco, neniuj devas rakonti al mi, kio okazas post la statuo. Kie oni tiel laŭte devas krii: Ni estas popolo de liberaj homoj!, tie oni volas nur kaŝi la fakton, ke la libero estas entombigita, aŭ ke oni tiom prirongis ĝin per centmiloj da leĝoj, ordonoj, dekretoj, instrukcioj, regularoj kaj policaj bastonoj, ke restis nur la kriado, la laŭta fanfara bruego kaj la diinoj de libereco. En Hispanio neniuj homo parolas pri libero, kaj en alia lando, en kiu oni same ne parolas pri libero, mi foje aŭdis mencion de

la vorto mallibero. Tiun vorton oni parolis okaze de manifestacio. La manifestacio, kiun partoprenis la tuta loĝantaro, ĉe kiu honorindaj civitanoj ne timis iri post la flagoj de komunistoj kaj anarkiistoj, kaj ĉe kiu la komunistoj sin trovis ne tro noblaj por marŝi malantaŭ la flagoj de la patrio, okazis protesto kontraŭ la polico, kiu provis enkonduki laŭ la prusa modelo specon de deviga registriĝo por la loĝantaro. Ĝustadire, ĝi proponis nur, ke ĉiu civitano unu fojon jare registrigu en policejo sian adreson, sian nomon, sian aĝon kaj sian profesion. Sed la loĝantaro tuj flaris la diablon sub la masko kaj sciis jam ekde la unua vorto, ke tio estus nur la komenco de la deviga registriĝo.

Ekzistas hodiaŭ neniu homo surtere, kiu ne scias, kion signifas Germanio. La milito kontraŭ Anglio kaj Usono estis la plej bona reklamo por Germanio kaj por germana laboro. Ke Prusujo estas lando, scias nur malmultaj homoj surtere. Kiam oni aŭdas en Usono kaj en multaj aliaj landoj la vorton "Prusujo", tiam oni neniam ligas ĝin al la lando Prusujo aŭ al ĝiaj loĝantoj, sed ĝi estas sinonimo por la strangolado de la libero kaj por polica kuratoreco.

Kiam mi estis en Barcelono, mi preteriris iutage grandan konstruaĵon, kaj mi aŭdis kriojn, plorĝemojn kaj vedadon eliĝi el tiu konstruaĵo.

"Kio tie okazas?" mi demandis viron, kiu ĝuste preteriris.

"Tio estas la armea prizono," li diris al mi.

"Sed kial la homoj tie tiel kordisŝire krias?"

"La homoj? Sed ili estas ja komunistoj."

"Ili ja ne devas krei, se ili estas komunistoj."

"Ĉu vi vere ne komprenas? Oni nun tradraŝas kaj torturas ilin."

"Sed kial do?"

"Ili estas ja komunistoj."

"Tion vi nun jam la trian fojon diris al mi."

"Tial oni ja mortbatas ilin. Vespere oni tiam elportas kaj enterigas ilin."

"Ĉu ili estas do krimuloj?"

"Ne, sed komunistoj."

"Tial oni torturas kaj mortbatas ilin?"

"Jes, ili volas fari ĉion alia. Al tiuj ĉio ne sufiĉe taŭgas. Ili volas nin fari sklavoj¹, tiel, ke ni ne plu povas fari, kion

1. Ili volas nin fari sklavoj: "Mi abomenas la komunismon, ĉar ĝi estas la negacio de la libero, kaj ĉar mi ne povas imagi ion home indan sen libero. Mi tial ne estas komunisto, ĉar la komunismo koncentras kaj ligas ĉiun potencon de la socio en la ŝtato, ĉar ĝi necese kondukas al la centralizo de la propraĵo en la manoj de la ŝtato. Male mi deziras la radikalan forigon de la ŝtato, la radikalan ekstermon de la aŭtoritata principo kaj de la kuratoreco de la ŝtato, kiuj sub la preteksto morale instrui kaj civilizi la homojn, ilin ĝis hodiaŭ sklavigis, subpremis, ekspluatis kaj koruptis. Mi deziras la organizon de

ni volas. La ŝtato faru sola ĉion, kaj ni ĉiuj estu nur ankoraŭ la laboristoj de la ŝtato. Sed tion ni ne volas havi. Ni volas labori, tiam, kiam ni volas, kiel ni volas, kie ni volas kaj kion ni volas. Kaj se ni ne volas labori, sed morti pro malsato, ni ankaŭ tiukaze ne volas, ke iu enmiksiĝu en tio. Sed la komunistoj volas enmiksiĝi en nian tutan vivon, kaj la ŝtato komandu ĉion. Tute juste, ke oni mortbatas ilin.”

Ĉu mi pro tio kondamnu Hispanion? Mi eĉ ne pensas pri tio. Ĉiu epoko kaj ĉiu lando, kiel ajn civilizita, havas siajn persekutojn de kristanoj, siajn herezulajn aŭtodaŭdojn kaj torturojn de sorĉistinoj. En Usono la herezuloj estas ne pli bone traktataj ol en Hispanio. La malĝojiga, la lamentinda, sed tute homeca afero estas, ke tiuj, kiuj ĵus hieraŭ mem estis la persekutatoj, nun estas la plej kruelaj persekutantoj. Kaj inter tiuj bestecaj persekutantoj nun jam troviĝas ankaŭ la komunistoj. La plipostulantoj, la antaŭenpuŝantoj estas ĉiam persekutataj. Viro, kiu enmigris antaŭ kvin jaroj Usonon kaj hieraŭ ricevis sian duan ateston de ŝataneco, hodiaŭ estas la viro, kiu plej sovaĝe krias: ‘Firme riglu la limojn, ne plu enlasu iun.’ Kaj tamen ili ĉiuj estas nur enmigrintoj kaj filoj de enmigrintoj, eĉ la prezidento . . .

la socio kaj de la kolektiva kaj socia propraĵo de sube supren sur la vojo de la libera asociado kaj ne de supre suben helpe de iu aŭtoritato, kiu ajn ĝi estu.” (M.Bakunin)

Kial mi postkuru la laboron? Jen oni staras antaŭ tiu, kiu havas laboron por disdoni kaj estas traktata kiel al-trudiĝema petanto de almozoj . . . ”Mi nun ne havas tempon, revenu pli malfrue.” Sed se foje la laboristo diras: ’Mi nun ne havas tempon aŭ mi ne emas labori por vi’, tiukaze estas revolucio, striko, skuado je la fundamentoj de la komuna prospero, kaj la polico venas, kaj tutaj miliciaj regimentoj almarŝas kaj starigas la mitralojn. Jen la vero: estas kelkfoje malpli hontige peti pri pano ol peti laboron. Kaj tamen, ĉu la ŝipestro sola povas veturigi sian ladokeston, sen la laboristo²? Ĉu la inĝeniero sola povas konstrui siajn lokomotivojn sen la laboristo? Sed la laboristo devas peti kun ĉapelo enmane pro laboro, devas stari kiel hundo batota, devas ridi pri la kretena ŝerco de la labordonanto, kvankam li tute ne emas ridi, nur por teni en bona humoro la ŝipestron aŭ la inĝenieron aŭ la mastron aŭ la skipestron de laboristoj aŭ kiun ajn, kiu havas la kompetenton diri la aŭtoritatajn vortojn: ’Ni dungas vin!’

Se mi tiel humile devas peti pro laboro por ricevi ĝin, mi povas ankaŭ peti postrestintajn tagmanĝojn en gas-

2. Kaj tamen, ĉu la ŝipestro povas sola veturi sian ladokeston, sen la laboristo? Ĉu la inĝeniero sola povas konstrui siajn lokomotivojn sen la laboristo?: Tiujn demandojn B. Brecht simile ripetas en sia poemo ”Demandoj de leganta laboristo”.

tejoj. Hotelkuiristo ne tiel forĵete traktas min, kiel jam traktis min homoj, de kiuj mi petis laboron.

Do, kial postkuri la laboron, se la suno tiel ore brilas, se ĉie estas loko por dormi kaj ĉiuj homoj afablas kaj ĝentilas, se neniuj policistoj volas ekscii ion de mi, se neniuj bastonulo traserĉas miajn poŝojn pro la perdita recepto por fari flekseblan vitron?

Mi ekhavis apetiton je fiŝoj, kaj mi opiniis, se mi volas manĝi fiŝojn, estas plej simple havigi ilin, kaj por havigi ilin, mi devis ilin kapti. Panon, supon kaj ĉemizon mi ja facile povis havigi al mi; sed peti kiel almozulo ilaron por kapti fiŝojn, tio vere ŝajnis tro moderna al mi. Mi tial atentis, kiam pasĝerŝipo alvenis kaj la vojaĝantoj forlasis la doganan konstruaĵon. Tie iu almanigis valizon al mi, kaj kiam mi redonis tiun valizon al la posedanto en la hotelo, mi ricevis tri pesetojn en la manon.

Kun tiu mono mi iris en butikon kaj aĉetis fadenon kaj hokon por kapti fiŝojn. Tio entute kostis proksimume peseton. Kvazaŭ preterpase mi rakontis al la vendisto, ke mi estas maristo, kiu perdis sian ŝipon. Jen la vendisto ridis, envolvis sufiĉe zorgeme miajn aĵojn en paperon kaj transdonis ilin al mi kun:

*"Favor!"*³ Mi volis preni mian kvitancon, sed la vendisto ridetis, disŝiris per eleganta gesto la kvitancon, ĵetis ĝin per alia eleganta gesto malantaŭ la ŝultron, kliniĝis

3. Favor! (hispane): Kompleze

ĝentile kaj diris: "Estas pagite, mi tre dankas! Multe da plezuro ĉe la kaptado de fiŝoj, sinjoro."

Kaj en tiu ĉi lando mi postkuru la laboron? Tiun landon mi forlasu? Mi ja ne meritus, ke la hispana suno brilus sur min.

Ĉapitro 18

Mi sidis sur la kaja muro kaj tenis mian hokfadenon, kiu pendis en la akvo. Neniu fiŝo ekmordis, kvankam mi tiel bone provizis ilin per la sangokolbaso, kiun mi kunportis de nederlanda ŝipo, kie mi estis por manĝi restaĵojn, manĝi kun la maristaro. Ankaŭ ili ne ĉiam esta dignaj aferoj, tiuj vizitoj por manĝi la restaĵojn sur la ŝipoj, la kunmanĝado kun la maristaro de ŝipo, kiu ankras enhavene. La laboristo, kiu havas bonan laboron aŭ almenaŭ supozas havi bonan postenon, sentas sin foje tre supereca al laboristo, kiu ne havas laboron. Kaj tiun superecon li ankaŭ sentigas al la senlaborulo. La plej granda diablo por la laboristo estas la laboristo. 'Nu, *beachcombers*¹, vi strandvaguloj, ĉu vi denove ne havas ion por ŝtopi ĝin en viajn grimacajn vizaĝojn? Jen vi volas veni jam plian fojon sur nian keston, kaj ni donu al vi plian fojon manĝon, por ke vi povu ŝtopi ĝin en viajn grimacilojn, ĉu? Sed nur du el vi rajtas suprenveni. Vi porkoj alportas tro da koto al ni. '

1. Beachcombers (angle): strandvaguloj, bordaj irantoj. Oni nomis ilin ankaŭ flugantaj fiŝoj kaj outerbounder. Ili estis la malo de tiuj maristoj, kiuj neniam forlasis sian ŝipon.

Tiam ni ne rajtis veni al la kajutoj, sufiĉe ofte ne. Ni devis halti antaŭ la pordoj. Tiam la kunproletoj ŝutis ĉion, kio restis sur la teleroj, kaj kion ili kelkfoje jam havis enbuŝe, en la grandan ladopelvon, en kiu oni estis alportinta la supon, tiam ili elŝovis la pelvon al ni, kaj ni devis manĝi sur la ferdeko, kie ni kaŭris sur la planko. Se ni tiam devis peti kuleron — mi kunhavis pro longa sperto ĉiam mian propran en la poŝo — ili diris, ke ni ne ricevos kulerojn. Tiukaze ni fiŝumis per fingro en la kaĉo. Aŭ ili ĵetis kelkajn kulerojn al ni kaj ĵetis ilin tiel lerte, ke ili falis en la kaĉon, tiel, ke ni devis eltiri ilin per niaj kotaj fingroj, kio ŝajnis doni inferan plezuron al tiuj uloj.

Kaj tiuj maristaroj eĉ ne estis la plej fiaj. Jen estis kelkaj, kiuj forpelis nin de la ŝipo, ĉar ni estas por ili fripona bando. Aŭ aliaj, kiuj antaŭ niaj okuloj ŝutis la plej belajn pelvojn plenajn de viando, legomo kaj terpomoj en la maron, kaj tutajn panojn postĵetis, nur por ĉagreni nin. Estis poste kelkfoje sufiĉe dolĉe travivi, se tiu aŭ alia el ili pro iu cirkonstanco estis maldungita aŭ elsaltis pobe, kaj tiam devis kuŝi kun ni sur la plaĝo, devis iri kun ni por manĝi restaĵojn, kaj tiel lernis, kiel sentiĝas tiuspeca traktado fare de la propraj klaskamaradoj.

Ne ĉiuj tiel agis. Sufiĉe da pesetoj mi ricevis de libervole donantaj ŝipproletoj, mi ricevis tutajn ladskatolojn plenajn de spicita bovaĵo aŭ hepata kolbaso aŭ sango-

kolbaso, laduojn plenajn de legomoj, pokilogramo kafen de la kuiristoj, tutajn panojn, kukojn kaj pudingojn. Unufoje dekdu, mi ripetas: dekdu rostitajn kokinojn, el kiuj mi mem devis forĵeti dek, kiujn mi ne povis manĝi kaj konservi, ĉar mi ja ne havis fridujon en miaj pantalonaĵoj. Ĉion, kion oni posedas en la mondo, oni havas ĉe si aŭ en si.

Kiam oni troviĝas sur la plaĝo apud hispanaj, afrikaj, egiptaj, hindiaj, ĉinaj, aŭstraliaj kaj sudamerikaj havenoj, oni koniĝas kun tre diversaj homoj kaj tre diversaj metodoj kiel vivteni sin. Sed neniu tiel fride sange lasas iun morti pro malsato kiel en multaj okazoj la laboristo. Kaj la laboristo de la propra nacio estas la plej terura el ĉiuj diabloj². Okazis, ke la maristaroj forpelis min, la usanon, de la usonaj ŝipoj. Male mi vivis kiel germano sur franca ŝipo kiel princo. La maristaro eksplicite invitis min, ke mi aperu sur la ŝipo por ĉiu matenmanĝo, ĉiu tagmanĝo kaj ĉiu vespermanĝo, dum la tuta tempo, kiam la ŝipo plu ankros en la haveno de Barcelono. Kaj mi ricevis la plej bonan, kio envenis la kajuton. Sed sur germanaj ŝipoj la maristoj tuj sur la falda ŝtuparo kun granda ŝildo alsaltis min: "Eniro malpermesita!" La ger-

2. Kaj la laboristo de la propra nacio estas la plej terura el ĉiuj diabloj: "Sed la konkurado de la laboristoj unu kontraŭ la alia estas la plej fia flanko de la nunaj rilatoj inter la laboristoj, la plej akra armo kontraŭ la proletaro . . ." (F. Engels)

manaj ŝipoj estas la unu nuraj, kiujn mi konas, kiuj foje pendigas en la haveno grandan ŝildon kun la surskribo: "Eniro malpermesita!", en la germana lingvo kaj en la lingvo de la lando, en kies haveno ili troviĝas. Jes, sinjoro.

Kiam mi restadis en Barcelono, oni rakontis al mi, ke en Marsejlo multaj usonaj ŝipoj ankras, kiuj ne povas trovi maristojn, ĉar tro multaj forfuĝis. La maristaro de vaporŝipo kunprenis min al Marsejlo. Sed estis falsa alarmo. Eĉ ne unu usona ŝipo ankris en la haveno, kaj ankaŭ sur la malmultaj aliaj nenio estis aranĝebla.

Tute malesperiĝinte mi iris tra la stratetoj en la havena kvartalo. Mi eniris tavernon, kiun multaj maristoj frekventas, por vidi, ĉu mi eble renkontos konaton, kiu povus helpi, ĉar mi ne havis eĉ centimon en miaj poŝoj.

Kiam mi eniris kaj ĉirkaŭrigardis pro seĝo, proksimiĝis kelnerino, afabla juna knabino, kaj demandis, kion mi volas trinki. Mi diris al ŝi, ke mi ne havas monon, ke mi nur volas rigardi, ĉu iu konato enestas, kiu eble donos iom al mi. Ŝi demandis min, kio mi estas. Mi diris: "Germana maristo."

Jen ŝi diris: "Sidiĝu, mi alportos manĝon por vi!"

Mi rediris: "Sed mi ja ne havas monon."

"Ne gravas," ŝi diris. "Vi tuj havos sufiĉe da mono."

Tion mi ne komprenis kaj mi intencis skui la polvon de la piedoj, ĉar mi supozis, ke estas ia kaptilo.

Post kiam mi manĝis kaj botelo da vino staris antaŭ mi, la knabino subite vokis tute laŭte tra la taverno: "Sinjoroj, ĉi tie estas kompatinda germana maristo, kiu ne havas ŝipon. Ĉu vi volus doni iom al li?"

Mi sentis, ke mi paliĝas kiel mortinto, ĉar mi nun pensis, ke tio estas la kaptilo, ke oni volas amuzi sin per tio, ke oni tradraŝas min, kaj sufiĉe draste. Sed nenio tia okazis. La homoj ĉiuj nur ĉesis paroli kaj turnis sin al mi. Unu el ili leviĝis, alvenis kun sia glaso, tintigis ĝin al la mia kaj tostis: "Je via sano, germano!" Li eĉ ne diris 'boŝo'. Tiam la knabino prenis teleron kaj rondiris, kaj kiam ŝi poste elŝutis la teleron antaŭ min, mi kalkulis deksep frankojn kaj ĉirkaŭ sesdek centimojn. Nun mi povis bone pagi mian manĝon kaj mian vinon, kaj kiam mi reveturis du tagojn poste al Barcelono, eĉ kelkaj frankoj restis.

Mi ne kredas, ke iu malamikeco inter popoloj ekzistis, se oni ne artifice kreus ĝin kaj poste hejtus per fia agitado. Oni supozus, ke homoj pli prudentas ol hundoj. Sed hundoj nur de tempo al tempo lasas sin peli kontraŭ sia propra specio, kaj kelkfoje ne. Sed homoj ĉiam lasas sin peli kontraŭ aliaj, kaj la kŝ, kŝ eĉ ne devas esti farita lerte. Sufiĉas, ke ĝi estu farita, kaj jam ili atakas sin kva-zaŭ freneziginte . . .

Fulmotondro! Eĉ ne unu fiŝeto ekmordas la hokon, kaj la kolbaso el la ladskatolo tuj elĉerpiĝas. Jen la sekvo

de tio, se oni revas kaj pensas pri io alia, anstataŭ atenti pri la negoco. Tuj kiam mi estos ariginta porcion, mi eliros, ekbruligos fajron kaj rostos la fiŝojn sur bastono. Foje io alia ol ĉiam fiŝoj frititaj en oleo.

Denove neniuj alhokiĝis, kaj la kolbaso estas formordita. Kiom da tempo mi sidas ĉi tie? Certe jam tri horojn. Sed la kaptado de fiŝoj trankviligas la nervojn. Oni ne havas la senton disipi sian tempon. Estas utila laboro, kiun oni faras: Oni kontribuas sian parton al la nutrado de la popolo, ĉar se mi manĝas la fiŝojn, kiujn mi nun kaptas ĉi tie, mi ja ne devas formanĝi aliloke la nudelsupon. Tiu do povas esti ŝparita, kaj fine de la jaro oni retrovas la ŝparitan nudelsupon en iu statistiko, kie la linio, en kiu la ŝparita nudelsupo estas menciita, pli kostas ol sume ĉiuj forŝutitaj supoj de la tuta lando.

Sed mi povus ankaŭ vendi la fiŝojn. Eble mi arigos tiom da ili, ke mi povos ricevi du pesetojn. Tiukaze mi povus denove dormi en lito du noktojn.

Nu, amiketo, finfine mi tamen kaptis vin. Vi estas tiu, kiu formordis la tutan sangokolbason. Peza ĝi ja ne estas. Kilograma duono. Mi supozas, ke ne tute. Tricent kvindek gramoj. Vi ja nun vere bele baraktas. Mi povas konsenti kun vi. Ankaŭ mi jam diversajn fojojn tiel baraktis, se bastonulo kaptis min kolome. Sed nenio helpas, mi havas apetiton je fiŝoj.

Jes ja, la akvo estas tiel agrable friska kaj la suno tiel bele varma. Kaj ankaŭ bastonulo ĉi tie ĝis nun ne kaptis min kolumbe. Kaj mi scias, kia sento estas. La tricent kaj kvindek gramoj cetere ne sufiĉus. Se vi pezus almenaŭ kilogramon. Kaj ĉar vi ja ekmordis kaj faris la komplezon al mi, ke mi ne tiel vane devis sidadi ĉi tie, kaj ĉar mi amas liberi, ĉar mi multe pli amas liberi ol povi manĝi ĝissate, kaj ĉar la suno ridas kaj la akvo bluas, kaj ĉar vi estas hispana fiŝeto: Hop, mi ne pafmortigos vin, gaje eknaĝu denove kaj ĝoju pri via vigla vivo. Ne tuj eniru en la reton de alia. Fornaĝu kaj salutu vian amikinson.

Jen ĝi plaŭdas kaj naĝas kaj ridas, ke mi povas aŭdi tion ĝis sur la muro. Salutu vian amikinson! . . . aĥ, merdon, forgesu tion . . .

"Vi estas stranga kaptisto de fiŝoj," subite iu diris malantaŭ mi. Mi turnas min kaj vidas stari doganoficiston, kiu observis min dum la tuta tempo, kaj nun laŭte ridas.

"Sed tie enestas ja pli da fiŝoj, la maro ja ne tro malgrandas," mi diras, dum mi lancas denove sangokolbason sur la hokon.

"Certe enestas pliaj. Sed ĝi estis ja tute bona, dika fiŝo."

"Certe ĝi estis tia, ĝi havas mian tutan ladskatolon da sangokolbaso en la stomako, tiukaze ĝi ne diku, ĉu?"

"Kial vi cetere kaptas fiŝojn, se vi reĵetas maren tiajn bonajn fiŝojn?"

”Por ke mi povu diri, ke mi kaptis fiŝojn, se hodiaŭ vespere iu demandos, kion mi faris dum la tuta tago.”

”Tiukaze do kaptu plu,” la doganoficisto diris kaj iris for.

Ke la kaptado de fiŝoj estas praktikata filozofio, tion komprenas nur tre malmultaj homoj³. Oni vivas ja ne por posedi ion, sed por deziri, por riski, por ludi, oni vivas.

Jen, jam denove fiŝo. Se mi nur ne estus lasinta foriri la alian! Nun baldaŭ porcio da fiŝoj kunestus. Sed mi ja ne enkondukos klasdiferencojn. La alian mi liberigis, nun mi ja ĉi tiun pro ĝia stulteco ne povas mortkondamni. Tio estas, por diri la veron, la stulteco ĉiam kaj ĉie meritas la mortpunon, provizore oni punas ĝin nur per sklaveco. Se mi scius, ke mi ricevos ankoraŭ tri pliajn, kia vi estas, jen via fino certus. Mi havas apetiton je fiŝoj. Sed vi estas delica malgranda vivanta miraklo, nu, reiru do en la vastan maron. Hop! Libero tamen estas la plej granda kaj bona en la vivo. Ja, je ĉiuj diabloj, ĉu mi do ĉi tie al ĉiu el vi donu la manon? Jam mi denove havas fiŝon en la mano. Mi tute certe scias, ke, se mi nun re-

3. En la klasika taoisma verko ”Zhuang-zi” de la ĉina filozofo Zhuang Zhou el la tria kaj kvara jarcentoj antaŭ la unua jarmilo troviĝas du belaj tekstoj, en kiuj tiu filozofo jam longe antaŭ Jesuo kaj B.T. filozofiumis pri la gajo de la fiŝoj kaj la kaptado de fiŝoj. Cetere, tiu miriga libro abundas de pensoj, kiuj retroviĝas en la verkoj de B. Traven.

tenos vin, eĉ ne unu plia ekmordos la hokon, ĉar ili ĉiuj scios, ke ili ne povas fidi min. Kaj havante nur vin, mi ne povas entrepreni ion kun vi. Tute ne valorus la penon foriri kaj bruligi fajron. Kiom da tempo la kara vivo konstruadis je vi, por konduki vin al tiu nemulta pezo? Ses jarojn, eble sep. Nun mi mortigu vin en sekundo per bato kaj finu vian vivon, ĉu? Fornaĝu, ĝuu la bluan maron kaj viajn kunulojn. Jen ĝi gaje vostumas for. Ĉu ne? Amiketo, vi scias la valoron de libero, ĝoju pri ĝi, estimu ĝin kaj estu feliĉa.

Sed tio estas ja sufiĉe stranga ladokesto, alflosanta tie . . . Ĝi ĵus startis kaj ne bone moviĝas. Ĝi treniĝas kaj ruliĝas kaj gratas laŭlonge de la kajo. Videble ĝi ne volas eliri, ĝi timas la akvon. Tio tute certas, vi povas fidi pri tio, ke ekzistas ankaŭ akvotimaj ŝipoj, jes, sinjoro. Tio ja estas la eraro, tiel ofte farata, ke oni kontestas la personecon al ŝipoj. Ili havas sian personecon, siajn kapricojn, tute kiel homo. Tiu ĉi olda onklino havas personecon. Tion mi vidis jam en la unua momento. Lekis salon kun ĝi ne estus amuzo.

Ĉapitro 19

Mi veturis sur tre diversaj ŝipoj, tion la dioj scias. Kaj mil ŝipojn mi vidis, tion Tomaso¹ kredas al mi. Sed neniam antaŭe mi vidis ŝipon, kiu similis al tiu ĉi. La tuta eksteraĵo, por tuj komenci per tio, estis ne nur bona ŝerco, ne, ĝi estis neebla aĵo. Se oni vidis tiun ladokeston, oni dubis, ke ŝi² vere povus veturi sur la akvo. Multe pli oni preferis supozi, ke ŝi estas bona transportrimedo tra la dezerto Saharo, kiu facile venkas la plej bonajn kamelojn. Ŝia formo nek modernis nek mezepokis. Estus tute vana klopodo envicigi ĝin en iun periodon de la ŝipkonstrua arto. Sur la pruo ŝi portis la

1. Tomaso: "Sed Tomaso, unu el la dek du, nomata Didimo, ne ĉeestis kun ili, kiam Jesuo venis. La aliaj disĉiploj do diris al li: Ni vidis la Sinjoron. Sed li diris al ili: Se mi ne vidos en liaj manoj la truon de la najloj, kaj se mi ne metos mian fingron en la lokon de la najloj, kaj ne metos mian manon en lian flankon, mi tute ne kredos. (Sankta Johano 20.19-25)
2. Ĉar la ŝipo en la tuta romano estas preparolata de B. Traven kvazaŭ ino, do per "ŝi" (germane=sie) eĉ kontraŭe al la germana genro (das Schiff = es = ĝi), necesis adopti tiun lingvouzon en la traduko.

nomon "Yorikke", do Jorike³. Sed la nomo tiel palis kaj tiel ellaviĝis, kvazaŭ ŝi hontus havi tiun nomon. Je la pobo, laŭ mara regularo, estu legebla la hejmloko. Sed de kie ŝi venis, ŝi volis riveli al neniu, verŝajne ŝi hontis ankaŭ pro sia loĝloko. Ankaŭ sian naciecon ŝi tenis strikte sekreta, videble ŝia pasporto ne estis tute en ordo. Ĉiukaze la nacia flago, kiu flirtis sur la flagstango, tiom palis, ke ĝi kapablus alpreni ĉian koloron⁴. Krome la

3. Jorike: en la originalo "Yorikke", havas rilaton al "Hamleto" de Shakespeare. La sekva parto, tradukita de L.L. Zamenhof, troveblas en SCENO I de AKTO V, kiu okazas sur tombejo.

HAMLETO (prenas kranion)

Lasu nin vidi ĝin! Ha, malfeliĉa Jorik! Mi konis lin, Horacio: persono de senfine gaja humoro, plena de plej belaj spritaĵoj. Mil fojojn li portadis min sur la dorso, kaj nun kia terura vido! La koro al mi premiĝas. Tie ĉi pendis la lipoj, kiujn mi kisadis tiom ofte. Kie nun estas viaj spritaĵoj, viaj artifiko, viaj kantoj, viaj fulmoj de gajeco, ĉe kiuj la tuta tablo eksplodadis per ridoj? Ĉu restis neniu el ili, por nun ŝerci pri via propra malsaĝa vido? Ĉio forputris? Nun iru en la ĉambron de eminenta sinjorino kaj diru al ŝi, ke kiom ajn ŝi sin ŝmiros, ŝi tamen en la fino ricevos tian vizaĝon; ridigu ŝin per tio ĉi! . . .

La aktoro Ret Marut ludis la rolon de unu el la tombofosistoj.

4. Tradukante la tekston pri la koloroj de Jorike, mi devis pensi pri la vortoj, kiujn la doktoro de la medicino Philippus Aureolus Theophrastus von Hohenheim, nomata Paracelsus, kiu en la Kamparanaj Militoj en Eŭropo kiel militkampa kuracisto staris sur la flanko de la revoluciaj kamparanoj,

flago tute disfranĝiĝis, kvazaŭ ĝi antaŭflirtis la batalantajn flotojn en ĉiuj marbataloj de la lastaj kvarmil jaroj.

Kiun koloron ŝia vesto havis, mi ne povis distingi, kvankam tio koncernis mian specialan fakon. Plej verŝajne la jupeto, en longe pasinta tempo, iam estis blanka kiel neĝo, blanka kiel la senkulpeco de ĵus naskita bebo. Sed tio certe estis antaŭ tre longa tempo. Tio certe estis en la jaro, kiam Abraham fianĉiĝis kun Sara en Ur en Ĥaldeo. La eĝoj de la balustrado iam verdis. Ankaŭ tio estis antaŭ tre longa tempo. Post tiuj praaj tagoj Jorike travivis kelkajn centojn de pliaj farbadoj, laŭ la iro de la tempoj. Sed la ferdeklaboristoj neniam penis forskrapi la malnovan farbon. Verŝajne tio estis malpermesita al ili. Ĉiukaze oni ĉiam metis la novan farbtavolon sur la malnovan, tiel ke Jorike nun tiom ampleksiĝis, ke ŝi ŝaj-

skribis: "Ilian mondon ili tute kovris per la sepa koloro. Kaj ili asertas, ke tiu koloro estas plenvalida. Kaj tiel ili opinias, ke ankaŭ ilia kovrilo ĵetita sur la mondon estas perfekta. Ilia ĉiopotenco, de Dio damnita, ne pretervidebla, sed senfine trankviliga grizo. Sep astroj estas kaj sep sakramentoj. Kaj tiel do ili bezonas la sepan koloron. Kaj tiel ili kovrante surŝmiras ĉion. Nenio plu de la profunda nigro de la radikoj, de la origino de ĉio estanta. Nenio plu de la klara blanko de la lumo. Nenio plu de la bluo, de la konsolanta fortiganta bluo de la tero. Nenion plu de la friskiga verdo de la akvo. Nenio plu de la flirtanta kaj viviga flavo de la aero. Nenio plu de la majesta ruĝo de la fajro. Nenio plu, kio varmigas la koron. Griza kaĉo sur la tutan teron. Tiel ili larĝe kaj dike rulpremas ĝin antaŭ si kaj sufokas min."

nis nun duoble pli granda, ol ŝi vere estis. Se oni entreprenus la laboron zorge detiri la diversajn farbtavolojn, tiam eblus precize konstati, kiun specon de farbo uzis ĉiu jarcento.

Memkompreneble, por ne esti kulpigita pro troigo, oni devus detiri la farbojn ne nur de la ekstera vesto, kie Jorike estis relative plej juna, ĉar oni sendis ŝin de tempo al tempo en instituton de plibeligo. Ne, oni devus detiri la farbojn de ĉiuj partoj de la ŝipo, precipe do de la internaj instalaĵoj, por ekscii la kolorojn, per kiuj la granda festohalo de Nebukadnecar estis ornamita, kion ni eĉ nun ankoraŭ ne scias, kio faras tre grandajn zorgojn al ni.

La vesto tiel malice aspektis, ke la diabloj en la infero kompatus ĝin. Ĝi havis grandajn surfacojn, sur kiuj la ferdeklaboristoj elprovis belan fortan bolŝevistan ruĝon. Sed poste la posedanto aŭ la kapitano ŝajne ne ŝatis tiun koloron, kaj oni farbis plu per aristokrata bluo. La ruĝo kostis monon, kaj senĝene oni lasis ĝin. Farbo estas farbo, kaj estas indiferece al la avida salakvo, ĉu ĝi voras bolŝevistan ruĝon, ĉu liberecoverdon, la grava afero estas, ke la vento kaj la ondoj ricevas ion por vori, alikaze ili vorus la ŝipon. La posta posedanto siavice pensis, ke nigra ŝipo pli belas kaj, ke dika nigro pli bone ol iu alia koloro blindigus la suspektemajn okulojn de la asekurasocioj. Sed neniam iu aŭdacis tiel altigi la kostojn, ke li

superfarbis per la nova farbo ion, kio jam havis farbon, por doni unuecan nuancon al la tuta vesto. Nur ne superflue elspezi! Ŝi estis ja . . . halt', tion mi ankoraŭ ne volas diri, ĉar mi ja ankoraŭ ne scias. Sed olda salakva fiŝo flareblas rapide, kaj mi estas olda salakva fiŝo, kiu rapide flaras ion.

Se nun Jorike marveturis aŭ restis en haveno, la farbo ne sufiĉis, kaj oni farbis plu per la farboj, kiuj troviĝis. La ŝipestro ĉiufoje nur notis: "Aĉetis farbojn, aĉetis farbojn, aĉetis farbojn." Neniu povas vivi nur de sia salajro. Sed la farbojn oni ne aĉetis, anstataŭe oni foruzis ĉiun farbon, kiu jam surŝipis, ĉu bruna, verda, viola, vermiljona, flava aŭ oranĝa farboj.

Tiel Jorike do aspektis de ekstere. Pro teruro preskaŭ elglitis la hokfadeno el mia mano, kiam mi unuafoje vidis tiun marmonstron.

Tio estas la rezulto, se oni havene ne donas tagforpermeson al la ferdeklaboristoj, pro nura avaro. La Unua Oficiro ne scias, kion fari kun ili, kaj tial ili devas farbi de matene je la sepa ĝis posttagmeze je la kvina, farbi, farbi, farbi, tiom longe, kiom ankoraŭ estas penikotenilo en la mondo kaj malnova ladskastolo kun tavolo da dikiĝinta kaj krustiĝinta farbo je la randoj.

Nun aldone okazas, ke la ferdeklaboristoj dum la farbado devas pendi ekstere apud la ŝelo de la ŝipo je ŝnuregoj aŭ sidi sur mallarĝaj tabuloj, kiujn oni lasas mal-

supren per ŝnuregoj. Se nun la tuta kesto subite ricevas sufiĉe grandan puŝon — ĉu pro neatendite granda ondo, ĉu pro la kirlaj ondoj de preterveturanta giganta kesto, aŭ tial, ke oni ne tenis sufiĉe flekseble la kaptoŝnuregojn dum la tajdoŝanĝo — la farbanto ekflugas sur sia mortobalancilo for de la ŝelo. Ĉar li nun preferas savi sian vivon anstataŭ la farbsitelon, kompreneble la farbsitelo renversiĝas kaj la bunta farbosupo fluas sur la ŝelo malsupren. Estas vere, la sitelo estas savita, kaj ankaŭ la viro, la sitelo pendis je ŝnurego kaj la viro ankoraŭ sufiĉe frue kaptis ŝnuregon. Sed la farbo! Sed la farbo! Sur Jorike oni povis postkalkuli krom la diversaj farbprovoj ankoraŭ tute ekzakte ĉiujn puŝojn, kiujn la bona ŝipeto travivis en la lastaj dek jaroj. Superfarbi tiujn farbelverŝojn, tio estus disipo. Estis farbo, kaj la celo delikatsente kovri per farbo la diversajn malbelaĵojn de Jorike, estis ja plenumita per ĉiu puŝo. Estis jam sen tio sufiĉe multekoste, ĉar ne la tuta farbo restis en tiuj okazoj sur Jorike, sed parto malaperis en la maron kaj alia parto gluiĝis sur la pantalono de la ferdeklaboristo, kie ĝi tute superfluis. Per tiu farbita pantalono, kiun oni nun povas starigi, sen ke ĝi falus, la okazaĵo tute ne estas finita. Nun ankoraŭ sekvas la kverelo kun la Unua Oficiro, kiu reprezentas la opinion, ke la farbo pli valoras ol la viro, ke la viro anstataŭ pensi pri sia malgrava vivo estus devinta pensi unue pri la multvalora farbo. Ferdeklabo-

ristojn li povus kolekti de sur la stratpavimo aŭ forpreni de sub pendumilo, sed farbo kostas monon. Kaj la ŝipestro denove terure spektaklos al li, ĉar li plian fojon ne scias, kion fari rilate la farblibron kaj ties rubriko "Aĉetitaj farboj" Ofte tia interparolado — post kiam la kutimaj sakrokanonadoj forpafis ĉian municion — finiĝas per tio, ke la savita ferdeklaboristo postulas sian salajron, ŝtopas la sakon, iras trans la balustradon kaj deziras al la ŝipo incendion⁵ en la karboholdoj, kiam ĝi troviĝos kvincent mejlojn for de la bordo. Se homo frenezas, oni tion ofte jam rimarkas je la eksteraĵoj, je la aspekto de la vizaĝo, je la aranĝo de la vestoj. Ju pli homo frenezas des pli okulfrape estas lia aspekto. Oni ne bone povas diri, ke Jorike estis sama al prudenta ŝipo, al mense normala ŝipo, aŭ eĉ nur simila al tia. Tio estus ofendo por ĉiuj aliaj ŝipoj sur la sep maroj. Ŝia aspekto tiel perfekte harmoniis kun ŝia spirito, animo, karaktero kaj konduto, ke oni tute pravigite devis dubi pri la mensa saneco de Jorike. Estis ja ne nur la ekstera vesto, ne nur la koloro. Ĉio, kio videblis de tiu boato, plene kaj senrezerve kongruis kun la haŭto kaj la vizaĝo. La kargoma-

5. incendio: Ke ŝipbruloj estis timataj, montras la angla maristakanto de hejtistoj. "Fire down below", kiu priskribas incendion, ĉe kiu ĉie brulas, en la kuirejo, en la viandĉambreto, en la litbenko, en la monŝranko, kie la mono fandiĝas, kaj finfine sur la ferdeko. "Sube brulas, sube brulas, alportu sitelon kun akvo!"

stoj staris kiel magraj branĉoj zigzage en la aero. Se oni pafus kuglon en la kamentubon laŭlonge, eĉ se estus nur revolvera kuglo, ĝi neniam elirus el la alia finaĵo. Sed fumo preterpasas ja ankaŭ angulojn, alie Jorike neniam estus povinta fumi. Tute certe ne el la kamentubo. Kiun ligan la ponto havis al la aliaj ŝippartoj, mi ne povis eltrovi. Oni havis la impreson, kvazaŭ la ŝipo post la ekveturo devus reveni post horo por kunpreni la komandoponton, kiu restis havene; ĉar la ŝipestro el sia pozicio ne povis rimarki, ke la ŝipo jam survojas dum horo. Kaj nur, se la stevardo irus sur la ponton por diri al la ŝipestro, ke la manĝo en la oficira ĉambro pretas, oni eltrovus, ke la ponto kun la ŝipestro sur ĝi ne kunveturis, sed ŝvebas ie en la lasta haveno aŭ kroĉiĝis al io.

Kiam mi nun sidis sur la muro, tiel diligente kaptanta fiŝojn kaj vidis Jorike, jen mi ridis, jen mi tiel laŭte kaj tiel monstre ridis, ke la bona Jorike subite ektimis kaj retroglitis duonon de ŝiplongo. Ŝi ne volis kaj ne volis eniri la akvon. Ŝi tiel gratis kaj skrapis la kajon, ke hundo bedaŭrus, ke oni sincere ekkompatis la plorindan onklinon, kiun oni ĝuste nun denove volis elpeli en la kruelan mondon de sovaĝaj potencoj kaj elementoj.

Sed neniuj sentis kompaton al ŝi.

Mi aŭdis la knarojn kaj ŝrikojn de la vinĉo kaj la pelmelan kuradon kaj sciis, ke ili nun ĝisfunde tradraŝos kaj malice hejtos la onklinon, kaj tiam ŝi tamen devos dan-

ci. Kion sola damo finfine povas fari daŭre kontraŭ tiom da krudaj pugnoj? Ŝi povas grati kaj mordi, sed ŝi devas elveni de malantaŭ la barilo kaj kuniri al la danco⁶, ĉu ŝi inklinas al tio, aŭ ne. Se tia pruda damo poste nur aŭdas la muzikon, ŝi estas la plej sovaĝa el ĉiuj. Tiel certe estis ankaŭ ĉe Jorike. Feliĉe enirinte la akvon ŝi kuros kiel juna diablino, por veni kiel eble plej rapide en alian havenon, kie ŝi povas ripozi kaj sonĝi pri pasintaj tempoj, kiam oni ne tiom multe pelis ŝin kiel en niaj hastaj tagoj. Ŝi ja ne plu estas infano kaj jam iom peza je la naĝiloj. Se ŝi ne estus tiel dike vestita, ŝi certe ex frostotremus en

6. kaj devas kuniri al la danco: inter la versoj de Nathanael Schlott el la jaro 1701 pri "la danco de l' skeletulo" en la Maria-preĝejo de Lübeck (vidu ankaŭ pri tio 45/1) estas la sekvaj. Por povi redoni tute precize la tekston mi prefere ne rimis:

La skeletulo al la junulino

*Tiel kiel la mondo mi tute ne atentis komplimentojn.
Devo mi nomas la duran vorton, kiu rompas ŝtalon kaj feron.
Kaj kial vi volas rifuzi al mi la lastan iron?
La junulinoj alikaze ne kutimas rifuzi danceton.*

La junulino al la skeletulo

*Mi sekvas, ĉar mi devas kaj dancas kiel mi povas.
Fratinoj, elektu sufiĉe frue viron.
Tiel vi donas al la edzo en la vivo la manon,
kiun mi devas doni ne tute libervole al la skeletulo.*

la frida akvo, ĉar la sango ne plu tiel junece kuras en la vejnoj kiel tiam, kiam ŝi rigardis la bonvenigajn solenaĵojn, aranĝitajn de Kleopatra⁷ je la honoro de Antonio.

7. Kleopatra kaj Antonio: Gemo el la antikvo montras Kleopatran kaj Antonion sur la malantaŭa ferdeko de kila ŝipo. Kleopatra partoprenis marbatalon ĉe Actium kiel komandantino de eskadro, sed fuĝis. La amanto Antonio tuj sekvis ŝin. Ŝia proksimo pli gravis por li ol la sukcesa fino de la marbatalo. Bela mensogeto, ĉu ne? Traven mencias Actium en la angla praversio de la Mortula Ŝipo, kiu troveblas en la biografio de Guthke.

Ĉapitro 20¹

Laŭ la aspekto de ŝipo oni povas precize juĝi, kiel oni nutras kaj traktas la maristaron, se oni flaris antaŭe dum kelka tempo salan akvon. Jen iuj serioze imagas kompreni ion pri la maro, pri ŝipoj kaj maristoj, se ili veturis dekdu fojojn sur pasaĝera ŝipo, eble eĉ en ŝtata kajuto, trans oceanojn. Sed pasaĝero nek lernas ion pri la maro nek pri ŝipoj, kaj eĉ multe malpli pri la vivo de la maristaro. La stevaroj ne estas membroj de la maristaro, kaj ankaŭ la oficiroj ne estas membroj de la maristaro. La unuaj estas nur kelneroj kaj domservistoj, kaj la duaj nur oficiroj kun la rajto je pensio.

La ŝipestro komandas la ŝipon, sed li ne konas ĝin. Tiu, kiu rajdas sur kamelo kaj diras la lokon, kien li volas rajdi, scias nenion pri la kamelo. Nur la kamelpelisto konas la kamelon, al li la kamelo parolas, kaj li paro-

1. La tuta ĉapitro estas kvazaŭ protesto kontraŭ la artikolo 'Pri la aŭtoritato' de Friedrich Engels, kiu defendas kontraŭ la ideoj de Bakunin la neceson de aŭtoritato kaj ankaŭ asertas, "ke la neceso de aŭtoritato plej klare montriĝas sur ŝipo sur la maro, kie en la momento de danĝero la vivo de ĉiuj dependas de tio, ke ĉiuj tuj kaj absolute obeas la volon de unu sola persono."

las al la kamelo. Nur li konas ties zorgojn kaj preferojn kaj dezirojn.

Tiel estas ankaŭ pri ŝipo. La ŝipestro estas la komandanto, la superulo, kiu ĉion volas havi alie ol la ŝipo. Lin la ŝipo hatas, tiel kiel ĉiuj superuloj kaj komandantoj estas hatataj. Se komandantoj vere iam estas amataj, aŭ se oni diras, ke ili estas amataj, jen oni nur tial amas ilin, ĉar tiel oni plej bone povas elteni ilin kaj iliajn kapricojn.

Sed estas la maristaro, kiu amas la ŝipon. La maristoj estas la aŭtentikaj kaj efektivaj kamaradoj de la ŝipo. Ili poluradas la ŝipon, ili karesas ĝin, ili ĝin kisas. La ŝipanaro ofte ne havas alian hejmon ol la ŝipo; la komandanto havas belan domon, ie inter kampoj, li havas sian edzinon, li havas siajn infanojn. Ankaŭ kelkaj maristoj havas edzinon kaj infanojn, sed ilia laboro por la ŝipo kaj sur la ŝipo estas tiel streĉa kaj laciga, ke ili povas pensi nur pri la ŝipo kaj tute forgesas la hejman familion, ĉar ili ne havas tempon por pensi pri la hejmo. Se ili volus komenci pensi pri hejme, ili tuj ekdormus pro troa laciĝo.

La ŝipo tre bone scias, ke ĝi ne povus veturi eĉ metron, se la ŝipanaro ne estus. Sen ŝipestro ŝipo povas veturi, sen ŝipanaro ne. La ŝipestro eĉ ne povus nutri la ŝipon, ĉar li ne komprenas kiel surĵeti karbojn, por ke la fajroj ne estingiĝu kaj tamen donu tiom grandan varmegon, kiom eblas, sen estigi per tio digestajn perturbojn.

Kun la ŝipanaro la ŝipo interparolas, kun la ŝipestro kaj la oficiroj neniam.

Al la ŝipanaro la ŝipo rakontas fabelojn kaj belegajn historiojn. Ĉiujn miajn marrakontojn la ŝipoj rakontis al mi, kaj ne homoj. La ŝipo ankaŭ volonte lasas rakonti ion al si de la ŝipanaro. Mi aŭdis ŝipojn ridi kaj subridi, kiam la ŝipanaro dimanĉe posttagmeze sidis sur la ferdeko kaj interŝanĝis spritaĵojn. Mi vidis plori ŝipojn, kiam malgajaj rakontoj estis interŝanĝataj. Kaj mi vidis amare plorsingulti ŝipon, ĉar ĝi sciis, ke ĝi sinkos en la sekvonta veturo. Ĝi efektive neniam revenis kaj pli poste troviĝis en la Lloyds²-listo "Malaperinta".

Ŝipo ĉiam estas sur la flanko de la ŝipanaro, neniam flanke de la ŝipestro. La ŝipestro laboras ne por la ŝipo, li laboras por la kompanio. La ŝipanaro ofte eĉ ne scias, al kiu kompanio la ŝipo apartenas; ĝi ne cerbumas pri tio, ĝi zorgas nur pri tio, kio koncernas la ŝipon mem. Se la ŝipanaro malkontentas aŭ ribelas, la ŝipo tuj kunribelas. Strikrompantojn la ŝipo malamas pli ol la fundon de la maro; kaj mi konis ŝipon, kiu kun tuta grego da strikrompantoj, ankoraŭ preskaŭ en viddistanco de bordo, glate alfundiĝis. Neniu revenis, la ŝipo prefere mem sinkis profunden, ol lasi sin fingrumi de strikrompantoj. Jes, sinjoro.

2. Lloyds: brita unuiĝo de asekurkompanioj kun borso, precipe konata por marasekuraj aferoj, ekde 1683

Se la ŝipanaro estas malbone nutrata aŭ malbone traktata, la ŝipo tuj aliĝas a la la partio de la ŝipanaro kaj tiel laŭte elkrias en ĉiu haveno la veron, ke la ŝipestro devas fermtenigi la orelojn kaj sufiĉe ofte havenkomisiono estas pelata el la dormo kaj ne pli frue retrovas trankvilon, ĝis ĝi entreprenis enketon. Mi estas tre certa, ke oni opinias min tute manĝavida ulo. Sed por maristoj la manĝo estas ja la sola afero, pri kio ili povas okupiĝi, krom pri la ŝipo. Aliajn ĝojojn ili ne havas, kaj streĉa laboro kaŭzas fortan apetiton. La manĝo estas grava parto de ilia salajro.

Sed sur Jorike, tiel, kiel ĝi sufiĉe laŭte elkriis, oni disdonis la plej mizeran manĝaĉon al la ŝipanaro, kiun avara kompanio kaj ŝipestro, kiu devas havigi al si kromajn enspezojn, iel povas aranĝi por ĝuste ankoraŭ vivteni la ŝiparon. Kiujn ecojn la ŝipestro mem havis, tion Jorike rivelis al ĉiu, kiu komprenas la lingvon de ŝipo. Li volonte drinkis, sed nur bonajn markojn, li volonte manĝis, sed nur bonajn gustaĵojn, li ŝtelis ĉie, kie eblis ŝteli; li faris flankajn negocojn, kun ĉiu, kun kiu eblis, kaj je kies ajn kostoj. Ĉio cetera tre indiferentis al li, kaj persone li nur malofte molestis la ŝiparon. Li molestis ĝin ĉirkaŭvoje pere de la oficiroj kaj inĝenieroj. Tiuj inĝenieroj, sur ŝipoj ne frenezaj, sed normalaj, eĉ kiel lubrikistoj ne povus labori.

Kiel eblis nur, ke Jorike ricevis kaj povis teni ŝipanaron? Kiel eblis, ke ŝi povis elveturi el hispana haveno, el tiu benita lando de sunbrilo kaj libero, kun kompleta ŝip-anaro? Kaŝiĝis sekreto en tio. Ĉu ŝi eble eĉ estas . . . ?

Sed eble jes. Eble ŝi vere estas mortula ŝipo. Jen! Finfine la enigmo solviĝis. Mortula ŝipo. Mil sakrojn! Ho, paseraĵ vostoĵ kaj fiŝaĵ naĝiloĵ! Jes ja, ŝi estas mortula ŝipo.

Ke mi ne tuj en la unua sekundo rimarkis tion! Mi simple dormemis.

Vere, jen neniuj duboj plu eblas.

Sed tie ankaŭ io alia estis perceptebla, tiel, ke ŝi eble tamen ne estis tio. Jen sekreto kaŝiĝas. Min tuj gratu urso el la norda poluso sur la postaĵo, se mi ne eltrovos, pri kio temas ĉe tiu kesto.

Jorike nun fine tamen decidis ekiri, libervole kaj sen kvereloj. Mi subtaksis ŝin. Ŝi timis la akvon pro bonaj kialoj. La ŝipestro estis azeno, jes, sinjoro. Jorike multe pli prudentis ol la ŝipestro. Ŝi tute ne bezonis kapitanon, tion mi nun vidis. Ŝi estis bona olda purrasa ĉevalo, kiun oni devas lasi iri libere, se ĝi iru la ĝustan vojon. Kapitano devas nur antaŭmeti substampitan kaj subskribitan ateston, ke li sukcese trapasis ekzamenon, kaj tuj oni konfidas keston al li, kaj aldone eĉ tian delikatan, kian Jorike. Donu al sperta ferdeklaboristo la salajron de ŝipestro, kaj li pli bone kondukos Jorike trans la grandan

ranolagon³ ol koncesiita kapitano, kiu faras nenion alian ol ĉirkaŭpromeni la tutan tagon kaj mediti pri tio, kiel kaj kie pritranci eĉ iom pli la kostojn por la ŝipanaro, por elvringi por la kompanio kaj por sia poŝo eĉ plian kvinendon.

La fluo kaj la vento direktis sin kontraŭe al Jorike, kontraŭe al tiu vojo, kiun la ŝipestro provis trudi al ŝi. Al tia delikata ino oni ne trudu kiel kaj kien iri, tiel ŝi povas nur devojiĝi. La piloto ne estis riproĉebla. La piloto bone konas sian havenon, sed li ne konas la ŝipon. Sed tiu ŝipestro eĉ multe malpli konis la ŝipon.

Ŝi rampis knarante laŭlonge de la kajo, kaj mi devis nun suprentiri la krurojn, ĉar alie ŝi estus kunpreninta ilin, kaj tiom multe mi ne avidis sendi miajn krurojn al Maroko, dum mi restas en Barcelono.

Pobe ŝi baraktis per la kirla naĝilo, kaj ĉi tie je la flankoj ŝi sputis kaj pisis tiel freneze, kvazaŭ ĝi drinkus mi ne scias kiom, kaj kvazaŭ ŝi havus mi ne scias kiom da problemoj por survojiĝi sen kunpreni la lanternfostojn.

Finfine la ŝipestro sukcesis deĝi de la kajo. Sed mi havas la konvinkon, ke estis Jorike mem, kiu komencis akcepti, ke ŝi nun devas zorgi pri si, se ŝi volas elveni kun sana haŭto. Eble ŝi ankaŭ volis ŝpari kelkajn sitelojn da farbo por sia posedanto.

3. trans la grandan ranolagon: trans la Atlantikon

Ju pli ŝi proksimiĝis des pli netolerebla fariĝis ŝia aspekto. Kaj la penso venis en mian kapon, ke eĉ, se la ekzekutisto nun ĉasus min kun malferma maŝo kaj mi povus eskapi lin nur per la dungigŝo sur Jorike, mi preferus la maŝon kaj dirus al la ekzekutisto: "Kara amiko, forkonduku min kaj sufiĉe rapide, por ke mi estu savita de tiu najlokesto." Mi ja nun vidis ion, kio multe pli teruris ol ĉio, kion mi iam vidis en tiu rilato.

Ĉapitro 21

Sur la antaŭferdeko staris la vaĉanaroj, kiuj havis liberan tempon kaj rigardis trans la balustradon al la kajo, por ankoraŭ per la okuloj avide ensuĉi de la firma tero ĉion, kion ili povis kapti en tiuj lastaj momentoj. Sufiĉe ofte en mia vivo mi vidis ĉifonulajn, ruiniĝintajn, anime detruitajn, kotŝmiritajn, de pedikoj kaj abscesoj kovritajn maristojn, en aziaj kaj sudamerikaj havenoj, pli ol abunde kaj en pleja perfekto, sed, ke mi vidis kiam ajn tian ŝipanaron kaj eĉ tian, kia post plurtaga serĉa vagado ne estis ĵetita sur la bordon post ŝiprompo, sed troviĝanta sur elveturanta vaporŝipo, mi ne povis memori. Ke io tia eblus, mi ne supozis. Mi certe ne aspektis eleganta, kaj por diri la veron, laŭ aspekto mi multe pli proksimis al trampo ol al neĉifonulo. Sed kompare kun tiu ĉi ŝipanaro mi aspektis kiel la ŝejko de ĥoroknabino ĉe la *Ziegfeld Follies* en Nov-Jorko. Tio ne estis mortula ŝipo. Dio pardonu al mi tiun pekon; ili estis ja marrabistoj antaŭ la unua predo; piratoj¹ persekutataj jam ses mo-

1. pirato: la vorto devenas de la greka 'peiran', serĉi sian feliĉon

natojn de la militŝipoj de ĉiuj nacioj; bukanieroj², kiuj tiel profunde falis, ke ili ne vidis alian eliron ol ataki kaj elrabi ĉinajn legomĵonkojn sur la maro.

Sankta marserpento, kiom ĉifonulaj ili estis, kiel kotaj ili estis! Unu el ili ne surhavis ĉapon, ĉar li posedis nek ĉapelon nek ĉapon, sed volvis pecon de verda subjupo kvazaŭ turbanon ĉirkaŭ la kapon. Alia surhavis, sinjoroj, ne, tion vi ne kredos, sed mi ja tuj kiel hejtisto sur savboato estu dungita, se ne estas la vero, unu el ili surhavis eĉ cilindran ĉapelon³. Imagu tion, maristo kun cilindra ĉapelo. Ĉu la mondo ion tian iam travivis? Eble li estis ankoraŭ kamentubisto duonon de horo antaŭ la elveturo. Aŭ li purigis tie sur la kesto la kamentubon. Eble speciala ordono estis sur Jorike, ke la kamentubo balaendas nur kun cilindra ĉapelo. Similajn kuriozajn ordonojn mi spertis sur ŝipoj. Sed Jorike ne apartenis al la ŝipoj, kie oni enkondukas kuriozajn ordonojn; Jorike estis ŝipo, kie oni havas sufiĉe da laboro kun tiuj ordonoj, kiuj ekzistas mil jarojn, por ke la kesto funkcii. Ne, tiu cilindra ĉapelo estis uzata nur tial, ĉar la viro ne ha-

2. bukanieroj: Ili estis piratoj de la Kariba maro. Ili mem nomiĝis 'fratoj de la bordoj'. La vorto bukaniero devenas de la hispana vorto Bucan, kiu signifas: Rostkrado por la sekigo de viando en la suno, ankaŭ kromnomo de la kuiristo John Silver el la fama libro "La trezora insulo" de Stevenson.
3. cilindra ĉapelo: Cilindraj ĉapeloj ankoraŭ en la 19-a jarcento efektive estis kapkovraĵo de germanaj maristoj.

vis alian kapkovrilon, kaj se li havus iun, li videble posedis sufiĉe da estetika sento, por ne bone povi vesti sin per telerĉapo, pro la frakveŝto, kiun li portis sur la korpo. Ŝajnis eĉ ne tute ekskludeble, ke li forfuĝis de sia propra edziĝfestoj en tiu fatala momento, kiam la seriozo ekis, kaj ĉar li ne trovis alian rifuĝejon for de la megeroj, ĉe la kulmino de la danĝero ekkaptis la Jorike, kie oni bonvenigis lin per brakumoj. Ĉi tie neniu el la megeroj serĉis lin, certe ne iun, kiu forkuris kiel leporo de la fiandino en frako kaj kun cilindra ĉapelo.

Se mi estus sciinta, ke ili vere estas marrabistoj, mi estus petinta ilin surgenue, ke ili kunprenu min al gloro kaj oro. Sed se oni ne havas submarŝipon, marrabado en la nuna tempo ne plu valoras la penon.

Ne, ĉar ili ne estas marrabistoj, do prefere la ekzekutistoj, ol esti devigita veturi sur Jorike. La ŝipo, kiu povus forlogi min de la sunplena Hispanio, devus esti ŝipo almenaŭ duoble pli bona ol la Tuscaloosa. Ho ve, kiom longa tempo pasis. Ĉu ŝi ankoraŭ estas hejme en Nov-Orleano? Nov-Orleano, *Jackson Square*, *Levee* kaj aĥ . . . nu, mi foje surpiku denove sangokolbason; tuj post la preterpaso de la bunta kesto, mi ja eble kaptos dufuntan. Se ne, estos same bone, tiukaze mi esploros, kion la nudelsupo faras, aŭ mi demandas, kion ili vespermanĝos sur la nederlanda ŝipo tie transe.

Kiel limako, kiu tro multe manĝis, sed tamen devas trejni sin por la sekvonta vetkurado de limakoj, tiel Jorike preteriris.

Kiam la kapoj de la ĝangalobanditoj estis precize super mi, unu el ili vokis malsupren: *"Hey, ain't ye sailor⁴?"*
"Yesser."

"Want a ĝop⁵?" Pri sia angla lingvo li ne rajtas fieri, sed por intimaj familiaj rilatoj ĝi sufiĉas.

Ĉu mi volas havi laboron?

Aj, griza urso ludanta la orgenon, li ja ne eble serioze diris tion? Ĉu mi volas havi laboron?

Nun mi sidas en la kaptilo. Jen la demando, kiun mi pli timis ol la trombonon de la arkiangelo Mikaelo en la Releviĝa tago. Kutime oni ja mem devas peti pro laboro. Tio estas eterna neŝanĝebla leĝo, de kiam laboristoj ekzistas jam. Kaj mi neniam iris por demandi, ĉiam pro la timo, ke iam iu dirus, ke jes.

Kiel ĉiuj maristoj, tiel ankaŭ mi estas superstiĉa. Sur ŝipo kaj surmare oni dependas de hazardoj kaj do ankaŭ de superstiĉoj⁶, alikaze oni ne eltenus tion kaj frenezi-

4. Hey ain't ye sailor? (angla): He, ĉu vi estas maristo?
5. Want a ĝop? (angle): misparolo de 'Do you need a job? Ĉu vi bezonas laboron?
6. superstiĉo: La multspeca superstiĉeco de maristoj radikas en la origine preskaŭ centprocenta dependeco de ondoj, vento kaj vetero, sed ankaŭ la dependeco de labordonantoj estigas superstiĉojn.

ĝus. Kaj estas tiu superstiĉo, kiu devigas diri min "jes", se iu demandas min, ĉu mi volas havi laboron. Se mi dirus, ke ne, mi forĵurus mian feliĉon, neniam denove en mia vivo povus dungigi sur ŝipo kaj plej malverŝajne tiam, kiam mi nepre bezonus iun. Kelkfoje oni kun sukceso rakontas historion, sed kelkfoje oni ne sukcesas, kaj la viro krias: "Policon! Trompisto!" Se tiukaze oni ne tuj havas ŝipon je sia dispono, la polico kredas al la viro, kiu ne havas humuron kaj ideojn.

Tiu ĉi superstiĉo jam kelkfoje faris malicajn petolaĵojn al mi kaj puŝis min en laborokupojn, pri kiuj mi neniam supozus, ke tiaj efektive estas en la mondo. Ĝi estis la kaŭzo de tio, ke mi fariĝis tombistohelpanto en Guayaquil en Ekvadoro, kaj ke mi devis helpi vendi en jarfoiro en Irlando per miaj propraj manoj unu spliton post la alia de la kruco, sur kiu nia Sinjoro kaj Savanto Jesuo Kristo elspiris sian lastan surteran suspiron. Ĉiu splito kostis duonon de krono, kaj la lupeo, kiun la homoj aldone devis aĉeti por ankaŭ povi vidi la spliton, kostis plian krondonon. Al tia laborokupo, kiun oni certe ne alkalkulos al miaj meritoj, oni ja venas pro superstiĉo. De kiam tio trafis min en Irlando, mi ne plu zorgis esti obeema kaj bona homo, ĉar mi sciis, ke mi nun forludis jam mian futuron. Estis ja ne pro tio, ke mi helpis vendi la splitojn. Ne, tio ne estis tiom fia, tion oni eble alkalkulus eĉ al miaj meritoj. Multe pli kondamninde estis, ke

mi helpis al la komercisto en hotelĉambro tranĉi la splitojn el antikva kestokovrilo. Sed ankaŭ tio ankoraŭ ne estus tiel nepardonebla, se mi nur ne estus ĵurinta antaŭ la homoj je mia animo, ke mi mem kunportis la splitojn el Palestino, kie olda arabo konvertiĝinta al la kristanismo, en kies familia posedo la splitoj dum okcent jaroj troviĝis, konfidis ilin al mi kun la solena certigo, ke Dio ensonĝe aperis al li kaj ordonis lin, ke tiuj ĉi splitoj trovu la vojon nur al Irlando kaj al neniu alia loko. La dokumentojn arablitere skribitajn ni povis montri kaj ankaŭ tradukon en la anglan, kiu eldiris, ke en la dokumento vere tio estas skribita, kion ni rakontis ĉe la jarfoiro. Tiaj petolaĵoj povas trafi superstiĉan homon, jes, sinjoro.

Se ni almenaŭ estus sendintaj la enspezitan monon al monaĥejo aŭ al la papo! Ankaŭ tiukaze ne estus tiom malbone kaj mi povus havi la esperon, ke oni pardonos al mi. Sed ni elspezis la monon por ni mem, kaj mi zorgis tre atente pri tio, ke mi ricevu la ĝustajn procentojn kaj tantiemojn. Sed neniel mi estis trompanto, mi estis nur viktimo de la superstiĉo, de mia superstiĉo, ĉar la bonaj homoj ja kredis al mi. Tiuj ne estis superstiĉaj.

Ĉapitro 22

Tiel do okazis tute nature, ke mi diris "jes", kiam oni demandis min, ĉu mi volas havi laboron. Io en mi devigis min diri, ke jes, kaj mi ne povis eskapi tiun trudon. Mi certas, ke mi paliĝis pro mortotimo, ĉar mi devis iri sur tiun keston.

"Ĉu A. B.¹?" la viro demandis.

Mi havas feliĉon, jen la savo. Ili bezonis iun A. B., kaj mi ne estis A. B. . . . Mi nun prudente detenis min diri: "Plain", ĉar okaze de bezono ferdeklaboristo povas stari ankaŭ ĉe la direktilo, precipe tiam, kiam la vetero trankvilas kaj grandaj kursŝanĝoj ne necesas.

Tial mi respondis: "Ne, sinjoro, ne A. B. *Black gang*. Nigra bando."

"Fajne!" la viro kriis malsupren. "Jen tio, kion ni bezonas. Rapidu, hop, sursaltu."

Nun ĉio klariĝis al mi. Ili prenis ĉiun, kiun ili kaptis kaj de ĉie, kie ili povis kapti iun, ĉar tiom aŭ tiom da viroj mankis al ili. Se mi estus dirinta: kuiristo, aŭ se mi estus vokinta: ĉarpentisto aŭ ŝipestro, ili ĉiam vokus: "Hop, supren!" Jen io ne estas en ordo. Damne, ĉu ĝi tamen

1. A.B., able-bodied seaman (angle): plene lerta maristo

estas . . . , ne, spite al ĉiuj suspektindaj cirkonstancoj, Jorike ŝajne tamen ne estis mortula ŝipo.

Mi devis ludi la lastajn kartojn.

"Where're ye bound? Kien vi veturas?"

"Kaj kien vi mem celas iri?"

Ili estas ruzuloj. Jen forkuro ne eblas. Mi povas voki suda poluso, ja, mi povas voki Ĝenevo, sen palpebrumo ili vokos al mi: "Tien ni veturas."

Sed mi sciis landon, kien la kesto ne riskus veturi, kaj tiu estis Anglio. Tial mi diris: "Anglio."

"Viro, vi estas feliĉulo!" kriis la voĉo. "Ni havas kargon por tie, pecvarojn por Liverpolo. Tie vi povos maldungiĝi."

Per tio ili perfidis sin. La unu nura lando, kie mi ne povis maldungiĝi, kaj ankaŭ ne alia maristo, kiu ne veturas sur angla ŝipo, estis Anglio. Sed mi ne povis eviti tiun respondon rilate al Liverpolo. Mi ja ne povis pruvi al ili, ke ili mensogas.

Ŝajnas tiel ridinde. Kompreneble neniu povis devigi min dungigi sur iu ŝipo, en nenia kazo dum mi ankoraŭ staris sur la firma tero, kie mi ne troviĝis sub la juĝa povo kaj la leĝa potenco de la ŝipestro. Sed tiel ja ĉiam estas: Se oni fartas tro bone kaj tro feliĉe, tiam oni celas eĉ pli bonan vivon, eĉ se tiu deziro pri pli bona vivo kaŝiĝus nur en tio, ke oni sopiras ŝanĝon de la pejzaĝo kaj flegas kaj nutras la kvietan eternan esperon, ke ĉiu ŝanĝo de-

vas konduki al io pli bona. Mi supozas, ke de kiam Adamo enuis en la paradizo, estas la malbeno de la homaro, ke oni neniam sentas sin perfekte feliĉa kaj tial ĉiam ĉasas pli grandan feliĉon. Se mi pensas pri Anglio kun ĝia eterna nebulo, kun ĝia eterne malseka frida klimato, kun ĝiaj pelaj ĉasadoj kontraŭ fremduloj, kun ĝia eterne stulte ridetanta kronprinco, kies masko glaciigis de frosto, kaj se mi komparas tion kun tiu libera kaj sunplena lando kaj kun ĝiaj afablaj enloĝantoj kaj nun imagas, ke mi ĉion ĉi forlasu, min vere kaptas sento kvazaŭ mi volus morti.

Sed jen la fatalo. Mi diris "jes", kaj kiel bona maristo, kiu ne rompas sian promeson, mi nun devis dungigi sur tiu kesto, kaj se ĝi veturus rekte al la mara fundo; sur tiu ŝipeto, pri kiu mi moke ridis, pri kiu mi laŭte kaj hurlante mokridis, kiam mi unuafoje vidis ĝin, sur kiu mi ne volis veturi eĉ tiukaze, se mi povus reteni tiel la lastan spiron. Ne kun tiu ŝipo kaj ne kun tiu ŝipanaro! Jorike venĝis sin pro tio, ke mi moke ridis pri ĝi. Sed fakte mi meritis tion, kial mi iris al la kajo kaj lasis min vidi de elveturantaj ŝipoj? Jen oni tenu flanke la nazon. Elveturantaj ŝipoj tute ne koncernu nin, se ne estas la niaj, oni lasu ilin en paco kaj ne provu postkraĉi ilin. Tio ĉiam fatalas. Tion ili ne povas elteni.

Maristo ne sonĝu pri fiŝoj, kaj li ne pensu pri fiŝoj, tio ne estas bona.² Kaj mi iris ĉi tien kaj volis eĉ kapti kelkajn. Ĉiu fiŝo aŭ ties patrino jam frandis peceton de dro-ninta maristo, tial maristo tenu sin for de fiŝoj. Se mari-sto volas manĝi fiŝojn, li aĉetu ilin de honesta fiŝisto. Kapti fiŝojn estas ties negoco, al li ili ne malicas; se fiŝisto sonĝas pri fiŝoj, tio signifas monon.

Mi pafis la lastan demandon, kiu eblis: "Kian monon vi pagas?"

"Anglan monon."

"Kia la manĝo estas?"

"Abunda."

Nun mi sidis en la kaptilo. Por eliri ne restis eĉ fende-to. Por mia konscienco ne restis eĉ unu kialo por repreni mian jeson.

Ili ĵetis ŝnuregon al mi, mi kaptis la ŝnuregon, svingis miajn krurojn antaŭen al la ŝipo kaj dum ili tiris sur la ferdekon la ŝnuregon, mi grimpis laŭ la ŝipŝelo supren kaj saltis trans la balustradon.

Kiam mi staris ferdeke, Jorike strange rapide atingis sian plenan rapidecon, kaj dume mi karesis per miaj okuloj la malaperantan Hispanion, mi havis la senton,

2. Por maristoj sonĝoj pri fiŝoj estas antaŭsigno de ŝippereo, tiel kiel ratoj, kiuj havene forlasas la ŝipon aŭ pri la "griza morto", kiu montriĝas kiel nebula homfiguro.

ke mi nun trapaŝis tra tiu granda pordego, super kiu legeblas la fatalaj vortoj:

*Kiu eniras ĉi tien,
ties nom' kaj ekzisto estas estingitaj,
la vento forblovis lin!*

DUA LIBRO

SURSKRIBO¹
SUPER LA ŜIPANARAJ KAJUTOJ
DE LA MORTULA ŜIPO

*Kiu eniras ĉi tien,
ties nom' kaj ekzisto estas estingitaj.
La vento forblovis lin².
De li eĉ spireto ne konserviĝis
en la vasta vasta mondo.
Li povas nek iri returne
nek paŝi antaŭen,*

1. La surskribo: la surskribo super la ŝipanaraj kajutoj de la Mortula Ŝipo havas rilaton al la inferoporda surskribo de Dante en "La dia komedio": 'Kiu eniras ĉi tien, tiu delasu de ĉiu espero!'

La ŝajne absolute pesimisma surskribo de B. T. estas tamen ambivalenca. En la filozofio de la germana individua anarkiisto Max Stirner (1806–1856) la enhavo de la surskribo estas la "pordo", kiun homo devas trairi, se li volas agi kiel memkonscia individuo. Tiu pensado troviĝas jam ĉe Jesuo Kristo. La influo de Max Stirner, prononcata Maks Ŝtirner, al Ret Marut estis esenca, unuavice pro ties siatempe tute nekutima defendo de la unikeco de ĉiu jomo. Marx kaj Engels, kiuj konis Stirneron el filozofa klubo de Berlino, skribis dikan verkon, La germanan ideologion" por ridindigi ties libron "La

*kie li staras, tie anatemo lin tenas.
Lin konas nek Dio nek infero.
Li ne estas tago, li ne estas nokto.
Li estas la nenio, la neniam, la neniam plu.
Li estas tro granda por la senfineco
kaj li tro etas por la sablograjno,
kiu havas siajn celojn en la universo.
Li estas la neniam estinta
kaj la neniam pensita!*

unikulo kaj lia propraĵo". Kvankam ili en multaj detaloj tute pravas, ili ĝuste kontraŭ la kerna eldiro de la libro, "ĉio estu mia afero . . . , nur mia afero ne estu mia afero", ne scias diri ion konvinkigan. Eĉ male, sen la obstina defendo de la individuo fare de Max Stirner la sekva frazo verŝajne ne estus skribita en la Komunista Manifesto: "Sur la loko de la malnova burĝa socio kun siaj klasoj kaj klasaj antagonismoj ni havos asocion, kie la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la libera evoluo de ĉiuj." (traduko de Detlev Blanke).

2. La vento forblovis lin: En pli fruaj tempoj vaĉo konsistis el ok "glasoj". Por tion mezuri ekzistis specialaj sablorhorloĝoj. La sablo de supra glaso fluis en la suban dum duono de horo. Tiel la vaĉuloj orientiĝis. Se la sablo estis komplete fluinta suben, ili vekkantis en la orelojn de la vaĉontoj: "En la nomo de Dio, sep pasis kaj ok forblovis. Amen."

Ĉapitro 23

Nun mi rigardis de proksime la ŝarkkaptistojn. La impresoj, kiuj mi ricevis jam de ekstere, neniel pliboniĝis. Ĝi eĉ ne pli malboniĝis, ĝi fariĝis simple neniiga. Komence mi kredis, ke inter ili estas kelkaj negroj kaj araboj. Sed nun mi rimarkis, ke ili nur tiel aspektis sub karbopolvo kaj koto. La ferdeklaboristo staras ja nuntempe sur neniuj ŝipoj, kun la ebla escepto de la rusaj bolŝevistaj ŝipoj, sur la sama rangoŝtupo kiel la ŝipestro. Kaj efektive, kien tio finfine kondukus? Iun belan tagon oni povus erari pri tio, kiu estas kiu, kaj eltrovi, ke la ferdeklaboristo same tiel inteligentas kiel la ŝipestro. Kelkfoje tio eĉ ne estus pruvo pri tio, ke la ferdeklaboristo efektive estas inteligenta.

Ĉi tie sendube eĉ inter la ferdeklaboristoj estis rangoŝtupoj. Jen estis ferdeklaboristoj de la unua rango, ferdeklaboristoj de la dua, de la tria kaj kvara rango. La du poŝtoŝtelistoj, kiuj tie staris, ŝajne apartenis al la kvina rango de la ferdeklaboristoj. Mi ne scias, kiu homa raso momente estas la plej malcivilizita. Tio ŝanĝiĝas ja en ĉiu jaro, depende de tio, kiom valoras aŭ senvaloras por aliaj la lando, kie vivas tiu homa raso. Sed tiujn du ferdekla-

boristojn la necivilizita raso verŝajne eĉ ne povus utili-
gi por disbati kokosojn. Tiom da ferdeklaboristoj, ke ĉiu
rango havu ĉi tie sian laŭjuran reprezentanton, oni ne
povis dungi por Jorike. Sekve tiuj de la unua, de la dua,
tria kaj kvara rango ne ĉeestis, kaj nur du de la kvina kaj
tri de la sesa rango. La reprezentantojn de la kvina rango
mi priskribis, tiujn de la sesa mi ne povas priskribi, ĉar
mi povas kompari ilin kun nenio alia, kio troveblas sur-
tere. Kvankam ili sendube estis originaluloj, mi devas
kontentiĝi per tio, ke mi diras: ili estis indaj representan-
toj kaj oni povis kredi al ili sen legitimaĵoj, ke ili apart-
enas al la sesa rango.

”Boŭnan tagoŭn!” La gvidanto de la poŝoŝtelistoj kaj
foirtrompisto — halt, mi volis diri: la gvidanto de la
poŝoŝtelistoj kaj ĉevalŝakristoj proksimiĝis al mi. ”Mi
esdas la Dua Inkŝeniero. Kaj tioŭ, kioŭ esdas miaŭ nej-
baroŭ, tioŭ esdas la *dunkymen*.” Kia angla! Mi certe de-
vos traduki estonte en pli bone legeblan lingvon, por
komprenebli ĝin. Li volis informi min, ke li estas la
Dua Inĝeniero kaj pro tio mia rekta ĉefo, de kiam mi
apartenas al la nigra bando, kaj li informis min, ke la
apudstaranto estas la *donkeyman*, alivorte dirite mia sub-
oficiro.

”Kaj mi,” tiel mi nun prezentis min mem, ”mi estas la
Unua prezidanto de la kompanio, kiu posedas tiun kes-

ton, kaj mi venis sur la ferdekon por instrui la rapidan kuron al vi.”

Se la du kredis, ke ili povas mistifiki min, ili por tio prefere serĉu alian, ne ĝuste min, kiu jam veturis kiel ŝipoknabo, kiam la samaĝuloj ankoraŭ lernis la abocon. Kun tia vanilo oni ne venu al mi, tiel ni trovos tuj ekde la unua vaĉo la ĝustan tonon inter ni kaj ne trinkos multe da spicita ĉokolado kune.

Sed li ne komprenis, kion mi diris; ĉar li plu parolis: ”Iru al la kajutoj kaj elserĉu dormlokon por vi.”

Nun vere tuj la ŝindoj falos de mia tegmento! Li ja ne eble serioze parolis kaj estas efektive la Dua Inĝeniero kaj mia superulo, tiu eskapita galersklavo, ĉu?

Kvazaŭ iu batis mian kapon per klabo, tiel mi nun ŝanceliĝis al la antaŭferdeko, al mia kajuto.

Kelkaj viroj kuŝis pigre en sia litbenko. Kiam mi envenis, ili rigardis dormeme al mi sen montri iun intereson aŭ iun miron. Tiaj neatenditaj refreŝiĝoj de la ŝipanaro ŝajne tro ofte okazis, por ankoraŭ valori atenton. Pli poste mi iam aŭdis, ke en dekoj de havenoj, en kiuj Jorike de tempo al tempo ĵetis la ankron, ĉiam du aŭ tri viroj atendis borde, kiuj pro tiu aŭ alia kaŭzo ne povis labori sur alia ŝipo aŭ nepre devis foriri, ĉar la kajoj fariĝis tro nesekuraj, kaj nun ĉiutage preĝis: ”Ho Dio de la ŝipoj kaj anĝelaj armeoj, igu enveni la bonan oldan Jorike!” Sur Jorike ĉiam mankis du aŭ tri viroj, kaj mi

certas, ke Jorike neniam en sia tuta longa vivo veturis kun kompleta ŝipanaro. Oni diris pri Jorike ankaŭ plian malicaĵon. Oni asertis, ke la ŝipestro jam multfoje iris al la pendumiloj kaj ekzamenis la pendigitajn, ĉu ankoraŭ estas fajrero da vivo en ili, tiel, ke ili havu ankoraŭ tiom da spiro por povi flustri la jeson por dungiĝi sur Jorike. Tiu fifamo malicas, tion mi scias, sed ĝi ne estas prenita el la aero kaj ne suĉita el orelo lobo de kato. Mi demandis pro vaka litbenko. Unu el la uloj signis per la kapo al supre troviĝanta litbenko, kiu aspektis kiel lignoskatolo. Mi demandis, ĉu tie eble iu mortaĉis. La viro kapjesis kaj diris tiam: "La suba komodo same liberas."

Tial mi prenis la suban. La viro perdis ĉiun intereson pri mi kaj miaj faroj.

En la litbenko estis nek matraco nek pajlosako, nek kuseno, nek kovrilo, nek littuko. Tie estis nenio. Nur la nuda vermborita ligno. Kaj eĉ de la ligno oni ŝparis ĉiun milimetron, kiun oni ankoraŭ povis ŝpari sen perdi la pravigon nomi tiun kofron por homaj ostoj ankoraŭ litbenko kaj ne eventuale ombrelkofro. En ĉiu el la du litbenkoj, kiuj kuŝis transe de mia, unu el ili supre kaj la alia sube, kuŝis ĉifonoj kaj disŝiritaj malnovaj sakoj. Tiuj estis la matracoj de la ŝipanoj, kiuj nun vaĉis aŭ pasigis ferdeke la tempon. Kiel kusenoj ili havis malnovajn ŝnuregojn. Ke eblas dormi sur ŝnuregoj, do tamen ne estas legendo el praa tempo. En la litbenko, kiu troviĝis super

la mia, en kiu do antaŭnelonge iu mizere mortis, eble nur hieraŭ, ne kuŝis ĉifonoj. Se mi sidis sur mia litbenko, mi povis atingi la transan litbenkon sen devi etendi longe miajn krurojn. Mi jam tuŝis ĝin per la genuoj, se mi sidis ĉi tie. La ŝipkonstruisto estis bona matematikisto. Li elkalkulis, ke sur ŝipo ĉiam triono aŭ kelkfoje eĉ duono de la ŝipanaro vaĉas dum tiu tempo, dum kiu la litbenkoj estas uzataj. Sed okazis, ke ni tri viroj, kiuj loĝis en tiu kupeo, ĉiuj samtempe vaĉis, tiel, ke ni ĉiuj en la sama tempo devis vesti kaj malvesti nin en tiu ĉambro, kiu inter la litbenkoj larĝis apenaŭ kvindek centimetrojn. Tiu kirlado de moviĝantaj brakoj, kruroj, kapoj kaj ŝultroj iĝis eĉ pli konfuziga, kiam en najbara kajuto viro kun sia litbenko rompfalis kaj devis uzi tiun, en kiu iu mortis mizere. Tiel, kiel la aferoj ofte iras, ankaŭ ĉi tie okazis; la nova kajuta loĝanto kunapartenis al nia vaĉo, kaj nun la detaloj de la kirlado ĉe la vestado kaj malvestado tute ne plu distingeblis. Se la kirla konfuzo vere tro grandis, tiel, ke la ŝipsonorilo jam vokis la vaĉojn, tiam tiu aŭ tiu kriis subite tondran "Halt!", kaj tiam laŭ senvorta interkonsento ĉiu el ni tenis sin senmova dum sekundo. Tiun 'Halt!' ni ne rajtis uzi sen bezono, sed nur, se iu estis en pleja danĝero, se iu perdis sian maldekstran brakon aŭ interkonfuzis sian dekstran kruron tiel kun la maldekstra kruro de alia kajutano, ke oni neniam eltrovus sen tiu "Halt!", ke Martin kun la dekstra kruro

de Bertram iris vaĉi, kaj Bertrand nur je la mateniĝo rimarkus, ke li turnis la rudron dum la tuta vaĉo per la dekstra mano de Martin kaj per la maldekstra mano de Hendrik, dum mi malpurigis la manojn de Bertrand kaj tute ne sciis, kiu eluzas la miajn.

Jam pli gravajn sekvojn havis, se Bertrand en la obtuza lumo de la fulganta kajutlampo eniris per sia dekstra kruro en la maldekstran kruron de sia propra pantalonon, dume li enestis per sia jam vestita maldekstra kruro en la dekstra kruro de la pantalonon de Hendrik. Foje tio kostis du pantalonajn duonojn, foje kostis ĉiudirekte flugantajn puŝojn, foje rompfalintan litbenkon aŭ trapuŝitan pordon. Sed ĉiufoje tio kostis tutan libertempan vaĉon da kvereloj kaj reciprokaj insultoj por povi konstati, kiu la unua metis kruron en la eraran pantalonduonon, kio devigis la senkulpulon rapide ĉirkaŭrigardi pro libera pantalonduono, por ke li nur ne devu iri al la vaĉo kun senvestita kruro. Efektive dufoje okazis, ke pantalonduono postrestis en la kajuto, kies mankon la laŭrajtaj posedantoj rimarkis nur tiam, kiam la mateno komenciĝis. Solvo por tio eble troviĝus, se interkonsento estintus ebla inter ni. Sed kiu en tiu kazo estu la kondamnito, punita per la devo ellitiĝi minuton pli frue? Ĉe la ellitiĝo ja tuj la sovaĝa kverelo komenciĝis pri tio, ke oni vekis tridek minutojn tro frue, pro kio tuj ĉiuj estis puŝitaj en animstaton, kiu malebligis kaj jam en la ek-

ĝerma fazo sufokis ĉiun interakordiĝan negocadon. Tiuj kvereloj kaj koleroj kaj minacoj, ke oni ja rekompencos la tro fruan vekon fare de la vaĉintoj, kun la dormemaj homoj en la kajuto atingis la kulminon ĉiufoje ĝuste tiam, kiam la ŝipsonorilo vokis la vaĉontojn. Tiam aldoniĝis al la kolero la nervozeco, ke oni ne ĝustatempe pretos kaj devos komenci la vaĉon tuj kun riproĉo, ĉar la hundo denove tro malfrue vekis, kion li faris pro nura petolemo, se oni jam sen tio ne havis bonan rilaton al la Dua.

Ĉapitro 24

Elektran lumon Jorike ne havis; evidente ŝi eĉ ne sciis en sia senkulpeco, ke io tia ekzistas. La kajuton lumigis petrola lampo. Oni tamen tiel devis nomi tiun lumaparaton. Ĝi estis misformita ladujo kun surŝraŭbita brulilo el fera lado, kiun oni prilaboris per trompaj artifikoj tiel, ke oni kredu ĝin pura latuno. Eble estis tempo, en kiu tiu trompo funkciis. Sed ĉar ĉiu infano scias, ke latuno ne rustiĝas, kaj ĉar de tiu latuna krono postrestis nur la rusto, kiu pro longa kutimiĝo kuntenis sin en la formo de cilindra brulilo, la trompo evidentiĝis, kompreneble en tempo, kiam la lampo ne plu interŝanĝeblis, ĉar la garantia tempo jam pasis. La lampo iam havis ankaŭ cilindron. La restaĵeto de tiu cilindro estis sole nur tial sendube identigebla kiel postrestaĵo de uzebla lampocilindro, ĉar foje kaj foje ĉirkaŭflirtis en la kajuto la demando: 'Kies vico estas hodiaŭ purigi la cilindron?' Neniam estis ies vico, kaj neniam iu tuŝis ĝin. Tion oni cetere demandis nur pro longa kutimo, por lasi al si la kredon, ke ni posedas lampan cilindron. Mi neniam vidis iun, kiu havus tiom da kuraĝo tuŝi ĝin. Tion la cilindro ne estus transvivinta. Delikata rekta tuŝo de

la cilindro estus farinta polvon el ĝi, la misfarinto estus respondeca pro tio, oni subtrahus la cilindron de la salajro, kaj tiumaniere la kompanio ricevus novan cilindron. Sed tial ne tuj la ŝipo. Ie oni ja trovintus vitropecon, kiu per la demando: "Kies vico hodiaŭ estas?" ricevintus la formon de cilindro. La lampo mem estis unu el tiuj lampoj, kiujn portis la sep virgulinaj, kiam ili estis memgardaj. Pro tiaj cirkonstancoj ne havus sencon atendi, ke ĝi povu prilumi eĉ nur mizere maristan kajuton. Ankaŭ la meĉo estis ankoraŭ la sama, kiun virgulino tranĉis el sia lana subjupo. La oleo, kiun ni ricevis por la lampo, kaj kiun oni cele al trompo nomis petrolo, kelkfoje eĉ diamantoleo, jam estis ranca, kiam la virgulinaj verŝis oleon en siajn lampojn. En la intertempo ĝi ne pliboniĝis. Ĉe la intima, ja tro intima brilo de tiu kajuta lampo, kiu brulis laŭ instrukcio dum la tuta nokto kaj tiel eĉ pli dikigis la sufoke aĉan aeron, ĉar ĝi neniam brulis, sed ĉiam nur fulgis, aŭ vesti aŭ malvesti sin — se oni krome estas laca kiel ŝtipo aŭ tute dormebria pro subita vekiĝo per kruda mano — tio estus kondukinta en la malvasta ĉambro al pli grandaj katastrofoj ol mi trovas konvena rakonti, se ne helpus en la plej oftaj kazoj mildigaj cirkonstancoj. Oni ja nur malofte pelas aferojn ĝis la ekstremo. Por konfesi la veron, plej ofte ni nek vestis nek malvestis nin. Ne tial, ĉar ni ne havis ion, per kio sin vesti aŭ malvesti. Pro tio ne. Iuj ĉifonoj ja ĉiam

restis, por ke ni povu montri almenaŭ la bonan intencon. Sed kion fari, se oni havas nek matracon nek kovrilon, nek eĉ ion similan?

Kiam mi alvenis, mi memoris pri normalaj boatoj kaj demandis:

”Kie do troviĝas la matraco por mia litbenko?”

”Tiujn oni ne provizas ĉi tie.”

”Kusenojn?”

”Tiujn oni ne provizas ĉi tie.”

”Kovrilojn?”

”Tiujn oni ne provizas ĉi tie.”

Mi miris nur pri tio, ke la kompanio efektive provizis la ŝipon, kiun ni devis veturi; kaj mi ne estus mirinta, se oni dirus al mi, ke la ŝipon ĉiu mem kunprenu. Mi venis sur la ŝipon kun ĉapelo, jako, pantalono, ĉemizo kaj kun paro da . . . nu, kiam ili ankoraŭ estis novaj, ili nomiĝis botoj. Nun oni ne plu povus nomi ilin tiel, ĉar oni tion ne kredus al mi. Sed aliaj estis sur la ŝipo, kiuj ne tiel riĉis. Unu el ili tute ne havis jakon, alia tute ne ĉemizon kaj tria ne ŝuojn, sed iajn indianajn mokasenojn, kiujn li faris por si el malnovaj sakoj, kestokovriloj kaj ŝnuregoj. Iam poste mi eksciis, ke tiuj, kiuj havis la plej malmultan, estis pleje ŝatataj de la ŝipestro. Aliloke estas kutime male. Sed ĉi tie . . . Ju malpli iu havis des pli malofte li aŭdacis la aventuron elŝipiĝi kaj lasi la bonan Jorike al sia sorto.

Mia litbenko estis fiksita al la koridora muro. La transaj litbenkoj estis fiksitaj al ligna septo, kiu dividis la kajuton en du kamerojn. Aliaflanke de tiu septo, same troviĝis du litbenkoj, kaj transe de tiuj du litbenkoj apud la ŝeloplatoj estis du pliaj litbenkoj. Tiel oni ebligis, ke tiu kajuto, kiu jam por kvar plenkreskaj homoj sufiĉe malvastis, nun servas kiel daŭra loĝejo por ok homoj. Tiu lignosepto, kiu duĉambrigis la kajuton, tamen ne dispartigis la tutan kajuton, ĉar alie la uloj, kiuj kuŝis en la ekstera, en la ŝipŝela parto, devus elrampi el la flanka lukso, kiu tamen ne sufiĉe grandis por ebligi al homo trapremi sin. Tiu septo do etendiĝis nur je du trionoj tra la ĉambro, kaj tie, kie finiĝis la septo, komenciĝis la salono, la manĝejo. Laŭ preskribo la salono estu apartigita de la dormejoj. Tio ĉi tie perfekte sukcesis. Tiuj tri ĉambroj estis unu ĉambro, sed per la septo tiu ĉambro estis dividita je tri ĉambroj, ĉe kiuj nur ĉiam malfermis la pordoj. Tiel oni devis imagi la aferon, ĉar la ĉambroj ne havis apartan pordon. La kajuto havis komunan pordon, kiu kondukis en la koridoron. En la manĝejo staris kruda manĝotablo, kaj ĉe ĉiu flanko laŭlonge kruda benko. En angulo, apud la manĝejo, staris malnova aĉa ladositelo, kiu ĉiam likis. Ĝi estis lavositelo, bankuvo, viŝsitelo, ĉio ĉi kiel unu objekto. Krome ĝi servis ankaŭ por aliaj celoj, interalie ankaŭ por senbalastigi terure ebriajn maristojn je kelkaj kilogramoj, en tiuj kazoj, kiam la sitelo

sufiĉe frue estis atingita. Se ĝi estis atingita tro malfrue, jen kutime nekoncernato vekigis en sia litbenko, atakita de torenta pluvo, kiu elverŝis sur la litbenkon ĉion eblan, kio estiĝas sur kaj sub la tero, kun unu sola escepto: akvo. Akvo ne estis en tiu torenta pluvo, ne, sinjoro.

Staris kvar vestoŝrankoj en tiu kajuto. Se tie ne troviĝus la eluzitaj ĉifonoj kaj malnovaj sakoj, kiuj pendis en ili, oni povus nomi vakaj la vestoŝrankojn. Ok viroj loĝis en tiu kajuto, sed enestis nur kvar ŝrankoj. Kvar ŝrankoj tro multaj, ĉar, se oni ne havas ion por enpendigi, oni ne bezonas ŝrankon. Jen do la kialo, pro kiu nur kvar enestis. Estis jam antaŭe decidite, ke kvindek procentoj de la ŝipanaro sur Jorike havas nenion, kio valorus la penon pendigi ĝin en ŝrankon. Pordojn la kvar ŝrankoj ne plu havis, el kio eblis konkludi, ke cent procentoj de la ŝipanaro ne bezonas ŝrankon.

La bovokuloj okulfrape malgrandis kaj obskuris. La demando, kiu devus purigi ilin, de tempo al tempo aperis, sed neniu respondis ĝin per "mi", kaj se iu respondis ĝin per "vi" aŭ per "ci", oni kontestis tion per eksplodoj de kolero, ĝis ni interkonsentis pri "li". Kiu ajn estis tiu "li": Se oni nomis lin, li vaĉis, sekve ne povis partopreni la voĉdonon pri tiu demando kaj tiam ankaŭ ne havis tempon zorgi pri nepurigitaj bovokuloj. La purigado de unu el ili ja tute ne estis temo, ĉar la vitro elrompiĝis kaj oni fermgluis la vakan lokon per gazeta papero.

Jen, kial la kajuto eĉ ĉe hela sunbrilo estis vualita de mistera nebulo. La du bovokulojn, kiuj kondukis al la ferdeko, ni ne rajtis malfermi nokte, ĉar la lampolumo de la kajuto ĝenis la vaĉantojn sur la ponto. Ĉar ne estis trablovo, la aero en la kajuto tiel pezis kiel plumbo.

La kajuton ĉiutage iu balais, kiu restis starante en la koto kaj ne povis eltiri la piedojn aŭ perdis kudrilon aŭ butonon. Unufoje semajne oni inundis la kajuton per salakvo, kion ni nomis viŝi kaj froti. Ekzistis nek sapo nek sodo nek brosoj. Kiu provizu ilin? Ne la kompanio. Kaj la ŝipanaro eĉ ne havis sapon por lavi ĉemizon. Oni jam beatis, se oni havis enpoŝe saperon por lavi foje kaj foje la vizaĝon. Ne eblis lasi la saperon ie kuŝi. Eĉ se ĝi ne pli grandus ol pinglokapo, iu trovus, retenus kaj neniam redonus ĝin.

La koto tiel dikis kaj tiel perfekte firmsekiĝis, ke hakilo necesus por dehaki ĝin. Se mi iam havintus la forton por fari tion, mi estus provinta solvi la taskon. Ne pro troigitaj sentoj de puremo, ĉar tiuj sur Jorike baldaŭ perdiĝis, sed pro sciencaj motivoj. Mi flegis en mi la firman konvinkon, kaj tiun konvinkon mi flegas eĉ nun, ke mi estus trovinta en la pli subaj tavoloj, se mi ne tro lacinatus por forĉisi de la koto tavolon post tavolo, monerojn de la fenicoj. Kiujn trezorojn mi trovintus, se mi estus penetrinta eĉ kelkajn tavolojn pli profunden, pri tio mi eĉ ne kuraĝas fantazii. Eble tie kuŝis la ungodetranĉaĵoj

de la praavo de la neandertala homo, jam tiom longe kaj tiel vane serĉataj, kiuj tiel eksterordinare gravas por konstati, ĉu la troglodito jam aŭdis ion pri *Mr. Henry Ford* el *Detroit*, aŭ ĉu li kapablus elkalkuli, kiom da dolaroj *Mr. Rockefeller* enspezas dum unu sekundo, dum kiu li purigas siajn bluajn okulvitrojn; ĉar la universitatoj nur tiukaze povas esperi pri privata subvencio, se ili pretas transpreni parton de la reklamo. Se oni volis forlasi la kajuton, oni devis tramigri obskuran ridinde malarĝan koridoron. Transflanke de nia kajuto troviĝis simila kajuto, ne la sama, nur simila, ĉar ĝi estis eĉ pli kota, eĉ pli mucida kaj eĉ pli obskura ol nia. Unu el la finaĵoj de la koridoro kondukis al la ferdeko, la alia al foskaptilo. Antaŭ ol oni atingis tiun foskaptilon, oni trovis ankoraŭ ambaŭflanke po kamero, kiuj estis aranĝitaj por la ĉarpentisto, por la boatisto, por la suboficiro kaj por plia . . . isto, kiuj ĉiuj rangis kiel suboficiroj, kaj kiuj pro tio havis specialajn kajutojn, por ke ili ne devu spiri la saman aeron kiel la ordinara ŝipanaro, kio povus malutili al la aŭtoritato.

La foskaptilo kondukis al du kameroj, el kiuj unu estis la ĉambro por ĉenoj kaj ekipaĵoj, kaj la alian oni nomis la ĉambro de hororo¹. Estis neniue sur *Jorike*, kiu povis aserti, ke li estis iam en la ĉambro de hororo aŭ, ke

1. ĉambro de l' hororo: slanga esprimo ĉe *Lloyds* por ĉambro kun dika nigra libro, en kiu oni notis malaperintajn ŝipojn

li ĵetis rigardon internen. Ĝi ĉiam estis firme fermita. Kiam oni foje ial demandis, mi ne plu scias, pro kiu neordinara kialo, pri la ŝlosilo por la ĉambro de hororo, montriĝis, ke neniuj scias, kie ĝi troviĝas. Sed la oficistoj asertis, ke la ŝipestro havas la ŝlosilon. Kaj la ŝipestro forĵuris sian animon kaj siajn ankoraŭ nenaskitajn bebojn, ke li ne havas la ŝlosilon, kaj li diris, ke li plej severe malpermesas malfermi aŭ eĉ eniri la ĉambron. Ĉiu ŝipestro havas siajn kapricojn. Li havis multajn, interalie tiun, ke li neniam inspektis la kajutojn de la ŝipano, kion li devus fari unufoje semajne laŭ la preskribo. Li pravigis la kapricon tiel, ke li povus fari tion ja en la venonta semajno, ke li ĝuste hodiaŭ ne emas fuŝi al si la apetiton, kaj ke li ankoraŭ ne aranĝis la manĝilaron, kion li nun antaŭ ĉio alia devos fari.

Ĉapitro 25

Sed tamen iam homoj troviĝis en tiu ĉambro de hororo kaj rigardis ĉion, kio enestis. Tiuj homoj poste ne plu troviĝis sur la Jorike, oni tuj elĵetis ilin el la ŝipo, kiam malkovriĝis, ke ili aŭdacis eniri en tiun ĉambron. Sed ilia historio tamen konserviĝis sur Jorike. Tiaj historioj ĉiam konserviĝas, eĉ se oni maldungas per unu bato la tutan ŝipanaron, precipe en kazoj, se la kesto devas resti kelkajn monatojn en seka doko.

La ŝipanaro povas forlasi la ŝipon. La historioj forlasas ĝin neniam. Se la ŝipo aŭskultis historion, jen la historio restas sur ĝi. Ĝi penetras en la feron, en la lignon, en la litbenkojn, en la kargoholdojn, en la karbejojn, en la kaldronejon. Kaj tie la ŝipo rerakontas la historiojn¹ en noktaj horoj al siaj kamaradoj, al la maristoj, vorton post vorto, pli precize ol se ili estus presitaj.

1. la ŝipo rakontas: En la islanda legendo "La lingvo de la ŝipoj" ni trovas viron, kiu komprenis la lingvon de ŝipoj. En tiu legendo ni trovas plie ŝipon, kiu kiel la Jorike komence ne volas eniri la akvon. Post la eniro ankaŭ la ŝipo de la legendo neniam revenis. ("Islandaj popollegendoj", Berlino 1889)

Ankaŭ tiuj historioj pri la ĉambro de hororo konserviĝis. En la ĉambro la du enpenentrintoj vidis plurajn homajn skeletojn. Kiom da ili estis, ili pro sia harstariga teruriĝo ne povis kalkuli. Tio cetere estus malfacila afero, ĉar la skeletoj disfalis kaj intermiksiĝis pro skuigiĝado. Sed estis impona kvanto. Oni ankaŭ baldaŭ konstatis, kiuj tiuj skeletoj estis, aŭ pli ĝuste, al kiuj ili origine apartenis. La skeletoj estis la restaĵoj de eksaj membroj de la Jorike-ŝipanaro, voritaj de ratoj², kiuj havis la amplekson de tre grandaj katoj. Tiujn gigantajn ratojn oni vidis refoje, se ili elsagis el iuj truoj de la ĉambro de hororo.

Kial oni ĵetis la kompatindajn viktimojn al la ratoj, unue ne estis preterdube klara. Ekcirkulis onidiroj, kiuj fine kristaliĝis al tiu ĉi. Tiujn kompatindajn virojn oni oferis por teni malaltaj la veturkoston por Jorike kaj altaj la dividendojn de la kompanio aŭ por la posedanto. Se okazis, ke viro en haveno maldungiĝis kaj aŭdacis postuli la pagon por la horoj de pluslaboro, kiel estus farende laŭ la kontrakto, oni tuj formetis lin en la ĉambron de hororo.

Al la ŝipestro alia eblo ne restis. La pago de la salajro kaj la maldungiĝo okazis en la haveno. Tie la ŝipestro ne bone povis ĵeti en la maron la viron, kiu volis havi la

2. ratoj: pri tiu plago de la ŝipoj plendas la marveturaj kronikistoj de Pigafetta ĝis Melville. Tiu skribis: "Ili ne vivis inter ni, sed ni inter ili."

pagon de la pluslaboraj horoj; ĉar tion eble vidus la havenaj instancoj, kiuj monpunus la ŝipestron pro havenpoluo. Kion li faras kun sia viro, tio ne estas la afero de la instancoj, ilia afero estis nur, kion li faras kun la haveno aŭ la havena akvo. Se la ŝipestro nun simple lasus foriri la viron de la ŝipo, tiu tuj kurus al la polico aŭ al la konsulo aŭ al marista sindikato, kaj tiel la ŝipestro devus pagi la plushorojn. Por eviti tion, oni senhezite decidis enfermi la viron en la ĉambro de hororo.

Kiam la ŝipo jam troviĝis sur la alta maro, la ŝipestro iris malsupren por ellasi la viron, ĉar li jam ne estis danĝera. Sed la ratoj nun ne plu volis redoni lin, ĉar ili jam komencis manĝi je li, kaj certa nombro de geoj atendis jam kun geedziĝaj licencoj, ĉar la okazo tiom favoris aranĝi grandiozan nuptofeston³. La ŝipestro nepre bezonis la viron por la laboro, kaj li devis akcepti batalon kontraŭ la ratoj. Sed en tiuj bataloj la ŝipestro ĉiufoje estis venkita kaj devis fine, por savi la propran vivon, forlasi la ĉambron sen la viro. Helpon la ŝipestro ja ne povis alvoki, ĉar tiukaze ĉio koniĝus, kaj li devus pagi la plushorojn.

De kiam mi veturis sur Jorike, mi ne plu kredas la kordisŝirajn rakontojn pri sklavo kaj sklavŝipoj. Tiom den-

3. nupto de ratoj: edziĝofesto por musoj aspektantaj kiel ratoj troviĝas sur bonega ilustraĵo en "Fabeloj de Andersen" en 'Dio de dormo', tradukita de Zamenhof. (eldonejo ludovikito 1990)

se, kiom ni estis pakitaj, sklavoĵ neniam estis pakitaj. Tiom streĉe, kiom ni devis labori, sklavoĵ neniam devis labori. Tiom laca kaj malsata, kiom ni ĉiam estis, sklavoĵ neniam estis. Sklavoĵ estis komerca varo, por kiuj oni pagis kaj atendis altan pagon. Tiun varon oni devis trakti zorgeme. Por labore vrakiĝintaj, ĝisskelete malsatigitaj kaj tro lacaj sklavoĵ neniue eĉ nur la transportkostojn pagis, kaj multe malpli prezon tian, ke la komercisto profitus.

Sed maristoj ne estas sklavoĵ, por kiuj oni pagis kaj kiuj kiel altvalora komerca varo estas alte asekuritaj. Maristoj estas liberaj homoj. Ili estas liberaj, malsataj, en ĉifonoj, tro lacaj, sen laboro, kaj tial devas fari tion, kio estas postulata de ili, kaj ili devas labori ĝis la renversiĝo. Tiam oni ĵetas ilin en la maron, ĉar ili ne plu valoras la furaĝon. Ankoraŭ en tiu ĉi horo ekzistas ŝipoj de civilizitaj popoloj, sur kiuj oni rajtas vipi la maristojn, se ili rifuzas transpreni je daŭro la laboron de du vaĉoj kaj duonon de tiu de la tria aldone, ĉar la ŝipposedanto pagas tiajn aĉajn salajrojn, ke ĉiam almenaŭ triono de la ŝipanaro mankas.

Kaj la maristo devas manĝi tion, kion oni metas antaŭ lin, egale ĉu la kuiristo ankoraŭ hieraŭ estis tajloro, ĉar vera kuiristo por la salajro ne havigeblis, aŭ ĉu la ŝipesstro celas ŝpari tiom je la ŝipanara manĝo, ke la maristoj neniam satiĝas.

La historioj de la maro rakontas multon pri ŝipoj kaj maristoj. Sed se oni iom atente observas tiujn ŝipojn, oni vidas, ke ili estas dimanĉaj posttagmezŝipoj, kaj la maristoj en tiuj marrakontoj ĉiam estas gajaj operetaj kantistoj, kiuj manikuras siajn manojn kaj flegas sian aflikton pro malfeliĉaj amaferoj.

Ĉapitro 26

Mi interŝanĝis entute ne pli ol dek vortojn kun la dormemuloj en la kajuto. Kiam mi trovis mian litbenkon kaj oni diris al mi, ke ĉi tie estas nek kovriloj nek matracoj, la konversaciaj temoj elĉerpiĝis.

De supre mi aŭdis la kutimajn knarojn kaj la bruon de la ĉenoj, la tondrantan marteladon de la ankro, kiu batadis la ŝipŝelon, antaŭ ol ĝi silentiĝis, la ĉenan tintadon de la vinĉoj, la tien-tien-kuradon, la piedstamfadon, la komandadon, la sakrojn, ĉiujn tiujn bruojn, kiuj necesas, por ke ŝipo povu eliri. La samajn bruojn oni aŭdas, kiam ŝipo envenas.

Min tiuj bruoj ĉiufoje ĉagrenas kaj agacas. Mi bone fartas nur tiam, kiam la ŝipeto veturas sur la maro. Tute egale, ĉu ĝi veturas hejmen aŭ maren. Sed mi volas esti sur la maro kun la ŝipo. Ŝipo en haveno ne estas ŝipo, sed kesto, kiun oni pakas, en kiun aŭ el kiu oni pakas ion. En la haveno oni ankaŭ ne estas maristo sur ŝipo; sed nur tagsalajrulo. La plej kotan laboron oni faras en la haveno, kaj oni laboras, kvazaŭ oni estus en fabriko kaj ne sur ŝipo. Tiom longe, kiom mi aŭdis la ĉenan tintadon kaj la komandojn, mi ne forlasis la kajuton. Kie

homoj laboras, oni ne proksimiĝu. Tuj kiam oni staras proksime, facile okazas, ke oni kunlaboras. "Hej vi, rapidu, helpu iom." Mi ja eĉ ne konsideras fari tion. Ja por kio? Mi ne ricevus pagon. Jen ili pendigas en ĉiu oficejo kaj en ĉiu fabrikhalo la afiŝon kun la postulo: "*Do more!*", alivorte: "Laboru pli multe!" Jen la klarigo presita sur senkostaj folioj, kiujn ili metas ĉe niaj laborlokoj: "Laboru pli multe! Se vi hodiaŭ pli faras ol oni postulas de vi, se vi hodiaŭ pli laboras ol vi estas pagata, oni iam pagos al vi tion, kion vi pli faras."

Min ĝis nun neniu tiel povis kapti, tial mi ja ankaŭ ne fariĝis la Ĝenerala Direktoro de la *Pacific Railway and Steamship Co. Inc.*¹ Oni povas legi ĉiam denove en la dimanĉaj ĵurnaloj kaj en gazetoj kaj en la aŭtobiografiaj rimarkoj de sukcesaj viroj, ke nur per tiu libervola aldona laboro, kiu evidentigas ambicion, strebemon kaj la deziron komandi, jam kelkaj simplaj honestaj laboristoj fariĝis ĝenerala direktoro aŭ miliardulo, kaj ke al ĉiu, kiu sekvas konsciencie tiun devizon, la sama vojo al la posteno de ĝenerala direktoro estas malfermita. Sed tiom da postenoj por ĝeneralaj direktoroj kaj tiom da miliardulaj postenoj ja en la tuta Usono ne vakas. Tiukaze mi povus labori unue pli kaj pli kaj ankoraŭ pli la unuajn tridek jarojn sen ricevi pli altan pagon, ĉar mi ja volas

1. Pacific Railway and Steamship Co.Inc. (angle): Pacifika Fervoja kaj Vaporŝipa Komerca Kompanio

fariĝi ĝenerala direktoro. Se mi tiam en konvena momento demandus: "Nu, kio nova pri la posteno de ĝenerala direktoro, ĉu ne jam iu vakas?", jen oni dirus al mi: "Ni tre bedaŭras, momente ankoraŭ ne, sed ni notis vin, laboru tiel fervore kelkan tempon plu, ni ne forgesos vin." En pli fruaj tempoj oni diris: "Ĉiu el miaj soldatoj portas la marŝalbastonon en sia tornistro", en la nuna tempo oni diras: "Ĉiuj el niaj laboristoj kaj oficistoj povas fariĝi ĝenerala direktoro." Kiel knabo ja ankaŭ mi kriante kolportis gazetojn kaj purigis botojn, kaj jam en mia dekunua jaro mi devis perlabori mian vivtenon, sed ĝis hodiaŭ mi fariĝis nek ĝenerala direktoro nek miliardulo. La gazetoj, kiujn tiuj miliarduloj kolportis kiel infanoj, kaj la botojn, kiujn ili purigis, certe estis tute aliaj gazetoj kaj botoj ol tiuj, kiuj pasis tra miaj manoj.

Se oni nokte staras kaj observas la maron, kaj ĉio kvietas, jen naskiĝas en la kapo diversaj kapricaj pensoj. Tiel mi jam fantaziis, kio estus okazinta, se la soldatoj de Napoleono ĉiuj subite elprenus sian marŝalbastonon el la tornistro. Kiu tiam varmigus la nitojn en la forĝejo de kaldronoj? Memkompreneble la ĵus nobeligitaj ĝeneralaj direktoroj. Kiu alia ol ili? Restus ja neniu alia, kiu povus fari tion, kaj la kaldrono devas esti forĝita ĝisfine, kaj la batalo devas esti batalita, ĉar alie oni bezonus nek ĝeneralajn direktorojn nek marŝalojn. La kredo plenigas malplenajn sakojn per oro, ĝi faras el filoj de ĉarpentistoj

diojn kaj el artileriaj leŭtenantoj imperiestrojn, kies nomoj transbrilas jarmilojn. Faru el la homoj kredantojn je vi, kaj ili draŝos sian karan dion el la ĉielo kaj sidigos vin sur lian tronon. La kredo movas montojn, sed la malkredo disrompas ĉiujn sklavĉenojn.

Kiam la bruoj finfine silentiĝis kaj mi jam vidis ferdeklaboristojn stari sen laboro, mi forlasis la kajuton kaj iris sur la ferdekon. Tuj la poŝostelisto, kiu prezentis sin Dua Inĝeniero al mi, salte proksimiĝis kaj diris per sia nedireble komika angla lingvo al mi: "La ŝipestro volas interparoli kun vi, venu kun mi."

La parolturno "Venu kun mi" preparas en deknaŭ de dudek kazoj nur la frazon: "Ni retenos vin ĉi tie dum sufiĉe longa tempo."

Eĉ, se en tiu speciala kazo la dua frazo ne estus parolita, ĝia konsekvenco tamen jam decidiĝis. Jorike kuris kiel karniĝinta fulmotondro sur la vasta maro. La piloto estas forlasinta la ŝipon, kaj la Unua Oficiro jam transprenis la vaĉon.

La ŝipestro estis ankoraŭ juna viro, tre bone nutrita, kun sana, ruĝa kaj glate razita vizaĝo. Li havis hele bluajn okulojn, kaj en lia flave bruna hararo montriĝis flamruĝaj kolortonoj. Li vestis sin eksterordinare bone, preskaŭ tro elegante. La kunaranĝo de la koloroj de la kostumo, de la kravato, de la ŝtrumpoj kaj de la elegantaj someraj ŝuoj estis bone elektita. Laŭ lia aspekto oni

ne taskus lin kapitano de malgranda frajtŝipo, eĉ ne kapitano de granda pasaĝera ŝipo. Li ne aspektis, kvazaŭ li povus konduki keston almenaŭ de unu rodo al alia rodo sen albordiĝi ĉe tio sur la alia flanko de la terglobo. Li parolis bonan puran anglan lingvon, kiun oni eble lernas en tre bona lernejo de neanglalingva lando. La vortojn li elektis tre zorgeme, oni havis la impreson, ke li tre lerte kaj rapide elektis dum la parolado nur tiajn vortojn, kiujn li povis elparoli senerare. Por sukcese fari tion, li intermetis dumparole paŭzojn, per kio li vekis la imagon, ke li estas pensulo. La kontrasto inter la ŝipes-tro kaj la Dua Inĝeniero, kiu ja same estis oficiro, estis tute ne komika, sed tiel konsternis min, ke tiam, se mi iam dubus pri la loko, kie mi troviĝas, mi tuj sciis ĝin pro tiu kontrasto.

”Do, vi estas la nova subhejtisto?” li salutis min, kiam mi envenis en lian kabineton.

”Mi? Subhejtisto? Ne, sinjoro, *I am a fireman*, mi estas hejtisto.” Mi jam vidis la savantan lumturon.

”Pri hejtisto mi diris nenion,” enmiksiĝis sin nun la poŝtoŝtelisto.

”Mi demandis vin pro hejtpersonaro, tion mi ja demandis, ĉu ne?”

2. subhejtisto: en la originalo ’karbotirulo’, kiu devenas de la angla ’coal-drag’

"Tio estas ĝusta," mi respondis, "tion vi demandis kaj tion mi jesis. Sed en neniu sekundo mi pensis, ke temas pri subhejtisto."

La vizaĝo de la ŝipestro montris enuon, kaj li diris al la ĉevalŝakristo:

"Tio estas nun via afero, *Mr. Dils*. Mi supozis, ke ĉio estas en ordo."

"Mi tuj volas forlasi la keston, ŝipestro. Mi eĉ ne ludas per la ideo dungiĝi kiel subhejtisto. Tuj preparu boaton por mi. Mi protestas, kaj mi plendos en la havenoficejo pro provita ŝanhajado.³"

"Kiu ŝanhajis vin?" ekscitiĝis nun la ĉevalŝakristo. "Mi? Tio estas impertinenta mensogo."

"Dils," la kapitano diris nun tre serioze, tio ne estas mia afero. Tion mi ne responsas. El tiu kaĉo vi mem devas eltiri vin, tion mi jam nun klarigas, tion eldiskutu ekstere."

Sed la poŝostelisto ne lasis sin konfuzi. "Kion mi demandis? Ĉu mi demandis: kaldronara bando?"

"Vere, tion vi demandis, sed vi ne diris, ke . . ."

3. ŝanhaji (slange): rabi personon aŭ personojn. Fifamon atingis la dunga agento Ŝanhajo-Brown el Nov-Jorko el la velŝipa tempo, kiu kune kun aliaj en havenaj tavernoj ebrigiis tutajn ŝipanojn per rumo, en kiun oni ŝutis dormigilon. La maristoj rimarkis la trompon nur, se ili jam troviĝis surmare en fremda ŝipo.

"Ĉu la subhejtisto apartenas al la nigra bando, ĉu ne?" la inĝeniero nun demandis inside.

"Certe la subhejtisto apartenas al ĝi," mi konfirmis laŭ la vero, "sed mi havas . . ."

"Tiukaze tio ja estas tute en ordo," diris nun la ŝipestro, se vi intencis diri 'hejtisto', vi devintus tute klare diri tion, tiukaze

Mr. Dils certe estus dirinta al vi, ke hejtisto ne mankas al ni. Bone do, tial ni nun povas ekskribi."

Li prenis la listojn de la ŝipanaro kaj demandis pri mia nomo.

Mia bona marista nomo sur la listo de mortula ŝipo? Neniam. Tiel profunde mi ĝis nun ne sinkis. Mi ja neniam denove en mia vivo povus veturi honestan ŝipon. Prefere la adiaŭan ateston de honorinda prizono, tio pli taŭgus ol la kvitanca libro de mortula ŝipo.

Tiel mi rezignis pri mia bona nomo kaj forĵuris ekde nun miajn familiajn ligojn. Mi ne plu havis nomon.

"Naskita kiam kaj kie?"

La nomo estis for, sed mian hejmlandon mi ankoraŭ havis.

"Naskite kiam kaj kie?"

"En . . . en . . ."

"Kie do?"

"En Aleksandria."

"En Usono?"

”Ne, en Egiptujo.”

Nun ankaŭ la hejmlando estis for; ĉar ekde nun la kvintanclibro de Jorike estis mia sola legitimaĵo, ĝis la fino de mia vivo.

”Kiun ŝtatanecon? La britan?”

”Ne. Sen nacieco.”

Ĉu mi havu registrita mian nomon kaj mian naciecon en la listoj de Jorike dum la eterneco? Ĉu bone lavita usonano, civilizita, provizita per la evangelio de la dentobroso kaj la scienco de la ĉiutaga piedolavado, kiam ajn jam veturis sur iu Jorike, li kiam ajn jam servis, frotlavis kaj farbis sur iu Jorike? Mia hejmlando, ne, ne mia hejmlando, sed la reprezentantoj de mia hejmlando, estas vere, elpuŝis kaj kontestis min. Sed, ĉu mi povas kontesti la teron, kies aromon mi ensuĉis de mia unua enspiro? Ne pro la reprezentantoj, kaj ne pro ĝia flago, sed pro la amo al la hejmlando, pro ĝi mem, por ĝin honori, mi devis forĵuri ĝin. Sur Jorike ne veturas honesta usona knabo, eĉ se li forkuris de la ekzekutisto.”Ne, sinjoro, neniun naciecon.”

Pri la marista dokumento, pri la salajra libro, pri la pasporto aŭ pri io simila li ne demandis. Li sciis, ke oni ne demandu pri tiaj aĵoj al maristoj venintaj al Jorike. Ili ja povus diri: ”Mi ne havas paperojn.” Kion fari tiukaze? Tiukaze li ne rajtus dungi ilin, kaj Jorike ne havus ŝipanaron. Ĉe la unue atingebla konsulo oni devis ja oficiale

konfirmigi la liston. Sed tiam nenio plu ŝanĝeblis, la viro estis jam dungita, jam veturis sur la ŝipo, jen ne plu eblis rifuzi al li la konsulan konfirmon. La konsulo oficiale nenion scias pri mortulaj ŝipoj, kaj neoficiale li ne kredas ilian ekziston. Esti konsulo postulas talentojn. La konsuloj ankaŭ ne kredas la naskiĝon de homo, se la naskiĝatesto ne pruvas la naskiĝon.

Kio ankoraŭ restis al mi, post kiam mi forludis mian nomon kaj la hejmlandon? La laborforto. Nur kun tiu oni povis kalkuli. Ne kun ĝia plena rekompenco. Sed iom, por ke la laciĝo ne fuŝu la plezuron.

"La salajro por la subhejtistoj estas sepdek pesetoj," la ŝipestro diris kvazaŭ pretere, dum li skribis sur la liston.

"Kiiiiio?" mi krias. "Sepdek pesetojn?"

"Jes, ĉu vi ne sciis tion?" li demandis kun laca gesto.

"Mi dungigis por angla salajro," mi nun defendis mian salajron.

"*Mr. Dils?*" la ŝipestro demandis. "Kio tio estas, *Mr. Dils?*"

"Ĉu mi promesis anglan salajron al vi?" la ĉevalŝakristo diris rikane al mi.

Mi tuj povus draŝi sur la fian vizaĝon de tiu hundo, sed ĉi tie mi vere ne emas kuŝi en feraj katenoj. Ne sur Jorike, kie la ratoj, ekmordus min vivanta, se memdefendo ne eblas. Jes ja, vi promesis anglan salajron al mi," mi nun elkriis mian koleron al la kanajlo. Tio estas ja la lasta

afero, kiun mi povas defendi, mian salajron. Tiun hundan salajron. Ju pli streĉa la laboro, des pli eta la salajro. La subhejtisto havas la plej streĉan kaj inferan laboron sur la kesto, kaj plej ofte la plej aĉan salajron. Ankaŭ la angla salajro ne indas laŭdon, sed kie en la mondo la laboristo ricevas la plenan salajron? Kiu ne pagas la salajron al la laboristo, tiu estas sangohundo.⁴ Sed oni devas nur antaŭe interkonsenti kun la laboristo la salajron, kiu bezonas la laboron pli ol kion ajn, kaj ĝi estas jam lia salajro. Lia salajro, kaj oni ne plu estas sangohundo. Se ne estus leĝoj, ankaŭ ne estus miliardoj. Vortojn oni povas knedi, tial oni skribas leĝojn en la formo de vortoj. La malsatulon minacas la mortopuno, se tiu knedas ilin; se estas mildigaj cirkonstancoj, oni antaŭvidas la prizonon, por povi praktiki indulgon kaj por pruvi la humanecon de la leĝoj.

”Jes ja, tion vi faris, vi promesis anglan salajron al mi,” mi kriis plian fojon.

4. Kiu ne pagas la salajron al la laboristo, tiu estas sangohundo: “. . . kaj tamen la juĝejoj diras al la laboristo: ‘Vi ja estis via propra mastro, vi ja ne devis akcepti tian kontrakton, se vi ne emis, sed nun, ĉar vi akceptis libervole tiun kontrakton, vi ankaŭ devas agi laŭ ĝi’ — kaj tiel la laboristo aldone eĉ estas mokata de la juĝisto, kiu mem estas membro de la burĝa klaso.” (F. Engels)

”Nur ĉar ekzistas senposeduloj, la leĝoj necesas, . . .” (F. Engels)

”Ne kriu tiel laŭte, diris la kapitano, levante la okulojn de sur la listo. ”Kiel do estas, Dils? Mi nun finfine satas de tio. Se vi dungas iun, mi vere deziras, ke ĉio estu en ordo.”

La ŝipestro aktoris delikate. Jorike rajtas fieri pri sia mastro.

”Pri angla salajro mi tute ne parolis,” diris la ĉevalŝakristo.

”Vi tamen diris, tion mi povas ĵuri.” La etan anguleton de la laŭrajteco, kiu ankoraŭ restis al mi, mi volis defendi per mia tuta forto.

”Ĵuri, ĉu? Ja ne faru falasan ĵuron, viro. Mi ekzakte scias, kion mi diris al vi, kaj mi scias precize, kion vi respondis. Mi havas ĉi tie sufiĉe da atestantoj, kiuj staris apud mi, kiam mi dungis vin. Mi diris ’anglan monon’, sed pri angla salajro mi eĉ ne vorton diris.”

Tiu hundo pravas. Li efektive diris ’angla mono’ kaj tute ne menciis la vorton salajro. Kompreneble mi komprenis, ke temas pri angla salajro.

”Tiukaze do ankaŭ tio nun estas en ordo,” la ŝipestro diris trankvile. ”Vi kompreneble ricevos vian salajron en anglaj funtoj kaj ŝilingoj. Por ĉiu horo de pluslaboro kvin pencojn. Kaj kie vi volas maldungiĝi?”

”En la unua haveno, en kiun ni unue enveturos.”

”Tion vi ne rajtas,” la ĉevalŝakristo diris rikane.

”Jes ja, tion mi tamen rajtas.”

”Vi ne rajtas,” li ripetis. ”Vi dungigis por Liverpolo.”

”Tion ja ankaŭ mi opinias,” mi diras, ”Liverpolo estas ja la haveno, kiun ni enveturos unue.”

”Ne,” la ŝipestro respondis, ”ni deklaris Greklandon, sed mi ŝanĝis miajn intencojn kaj celas nun la nordan Afrikon.”

Vi deklaris kaj poste en la veturo ŝanĝas la kurson. Aj, kara amiko, vi estas klardira. Maroko kaj Sirio pagas bonajn prezojn por . . . Kaj se vi rapide kaj feliĉe enspezis la monon, tiam sekvos la dungoj por la lasta granda veturo, hej? De salakva fiŝo, kiu naĝis en tiom da maroj, vi ne povas kaŝi ion. Tio ne estas la unua kamufloŝipo, kiun mi veturas.

”Vi diris al mi, ke Liverpolo, kaj vi klare esprimis, ke mi rajtas maldungigi en Liverpolo,” mi vokas ekscitite al la poŝtoŝtelisto.

”Neniu vera vorto, ŝipestro,” diras la ruza bubo.

”Mi diris, ke ni havas pecvarojn por Liverpolo, kaj, ke li povos maldungigi tie, se ni haltos en Liverpolo.”

”En tiu kazo ĝi estas tute en ordo,” konfirmas nun la kapitano.

”Ni havas ok kestojn da sardenoj en oleo por Liverpolo, pecvaron, multe sub la kargotarifo. Livera limdato post dekok monatoj. Pro tiuj ok kestoj, kiuj estas neglekteblaj varoj, mi ja ne veturos al Liverpolo. Tiuj estas okaza varo, kiu ne kaŭzu kargokostojn. Se mi surŝipigos

pli da ili, por ke ili indu atenton, mi kompreneble jam iam en la venontaj ses monatoj veturos tien.”

”Tiukaze vi ja tuj povintus diri, ke ne estas pecvaro, sed okaza varo, kiun vi havas por Liverpolo.”

”Tion vi ja ne demandis,” kontraŭdiras la ĉevalŝakristo.

Jen fajna societo. Kontrabandi, falsi deklarojn, trompi havenajn instancojn, mensogi kursojn kaj veturi mortulajn ŝipojn. Kompare kun ili tradicia marrabisto estas ja nobelo. Veturi sur piratoŝipo ne estas hontinde, tie mi nek la nomon nek la naciecon forĵurus. Veturi marraĵbistan ŝipon estas afero de honoro. Sed veturi tiun keston, tio estas hontindaĵo, pro kiu mi longe devos barakti, antaŭ ol mi glutos kaj digestos tion.

”Bonvolu subskribi vian nomon ĉi tie.”

La ŝipestro transdonis fontplumon al mi.

”Sub tio? Neniam! Neniam!” Mi vokas la vortojn indigne.

”Kiel plaĉas al vi. *Mr. Dils*, bonvolu subskribi ĉi tie kiel atestanto.”

Tiu poŝtoŝtelisto, tiu ĉevalŝakristo, tiu fripono, tiu trompisto, tiu ŝanhajisto, tiu viro, por kiu la maŝo, per kiu dudek kvar rabmurdistoj estis pendigitaj, estas tro deca kaj honorinda, subskribu tie por mi. Tiu putrulo ne rajtas eĉ sub mia elpensita nomo meti sian lepran manon.

”Donu ĝin, ŝipestro, mi mem subskribos, nun vere jam ĉio estas feko kaj fuko.”

”Helmont Rigbay⁵, Aleksandria (Egiptujo).”

Jen skribitas. Firme kaj sekure. Do Jorike, hojhoj! Veturu en la inferon, se vi volas. Nun ĉio estas egala. Mi estas estingita el la vivantoj. Forblovito. Eĉ spiro de mi ne restis en la mondo.

Hola-hej! Hola-hej! Hoj! Hoj!

Mi mortis ne ĉe iu rif’,

veturas sur mortula ŝip’.

Ve, for de l’ suna Nova Orlean’.

Ve, for de l’ rava Luiziano.

Hola-hej! *Ave Caesar, Morituri te salutant!*⁶ La modernaj gladiatoroj salutas vin, ho Cezaro Aŭgusto Kapitalis-

5. Helmont Rigbay, Aleksandria (Egiptujo): La nederlanda teozofo kaj kemiisto Franciskus Mercurius van Helmont el la 17-a jarcento asertis en skribaĵo, ke li estas trovinta la ”ŝtonon de la saĝuloj”. Ankaŭ la postnomo ne estas hazarde elektita, ĉar poste ankaŭ Hal Croves/Traven uzis la pseŭdonomon Berrick, kiu devenas de Rigbay. En la angla la vorto bay estas ankaŭ uzata en la frazo: ”To have someone at bay”, do, ”havi iun en la kaptilo”. El ’Rigbay’ legeblas la anglaj vortoj ’a brick’, kiuj en Esperanto estas ’briko’. Tio rekondukas al ’brikofaristo’, la nomon de la kontraŭmilita gazeto de Ret Marut.

mo, *morituri te salutant!* La mortontoj salutas vin, ho Cezaro Aŭgusto Imperiestro, ni pretas morti por vi, por la sankta kaj gloriĉa asekurkompanio.

Ho, tempoj, ho, moroj! La gladiatoroj enmarŝis en brilaj kirasoj la arenon. Fanfaroj trumpetis kaj cimbaloj tintis. Belaj virinoj mansalutis ilin de sur la balustradoj kaj lasis fali la ore broditajn tuketojn; la gladiatoroj levis ilin de la tero, premis ilin al siaj lipoj, enspiris la ravan odoron, kaj dolĉa rideto dankis al ili kaj salutis ilin. Ĉe la entuziasma huraa kriado de ekscitita homamaso, ĉe la sonado de bruanta milita muziko ili eligis sian lastan elspiron.

Sed ni, la nunaj gladiatoroj, ni dronas en koto. Ni tro lacas por lavi nin. Ja por kio lavi sin? Ni mortas pro malsato, ĉar ni endormiĝas antaŭ la pelvo. Ni mortas pro malsato, ĉar la kompanio devas ŝpari, por ne subfali sub la konkurantojn. Ni mortas en ĉifonoj, mutaj, ĉe selektita rifo, profunde en la kaldronejo. Ni vidas entorenti la akvon, kaj ni jam ne sukcesas fuĝi supren. Ni esperas, ke la kaldronejoj eksplodu, por ke la fino venu rapide, ĉar la manoj estas firme enpinĉitaj, ĉar la fajropordoj salte

6. Ave Caesar, Morituri te salutant!: Gracon al vi, Cezaro, la mortontoj salutas vin!, la saluto de la gladiatoroj antaŭ batalo supren al la roma imperiestro. Tiujn batalojn tiutempe nur la stoikisto Seneca, instruisto de Nerono, kondamne priskribis en siaj stoicismaj "leteroj" (1,7,4)

malfermiĝis kaj la ardanta karbo lante voras je niaj piedoj kaj femuroj. La subhejtista bando, ĉu? Tiuj kutimiĝis al tio. Tiuj facile eltenas brogitan haŭton kaj vundojn.

Ni mortas sen fanfarmuziko, sen la ridado de belaj virinoj, sen la aplaŭda rumorado de homamaso en festa ekscitiĝo. Ni mortas mutaj kaj en ĉifonoj, por vi, ho Cezaro Aŭgusto! Gracon al vi, Imperiestro, ni ne havas nomojn, ni ne havas naciecon. Ni estas neniuj, ni estas nenio.

Gracon al vi, Cezaro Aŭgusto Imperiestro, vi ne devas pagi pensiojn por vidvinoj kaj orfoj. Ni, ho, Cezaro, estas la plej fidelaj el viaj servistoj. La mortontoj salutas vin!

Ĉapitro 27

Estis tridek minutoj antaŭ la dekokaj, kiam negro alportis la vespermanĝon en la kajuton. La vespermanĝo estis en du grasaj ladokruĉoj, kiuj aspektis kvazaŭ atakitaj per klaboroj. Ĝi konsistis el akveca pizosupo, ŝelkuiritaj terpomoj kaj varmega bruna akvo en emajlokruĉo, kiu same aspektis kvazaŭ primartelita. La bruna akvo havis la nomon teo.

"Kie estas la viando?" mi demandis la negron.

"Neniu viando hodiaŭ," li diris.

Mi rigardis lin kaj rimarkis, ke li ne estas negro, sed blankulo. Li estis la subhejtisto de alia vaĉo.

"Alporti la vespermanĝon estas via afero," la viro diris al mi.

"Ĉi tie mi ne estas la mesbubo, la Moseo¹, por ke vi tuj dekomence sciu tion," mi respondis.

"Ĉi tie ni ne havas mesbubojn."

"Ĉu?"

"Tion ĉi tie devas fari la subhejtistoj."

1. Moseo: ŝipknabo, la vorto devenas de la franca Mousse, la plej suba rango sur francaj galeroj ekde fine de la 17-a jarcento. La infanlaboron sur ŝipo la portugaloj komencis jam fine de la 15-a jarcento.

Tiel mi jam ricevis la unuan baton. Tio promesas ja ĉarman vivon. Mi jam scias, kial kaj por kio. La sorto pretendas siajn rajtojn.

”La vespermanĝon alportas la subhejtisto de la rato-vaĉo.”

La dua bato. Nun mi ne plu kalkulos la batojn. Lasu ilin alveni kaj trafi. Faru dika vian felon.

Do la ratvaĉo². Tio ja antaŭvideblis. La vaĉo de tagmezo ĝis la deksesa aŭ de noktmezo ĝis la kvara, la plej malica vaĉo, kiun oni eltrovis por torturi maristojn. Je la deksesa oni venas de la vaĉo. Oni lavas sin. Poste oni alportas la vespermanĝon por la tuta bando. Poste oni lavas la manĝilaron por la tuta bando, ĉar mesbubo ja mankas kaj la subhejtistoj mem devas fari ĉion. Poste oni kuŝiĝas en sia litbenko. Ĉar oni ne ricevas plian manĝon ĝis la oka matene, sed en la nokto devas iri al la vaĉo kaj ne devas nur iri tien, sed labori kaj multe labori, tial necesas fervore vespermanĝi, ĉar alie oni kolapsus en la nokto. Sed kun plena stomako oni ne povas dormi. Kelkfoje ĝis la dudekdua ankaŭ la libervaĉuloj ankoraŭ sidas kaj ludas kartojn kaj babilas pri io. Ĉar ili ne havas alian lokon al kiu iri, ili do sidas ĉi tie. Oni ja ne povas malpermesi babili al ili, ĉar alie ili forgesus la lingvon, kaj ili ja jam parolas mallaŭte por ne ĝeni la dormantajn

2. ratvaĉo: tiu vortkombino ne estas marista slango, sed elpenŝaĵo de B. T. En la marista slango oni diras ”hunda vaĉo”.

kamaradojn. Sed la mallaŭta parolado ĝenas eĉ pli ol la laŭta. Je la dudektria oni komencas endormiĝi. Dudek minutojn antaŭ noktmezo sekvas la vekvoko: "Elen kaj suben!" Je la kvara oni venas de la vaĉo, lavas sin. Eble. Oni falas sur la litbenkon. Tridek minutojn antaŭ la sesa ekas jam la taga bruoj sur la ŝipo. Je la oka oni ŝiriĝas el la dormo: "Matenmanĝo!" Sur la ŝipo oni dum la tuta antaŭtagmezo martelas, najlas, segas, komandas. Dudek minutojn antaŭ tagmezo neniuj venas por vekoj, ĉar oni ja ne supozas, ke eblas dormi je tiu horo. Oni jam vekigis kaj komencas sian vaĉon. Kaj tiel plu, je la deksepa . . . kaj ĉiam tiel plu.

"Kiu lavas la manĝilaron, se ne estas mesbubo?"

"La subhejtisto."

"Kiu frotviŝas la latrinojn?"

"La subhejtisto."

Tio estas certe honorinda okupo, se oni ne devas fari ion aldonan. En tiu ĉi kazo estis porkaĵo. Kaj tiu, kiu vidus la latrinojn, dirus: "Tio estas la plej granda porkaĵo, kiun mi vidis kiam ajn en mia vivo aŭ en iu tranĉeo." Sed mi spertis, ke la porkoj estas puremaj bestoj kaj ne joton malpli puremaj ol ĉevaloj. Se mi metus kamparanon aŭ porkobrediston en mornan stalon, kiu estas longa kaj larĝa du paŝojn, tro nutrus kaj ne ellasus lin, kaj nur de tempo al tempo enĵetus kelkajn pajlotigojn kaj ne aŭ nur malofte elprenus la malnovan kaĉigitan pajlon, ĉar li ja

tiom bone fartas en la sterko, tiam mi volonte vidus kiel la kamparano aspektas en tiu stalo post du semajnoj, kaj kiu tiam estas la pli granda porkaĉo, la kamparano aŭ lia dika porketo? Ne zorgu, la venĝo pro ĉi tio sekvos kontraŭ la homoj, pro ĉio, kion la homoj krimis kontraŭ ĉevaloj, hundoj, porkoj, ranoj kaj birdoj. Por tio ili iam pli pentos ol pro tio, kion ili krimis kontraŭ siaj kunhomoj. Oni ne povas frotlavi latrinon, se oni tro lacas por meti la kuleron da rizo en la buŝon, ne, sinjoro.

Suna Hispanio, jen la puno ĉar mi forlasis vin, afabla gastigantino!

Sur bona ŝipeto estas naŭko; taglaboristo, kiu kvazaŭ kiel osta aldono kunveturas, kiu neniam tro laboras, kiu ĉiam ĉie estu por helpi ĉe la laboro, kiu ricevas la salajron de ferdeklaboristo kaj entute kaj plej ofte havas sufiĉe agrablan vivon. La naŭko estas la viro por ĉio. Kaj ĉion, kio mise iras, oni atribuas al la naŭko. Li kulpas ĉion. Se en la holdoj fajro ekbrulas, jen la naŭko kulpas, kvankam li neniam rajtas eniri la holdojn, sed li ne levis regule la holdolukojn. Se la kuiristo tro longe rostis la manĝon, tiel ke ĝi nigriĝis, jen oni spektaklas al la naŭko, kvankam li neniam rajtas eniri la kuirejon, sed li ŝraŭbis je la akvokranoj, kiam li purigis ilin. Se la ŝipo subakviĝas, jen la naŭko kulpas, ĉar li, tial ke . . . nu jes, pro tio, ke li estas la naŭko.

Sur Jorike la subhejtistoj estis la naŭkoj, kaj la plej granda naŭko el ĉiuj naŭkoj estis . . . vi prave divenis: la subhejtisto de la ratvaĉo. Se io kota, malagrabla, vivdanĝera estis farenda, la Unua Inĝeniero diris al la Dua, ke li faru tion. Tiu diris al la suboficiro, kaj tiu diris al la lubrikisto, kaj tiu diris al la hejtisto kaj la hejtisto diris: "Tio ne estas hejtistolaboro, jen afero por subhejtisto." Kaj la subhejtisto de la ratvaĉo faris, ĉar li devis fari.

Se la subhejtisto poste elvenis kun sangantaj kaj vundbatitaj kaj gratvunditaj kruroj kaj kovrita de dudek brulvundoj, kaj se oni devis eltiri lin je la kruroj, ĉar li alie brogiĝus, tiam la hejtisto iris al la lubrikisto kaj diris: "Mi faris ĝin." La lubrikisto al la suboficiro: "Mi faris." La suboficiro al la Dua Inĝeniero: "Mi faris." Kaj la Dua al la Unua, kaj la Unua Inĝeniero iris al la ĉefo kaj diris: "Mi deziras, ke oni raportu en la ŝipĵurnalo: 'La Unua Inĝeniero riparigis en vivdanĝero, dum la kaldronegoj restis plene prifajrataj, por ke la ŝiprapideco ne malpliĝu, tubodifekton de la unua grado. La ŝipo povis teni la plenan veturrapidecon.' " En la kompanio oni legas la ĵurnalon kaj la prezidanto diras: "Ni devas doni al la Unua Inĝeniero de Jorike pli grandan ŝipon, la viro meritis ion pli bonan." La subhejtisto ricevis la cikatrojn, kiuj restos al li por ĉiam, kaj li kripliĝis. Sed kial la subhejtisto devis fari? Ankaŭ li certe povis diri kiel la aliaj: "Tion mi ne faros, el tio mi ne elvenus viva." Sed tion li

ne povis diri. Li devis fari, nepre devis fari tion. ”Ja viro, ĉu vi volas, ke la tuta ŝipo sinku profunden, ke dronu tiel ĉiuj viaj kamaradoj? Ĉu via konscienco permesus tion?” La ferdeklaboristoj ja ne povis fari ĝin, ili sciis nenion pri kaldronegoj. Ankaŭ la subhejtisto sciis nenion pri kaldronegoj, li sciis nur kiel ŝoveli karbojn. La inĝeniero sciis ion pri kaldronegoj, pro tio oni ja pagis lin kiel Unuan Inĝenieron, ĉar li havas spertojn pri kaldronegoj kaj en siaj ekzamenoj devis fari tiajn riparojn. Sed la subhejtisto laboris antaŭ la kaldronegoj kaj apud la kaldronegoj kaj post la kaldronegoj, kaj li estis la subhejtisto, kaj li estis la viro, kiu ne volis respondi la morton de tiom da homoj, eĉ, se lia propra vivo pro tio finiĝos en rubaĵa barelo. La vivo de kota subhejtisto ne estas vivo, neniuj konsideras ĝin kiel vivo. Li mortas kaj finite, ni ne parolu pri tio. Muŝon oni ja eble elfiŝas el la lakto kaj donacas al ĝi la etan vivon, sed subhejtisto ne samrangas al muŝo. La subhejtisto estas koto, polvo, viŝĉifono; li ĝuste ankoraŭ sufiĉe taŭgas por ŝoveli karbojn.

”Subhejtisto, hej!” vokas la Unua Inĝeniero. ”Ĉu vi volas trinki rumon?”

”Jes, ĉefo.”

Sed la brandoglaso elfalas el lia mano, la rumo perdiĝas. La mano estas brogita, jes, sinjoro.

La vespermanĝo kuŝis sur la tablo. Mi malsatiĝis intertempe kaj pensis, ke konvenus manĝi ion. Tio estis

mia intenco. Sed havi intencon kaj realigi intencon, tio estas du aferoj. Mi ĉirkaŭrigardis pro telero kaj kulero.

”Lasu stari la teleron, tiu estas la mia.”

”Nu, de kie mi do prenu teleron?”

”Se vi ne kunportis iun, jen vi certe devos vivi sen telero.”

”Ĉu oni ĉi tie vere ne disponigas manĝilaron?”

”Nur tion, kion vi mem havas, vi povas disponigi al vi.”

”Kiel mi do manĝu sen telero, sen forko, sen kulero?”

”Via afero.”

”Aŭskultu, novulo,” iu vokis el sia litbenko, ”vi povas havi mian teleron, mian tason kaj mian manĝilaron. Sed tiukaze vi ĉiufoje devos purigi ĝin.”

Jen iu estis, kiu havis nur rompitan teleron, sed ne tason; alia havis forkon, sed ne kuleron. Se nun la manĝo alvenis en la kajuto, ĉiufoje unue ekestis kverelo pri tio, kiu rajtas la unua uzi la kuleron aŭ la tason aŭ la teleron; ĉar tiu, kiu rajtis uzi la unua la teleron aŭ la kuleron, kompreneble elfiŝis la plej bonajn pecojn. Neniu riproĉu tion.

Tio, kio nomiĝis teo, estis varmega bruna akvo. Ofte ĝi ne varmegis, sed varmetis. Tion, kio nomiĝis kafo, oni disdonis je matenmanĝo kaj je la tria. Tiun kafon je la tria mi vidis neniam. La kialo: ratvaĉo. De tagmezo ĝis la dekseka mi vaĉis. Je la dekkvina oni disdonis la kafon.

Je la deksesaj, kiam mia posteulo anstataŭis min, postrestis eĉ ne guto de tiu kafo. Kelkfoje ankoraŭ estis varmega akvo en la kuirejo, sed se oni ne havis proprajn kafograjnojn, oni ne povis prepari kafon.

Ju pli kafo aŭ teo diferencas disde aŭtentika kafo aŭ teo, des pli oni sentas la bezonon plibeligi ilin per sukero kaj lakto, por tiel stimuli la fantazion. Ĉiun trian semajnon ĉiu viro ricevis malgrandan ladskatolon kun kondensita kaj sukerita lakto kaj ĉiun semajnon pundon da sukero; ĉar la kafo kaj la teo el la kuirejo alvenis pura, do sen lakto kaj sukero.

Kiam oni ricevis la lakton, oni malfermis la ladskatolon kaj kiel ŝparema homo elprenis kuleretplendon, por doni nubeton al la teo. Poste oni zorgeme formetis sian ladskatolon, por uzi ĝin nur ĉe la venonta kafo. Sed dume oni vaĉis, la aliaj ne ŝtelis la ladskatolon, sed forkonsumis ĝin ĝis la lasta resto. Ĉar oni plej facile malkovras la plej sekurajn kaŝlokojn, tio okazis nur je la unua fojo al mi, ke mia lakto malaperis. Kiam mi ricevis la duan fojon mian lakton, mi tuj per unu fojo elkuleris ĝin, ĉar tio estis la sola metodo por savi miajn porciojn, jen la metodo, kiun ĉiuj uzis.

Kun la pundo da sukero oni faris precize la samon, oni tuj post la ricevo manĝis ĝin sen enmeto de paŭzo. Foje ni sukcesis interkonsenti. La sukero de la tuta kajuto estis ŝutita en komunan skatolon, kaj ĉiu elprenu por

si kulerplenon, kiam la kafo aŭ la teo alvenos. La sekvo de tiu interkonsento estis, ke la tuta sukero en la dua tago jam malaperis kaj nur vaka skatolo algapis min.

Freŝan panon ni ricevis ĉiutage. Kaj ĉiun semajnon la kajutanoj ricevis skatolon da margarino, kiu kvante sufiĉis. Sed neniuj povis manĝi ĝin, ĉar ŝmirsapo pli bone gustis.

En tagoj, dum kiuj ni devis bridigi la langon kaj fermi la okulojn, ĉiu viro ricevis du glasojn da rumo kaj je duono plenigitan tason da marmelado. Tio estis la tagoj, kiam mistera varo alvenis kaj foriris.

Matenmanĝe ni ricevis hordean supon kun prunoj aŭ rizon kun sangokolbaso aŭ terpomojn kaj haringojn aŭ nigrajn fabojn kaj salitajn fiŝojn. Ĉiun kvaran tagon la tuta vico rekomenciĝis per hordea supo kun prunoj.

Dimanĉe tagmeze ni ricevis bovaĵon kun mustarda saŭco aŭ spicitan bovaĵon kun akvobuljono, lunde salitan viandon, kiun neniam iu manĝis, ĉar ĝi konsistis nur el salo kaj lardohaŭto, marde sekigitan salfiŝon, merkrede sekajn legomojn kaj bakitajn prunojn en blue akveca mukokaĉo el terpoma amelo. La mukaĵon oni nomis pudingo. Ĵaŭde la vico komenciĝis denove per salvando, kiun neniam iu manĝis.

La vespermanĝo estis unu el la nomitaj matenmanĝoj aŭ tagmanĝoj. Ĉiun manĝon akompanis ŝelkuiritaj terpomoj el kiuj nur duono uzeblis. La ŝipestro neniam

aĉetis terpomojn. Oni prenis ilin el la kargo, se ni transportis sudterpomojn. Tiom longe, kiom la terpomoj estis novaj kaj junaj, ili ĝojigis nin kaj estis frandaĵoj, sed se ni dum longa tempo ne transportis terpomojn, jen venis la vico de tiuj, pri kiuj mi parolis.

Kiel kamuflan kargon ni transportis de tempo al tempo ne nur terpomojn, sed ankaŭ tomatojn, bananojn, ananasojn, daktilojn, kokosojn. Sole tiuj kargoj ebligis al ni transvivi tiun manĝon kaj ne mortaĉi pro manĝonaŭzo. Kiu partoprenis mondmiliton, eble lernis, kion homo povas elteni sen mortaĉi, sed kiu veturis sur originala mortula ŝipo kaj sur originala kontrabandŝipeto, tute certe scias, kiom da suferoj homo povas elteni. Tre rapide oni dekutimiĝas de ĉia naŭziĝo.

La manĝilaro, tiel ofere me proponita al mi por la uzo, ne tute kompletis, ĝi konsistis el nura telero. Kiam mi jam arigis la necesan manĝilaron, mi uzis la forkon de Stanislav, la tason de Fernando, la tranĉilon de Ruben, kaj kuleron mi estus ricevinta de Hermann, sed kuleron mi mem posedis. Pro tiu oferemo mi devis purigi la manĝilaron de ĉiuj ĝis ĝi brilas, dufoje po ĉiu manĝo. Unue transpreninte ĝin, kaj poste mem uzinte ĝin.

Kiam la vespermanĝo pasis, mi devis purigi la gamelejojn, do la klabitajn lavpelvojn, en kiuj oni alportis la manĝon el la kuirejo. Por tiu lavado nek mi nek kiu ajn bezonis sapon, sodon aŭ broson, ĉar tiaj aĵoj ne ekzistis.

Kiel la gameloj aspektis, kiam oni denove enŝutis iun manĝon, mi ne devas rakonti.

En tiu koto mi ne povis vivi. Mi entreprenis viŝi la kajuton. La uloj post la manĝo falis sur siajn litbenkojn kvazaŭ mortaj. Dum la manĝo oni preskaŭ ne parolis ion. Estis kvazaŭ porkoj staras ĉe trogo. Post tri tagoj mi ne plu pensis pri tiu komparo. La kapabloj kompari ion aŭ reveki klarajn memorojn el pli frua vivo, jam estingigis.

”Sapon oni ne provizas,” oni vokis grumble al mi el litbenko.

”Ankaŭ ne lavbrosojn aŭ brosojn aliajn. Kaj nun finu viajn manipulojn, ni volas dormi.”

Tuj mi kuris mezŝipe al la inĝeniera kabineto, kie mi frapis.

”Mi volas viŝi la kajuton kaj postulas sapon kaj fortan frotribron.”

”Kion vi pensas pri mi? Vi ja ne eble volas diri, ke mi devas aĉeti sapon aŭ brosojn por vi? Tute neeble.”

”Bone, sed nun mi mem. Mi ne havas sapon por mi mem. Kaj mi ja laboru antaŭ la kaldronegoj.” Mi tamen scivolis, ĉu mi vere ne ricevos sapon.

”Tio estas via propra afero. Se vi volas lavi vin, vi devas havi sapon. Sapo apartenas al laŭorda ekipaĵo de maristo.”

”Povas esti, sed tio estas nova por mi. La tualetsapon jes, sed ne la laborsapon, kaj por la kaldronobando la inĝeniero devas disponigi la sapon, aŭ la ŝipestro aŭ la kompanio. Estas indiferente al mi, kiu devas disponigi la sapon. Sed mi volas havi sapon. Cetere, kia porkaĵo tio estas? Sur ĉiu honesta kesto oni disponigas la necesan, matracon, kusenon, littukon, kovrilon, mantukon, laborsapon kaj antaŭ ĉio alia manĝilaron. Tio apartenas al la ekipaĵo de la ŝipo kaj ne al tiu de la maristo.”

”Ne ĉi tie. Se ne plaĉas al vi, vi povas ja foriri.”

”Impertinenta kanajlo vi estas.”

”For el mia kabineto aŭ mi raportos vin al la ŝipestro, por ke tiu katenigu vin.”

”Tio ne ĝenus min.”

”Ne okazos tiel, kiel vi pensas, viro. Tiel ebriaj ni ne estas. Mi bezonas la subhejtiston. Ne, mi katenigos vin pere de tuta monata salajro, se vi tiel provokos min ankoraŭfoje.”

”Vi estas veraj ĝentlemanoj, tion mi devas diri. Eĉ la groŝojn vi ŝtelas.”

La fripono sidis kaj rikanis. Pugnobataloj neniam havas kontentigan rezulton, kaj tiukaze li ŝtelus de mi eĉ du monatajn salajrojn.

”Rakontu tion, mi petas, al via praavino,” li diris, ”ŝi trankvile aŭskultos tion. Sed ne mi. Eksteren nun! Kaj

rapide. Antaŭen al la litbenko, je la dudektria via vaĉo komencos.”

”Mia vaĉo komenciĝos noktomeze. Noktomeze ĝis la kvara.”

”Ne ĉe ni kaj ne por subhejtistoj. La subhejtistoj komencas je la dekunua aŭ dudektria, ili eligas cindron de la dekunua ĝis tagmezo aŭ de la dudektria ĝis noktmezo, kaj je tagmezo aŭ je noktomezo komenciĝas la laborvaĉo.”

”Do, la horo antaŭ tagmezo aŭ noktmezo ne estas labortempo, ĉu?”

”La cindron la subhejtistoj ĉe ni devas eligi aldone.”

”Sed kromhoroj estas alkalkulataj, ĉu?”

”Ne ĉe ni, kaj ne por la eligo de la cindro.”

Mi demandis min, en kiu jarcento mi vivas. Inter kian homan specon mi falis? Kiel ebriulo mi ŝanceliĝis al la kajuto.

Jen estis la maro, la blua belega maro, kiun mi tiel pasie amis, ke la penso droni kiel honesta maristo en ĝi, neniam terurigas min. Tio ja estas la granda solena gedziĝo kun la ino, kiu tiom kapricas, kiu tiel kolere povas furiozi, kiu havas tian grandiozan temperamenton, kiu povas ridi tiel fascine kaj povas kanti tiajn ravajn lulkantojn, kaj kiu tiel mirinde belas, aĥ, tiel supermezure belas.

Ĝi estis la sama maro, sur kiu veturis miloj kaj miloj da honestaj kaj sanaj ŝipoj. Kaj nun la sorto elektis min por veturi ŝipon, kiu malsaniĝis je lepro, kaj kiu nun veturis plu nur pro la espero, ke la maro kompatu. Sed la impresoj trudis sin al mi, mi sentis tion, ke la maro ne volas akcepti la leproŝipon, por ke ĝi ne mem pestiĝu. Ankoraŭ ne. Ĝia tempo ankoraŭ ne alvenis. Ankoraŭ la maro atendis, ankoraŭ la maro esperis, ke ĝi ne devos toleri tiun peston, ke tiu mara absceso ie surtere aŭ en iu putranta angula haveno diskrevos kaj pereos. Ankoraŭ ne venis la tempo por Jorike. Mi ankoraŭ ne antaŭsentis la morton, ĉe mia litbenko la gasto ankoraŭ ne frapis. Sed estas vere, kiam mi nun staris ĉe la balustrado, kaj super mi estis la brilantaj steloj de la ĉielo kaj antaŭ mi la verde briletanta maro, kaj kiam mi pensis pri mia perdita Nov-Orleano kaj pri mia suna Hispanio, jen la tento atakis min: Hop! Saltu maren, bubo, fuŝu al ili la plezuron pro la subhejtisto, faru rapidan glatan finon, por ke vi ne tute perdu vin. Sed poste ja nur alia kompatinda, laca, ĉifonvestita, eterne malsata, malpura kaj ĉasata subhejtisto devus transpreni ankaŭ mian vaĉon, kaj tial li farus tiel neeltenebla al mi la lastan vojaĝon, ke mi devus naĝi denove kaj denove al la surfaco de la maro.

Ho ne, ĉe ĉiuj diabloj en la infero, kunmordu la dentojn kaj pripisu ilin. Vin, kara amiko, Jorike ne povas

venki. Ne la konsuloj. Ne Jorike. Ne la poŝoŝtelisto. Vi estas ja el Nov-Orleano, bubo. Ensaltu en la merdon kaj tranaĝu! Iam tempo kun akvo kaj sapo revenos. La fetoro estas nur ekstera. Hop! Ke ŝprucu!

For de la balustrado, kaj al la bestaĉo, kiu volas venki vin, draŝu pugnon inter la dentojn! Kraĉu plian fojon maren, kaj nun antaŭen al la litbenko!

Kiam mi foriris de la balustrado, mi sciis efektive, ke mi troviĝas sur mortula ŝipo kaj sur trompkesto, sed mi ankaŭ sciis, ke ne plu estas mia mortula ŝipo. Sur Jorike mi ne helpas enspezi la asekurmonon. Sur ĝi mi ne fariĝos gladiatoro. Mi kraĉas sur vian vizaĝon, Cezaro Aŭgusto Imperiestro. Ŝparu vian sapon kaj voru ĝin, mi ne plu bezonas sapon. Sed vi ne vidos min lamenti denove. Mi kraĉas sur vian vizaĝon, al vi kaj al viaj kanaj-laj idoj.³

3. Tiu "eksploda" punkto, kiel la esploristo Heiner Böhnke nomas tion, la ekribela punkto estas unu el la esencaj temoj en la verkoj de Traven. Gustav Landauer, mortpafita en 1919 (vidu pri li en 12/4) skribis pri tio en sia plej konata verko "Alvoko al socialismo": "Neniu 'pura koncepto' (ankaŭ ne la marksisma) povas anstataŭigi la travivaĵojn, en kiuj individuo spertas sin sen sekurecoj kaj ligoj kaj malesperiĝas 'pro certa kaŭzo kaj frenezo kaj vera mizero'." La ekribela momento estas pli ol nura racia konkludo el soci-kritika pensado, ĝi estas la pasia ekkrio de turmentata animo, kiu ne plu pretas toleri tion, kio ne tolereblas.

Ĉapitro 28

Endormiĝi mi ne povis. Mi kuŝis sur la nudaj tabuloj de mia litbenko kiel arestita fripono sur la nuda kuŝbenko en policejo. La fulganta petrola lampo pleniĝis la ĉambron per tia fuma aero, ke la spirado fariĝis turmento. Ĉar mi ja ne havis kovrilon, mi sentis la froston. La noktoj surmare povas iĝi diable fridaj. Ĝuste kiam mi falis en facilan dormon, fortaj kaj senpaciencaj manoj subite min tiel skuis kaj puŝis, kvazaŭ oni volus ĵeti min tra la vando.

”Eliĝu. Duono antaŭ la dudektria.”

”Ankoraŭ duono? Kial vi ne venas kvaronon antaŭe?”

”Mi ĝuste nun estas supre, ĉar mi alportas la trinkakvon por la hejtisto. Mi ne povas denove veni supren. Vi devas eliĝi. Dek minutojn antaŭ la noktmezo vi vekos la hejtiston kaj alportos la kafon por li.”

”Tiun mi ne konas, ne scias lian litbenkon.”

”Elvenu, mi montros al vi.”

Mi ekstaris kaj li montris la litbenkon de la hejtisto, kiu apartenis al mia vaĉo.

”Faru, rapidu. Iru tuj al la cindrovinĉo. Damne, ni havas monton da cindro.” La viro malaperis kiel fantomo.

La kajuto estis preskaŭ senluma, ĉar la lampo ne donis lumon.

Ĉe la lumo de rompita, malgranda kaj fulge nigrigita lanterno la subhejtisto de la antaŭvaĉo, Stanislav¹, montis al mi kiel manipuli la vinĉon.

”Aŭskultu, Stanislav, tion mi ne komprenas,” mi diris. ”Ja ankaŭ mi scias iom pri ŝipoj kun dika salhaŭto, sed tion mi neniam spertis ĝis nun, ke la subhejtistoj estas punitaj per aldonaj vaĉaj horoj. Kial?”

”Mi ja scias. Ankaŭ mi ne ĵus elrampis el la vindaĵoj. Sur aliaj ŝipoj la hejtisto devas helpi eligi la cindron. Sed ĉi tie la hejtisto sola ja neniam povus fini ĝustatempe la laboron, kaj se la subhejtisto ne helpas de tempo al tempo, la premo kun fanfaroj tuj falas ĝis centdudek, kaj la kesto eksinkas kiel sako kaj ekstaras kiel rudro ofendita. Sur aliaj ovokestoĵoj, eĉ se estas ĉerkoj, la vaĉo havas du hejtistojn aŭ almenaŭ unu hejtiston kaj plian duone.

1. Stanislav: Hal Croves, plia pseŭdonimo de B. Traven, de la ”komisiito” de B. T., kiel li nomas sin mem, en intervjuo rimarkis: ”Sed estas ankoraŭ io plia, ankoraŭ pli inter la linioj. La usona maristo ne estas la vere grava figuro. La plej grava persono estas Stanislav. Li perdis pro milito la hejmlandon. Ne estis lia kulpo. Li eĉ ne estis soldato.” Kaj en la sama intervjuo: ”Jes, Stanislav estis reala persono.”

Sed mi pensas, ke vi jam scias, kie vi troviĝas, marista anĝeleto mia.”

”Mi ne anĝelos. Vi povas veti pri tio, fidu tion.”

”Ĉu vi volas elsalti pobe? Tio ne sukcesos. Tion vi ankoraŭ lernos. Do prefere tuj ĵetu en la lanon vin kaj elserĉu por vi la savboaton, per kiu vi povas fuĝi. La kuiristo ĉi tie estas la avo. Li rakontos al vi ĉion necesan, se vi plektos bonan fadenon kune kun li. Tiu hundo stivis du jakojn en sia litbenko.”

”Ĉu ni sekve ne havas savjakojn?” mi demandis mirigite.

”Eĉ savringo ne ekzistas, nur kvar dekoraciaj ringoj kun orobronzo. Sed mi konsilas al vi, prenu nenium el ili. Se vi tie traŝovu vian kapon, prefere prenu muelŝtonon. Kun la muelŝtono vi eble povas esperi, sed kun la dekoraciaj kolbasoj neniam.”

”Kiel la hundo povas fari tion? Jen ja en ĉiu litbenko devas troviĝi savjako. Mi estas tiel kutimiginta al tio, ke mi tute ne rimarkis, ke la savjakoj mankas.”

Stanislav ridis kaj diris: ”Tian ĉerkon vi ne veturis ĝis nun. Tial. Sed por mi Jorike estas jam la kvara mortula ĉerko. Tiujn oni ja nun povas elserĉi.”

”Hej-ho, Lavski!” lia hejtisto kriis supren tra la cindroŝakto.

”Kio estas, hejtisto?” Stanislav demandis al la profundo.

”Ĉu vi hodiaŭ ne levas la cindron, aŭ kiel?” la hejtisto blekis supren. Estis Martin.

”Kompreneble ni levos. Sed mi ja devas instrui la novulon. Tiu ankoraŭ ne konas la vinĉon.”

”Jen rapidu kaj venu malsupren. Ĵus krado elfalis.” La hejtisto suprenkriis.

”Unue ni devas levi la cindron. La krado povas atendi. Mi devas instrui la novulon,” Stanislav denove kriis profunden.

”Nu, se temas pri mortulaj ĉerkoj . . . kiun nomon vi cetere havas, novulo?”

”Mi? Pippip².”

”Beleta nomo. Ĉu vi estas turko?”

”Egipto.”

”Tio konvenas. Egipto mankis. Ni havas ĉi tie ĉiujn naciojn sur la kesto.”

”Ĉiujn? Ankaŭ usonanojn?”

”Mi supozas, ke vi dormas ankoraŭ. La solaj, kiuj neniam veturus sur mortula ĉerko, estas usonanoj kaj komsoj.”

2. Pippip: Se oni frapadas en Germanio la montrofigron al la frunto kaj diras al alia: ”pipip”, oni celas esprimi, ”vi ja havas birdon”, kio signifas: ”Vi estas ja vere freneza.” Tia dadaisma varianto de nomdono troviĝas ankaŭ en ĉapitro dek, tie kie temas pri la konsulo Mr. Grgrgrgs. En la postlasaĵo de B. T. troviĝis la ”Dada-almanako” el la jaro 1920 kaj la kajero ”Vingt-cinq poemes” de Tristan Tzara kun manskriba dediĉo.

”Komsoj?”

”Ha, ne ŝajnu vin tiel naiva, vi ŝafo. Bolŝoj. Komunistoj. Usonanoj ne venas, ĉar ili mizere mortus en la koto en la unua tago, kaj ĉar ili ankaŭ ĉiufoje trovas helpon ĉe siaj konsuloj. La konsuloj jam flustras al ili la veron pri tiuj kestoj.”

”Kaj la komsoj?”

”Tiuj tro ruzas, tiuj flaras jam, pri kio temas, se ili vidas nur la mastpinton. Vi povas fidi tion. Tiuj lertas kaj spertas. Tie, kie aŭtentika komso kunveturas, asekuro ne havas ŝancon. Tiuj entombigas ĉiun asekuron, kiom ajn fajne ĝi estas sukerita. Ili havas flarnazojn, kontraŭ ili ni ĉiuj ne povas konkuri. Kaj ili havas ankaŭ tuj la plej belan fulmotondron kun la inspektistoj. Sed nun mi povas rakonti al vi ankaŭ tion, se ie veturas sana ŝipo, kie ne nur usonanoj kunveturas, sed ankaŭ usonanoj, kiuj estas komsoj, amiko mia, tio estas mielo. Tio estas . . . Mi ja povas diri al vi, mi veturas ja nur por iam povi veturi sur tia ŝipo. Tian ŝipon mi neniam forlasus. Tie mi eĉ kiel naŭko laborus. Estus tute egale al mi. Se vi eble iam vidus keston el Nov-Orleano, aŭ de ie tie. Tio estas interesa afero.”

”Tian ŝipon mi ne vidis ĝis nun,” mi diris.

”Tian vi neniam veturos, eĉ se vi havus cent jarojn kaj ĉiuj forlasis la ŝipon. Ne vi. Egipto tute ne, eĉ se li havus pasporton el sukero. Nun ankaŭ mi ne plu havas ŝan-

con. Tiu, kiu veturis sur Jorike, neniam plu revenos sur sanan ŝipon. Sed nun ni eklaboru.”

”Ĉu ĝi pendas firme?” Stanislav kriis en la ŝakton.

”Eklevu!”

Stanislav puŝis la baskulilon antaŭen, kaj la cindro-kruĉo moviĝis kun ĉena tintado supren. Kiam ĝi troviĝis en la alteco, kie oni povas atingi ĝin permane, li retiris rapide la baskulilon al la alia flanko. La kruĉo saltetis ankoraŭfoje supren kaj ankoraŭfoje malsupren kaj tiam pendis en la ŝaktluko.

”Nun elkroĉu kaj portu ĝin al la balustrado kaj elŝutu ĝin maren. Sed bone atentu, por ke la kruĉo ne falu en la maron. Jen ni havus la kaĉon kaj devus labori per unu kruĉo, tiukaze ni rajtos du horojn pli frue ellitiĝi. Sciu tion.”

La kruĉo arde varmegis, kaj supre de ĝi kuŝis la ruĝe ardantaj skoriaj pecoj. Mi apenaŭ povis tuŝi ĝin, sed mi devis. Kaj peza la kruĉo estis. Certe kvindek kilogramojn. Nun mi devis porti antaŭbruste la kruĉon rekte trans la ferdekvojon, kiu larĝis kvar metrojn, kaj mi devis ŝuti ĝin en la lignan ŝakton, tra kiu la cindro falis en la maron kaj tie sible malaperis. Tiam mi reportis la kruĉon kaj kroĉis ĝin denove en la levĉenojn.

”Tio estas tute klara, kial la savjako perdiĝis. Mi certas, ke la ŝipestro vendis ilin, por havi aldonan enspezon,” diris Stanislav. ”Sed li faris tion ne nur por vendi

ion. Atentu, se ne estas savjakoĵoj, jen ne venos atestantoj antaŭ la maristan tribunalon. Ĉu vi nun gustas la cinaĵon? Atestantoj neniam vere fidindas. Kelkfoje ili tamen ion vidis aŭ rimarkis, kaj ankaŭ la asekurkompanioj ĉiuforte tuj sekvas kaj kaptas la trompulojn. La boatojn vi devas foje rigardi ĉe taglumo . . . kiel vi diris, ke vi nomiĝas? Jes, rigardu ĉe taglumo la boatojn, Pippip. Tie vi povas traĵeti viajn botojn. Kaj glate! Estus eĉ malpli da atestantoj.”

”Nu, ne rakontu marfabelojn, ĉu ne?” mi kontraŭdiris. Ja ankaŭ la ŝipestro volas forlasi la ŝipon.”

”Ne maltrankviliĝu pro la ŝipestro. Pensu unue pri via haŭto. La ŝipestro certe iel elvenos. Se vi scios ĉion tiel bone kiel vi scias tion, nenio plu mankos al vi.”

”Sed vi ja jam eskapis el tri mortulaj ĉerkoj, ĉu ne veras?”

”El du mi vere eliris kaj kiel vera amiko de la lasta haveno ne forlasis ĝin. Kaj el la tria . . . sed vi azeno, ankaŭ feliĉon vi bezonas. Se vi ne havas feliĉon, tiukaze eĉ ne proksimiĝu al la akvo, alie vi falus en lavpelson kaj neniam plu elvenus.”

”Lavski! Hej! Kio okazas tie supre?” la hejtisto nun denove kriis el la profundo.

”La ĉenoj malkroĉis sin, fulmotondro!” Stanislav blekis malsupren.

”La cindro eĉ morgaŭ ne estos supre, se vi tiel plu laboros,” la voĉo denove vokis el la profundo.

”Do, provu foje la vinĉon, sed memgardu, ĝi batas ĉirkaŭ si kiel sovaĝa ĉevalo. Ĝi glate dehakos vian kranion, se vi songas dum sekundo.”

La peza kruĉo suprenvenis kaj tie tondris sur la kovrilon, tiel, ke mi pensis, ke ĝi frakastos la tutan ŝakton en mil pecojn, sed antaŭ ol mi repuŝis la baskulilon, la vinĉo mem puŝis ĝin al la kontraŭa flanko, kaj la sitelo ree sagis malsupren en la ŝakton. Tie malsupre ĝi trafis la plankon kun terura bruoj, la skorioj ŝprucis ĉirkaŭen, la hejtisto kriis kiel frenezulo, kaj en la sama momento la baskula efiko ekfunkciis plian fojon, kaj la kruĉo, nun duonplena, je dua fojo pafiĝis furioze kontraŭ la ŝaktokovrilon, ĉirkaŭbatis tie kun tondraj krakoj kaj la skorioj falis kun terura bruoj en la ŝakton. Batante, falante kontraŭ la fervandojn de la ŝakto, ili tiom pliigis la tamburadon kaj la ĉentintadon, ke oni povus kredi la tutan ŝipon displitiĝanta. La kruĉo jam denove ekfulmis malsupren, sed Stanislav nun interrompe kaptis la baskulilon. Tuj la kruĉo tiel obeeme haltis, kvazaŭ ĝi estus morta estaĵo.

”Nu, diris Stanislav, tiel simple tio ne estas. Tion oni devas lerni. Jen vi bezonos du semajnojn, ĝis kiam vi regos la trukon. Prefere iru malsupren kaj enŝovelu, tiam mi transprenos la vinĉon. Mi montros tion al vi morgaŭ tagmeze, en taglumo, tiam jam pli bone sukcesos al vi.

Se la vinĉo adiaŭos nin, tiam ni povos levi la cindron per la manoj. Kaj tion mi deziras nek al vi nek al ni. Jen ni nek iros nek rampos, jen ni jam nur ruliĝos de loko al loko.”

”Lasu min provi plian fojon, Lavski. Mi volas diri Sinjorina Moŝto al ŝi. Eble ŝi tiam obeos min.” Poste mi vokis malsupren: ”Kroĉu ĝin!”

”Eklevu!” krio respondis.

”Nu, Grafina Moŝto, ĉu vi nun emas?”

Mahometo atestas, ke ŝi faris ĝin, ŝi faris ĝin tiel tene-re, tiel delikate. Ŝi ekhaltis milimetroprecize. Mi kredas, ke mi konis Jorike pli bone ol la ŝipestro aŭ la avo. La vinĉo apartenis al tiuj partoj de la ŝipo, kiuj jam kunro-lis en la arkeo de Noa kaj jam devenis el la tempo antaŭ la diluvo. En tiu ĉi vaporvinĉo kunestis ĉiuj koboldoj kaj spiritoj³, kiuj ne trovis lokon en la ceteraj anguloj kaj kaŝejoj de Jorike, ĉar ili estis tro multnombraj. Kaj pro tio la vinĉo havis sian personecon, kiu postulis respek-ton. Stanislav atingis la respekton per longe spertiĝinta mano, mi devis fari tion per vortoj.

”Via Reĝina Moŝto, ankoraŭfoje, mi petas.”

3. koboldoj kaj spiritoj: estas multaj en la historio de ŝipoj, la plej konata estas la bona nano kun la fajre ruĝa vizaĝo kaj blanka barbo, en maristaj vestoj, kiu nokte fermŝtopas likantajn ŝiptruojn kaj avertas pri proksimaj ŝipkatastrofoj. Kutime li sidas sub la ankrovinĉo. Sed se ŝtormas, li vaĉas ĉe la masto.

Jen, plian fojon la cindrokruĉo glitis kvazaŭ karesite per veluraj manoj. Sed kompreneble, sufiĉe ofte ŝi plu petolis kaj faris displitiĝajn efektojn, sed nur, se mi forgesis ĝentile trakti ŝin. Estis foje kaj foje sufiĉe amuzaj kaptomanovroj, kiujn mi devis entrepreni, por haltigi la supren-malsupren sagantan ujon. Jen ĝi trasagis supre, jen ĝi sagis malsupren kaj tuj denove alten. Se oni ne precize, do tute precize tenis la baskulilon, ekis la kontraŭa efiko.

Stanislav iris malsupren, ŝovelis en la kruĉojn kaj poste ĉiufoje vokis: Eklevu! Kaj mi kroĉis aŭ malkroĉis la kruĉojn, portis ilin arde varmegaj, tiaj, kiaj ili estis, trans la ferdekojn kaj elŝutis la cindron en la ŝakton.

Kiam kvindek kruĉoj estis levitaj, Stanislav kriis, ke ni lasu la reston por la sekvanta vaĉo, ĉar jam tro malfruas. Mi pensis, ke mi nun renversiĝos pro tiu spirraba portado de la nekredeble pezaj kruĉoj. Sed antaŭ ol mi havis la okazon renversiĝi, Stanislav kriis supren: "Hej, rapidu, dudek minutojn ĝis noktmezo."

Mi trenis mian korpon al la kajuto. La ferdeko ne estis lumigata, por ŝpari la petrolon; kaj mi vundbatis kvarfoje miajn tibiojn, antaŭ ol mi venis al la antaŭferdeko. Tio, kio kuŝis sur la ferdeko, estas precize priskribbla nur per tio, ke mi diras: Tie ĉio kuŝis sur la ferdeko. Ĉio, kion la terglobo estigas aŭ iam estigis. Parto de tiu ĉio estis altgrade ebria ŝipĉarpentisto, la ĉarpentisto

de Jorike, kiu en ĉiu haveno drinkis kiel porko kaj dum la unua tago de ĉiu veturo uzeblis eĉ ne kiel balaila stango. La ŝipestro jam ĝojis, se la rudristoj ne ĉiam akompanis lin kaj ankoraŭ almenaŭ unu rudristo retenis tiom da vivo por povi stari ĉe la rudro. Al la ĉarpentisto, al la tri rudristoj kaj al kelkaj pliaj oni senzorge estus povinta doni savjakojn. Ili ne estus fuŝintaj la asekurpolison, male, ili savintus la plej dubindan polison sen konscii, kion oni postulas de ili. Ili ankaŭ havis la plej bonan ŝancon kuniri sur la boaton n-ro unu, kiun la ŝipestro bezonis por savi la bone flegatan ŝipĵurnalon kaj konservi la licencon kaj gajni premion pro deĵora fervoro spite al vivdanĝero.

Nun mi devis preni la kafokruĉon, devis iri kun ĝi al la kuirejo, kie la kafo staris sur la fornelo, kaj devis pleni ĝin. Tiam mi devis trairi trian fojon la senluman ferdekon. Miaj tibioj sangis horore. Sed kompreneble ne estis hejmapoteko sur la ŝipo, kaj se la Unua Oficiro efektive kaŝe retenis ion por la unua helpo, mi tamen ne povis molesti lin pro tiaj bagateloj.

Nun mi atakis mian hejtiston, por veki lin. Li intencis murdi min, ĉar mi aŭdacis lin jam veki. Kaj kiam la sonorilo vokis kaj li jam ne povis gluti la varmegan kafon, li volis murdi min la duan fojon, ĉar mi vekis lin tro malfrue. Kvereli estas disipi fortojn. Nur azenoj kverelas. Diru vian opinion, se vi vere havas iun, kio ja sufiĉe mal-

ofte okazas, kaj poste fermu vian babiltruon kaj lasu paroli la alian ĝis liaj makzeloj saltas el la kardinoj. Ĉiam jesu la opinion de la alia, kaj se li tiam finis kaj eĉ pepi ne plu povas, kaj demandas vin "Nu, ĉu mi ne pravas?" tiam memorigu lin tute pretere pri tio, ke vi jam antaŭ longe diris vian opinion al li, kaj ke li pri ĉio alia certe pravas. Veki nur dum semajno la hejtiston de la ratvaĉo malebligas por jaroj kompreni politikon.

La kafo varmegis, nigris kaj amaris. Neniu sukero, ne-niu lakto. Pano estis, sed oni devis manĝi ĝin seka, ĉar la margarino feteris. La hejtisto venis al la tablo, falis sur la benkon, rektiĝis, kaj kiam li volis konduki la kafotason al la buŝo, lia kapo falis malsupren sur la tason, tiel, ke ĝi renversiĝis. Li jam denove dormis kaj palpis sonĝeme la panon por deŝiri pecon, ĉar li pro laco ne povis teni la tranĉilon. Ĉiujn siajn movojn li faris per la tuta korpo, ne nur per la manoj, la brakoj, la fingroj, la lipoj aŭ la kapo. La sonorilo vokis, li eksplodis kolere, pro la kafo, kaj li diris: "Iru malsupren, mi tuj venos. Zorgu pri la skoria akvo."

Kiam mi preterpasis la kuirejon, mi tie vidis Stanisla-von fari manipuladojn en la malhelo. Li provis ŝteli sapon, kiun la kuiristo eble ie kaŝis. La kuiristo ŝtelis la sapon de la stevardo, kaj la stevardo ŝtelis la sapon el la kofro de la ŝipestro.

”Montru foje la vojon malsupren *to the stokehold*, al la kaldronejo, Lavski,” mi diris al li.

Li elvenis kaj ni devis grimpi sur pli altan etaĝon, kiu estis la interferdeko de la mezŝipo. Li montris al mi nigran ŝakton: ”Jen la eskaloj malsupren. Vi ne povas erari pri la vojo,” li diris kaj reiris al la kuirejo.

El la peĉonigra kaj tamen tiel brile klara mara nokto mi rigardis profunden en la ŝakton. En ŝajne senfine fora profundo mi vidis flagrantan, nebulan, fumecan helon. Tiu helo ruĝecis de la reflektiĝantaj kaldronegfajroj. Mi havis la impreson kvazaŭ mi vidus la submondon. En tiun ruĝan, nebulan lumon paŝis nun nuda homfiguro, nigra de fulgo kaj kun arĝentaj strioj el gutanta ŝvito sur la korpo. La figuro staris tie kun krucitaj brakoj kaj gapis senmove la fonton de la ruĝa lumo. Poste la figuro moviĝis, mankaptis longan pezan ferstangon, per kiu oni vigligas la fajron, kaj apogis ĝin kontraŭ la malantaŭa vando, post kiam ĝi nedecideme pikumadis per ĝi. La figuro nun antaŭeniris, kliniĝis, kaj momenton poste ŝajnis, kvazaŭ la flamoj glutus ĝin. Tiam la figuro rektiĝis, la flamoj estis estingitaj, kaj nur la fantoma ruĝeca lumo postrestis.

Mi volis malsuprengrimpi la eskalon, sed kiam mi metis piedon sur la plej supran rungon, atakis min terura kolono el varmego, sufoka olea fetoro, karbopolvo, fluganta cindro, dika petrola fumo kaj akvovaporo. Mi

retrofalas, kaj kun laŭta avida enspiro mi provis kapti freŝan aeron, ĉar mi supozis, ke miaj pulmoj ne plu povus funkcii. Sed nenio helpis. Mi devis tie malsupreniri. Jen en la profundo troviĝis viro. Vivanta homo, kiu tie moviĝas. Kaj tie, kie povas esti alia homo, ankaŭ mi povas esti. Mi malsuprengrimpis rapide kvin aŭ ses rungojn, sed tiam ne plu eblis. Kiel simio mi fuĝis supren por povi enspiri aeron.

La eskalo estis el fero, la rungoj el fingrodika rondfero. La eskalo havis nur unu balustradon, la alia flanko, la ekstera flanko, ne havis balustradon. Do, ĝuste tiu flanko estis senbara, ĉe kiu oni povis fali en la ŝakton, sed la flanko, kiu troviĝis ĉe la vando de la maŝinhalo, estis sekurigita per balustrado.

Kiam mi denove plenigis miajn pulmojn, mi faris la trian provon kaj atingis plataĵon. Tri paŝoj trans la platformon, kiu larĝis nur kvindek centimetrojn, kondukis al la fino de la platformo, kie dua eskalo kondukis pli profunden. Sed tiujn tri paŝojn mi ne povis fari. En vizaĝa alto ĉi tie troviĝis la cindrovino, kaj la vaportubo de la vino havis longan, sed malvastan fendon. Tra tiu fendo siblis broge varmega akvovaporo, akre kaj tranĉe kiel pikflamo. La fendo situis tiel, ke oni eĉ kliginte ne povis eviti tiun elsagantan vaporradion. Mi provis rektiĝi, sed tiam la vaporo mordis miajn brakojn kaj la bruston kaj

brogis ilin. Intertempe mi ree devis fuĝi supren por enspiri aeron.

Mi troviĝis sur la malĝusta vojo. Tio ne estis la mia. Mi reiris al la kuirejo, kie Stanislav ankoraŭ serĉis sapon. "Mi akompanos vin malsupren, venu do," Stanislav diris helpoprete.

Kiam ni estis survoje, li diris: "Vi neniam estis ĉe kaldronego, ĉu ne? Tion mi ja tuj vidis. Al vinĉo oni ja ne diras bonan tagon. Vinĉon oni draŝas sur la kranion kaj fino."

Mi nun ne havis la humoron, por rakonti al li, kiel oni traktu aĵojn, kiuj havas animon.

"Vi pravas, Lavski, mi neniam estis ĉe kaldronego, eĉ neniam enmetis la nazon tien. Mi estis ferdeklaboristo, stevardo, ŝipknabo, ekde kiam mi vidis mian unuan kesteton. Mi neniam flaris ĉe la nigra bando, la aero tie estis ĉiam tro sufoka por mi. Diru, ĉu vi iomete helpas al mi en la unua vaĉo?"

"Ne babilu tiel longe, kompreneble. Antaŭen, venu. Iel ni ja kuiras la brasikosupon. Mi konas viajn zorgojn. Jen via unua kadavroĉaro. Mi konas la ĉerkojn, tion kredis al mi. Sed foje kaj foje vi dankas la ĉielon kaj la inferon, se tia Jorike aperas antaŭ via pruo, kaj vi sursaltas kun volupta sento, kvazaŭ vi . . . nu, ne maltrankviliĝu. Se io ne iros glate, jen voku min, mi certe tiros vin el la

kaĉo. Eĉ se ĉiu el ni nur estas mortulo, ne malesperiĝu. Ne povas fariĝi ankoraŭ pli fie.”

Sed iĝis pli fie. Oni povas veturi sur mortula ŝipo. Oni povas estis mortulo, mortulo inter mortuloj. Oni povas esti estingita el la vico de la vivantoj, forblovita de la surfaco de la mondo, kaj tamen oni povas esti devigata elteni terurajn ne eviteblajn turmentojn, ĉar oni jam mortas kaj plia fuĝvojo ne restis.

Ĉapitro 29

Mi rigardis al Stanislav, kiu iris al la ŝakto, kiun mi ĵus forlasis, ĉar mi supozis, ke mi eraris pri la vojo. Li malsuprengrimpis senhezite la eskalon, kaj mi sekvis lin. Kiam ni troviĝis ĉe la fino de la unua eskalo kaj venis sur la platformon sub la varmega vaporradio, mi diris: "Tie ni ne povas trairi. La vaporo brogus nian felon ĝisoste."

"Tute glate vi travenas nur malofte. Morgaŭ mi montros al vi miajn brakojn. Sed ni devas trairi tie, diris Stanislav. Nenio helpas, neniue alia vojo al la kaldronegoj por ni. La inĝenieroj ne permesas al ni trairi la maŝinejon, ĉar ni estas tro kotaj, kaj ĉar kontraŭus la regularon."

Dum li ankoraŭ diris tion, mi vidis lin subite volvi la brakojn ĉirkaŭ la kapon por tiel gardi la vizaĝon, la orelojn kaj la nukon. Nun li turniĝis, trapremis kaj etendis sin kiel tremanta limako inter la arde varmegajn vapor-tubojn, kies protektkovraĵoj jam delonge forputris kaj deŝiriĝis, kaj la fajre ardan vandon de la maŝinejo. Tion eĉ serpentohomo ne povus imiti, mi pensis, kiam mi vidis ĝin. Sed nun mi eksciis, ke la tuta kaldronobando

devas fari tion, kaj per unu fojo mi ankaŭ komprenis, kial sur Jorike estas tiom da manĝaĵoj, kiujn neniu homo povas manĝi, kaj kiujn oni ĵetas maren. Oni ĵetis ilin maren nur tiam, kiam la kuiristo¹ ne povis vidi ĝin, ĉar alie ekis tumulto spektaklo pri tio, ke ni nepre devas reporti en la kuirejon ĉiujn salitajn lardhaŭtojn kaj ĉian nemangĝeblan aĵon, kiuj ne eniris en la obstine rifuzintan stomakon, por ke la kuiristo povu fari el ili *Irish Stew*², irlandan stufaĵon, viandajn buletojn, gulaŝon, fajnan viandan haketaĵon kaj similajn delikataĵojn.

”Ĉu vi nun vidis, filo mia, kiel fari tion? Ne tro longe meditu. Se vi unue meditas kaj rigardas kaj cerbumas pri tio, ke vi dekstre estos brogita kaj maldekstre fulmorpide falos en la ŝakton, jen tute ne eblas. Per la brakoj volvu la kapon, vidu, tiel . . . kaj poste la serpentodanco. Tio utilos al vi, kiam vi tro profunde metis vian nazon en la poŝon de aliaj homoj kaj oni metis ferajn kurtenojn antaŭ vian fenestron. Ankaŭ tie mi jam trapasis. Ĉiam estas bone ekzerci, vi scias neniam, ĉu vi bezonos ĝin. Hop!”

1. kuiristo: Jam sur la velŝipoj la ”Smutje” estis unu el la plej malamataj personoj. Elstarantan priskribon de tia malamata kuiristo donas Jack London en sia libro ”La marlupo”. Al la fifamaj inventaĵoj de tiuj markuiristoj apartenas ”the potage”, la kunkuirado de la manĝrestoj el pluraj tagoj, de la fiŝvosto ĝis la jam prironĝitaj ostoj.
2. Irish Stew (angle): Irlanda unupota manĝaĵo

Mi saltis, kaj jam mi estis trapasinta. Mi sentis egan varmon je miaj brakoj, sed tio estis certe nur imago.

Je la alia rando de la platformo longa fera eskalo kondukis pli profunden al la fundamentoj de la submondo. Tiu dua eskalo tiom varmegis, ke mia ĝis tiam uzita naztuko senvaloriĝis. Mi devis apogi min per la kubutoj sur la balustradon, por ekteni min sur la eskalo. Ju pli mi fondiĝis des pli dikiĝis la aero, des pli varmega, fumeca, olea kaj netolerebla ĝi fariĝis. La infero, kiun mi nun post mia morto finfine atingis, tio ne povis esti. En la infero ja ankaŭ la diabloj devas vivi, sed ĉi tie diabloj ne povis vivi, tio estis neimagebla.

Sed jen staris homo, nuda kaj ŝvitanta homo, la hejstisto de la antaŭa vaĉo. Homoj ĉi tie ne povis vivi. Sed ili devis. Ili estis mortuloj. Estingitoj. Senlanduloj. Senpasportuloj. Senpatriuloj. Tiuj devis, ĉu ili povis aŭ ne. Diabloj ĉi tie ne povis vivi, ĉar restaĵon de kulturo oni lasas eĉ al la diabloj, tion Goethe scias³. Sed homoj ĉi tie

3. tion Goethe scias: aludo pri la diablo en la dramo "Fausto I" de Goethe, kiu skribis en la akto 'sorĉistina kuirejo', ke la kulturo, kreinta ĉion en la mondo, disvastiĝis ankaŭ en la diablo. Henriko Faŭsto, en la teatraĵo faranta kontrakton kun tiu diablo, ne reflektas sole la historian figuron Johanon Fauston, sed ankaŭ la kuraciston kaj filozofon Henricus Cornelius Agrippa de Nettesheim (vidu pri li en ĉapitro 43), kies nigraj hundoj" Tarot" kaj "Mastro" ĉe Goethe transformiĝis al nigra pudelo. Marut skribis pri "Fausto I", ke estas "genia artaĵo", en kiu ĝenis lin nur la figuro de Grete. Kaj

devis ne nur vivi, ili devis labori ĉi tie, kaj ili devis labori ĉi tie tiel streĉe, ke ili forgesis ĉion, plej laste eĉ, post kiam ili longe antaŭe sin mem forgesis, ke ĉi tie ne eblas labori.

Antaŭ ol oni faris mortulon el mi, kaj antaŭ ol mi venis al la mortuloj, mi ofte ne komprenis kiel sklaveco eblas, kiel militservo eblas, kiel eblas, ke sanaj kaj prudentaj homoj senproteste lasas sin peli antaŭ kanonojn kaj mitralojn, ke homoj ne miloble pli volonte mortigas sin ol elteni sklavecon, militservon, galerajn ĉenojn kaj skurgoxbatojn. De kiam mi estis ĉe la mortuloj, de kiam mi mem estas mortulo, de kiam mi veturis sur mortula ŝipo, ankaŭ tiu sekreto riveligis al mi, kiel ja ĉiuj sekretoj revelaciigis nur post la morto. Tiel profunde neniu homo povas sinki, ke li ne povus sinki ĉiam ankoraŭ pli profunden, tiel peze neniu sortobato povas trafi homon, ke li ne povus elteni eĉ pli pezan. Jen estas la kaŭzo, kial

pri Goethe mem li skribis: "Germanio havos nur tiam la rajton diri pri Goethe, ke li estas germano, se en la tuta Germanio ne plu troveblas mangrenado kaj gasbombo, krom en muzeo."
("Brikofaristo", 1919-12-03)

Ke Goethe kiel sekreta konsilisto kaj militministro prizorgis al sia princo kaj sinjoro Karl August la soldatojn el turingiaj lokoj, ekzemple el Dornburg, Traven evidente ne sciis. Goethe mem nomis tion "Soldatenklauben", la ungokaptado de soldatoj. Li ankaŭ patroprenis en la milito kontraŭ la revoluciaj francoj sub Napoleono, kompreneble nur tre malvolonte, ĉar lia princo devigis lin.

la intelekto, kiu levas la homojn super la bestojn, profunde malaltigas ilin sub la bestojn. Mi kondukis vicojn de kameloj, lamoj, azenoj kaj muloj, kiuj transportis ŝarĝojn. Mi vidis dekojn el tiuj bestoj, kiuj kuŝigis sin, se oni nur per kilogramo troŝarĝis ilin, kiuj kuŝigis sin, kiam ili opiniis sin malbone traktataj, kiuj sen plendoj lasis sin mortskurĝi — kaj ankaŭ tion mi vidis — ol ekstari kaj akcepti la ŝarĝon aŭ plu toleri la malbonan traktadon. Mi vidis azenojn venditajn al homoj, kiuj kruele turmentis la bestojn, kaj la azenoj ĉesis manĝi kaj mortis. Eĉ maizo ne povis ŝanĝi ilian decidon. Sed la homoj, ĉu? La mastroj de la kreitaro, ĉu? Ili amas sklavi, ili fieras pri la rajto esti soldato kaj perdi la vivon per mitraloj, ili amas esti skurĝataj kaj torturataj. Kial? Ĉar ili povas pensi. Ĉar ili esperas. Ĉar ili esperas, ke revenos pli bonaj tempoj. Per tio ili estas damnitaj kaj neniam benitaj. Kompato al sklavoj? Kompato al soldatoj kaj soldatkripluloj? Malamo kontraŭ tiranoj? Ne! Ne! Ne!

Se mi estus saltinta trans la balustradon, mi nun ne troviĝus en infero, kie eĉ la diabloj ne povus elteni. Sed mi ne saltis kaj nun mi ne havas la rajton plendi aŭ eĉ akuzi aliajn. Lasu la almozulon morti pro malsato, se vi respektas la homon je li. Mi ne havas la rajton lamenti pri mia malfeliĉa sorto. Kial mi ne saltis? Kial mi ne saltas nun? Kial mi lasas min skurĝi kaj torturi? Ĉar mi esperas revidi Nov-Orleanon. Ĉar mi esperas, kaj ĉar mi

preferas naĝi tra la merdo ol ĵeti mian ŝatatan kaj drolotatan esperon en la merdon. Imperiestro, vi neniam estos en embaraso pro manko de gladiatoroj; la plej belaj kaj plej fieraj viroj surgenue petegos vin: "Ho, adorata, ho, admirinda imperiestro, permesu al mi esti via gladiatoro!"

Ĉapitro 30

Estas kompreneble, ke mi povas labori ĉi tie. Ĉi tie ja ankaŭ aliaj laboras. Tion mi vidas per miaj propraj okuloj. Tion, kion alia povas fari, ankaŭ mi povas fari. La imita instinkto de la homoj estigas heroojn, kaj ĝi estigas sklavojn. Se tiu alia ne mortas pro la skurĝbatoj, certe ankaŭ mi transvivos ilin. "Rigardu, jen la viro, li paŝas rekte al la pafanta mitralo. Fulmotondro, kia bravulo, diablo! Respekton al tiu viro! Kia bravulo! Li kuraĝas kiel leono." Kompreneble ankaŭ mi povas fari tion. Tiel la militoj disvolviĝas, kaj tiel la mortulaj ŝipoj veturas, ĉiuj laŭ la sama recepto. La homoj havas nur unu ŝablonon, laŭ kiu ili faras ĉion; tio tiel glate iras, ke ili tute ne devas streĉi sian cerbon por elpensi alian recepton. Neniujn vojojn oni pli ŝatas ol ofte iritajn. Tiel oni sentas sin agrable sekura. La imita instinkto kulpas je tio, ke la homaro dum la lastaj sesmil jaroj ne progresis, sed malgraŭ radio kaj aerflugoj vivas en la sama barbareco kiel komence de la eŭropa periodo. Tiel faris la patro, kaj tiel same faru la filo. Kio por mi, via patro, sufiĉe taŭgis, tio por vi, muknazulo, ja tiom pli sufiĉe taŭgas. La sankta konstitucio, kiu estis sufiĉe bona por Georgo Vaxhing-

ton kaj la revoluciaj batalantoj, tiom pli por ni sufiĉe bonas, kaj la konstitucio estas bona, ĉar ĝi eltenis jam cent kvindek jarojn. Sed ankaŭ konstitucioj, kiuj iam havis junan fajrecan sangon en la vejnoj, iom post iom sklerozigaĝas. La plej bona religio iutage estos pagana superstiĉo, kaj neniuj religioj tiurilate estas escepto. Nur tio, kion oni faris alie ol antaŭe, nur tio, kion oni kontraŭ la protesto de la patroj kaj sanktuloj kaj respondeculoj alie pensis, havigis novajn perspektivojn al la homaro kaj donis al ĝi la kredon, ke tamen en iu fora tago eblos observi progreson. Tiu fora tago estos en vidproksimo, se la homoj ne plu kredos je institucioj, nek je aŭtoritatoj . . .

”Kial vi tie staradas? Mi eĉ vian nomon ne scias, diru al mi, subhejtisto.”

Mia hejtisto estis veninta malsupren kaj grumblis fi-humore.

”Pippip estas mia nomo.”

Tio ŝajne iom plibonigis lian humoron.

”Do vi estas perso, ĉu?”

”Ne, mi estas abiseno. Mia patrino estis parsio. Tiuj ĵetas siajn mortintojn antaŭ la vulturojn.”

”Ni al la fiŝoj. Ŝajne via patrino estis tute honesta virino. Mia estis olda malbenita putino. Sed, se vi diras ‘filo de putino’ al mi, mi draŝos vian melonkapon.”

Do, li estis hispano. Se tiuj parolas kvar vortojn, tri el ili estas "filo de putino". Dependas de la grado de amikeco, ĉu oni rajtas diri al hispano, ke lia patrino estis groŝoputino. Ju pli oni proksimiĝas al la vero, des pli verŝajne oni devos subite tiri tranĉilon el siaj ripoj. Ju pli oni foras de la vero, des pli verŝajne oni aŭdos la respondon: "*Muchas gracias, Señor*, mi tre dankas, ne ĝeniĝu, mi estas tute je via dispono." Neniu havas tian delikatan kaj ridindan senton de honoro kiel la plej kota proleto. Kaj se la kotaj proletoj iutage havos la senton de honoro tie, kie ĝi devus troviĝi, tiam ili estos la ridantoj. Nuntempe ili havas la senton de honoro tie, kie la aliaj ŝatas vidi ĝin, ĉar tiukaze ili tiel bone povas ludi per ĝi, je sia propra avantaĝo. Por kio vi bezonas honoron, proleto? Salajron vi bezonas, bonan salajron, kaj tiam la honoro aldoniĝos per si mem. Kaj se vi havos ankaŭ la fabrikon, vi povos translasi por ĉiam la honoron al la aliaj; tiam vi ekscios, kiom malmulte la honoro interesas ilin . . .

La hejtisto de la antaŭvaĉo tiris nun ardantan dikan bolton el la fajro kaj metis ĝin en sitelon da freŝa akvo. En marakvo oni ja ne povas lavi sin, ĝi estas apenaŭ sufiĉe bona por malvarmigi la skoriojn. Tiam li eklavis sin per sablo kaj cindro, ĉar li ne havis sapon.

La kaldronejo estis lumigata per du lampoj. Unu el tiuj lampoj pendis antaŭ la vapormetro, por ke la hejtisto povu legi kaj reguli la vaporpremon. La alia lampo,

kiun uzis la subhejtistoj, pendis en angulo. En tiu mondo de mortuloj oni sciis nenion pri la terglobo, oni sciis nenion pri la ekzisto de acetilenaj lampoj, lampoj de fabrikita gaso, gazolinlanternoj, alkoholaj lampoj. Pri elektro, kiun oni povus facile produkti per la alkuplo de dinamo, mi prefere tute silentas. Sed ĉiu cendo elspezita por Jorike estis ja mono disipita. Nutri la fiŝojn per mono, tio estus bufonaĵo, ili kontentu manĝi la ŝipanaron. Tiujn du lampojn oni trovis ĉe la elfosado de la antikva Kartago.

Tiu, kiu deziras koniĝi kun la formo de tiuj lampoj, iru en muzeon kaj rigardu la romanian sekcion, kie inter la potistaj axoj troviĝas ankaŭ tiaj lampoj, kiajn ni havis. Estis ujoj kun tubecaj meĉingoĵoj. En la meĉingo enestis buligita strio de viŝtuko. La ujon oni plenigis per tiu likvaĵo, kiu devis servi ankaŭ por la virgulina lampo en la kajuto kaj havis la erarigan nomon petrolo. Kvarfoje hore oni devis iom pli eltiri la ŝtofostrion, ĉar ĝi fulgis kaj plenigis la kaldronejon per netravidebla dika nigra fumo, en kiu la fulgoflokoj flugis tiel dense kiel la akridoj en Argentinio dum plago. La strion oni devis pene eltiri per la nudaj fingropintoj, pro kio oni en la unua vaĉo forbruligis al si la ungojn kaj brulvundis sin la fingropintojn. Sidante en la karboholdoj kun la lampo, oni ne povis unue estingi la lampon, ĉar tiukaze oni pli pos-

te devus malsupreniri en la kaldronejon por povi ree ekbruligi ĝin.

Stanislav hodiaŭ jam tralaboris duoblan vaĉon. Kion tio signifas, ankoraŭ klariĝos. Malgraŭ tio, ke li apenaŭ povis rampi plu, li ankoraŭ restis plenan horon en la kaldronejo por asisti min. Naŭ fajrojn la hejtisto devis priservi, kaj por nutri la naŭ fajrojn, la subhejtisto devis alporti la karbojn. Sed antaŭ ol oni povis komenci alporti la karbojn, aliaj laboroj farendis. Ĉar la fajroj mem ne konsideris tiujn laborojn, kaj ĉar ili tuj elkriis ĉiun neglekton sur la vapormetro aŭ eĉ elhurlis tion sur la ponto, tial necesis amasigi en la kaldronejo atentindan karboprovizon, sufiĉan por tiu tempo de aldonaj laboroj. Tiun grandan provizon la vaĉantoj devis lasi por la vaĉontoj, kaj tiuj novaj vaĉantoj devis transdoni fine de la vaĉo egalan provizon al la sekvantoj. Tiu provizo estis amasigebla nur per ŝajne superhoma fortostreĉo dum la du mezaj horoj de vaĉo, do en mia vaĉo de la unua ĝis la tria aŭ de la dektria ĝis la dekkvina. De tagmeze ĝis la dektria aŭ de noktomeze ĝis la unua venis la antaŭlaboroj, kaj je la tria aŭ dekkvina komenciĝis la cindrolevo kun la subhejtisto de la nova vaĉo. Do, en du horoj oni devis alporti ĉiujn karbojn, kiujn naŭ fajroj de vaporŝipo voras en plenrapida veturo dum kvar horoj. Se la karboj kuŝas en la holdoj fronte de la fajroj, la alportado de la karbo estas la streĉa laborkvanto de sana,

forta kaj bone nutrata laboristo. Sed, se la karbo kuŝis tie, kie ĝi plej ofte kuŝis sur Jorike, jen estas laboro por tri aŭ kvar fortaj viroj. Ĉi tie tiun laboron devis fari unu viro. Kaj li faris. Li estas ja mortulo. Tiu povas fari ĉion. Kaj neniŭ pli bone kapablas peli iun, neniŭ pli sarkasme povas diri: "Lama hundo! Rigardu foje min!" ol la kunmortulo, ol la kunproleto, ol la kunmalsatulo, ol la kunŝkurĝato. Ankaŭ la galersklavoj¹ havas sian fieron kaj sian honorsenton, ili fieras esti bonaj galersklavoj, ili fieras "nun foje montri", kion ili kapablas. Se la okuloj de la ŝkurĝisto, kiu laŭiras kun ŝkurĝo la vicojn, kun plaĉo fiksiĝas al unu el ili, tiu estas tiel feliĉa, kvazaŭ la imperiestro mem fiksus ordenon sur lian bruston.

La hejtisto ĵetis karbojn sur ĉiun trian fajron, ĉiufoje preterlasante du. Poste li rompis la skoriojn en tri aliaj interaj fajroj, tiel, ke ili denove flamiĝis. Super ĉiu fajro legeblis krete skribita numero, de unu ĝis naŭ. Kiam la enĵetado de la karboj kaj la rompado de la skorioj estis finitaj, la fajro numero tri estis en la vico. Ĝi preskaŭ malsuprenbrulis ĝis la krado, kaj la hejtisto rompis per peza longa ferstango la skoriojn de sur la kradoj. La skorioj sidis firme. Kaj de la fajro eliris muĝanta varmego.

1. galersklavoj: elpenŝaĵo de la fenicoj. La galeroj servis dum kvarmil jaroj kiel militŝipoj. Sub la franca reĝo Ludoviko la 14-a estis eĉ libervolaj "galiotanoj", kiuj ĝuis la dubindan privilegion esti katenitaj nur dum bataloj.

Per ĉiu plia skorio, kiun oni elrompis kaj tiris antaŭ la fajron, la varmego eĉ pli potenciĝis. Ĉar nun la ardantaj skorioj kuŝis antaŭ la fajropordoj en la kaldronejo kaj hejtis ĝin tiom, kvazaŭ ĝi estus alta forno. La hejtisto kaj ankaŭ mi surhavis nur pantalonon, nenion pli. La hejtisto portis piede ĉifonajn babuŝojn, kaj mi botojn. Foje kaj foje la hejtisto suprensaltis kaj stamfe forskuis de siaj piedoj la ardantajn skorierojn, sur kiujn ili saltis. La fajrostangon eblis teni per la manoj nur tial, ĉar la hejtisto envolvis siajn manojn per sakĉifonoj, kaj ĉar li tenis ledon de malnova valizo inter la manoj kaj la stango. Finfine la varmego, kiu eliris de la skorioj, iĝis tiom superforta, ke la hejtisto devis fuĝi for de la fajro. Nun ni estingis la skoriojn per akvo, kiun mi prenis el la ligna kuvo. La eksplode disvastiĝanta vaporo nin ambaŭ saltigis returne al la vando. Tuj pecon post peco malvarmigi la skoriojn, tio ne eblas, ĉar la hejtisto ne povus labori dume. Tiukaze la elpreno de la skorioj daŭrus tro longe, la fajro ne flamus, kaj la vaporpremo tiom falus, ke necesus labori kvazaŭ freneze tridek minutojn, por realtigi la premon. Suben ĝi falas rapide, supren ĝi grimpas nur lante kaj per peniga laboro.

Ĉio, kio troviĝis sur Jorike, servis por malfaciligi la vivon kaj la laboron de la ŝipanaro. La kaldronejo tro mallarĝis. Ĝi multe pli mallarĝis ol longis la fajrokanaloj. Se viro devis enpuŝi en la fajron aŭ eltiri el ĝi la fajro-

stangon, li devis entrepreni per la stango ĉiajn eblajn turnojn kaj manovrojn, por manipuli ĝin, ĉar li ĉiufoje denove puŝis ĝin kontraŭ la malantaŭan vandon. Pro tiuj dancoj farendaj de la hejtisto, ne malofte okazis, ke li jen tie jen tie ĉi stumblis kaj falis sur karbomonton. Jen ĉe la vando, jen ĉe fajropordo li vundobatis siajn fingrajn artikojn. Se li falis kaj instinkte volis teni sin, li mankaptis ardantajn skoriojn aŭ la ruĝardantan fajrostangon. Ankaŭ okazis, precipe kiam la ŝipo ruliĝadis, ke li falis per la vizaĝo sur la skoriojn aŭ la ruĝardantan fajrostangon aŭ la fajropordon aŭ surtretis nudapiede sur elprenitan varmegan kradon aŭ varmegan skoriopecon. Mia hejtisto iam perdis la ekvilibron pro neatendite peza ruliĝo de la ŝipo, kaj li falis per la nuda dorso sur la blanke ardantajn skoriojn, kiuj kuŝis antaŭ la fajro. Mortula ŝipo, jes, sinjoro. Ekzistas mortulaj ŝipoj, kiuj interne faras kadavrojn, kaj ekzistas mortulaj ŝipoj, kiuj faras kadavrojn ekstere, kaj ekzistas mortulaj ŝipoj, kiuj ĉie faras kadavrojn. Jorike faris ĉion kaj ĉiujn, — ĝi estis bona mortula ŝipo.

Kiam la skorioj estis jam elprenitaj kaj estingitaj, ni surĵetis freŝajn noksokarbojn. Tiuj karboj, kiujn la subhejtisto jam antaŭe devis elserĉi el la karboprovizo, devis esti bonaj, ne tro grandaj karbopecoj, kiuj facile ekbrulu, por ke la fajro rapide denove flamiĝu. Ĉar la karbo, per kiu ni hejtis sur Jorike, estis la plej malmultekos-

ta kaj la plej aĉa karbo, kiu kie ajn ekzistis, ĝi estigis nur nekontentigan hejtenergion. Kaj tio estis plia kaŭzo, pro kiu la subhejtisto devis alporti nekredeble grandan karbamason, por povi teni alte la premon. Nun la hejtisto denove kontrolis la aliajn fajrojn, kaj mi ŝovelis la skoriojn al la mezo de la kaldronega vando, kie ili ne ĝenis nin dum la laboro.

La alia hejtisto intertempe ĝisfine lavis sin, sed dum tiu tuta tempo li troviĝis konstante en la danĝero, ke la ardanta fajrostango puŝas aŭ brulmarkas lin aŭ, ke saltanta skorio lin brulvundas. Sed li ne tro maltrankviliĝis pro tio, ĉar li estis morta. Nun oni povis ankaŭ vidi tion. La vizaĝo kaj la korpo pro la lavado per sablo kaj cindro preskaŭ puriĝis. Sed per sablo kaj cindro frotlavi la okulojn, tion li ne bone povis fari, kaj tial la okuloj havis larĝajn nigrajn ringojn. Tio donis al la vizaĝo la aspekton de skeletkranio, tiom pli, ĉar la vangoj pro la mizera manĝo kaj pro la troa laboro profunde kaviĝis. Li surmetis sian pantalonon kaj sian truitan ĉemizon kaj suprengrimpis la eskalon. Mi havis ĝuste sufiĉe da tempo por ĵeti rigardon supren kaj vidi, ke li serpentumas.

Stanislav intertempe alportis karbojn, por ke mi havu almenaŭ la provizon. Tiam estis la vico de la fajroj ses kaj naŭ. Kiam la skorioj el la sesa estis eltiritaj kaj la karboj surĵetitaj kaj la ceteraj fajroj tiom pretaj, ke eblis eltiri la skoriojn el la naŭa, Stanislav venis al mi kaj diris:

”Nun mi kaputas. Miaj fortoj forlasis min. Estas la unua. Mi nun jam dekkvin horojn seninterrompe kiel ĉevalo laboris. Je la kvina mi jam denove devos levi la cindron. Estas ja bone, ke vi venis, pli longe ni ne eltenus tion. Mi jam nun volas konfesi al vi, ni estas nur du subhejtistoj, se oni kalkulas ankaŭ vin. Do, ni havas ne po du vaĉojn, sed po tri, kaj al tio aldoniĝas por ĉiu vaĉo kromhoroj por la cindrolevado. Kaj morgaŭ, kiel plia aldono, ni devos forŝoveli la cindromontojn sur la ferdeko, ĉar en la haveno oni ja ne rajtas elĵeti la cindron. Atendos nin po kvar horoj aldonaj.”

”Ĉiuj ĉi horoj estas ja kromhoroj, la duoblaj vaĉoj, la forŝovelado de la ferdekcindro kaj la cindrolevado,” mi diris.

”Jes, tiuj ĉi horoj ĉiuj estas kromhoroj. Se plezurigas vin, kaj se vi ŝatas skribi, notu por vi ĉiujn ĉi kromajn horojn. Sed neniuj pagos ilin.”

”Sed tion ili ja konsentis, kiam ni faris la kontrakton,” mi respondis.

”Kontrakto ne validas ĉi tie. Nur tio, kio enestas en via poŝo, validas. Kaj en la poŝon vi ricevas ĉiufoje nur antaŭpagon, antaŭpagon, antaŭpagon. Ĉiufoje tiom, ke ĝuste sufiĉas por ebriiĝi kaj eble por babuŝoj aŭ ĉemizo, sed ne pli. Ĉar, se vi aspektus laŭorda kaj povus iri kun trankvila animo sur la stratoj, vi ja eble povus reviviĝi.

Ĉu vi nun flaras la pipron?² Vi ne povas foriri. Vi bezonas monon, bonan pantalonon, bonan jakon, bonajn botojn kaj paperojn. Vi ne ricevos ilin. Vi ne povas reviviĝi. Se vi forlasos la ŝipon, li ordonos kapti vin, pro dizerto. Ili tuj kaptos vin, pro viaj ĉifonaj vestaĵoj kaj pro viaj paperoj ne ekzistantaj. Tiam li minusos du aŭ tri monatsalajrojn de vi, pro dizerto. Li rajtas, kaj li faros. Tiam vi surgenue petegos pro groŝo por brando. Brandon vi nepre bezonas. Esti morta foje tamen doloras, eĉ se oni jam delonge kutimiĝis al tio. Bonan nokton. Mi ne lavos min, eĉ la manon mi ne povas levi plu. Ne lasu trafali kradojn, tio kostus sangon, Pippip. Bonan nokton.”

”Sankta Maria, seksperfortita Gabrielo, Josefo kaj Arimatia, aprotetikoj kaj virseksaj araneoj, fulmotondro de la ĉielo! . . .”

La hejtisto kriis kiel frenezulo, kaj poste faris tian gigantan enspiron, ke li povis ellasi novan vicon da sakroj kaj damnoj, tiel, ke la enloĝantoj de ĉiuj inferoj devis ruĝiĝi pro honto. De la majesto de lia dio, de la virgulina senkulpeco de la ĉielreĝino, de la digno de la sanktuloj nenio postrestis. Ili sinkis en la stratkoton, kie oni trenis ilin tra la fetora fluaĵo de la stratkanaletoj. La infero por li perdis sian hororon, ne plu povis trafi lin kia

2. Ĉu vi nun flaras la pipron? (slange): Ĉu vi nun komprenas?

ajn terura ĉiela anatemo, ĉar li, kiam mi demandis: "Hejtisto, diru al mi, kio okazas?" ekhurlis kiel sangosoifa rabobesto: "Ses kradoj falis. Sankta putiniĝ . . ."

Ĉapitro 31

Stanislav suprenirante diris, ke la falado de la kradoj kostas sangon. Sed li parolis pri la kazo, ke unu el ili falas. Nun ses falis. La reenmeto kostis ne nur sangon kaj forskrapitajn karnopecojn, forbrogitajn haŭtpartojn, ĝi kostis sangantan spermon, elŝiritajn tendenojn; la medolo fluis kiel akveca lavo el la ostotuboj; la artikoj krakis kiel ligno rompata. Kaj dum ni laboris kiel piramido-sklavoj, la vaporpremo falis kaj falis kaj falis. Kaj ni imagis la laboron, kiu atendis nin, por realtigi la premon. Tiu antaŭsento rampis kaj morde eniris niajn kadavrojn, dum ni turmentis nin pro la kradoj. Ekde tiu nokto mi staras super la dioj. Oni ne plu povas damni min. Mi liberas, rajtas senzorge fari aŭ ne fari ĉion laŭ mia volo. Mi rajtas malbeni diojn, mi rajtas malbeni min mem, rajtas agi laŭ mia plaĉo. Neniu homa leĝo, neniu dia ordono povas plu influi miajn agojn, ĉar oni ne plu povas damni min. La infero estas paradizo. Neniu homobeŝtaĉo povas elpensi inferajn turmentojn tiajn, kiaj povus timigi min. Kiel ajn la infero prezentiĝus, ĝi estus liberigo, liberigo de la enmeto de falintaj kradoj sur Jorike.

La ŝipestro neniam estis en la kaldronejo, kaj neniu el ambaŭ oficiroj. Neniu libervole eniris en tiun inferon. Ili eĉ elektis alian vojon, se ili devis nur preteriri la eniran ŝakton. La inĝenieroj kuraĝis eniri la kaldronejon nur, kiam Jorike delikate ankris en haveno kaj la kaldronobando faris purigajn laborojn, do viŝis tubojn, purigis la maŝinejon kaj faris similajn aĉajn taglaborojn. Eĉ tiam la inĝenieroj devis trakti diplomate la nigrajn banditojn. Ĉar tiuj ĉiam kaj ĉe ĉiu okazo estis en la stato por draŝi per martelo la kranion de la inĝeniero. Ĉu la kaldronobando havis iun respekton antaŭ prizonoj, pundomoj aŭ ekzekutisto? Ne, tio glitis de ili kiel pizo de la muro . . .

De la maŝinhalo kondukis malvasta kaj malalta vojo inter la triborda kaldronejo kaj la triborda vando en la kaldronejon. Tiu trairejo estis apartigita de la maŝinhalo per peza fera pordoluko hermetike fermebla, do tiel hermetika, kiel oni povas imagi tion sur Jorike. Se iu venis de la maŝinhalo kaj trapasis la holdolukon, tiu devis malsupreniri kelkajn rungojn, por atingi la trairejon. Tiu trairejo larĝis nur tri futojn kaj malaltis tiom, ke oni devis iri tute kliniĝinte, por ke oni ne puŝu sian kapon je la akre eĝaj transversaj ferotraboĵoj. Kiel ĉio alia sur Jorike, kiel la kaldronejo, tiel ankaŭ la trairejo tage kaj nokte estis nigre senluma. Aldone tiu vojo varmegis kiel alta forno. Ni, la subhejtistoj, altrafus tie eĉ kun bandaĝo antaŭ la okuloj ĉiun celon, ĉar tiu trairejo estis parto de

la specialaj torturvojoj. Tra tiu irejo ni devis ŝoveli kaj ŝovi kelkajn tunajn centojn da karbo al la kaldronegoj, el la holdoj apud la maŝinhalo. Ni konis tiun torturvojon kaj ĝiajn labirintajn enigmojn. Aliaj homoj ne tiel bone konis ĝin.

Se la vaporpremo grave falis, multe sub cent tridek, la deĵoranta oficiro devis fari ion. Por tio li estis ja pagata. Ankaŭ la Unua ne venis en la kaldronejon, surmare neniam. Disrompita skapolo instruis lin, ke oni ne molestu surmare la kaldronbandon. Li vokis nur de supre sur la ferdeko en la ŝakton: "La premo falas!" Sed tuj poste li jam estis for, ĉar el la profundo elvenis la kriado: "Hundo de putino, malbenita de Dio, tion ni mem scias. Venu malsupren, porko, se vi havas postulon." Sed tiumomente jam karbopecoj flugis kontraŭ la enirolukon.

Oni ne parolu al la laboristo pri bona konduto, ĝentileco kaj bonaj moroj, se oni samtempe ne volas doni al li la kondiĉojn, por ke li povu resti bone konduta kaj ĝentila. Koto kaj ŝvito transkolorigas, eĉ pli internen ol eksteren.

La Dua Inĝeniero estis ankoraŭ relative juna, eble tri-dek sesjara. Li estis granda ambiciulo kaj celis la postenon de la Unua. Li kredis, ke li plej bone povas pruvisian ambicion, se li pelas la fornobandon, precipe kiam ni estis en haveno, ĉar tiam li havis la maŝinkomandon. Li ne estis tre lernkapabla kaj nur reziste, pli ĝustadire

neniam lernis kiel trakti la kaldronan bandon de Jorike. Ekzistas inĝenieroj, kiujn la kaldronobando adoras. Mi konas ŝipestron, kiun la fornobando adoris kvazaŭ dion. Tiu ŝipestro mem ĉiutage eniris la kuirejon: "Kuiristo, mi volas vidi la manĝon, kiun miaj hejtistoj kaj subhejtistoj hodiaŭ ricevos. Mi volas gustumi ĝin. Tio estas koto. Tio iros maren. La hejtistoj kaj subhejtistoj, neniuj aliaj, veturigas la vaporŝipon." Kaj se li renkontis subhejtiston aŭ hejtiston sur la ferdeko, li demandis: "Subhejtisto, kiel la hodiaŭa manĝo gustis? Sufiĉe da viando? Ĉu vi ĉiuj kontentas pri la lakto? Vespere vi ĉiuj ricevos aldonan porcion da ovo kaj lardo. Ĉu la ŝipknabo efektive regule alportas la fridan teon malsupren, kiel ordonite?" Kaj strange, la hejtistoj kaj subhejtistoj sur tiu ŝipo tiel kondukis, ke oni povus inviti ilin al diplomatobalo.

Kiam dum la enmeto de la kradoj la premo falis kaj falis, venis la deĵoranta Dua tra la irejo, ŝovis la nazon ĉirkaŭ la kaldronegvandon kaj diris: "Ĉu la premo falas? La kesto tuj ekhaltos." La hejtisto en tiu momento ĝuste mantenis la ruĝardan fajrostangon, per kiu li provis remeti kradon falintan en la cindrejon. Kun terura hurlado, kun sange ruĝaj okuloj kaj ŝaŭmanta buŝo li rektiĝis kaj sagis kiel frenezulo kun la ardanta stango kontraŭ la inĝenieron por trapiki ties korpon. Sed kiel fulmo la inĝeniero malaperis post la angulo kaj haste forkuris tra la irejo. Ĉar li tiel rapide fuĝis, li ne sufiĉe taksis la ire-

jan alton kaj vundbatis sian kranion je unu el la transversaj traboj. La hejtisto trafis la lokon, kie la inĝeniero staris. La puŝo estis tiel fortega, ke larĝa peco de la masonaĵo, kiu gardis la kaldronegon kontraŭ la varmoperdo, desaltis kaj la stango ĉe la pinto kurbiĝis. Sed la viro ne ĉesigis la persekuton. Li ĉasis la Duan kun la stango, kaj sen kompato li estus mortbatinta kaj frakasinta lin, se la inĝeniero ne sufiĉe frue, kovrita de sango pro la kurado kontraŭ la ferotrabojn, estus atinginta la rungojn, se li ne estus krake ferminta kaj barinta la lukon.

La inĝeniero ne raportis la okazaĵon, same kiel neniu suboficiro aŭ oficiro, frapita sur vangon sen atestantoj de simpla soldato, raportus la vangofrapojn, por ne devi konfesi, ke io tia povis okazi al li. Se la inĝeniero estus raportinta la aferon, mi kiel atestanto estus ĵurinta, ke la inĝeniero envenis kaj intencis mortbati la hejtiston per ŝraŭbŝlosilo, ĉar laŭ lia diro la vaporpremo ne sufiĉis kaj la hejtisto diris al li, ke li rapide eliru, ĉar li tute ebrias, ke li tiam ebria ŝanceliĝis eksteren kaj vundbatis sian kapon. Tio ne estus mensogo. Sendepende de ĉio alia, la hejtisto estas mia kunsuferanto. Kaj se la aliaj blekas: *"Right or wrong, my country! Ĉu juste ĉu maljuste, estas mia patrio!"*, jen ankaŭ mi havas, mil diabloj, la rajton kaj la devon voki: *"Right or wrong, my fellow-worker! Ĉu juste ĉu maljuste, miaj kunproletoj!"*

En la posta tago la Unua demandis la Duan kial li ekhavas tiun truon en la kranio. La demandito rakontis la veron. Sed la Unua, la ruza bubo, raportis nenion, sed diris al la Dua: "Danku la diablon por tiu feliĉo, amiko! Ne faru tion ankoraŭfoje. Se kradoj falis, ne montru vin, jen rigardu en la enirŝakton, sed montru eĉ ne per enspiro, ke vi ĉeestas. Lasu la premon fali, kiom ĝi falas, eĉ se la kesto ekhaltus. Se vi malsupreniras tiam, kiam kradoj ankoraŭ elestas aŭ dum la postaj tridek minutoj, ili senkompatate mortbatos kaj ŝovos vin en la fajrokanalon. Neniu homo kiam ajn ekscios, kien vi malaperis. Mi avertas vin."

Tioma ambiciulo la Dua efektive ne estis, ke li ne plenkore akceptus tiun averton. Li neniam denove revenis en la kaldronejon, kiam kradoj falis, kaj se li venis en alia tempo, ĉar la vaporpremo malpliiĝis kaj ne volis altiĝi, tiam li tamen envenis, sed ne diris eĉ silabon, rigardis la vapormetron, staris dum iom da tempo, proponis cigaredon al la hejtisto kaj al la subhejtisto kaj diris tiam: "Ni havas tiel favan karbon, ke hejtisto povus esti el oro, kaj li tamen ne povus teni la premon."

Hejtistoj ja ne estas idiotoj kaj kompreneble tuj scias, kion la inĝeniero celas, kaj ili faras sian plej bonan, por altigi la vaporpremon. Ja ne nur aliaj homoj, sed ankaŭ proletoj havas sportan spriton. Sed neniu laboristo plendu pri sia superulo, li havas ĉiam tiujn, kiujn li meritas,

kaj kiajn li faras al si. Bone celita kaj bone trafanta pugnobato en la ĝusta tempo pli utilas ol longa striko aŭ longe daŭra ĉagreno. Ĉu oni nomas kruduloj la laboristojn aŭ ne, tio indiferentu al ili. Sed nepre oni respektu ilin, jen la plej grava afero. Nur ne estu timema, proleto. Kion ajn fifamigan oni alikaze povis diri pri Jorike, pro unu afero ĝi meritis laŭrokronon: Ĝi estis bonega instrumajstro. Post ses monatoj sur Jorike oni ne plu havis idolojn. Vi mem helpu al vi, ne tro fidu, ke aliaj helpos. Remeti falintajn kradojn, tio eĉ sur sanaj kestoj ne estas plezuro, kiel mi pli poste eksciis. Tio ĉiam estas tre ĉagreniga afero. Sed ne pli. Sed sur Jorike ĝi estis sangolaboro.

Ĉiu kradobloko pezis proksimume kvardek ĝis kvindek kilogramojn. Tiuj blokoj kuŝis per siaj dentoj sur transversaj traboj antaŭe kaj fine de la fajrokanalo. La transversaj traboj iam estis bonaj kaj novaj, en la tempo, kiam eksplodis la granda striko ĉe la tura konstruado en Babilono kaj estiĝis tiun lingvokonfuzon, kiu sur Jorike atingis sian kulminon.

Ne mirinde, ke tiuj transversaj traboj en la longa intertempo perdis sian apogopovon. Multfoje ardiĝinte la traboj sveltiĝis. La kradoj kuŝis per siaj dentoj nur sur tre maldikaj strioj de tiuj arde sveltiĝintaj transversaj traboj. Ĉe la rompado de la skorioj sufiĉis nur milimetra misatento, aŭ nur, ke la skorioj tre firme sidis, kaj jam krado-

bloko forglitis kaj falis en la cindrejon. La bloko ardis, kaj oni devis elfiŝi ĝin el la cindrejo per kurioza ilo, kiu nomiĝis kradotejnajlo kaj pezis proksimume dudek kilogramojn. Elfiŝinte la blokon, oni devis levi ĝin en la fajrokanalon kaj en sian antaŭan pozicion. Ĉar la transversaj traboj elardiĝinte striiĝis en la paso de jarmiloj, la kriplaj kaj forbruligitaj trabetoj, sur kiuj la blokoj kuŝu, apenaŭ colan duonon mallarĝis. Se oni bone surmetis la antaŭon de la bloko, ĝia fino forglitis kaj refalis en la cindrejon, kie oni devis duafoje elfiŝi ĝin, por povi ankoraŭfoje provi la remeton. Ĉifoje ĝia malantaŭo kuŝis bone sur la trabeto, sed ĝia antaŭo ne atingis la reston de la trabo kaj ĝi falis nun antaŭe en la cindrejon. Se la bloko je unu el la finaĵoj falis en la cindrejon, ankaŭ ĝia alia finaĵo cedis kaj la tuta krado falis. Tiun elfiŝadon kaj remetadon oni devis provi tiom ofte, ĝis la bloko per favora koincido de kelkaj favoraj cirkonstancoj per ambaŭ finaĵoj atingis tiun apenaŭan colduonon da surkuŝa surfaco.

Se temis pri nur unu bloko, jam estis la plej malice imagebla laboro. Sed pro la elfiŝado kaj remetado oni tuŝis foje kaj foje najbaran blokon, kaj tiu reagis je la voko kaj mem falis obeeme en la cindrejon, kunŝirante ĉe tio la najbaron. Ĉe la remeto de la lasta najbaro falis plia najbaro, kiu per nura milimetra strio apogis sin kaj jam dum horo sopire atendis, ke fine iu tuŝu ĝin, por ke

ankaŭ ĝi finfine havu kialon gliti en la cindrejon kaj partopreni la dancon.

Dum tiu elfiŝa kaj remeta tempo la fajro en la kanalo kompreneble gaje brulis plu, la kradoj ardis, la tenajlo ardis, la ferostango, per kiu la kradoj dum la remetado de sube estis apogataj, ardis, kaj la kradoblokoj havis tian pezon, ke ili eĉ tiam prezentis konsiderindan pezon, kiam ili estis fridaj kiel glacio kaj oni povis surbrake porti ilin. Seninterrompe oni ne povis labori je la blokoj, ĉar necesis priservi la aliajn fajrojn, por ke ili ne estingiĝu. La tutan karboprovizon, kiu kuŝis en la kaldronejo, la aliaj fajroj dume formanĝis, kaj necesis alporti novan provizon.

Kiam ni finfine enigis la ses kradojn kaj neniu el ni kuraĝis firme paŝi proksime de la fajropordo, por ke la blokoj ne skuiĝu kaj ĵetiĝu for de siaj milimetre dikaj trabetoj, ni ambaŭ falis senvive sur karbomonton. "Senvive" estas la ĝusta esprimo; ĉar ĉia vivo en ni dum tri-dek minutoj estingiĝis. Ni sangis, sed ni ne sentis tion, nia haŭto pendis en strioj de la brakoj kaj manoj, sur la brusto kaj dorse, kaj ĝi estis brogita grandparte, sed ni ne sentis tion. Ni ne plu havis la forton por spiri.

Bloveto da vivo fine revenis kaj ni devis denove altiĝi la vaporpremon. El la plej foraj anguloj de la ŝipo ni devis alporti la karbojn, ĉar la karboholdoj tie troviĝis, kie ili forprenis plej malmulte da kargokapacito. La kar-

goholdoj estis la plej grava afero. Pro ili Jorike veturis, pro ili ĉiu ŝipo veturas. La karbo, la manĝo por la ŝipo, estis akcesoraĵo, kiel la manĝo por la ŝipanaro estis akcesoraĵo. Ĉiun superfluan angulon, ne uzeblan kiel kargoholdon, oni plenigis per karboj, kaj de tie oni devis forporti ilin. En kvarhora vaĉo la naŭ fajroj de Jorike glutis pli ol mil kvarcent kvindek pezajn ŝovelplenojn da karboj. Tiujn mil kvarcent kvindek ŝovelplenojn oni devis alporti. Kaj tion ni devis fari aldone al la eligo de la skorioj, aldone al la elpreno de cindro el la cindrejo, aldone al la cindrolezado kaj en speciale benitaj vaĉoj aldone al la remetado de kradoj.

Tion devis fari unu subhejtisto, la plej kota viro de la ŝipanaro, la plej malestimata, tiu, kiu havis nek matracon nek kovrilon, nek kusenon, nek teleron, nek forkon, nek tason, tion devis fari viro, kiun ĝissate nutri ne eblis, ĉar la kompanio laŭ aserto tiukaze ne estus konkurenckapabla. Kaj ke kompanioj estu konkurenckapablaj, pri tio eĉ la ŝtato atentis. Tial, ĝi des malpli atentis pri tio, ke la homoj estu konkurenckapablaj. Ambaŭ samtempe, la kompaniojn kaj la laboristojn, oni ne povas teni konkurenckapablaj.

Je la kvara mia hejtisto estis anstataŭigita. Sed ne mi. Dudek minutojn antaŭ la kvina mi iris por veki Stanislavon, mian anstataŭulon, por levi la cindron. Mi devis tiri lin el la litbenko. Li dormis kiel ŝtono.

Li estis jam delonge sur Jorike. Li ne kutimiĝis al tio. Se iu, eble pasaĝero kun luksa kajuto, pelate de scivolo, proksimiĝas la kaldronejan ŝakton, ties unua penso estas: "Kiel eblas, ke homoj povas labori tie?"

Sed tiam tiu, kiu ĉiam proksimas por fari lian vivon eltenebla, tuj flustras en lian orelon: "Tiuĵ kutimiĝis al tio, ili eĉ ne rimarkas tion¹."

Tiel oni povas senkulpigi ĉion, kaj tiel oni senkulpigas ĉion. Tiom malmulte, kiom homo kutimiĝas je tuberkulozo aŭ daŭra malsato, tiom malmulte homo povas kutimiĝi elteni ion, kio en la unua tago tiel forte turmentas la korpon kaj la animon, ke oni deziras ĝin al neniu, kiu havas homan vizaĝon. Helpe de la malinda preteksto: "Tiuĵ kutimiĝis al tio!" oni senkulpigas ankaŭ la skurĝadon de sklavoĵ.

Stanislav, fortika kaj rezistopova viro, neniam kutimiĝis al tio, kaj mi neniam vidis homon, kiu kiam ajn kutimiĝis al turmentoj. Nek bestoj nek homoj povas kutimiĝi al turmentoj, nek al korpaj, nek al animaj. Ili nur iĝas obtuzaj, kaj tion oni nomas kutimiĝo. Sed mi ne

1. alkutimiĝo: Georg Forster (1754–1794), mondvojaĝinto kun Cook, sciencisto, framasono kaj jakobeno en la artikolo "Pri la interrilato de la ŝtatarto kaj la feliĉo de la homaro" skribis: "Por la malamikoj de la libero ankoraŭ restas elirvojo: argumento, kiu laŭ ili estas prenita el la naturo. La homo, ili asertas, estas nek pli nek malpli ol tio, por kio la kutimo destinis lin . . ."

kredas, ke homo iam tiom obtuziĝas, ke li ne sopiras liberiĝon, ke li ne plu portas ankore la eternan krion: "Mi esperas, ke mia liberigonto venos!" Nur tiu kutimiĝis, kiu ne plu esperas.

La espero de la sklavoj estas la potenco de la mastroj.

"Ĉu jam la kvina?" diris Stanislav. "Mi ja nur antaŭ sekundo kuŝiĝis." Li estis ankoraŭ tiel kota, kiel li iris supren. Ankaŭ nun li ne povis lavi sin. Li tro lacis.

"Mi devas diri al vi, Stanislav, mi ne eltenas tion. Mi ne povas levi la cindron je la dekunua kaj ekvaĉi tagmeze. Mi saltos maren."

Stanislav sidis sur la litbenko, rigardis min dormeme, li oscedis kaj diris: "Ne faru tion. Mi ne povas fari aldone ankaŭ vian vaĉon. Ankaŭ mi saltos maren. Tuj post vi. Ne. Tion mi ne faros. Tiukaze prefere la prunan kaĉon sub la fajron. Tiukaze ĉio kuniros, kaj ili ne plu povos kapti iun. Estas ja amuzaĵo, se oni pripensas. Tio kun la prunkaĉo."

La kompatinda Stanislav estas ja ankoraŭ tute ebria de dormo, mi pensis.

Ĉapitro 32

Je la sesa matene mia vaĉo finiĝis. Mi ne povis lasi karbobprovizon por Stanislav. Mi ne plu povis teni la ŝovelilon. Mi bezonis nek matracon, nek kovrilon, nek kusenon, nek sapon. Mi falis sur mian litbenkon, tiel kota, olee priŝmirita, graskovrita kaj ŝvitanta, kiel mi estis. Miaj pantalonoj estis fuŝitaj por ĉiam, ankaŭ mia ĉemizo kaj miaj botoj. Ili estis priŝmiritaj per oleo, karbopolvo kaj petrolo. Ili havis brultruojn, brulmakulojn, kaj estis ŝiritaj. Se mi nun en iu haveno starus ĉe la balustrado de Jorike, vice kaj marŝorde kune kun la aliaj poŝoŝtelistoj, enrompisto kaj fuĝintaj punkaptitoj, ne plu eblus diferencigi min de la aliaj. Ankaŭ mi havis nun mian vestaĵon de punkaptito, en kiu mi ne plu povis elŝipiĝi sen tuj esti kaptita kaj rekondukita. Mi fariĝis nun parto de Jorike, mi devis veturi kun ĝi, se eĉ al morto kaj pere. Fuĝo ne plu eblis.

Iu ŝire vekis min kaj kriis al mia orelo: "La matenmanĝo pretas." Ne eblis prepari kiun ajn matenmanĝon en la mondo, kiu kapablus logi min el la litbenko. Kio estis matenmanĝo kaj manĝado por mi? Nigra, dika, nebuleca, ŝtone peza io. Kelkaj homoj diras: "Mi estas tiel laca,

ke mi ne plu povas movi eĉ fingron.” Kiu diras tion, ne scias, kion signifas laceco. Movi la fingrojn? Eĉ la okulklapoj ne tute fermiĝis pro laco. Miaj okuloj estis duone apertaj, kaj mi perceptis la nebrilan taglumon kvazaŭ ŝarĝantan doloron, sed mi neniel povis fermi la palpebrojn. Ili ne fermiĝis per si mem kaj ne per mia volo. Tiun volon mi ja ne kapablis estigi en mi. Mi havis ne la deziron, sed nur animpezigan malkomfortan senton: ”La taglumo malaperu.”

Kaj kiam mi ne pensis, sed senrezistipova sentis: ”Kial mi zorgu pri la taglumo?”, tiam la peza fera hoko de organo suprenŝiris min, la levilo glitis el la mano de la organisto, mi falis tre rapide tridek metrojn malsupren, trafis kun laŭta bruo per la tuta korpo sur la kargokajon, kaj densa svarmo da homoj alsturmis min kaj kriis: ”Eliĝu, dudek antaŭ la dekunua, levu la cindron.”

Post kiam la cindro estis levita, mi alportis la tagmanĝon el la kuirejo, mi devis supreniri kun mia kruĉo la ŝipmezan eskalon kaj poste malsuprengrimpi la eskalon al la antaŭferdeko. Mi manĝis kelkajn prunojn, kiuj nomiĝis ”la pudingo”, kaj kuŝis en blua amela muko. Por povi manĝi ion alian kaj pli multe mi tro lakis. Mi ne lavis min, sed komencis sen tio la vaĉon. Kiam mia vaĉo finiĝis je la sesa vespere, mi estis tro laca por lavi min. La vespermanĝo estis malvarma kaj rigida. Tio ne tuŝis min. Mi lasis min fali sur mian litbenkon.

Tio iris tiel tri tagojn kaj tri noktojn. Mi ne havis alian personon ol dekunua ĝis la dekokaj, dudektria ĝis la sesa, dekunua ĝis la dekokaj, dudektria ĝis la sesa. En tiu kompreno sumiĝis por mi la mondpercepto kaj mia konscio pri mia persono. Mi estis estingita. Anstataŭ mia mio estis nenio alia ol dekunua ĝis la dekokaj kaj dudektria ĝis la sesa. Du nedireble veaj krioj entrancis tiun histon mian, kiu iam estis cerbo, karno, animo, koro. Ili kaŭzis akran doloron, kiu ŝrikigis min. Povas esti, ke oni sentas similan kriĉigan doloron, se la nuda cerbo estas tiklata per ŝtala risorto. La krioj alvenis ĉiufoje de tre fora loko, ili ĉiufoje estis la samaj, ĉiufoje same kruelaj kaj dolorigaj: "Eliĝu, dudek antaŭ la . . . ! Sankta perfort . . . — kradoj falis!"

Kiam kvar tagoj kaj kvin tagoj estis pasintaj, mi komencis malsati, manĝis kaj komencis kutimiĝi al tio.

"Tiel terure, kiel mi pensis, tio envere ne estas, Stanislav," mi diris, kiam mi transprenis la vaĉon de Stanislav. "La fritbuletoj tute bone gustas. Nur iom pli da lakto ni bezonus. Nu, kaj la provizo, kiun vi lasis al mi, ne tre imponas. Tiun ni enpikos ja en kavan denton de fajro unu. Cetere, kiel oni povas ellogi rumon el la Unua?"

"Lude facila afero, Pippip. Sufiĉe magra vi ja aspektas. Li kredos al vi. Iru do tuj supren kaj diru, ke via stomako malordiĝis, ke vi devas vomi sen interrompo. Diru, ke vi ne povas iri al la vaĉo, ke vi vomas verde. Tuj vi rice-

vos plenan glason da vino. Dufoje po semajno vi povas uzi la recepton. Se vi provus pli ofte, li ne plu kredos al vi. Tiukaze li enverŝos sen hezito ricinan oleon je duono, kaj vi rimarkos ĝin nur tiam, kiam vi jam glutis. Kaj vi ne povas kraĉi bone en lia kabineto, ĉar vi mem devus viŝi poste. Vi do glutus. Ne donu la recepton al alia. Estas nur por ni. La hejtistoj havas apartan. Sed ili ne elfajfas ĝin, tiuj friponoj.”

Mi kutimiĝis pli kaj pli al ĉio.

Tiam venis la tempo, kiam mi rehavis kromajn pensojn, kiam mi ne lace kaj kvazaŭ dormeme, sed tute seke alkriis la Duan, ke mi, se li ne tuj forlasos la kaldronejon, ne nur martelon, sed ankaŭ streĉbolton ĵetos al lia kranio, kaj ke li rajtas ĵeti min sen mia rezisto en la maron, se ne tute certe mi rompbatos per la martelo lian frunton kaj per la bolto la malantaŭon de lia idiotokranio kaj, ke li ĉifoje ne sukcesos fuĝi tra la irejo. Li efektive ne povus fuĝi. Ankaŭ li ŝajne sentis tion. Ni fiksas ferstangon en la irejo tiel, ke ĝi pendis ŝvebe. De la dorsflanka vando en la kaldronejo kondukis ŝnuro al tiu ferstango. Se la Dua provus fuĝi, unu el ni tuj saltus al la ŝnuro kaj tirus ĝin. Tiel la stango ĉesus ŝvebi kaj falus tiel sur lian fuĝvojon, ke li sidus en la kaptilo. Ĉu li ne plu viva aŭ nur kun frakasitaj membroj elirus, tio dependis nur de la nombro de falintaj kradoj.

Pasis foje kvin vaĉoj sen la falo de eĉ unu krado. Sed la kradoj ja ankaŭ elbrulis, kaj ni devis anstataŭigi ilin per novaj, ĉar alie la fajroj trafalus en la cindrejon. De tempo al tempo oni havis tioman bonan ŝancon, ke ĉe la enmeto de nova krado nur unu najbaro kunfalis, kaj ke oni sukcesis trakti kun pacienco kaj sango tiel delikate tiujn du kradojn, ke pliaj ne falis. Sed kompensis tion poste des pli kruelaj ekzamenoj, dum kiuj ne nur ses falis, sed ok, kaj ne nur en unu fajrokanalo, sed en du aŭ tri en la sama vaĉo. Vere, ni ricevis nenion donacite. Kiam ni alstiris la Oran Marbordon, ni envenis en ŝtormon, kaj kian ŝtormon! Laŭdu Dion en la alto kaj blovu al mi la trumpetojn! Kia vetero! Ĉe tio portu foje la kruĉojn kun supo kaj tajlora gulaŝo sen karambolo tra la mezŝipo al la kajuto. Laborsapo kaj benzino! Tion oni devas lerni.

Kaj nun la cindrolevadon. Jen oni do elkroĉis la pezan cindrokruĉon kaj portas ĝin varma inter la brakoj sur la ferdekvojo al la cindroŝakto. Sed antaŭ ol oni alvenas tie kun la amata kruĉo, Jorike ruliĝis kaj oni retroflugas kun la aminda plenigita kruĉo laŭlonge de la tuta ferdekvojo kaj rekte ĝis la alferdeka eskalo. Se Jorike pobe hufobatas, oni surplankiĝas kun la ankoraŭ nun firme braktenata cindrokruĉo sur la antaŭferdekon, se Jorike antaŭe montras la nudajn femurojn, oni brue glitas kun la kruĉo al la pobo kaj ruliĝas sur la tuta poba ferdeko

antaŭen kaj malantaŭen, kaj la Unua Oficiro krias de la ponto malsupren: "Hej, subhejtisto, se vi emas salti maren, faru tion, neniu retenos vin, sed la cindrokruĉon bonvolu lasi ĉi tie. Tiun vi ne bezonos, kiam vi kaptos fiŝojn."

Tiam ankaŭ sube ĉe la kaldronegoj estas multe pli agrable ol en aliaj tempoj. Ĝuste, kiam la hejtisto volas surĵeti per bone ekzercita svingo ŝovelilplenon en la fajron, li subite turnas sin kaj ĵetas la ŝovelilplenon da karboj krake sur la vizaĝon aŭ inter la ripojn de la subhejtisto. En la sekvanta ŝipruliĝado li eĉ ne povas eksvingi la ŝovelilon, sed flugas kun ĝi en karbomonton, en kiu li malaperas, kaj el kiu li nur tiam elrampas, kiam Jorike denove tie ruliĝas.

En la holdoj, se estas supraj holdoj, kiujn oni povas ŝarĝi ankaŭ per kargo, estas eĉ multe pli da amuzo, ĉar oni havas pli da manovrospaco. Oni feliĉe amasigis ĉe la tribordŝakto ducent ŝovelilplenojn kaj ĵus komencas ĵeti ilin en la kaldronejan ŝakton.

Sed nun Jorike subite brue turniĝas baborden. Kaj la subhejtisto, lia ŝovelilo kaj la belaj ducent ĵetoj da karbo glitas sovaĝe kirliĝante baborden kaj suprengrimpas la babordvandon. Jorike nun laŭlonge etendiĝas, oni reakiras la ekvilibron kaj decidas enĵeti en la babordan ŝakton la ducent ŝovelilplenojn. Oni ĵus enĵetis la unuan, sed jen Jorike por ŝanĝo turnas sin triborden. Kaj la kir-

liĝanta miksaĵo kun la subhejtisto en la mezo brue ŝutiĝas triborden, de kie ĝi antaŭe venis. Sed nun oni superuzas la bonan Jorike. Oni ne longe meditas, haste enĵetas dek, dekkvin ŝovelilplenojn en la tribordan ŝakton, poste oni kuras ankoraŭ sufiĉe frue transen al la babordo, kaj kiam la lavango tie alvenas, enĵetas tuj denove kvindek ŝovelilplenojn en la babordan ŝakton, kaj tiam oni kuras kiel Satano triborden, kaj jam la lavango sekvis, nun oni tie enĵetas dekkvin ŝovelilplenojn en la ŝakton, kaj tiel oni manovras la karbojn antaŭ la kaldronegojn, se ili troviĝas en la supraj holdoj. Subhejtisto devas same tiel bone regi la navigadon kiel la ŝipestro, alie subhejtisto en certaj tempoj ne movus eĉ kilogramon da karboj antaŭ la kaldronegojn. Memkompreneble, la subhejtisto sur la tuta korpo estas bruna kaj blua, la nazo estas batita, la tibioj vundbatitaj, la manoj kaj brakoj parte senhaŭtigataj. Gaja estas la marista vivo, hoj hoj!

Kaj eĉ pli gaja estas, ke centoj da ŝipoj kiel Jorike, centoj da mortulaj ŝipoj veturas sur la sep maroj. Ĉiuj nacioj havas siajn mortulajn ŝipojn. La plej fieraj kompanioj, kiuj fanfarone flirtigas la plej belajn flagojn, ne hontas veturigi mortulajn ŝipojn. Por kio oni pagas asekurpremiojn? Ne por plezuro. Ĉio devas enspezigi profiton.

Veturas multaj mortulaj ŝipoj sur la sep maroj, ĉar estas multaj mortuloj. Neniam ekzistis tiom da mortuloj, kiom ekde la tempo, kiam la granda milito por la li-

bereco estis gajnita. Por tiu libereco, kiu altrudis al la homaro pasportojn kaj ŝtatanecajn konfirmilojn, por montri al la homoj la ĉiopovon de la ŝtato. La epoko de la tiranoj, la epoko de la despotoj, de la absolutaj regantoj, de la reĝoj, imperiestroj kaj de ties lakeoj kaj konkubinoj estas supervenkita, kaj la venkinto estas la epoko de pli granda tirano, la epoko de la landa flago, la epoko de la ŝtato kaj de ties lakeoj.

Levu la liberon al simbolo de religio, kaj facile pro ĝi eksplodos la plej sangaj religiaj militoj. Vera libero estas relativa. Neniu religio estas relativa. Malplej relativa estas la profitavido. Ĝi estas la plej malnova religio, ĝi havas la plej bonajn pastrojn kaj la plej belajn preĝejojn. Jes, sinjoro.

Ĉapitro 33

Se ili devigas labori vin, ĝis vi tro kaputas, por eĉ diri "pip", vi ne plu zorgas pri tio, kio okazas ĉirkaŭe. Okazu kio ajn, rapide en la litbenkon kaj dormi. Oni povas esti devigata labori ĝis tia laciĝo, ke oni ĉesas pensi pri rezisto, ke oni ĉesas pensi pri fuĝo, ke oni ĉesas pensi pri la laco. Oni fariĝas maŝino, oni fariĝas aŭtomato. Ĉirkaŭe ili nun rajtas rabi aŭ murdi, oni ne rigardas, oni ne aŭskultas, nur dormi kaj dormi kaj nenion alian.

Dormeme mi staris ĉe la balustrado kaj songis starante. Granda kvanto da felukoj kun strangaj pintaj veloj proksimis. Sed tio ne frapis la atenton. Ili ĉiam estis en la ĉirkaŭaĵo. Fiŝistoj kaj kontrabandistoj kaj aliaj kun aliaj negocoj, negocoj, pri kiuj oni eĉ ne aŭdacus pensi.

Subite mi skuis min kaj tute vekigis. Mi ne komprenis, kio tiel ekscitis mian atenton. Ŝajne estis potenca bruo. Sed kiam mi kutimiĝis al la ideo de bruo, mi konsciiĝis, ke ne bruo tiel frape vekis min, sed profunda kvieto. La maŝino ĉesis labori, kaj tio kaŭzas strangajn sentojn. Tage kaj nokte oni aŭdas la stamfojn kaj tondrojn de la maŝino, ĝi bruas en la kaldronejo kiel ruliĝanta tondrado, en la holdoj kiel obtuza peza martelado, kajute kiel

turniĝanta rasla anhelado kaj pumpado. La bruoj rampas en la karnon kaj cerbon. Oni sentas ĝin en ĉiuj fibroj de la korpo. La tuta korpo estas regata de la kruda stamfado. La tuta homo enfalas en la ritmon de la maŝino. Oni parolas, manĝas, legas, laboras, aŭdas, vidas, dormas, vaĉas, pensas, sentas kaj vivas en tiu ritmo. Kaj subite la stamfado de la maŝino ĉesiĝas. Oni perceptas strangan doloron. Oni sentas vakuon en si, kvazaŭ oni fulmrapi-de veturus lifte malsupren. La tero sinkas de sub la piedoj, kaj oni havas la senton, kvazaŭ la suba parto de la ŝipo elfalis, pro kio oni sinkas ĝis la fundo de la maro.

Jorike ekhaltis kaj balanciĝis facilmove sur la glata kvieta maro. La ĉenoj tintadis kaj la ankro falis.

Stanislav tiumomente alproksimiĝis kun la kafokruĉo.

"Pippip," li vokis kaj diris mallaŭte, "nun ni devos saltadi antaŭ la kaldronegoj, hoj diablo! Ni devos suprenĉasi la premon ĝis cent naŭdekkvin."

"Ĉu vi frenezas, Stanislavski?" mi diris. "Jen ni tuj flugos sen interrompo ĝis la siriuso. Jam ĉe cent sepdek niaj intestoj tremas."

"Tial mi ja tiom ofte, kiom eblas, ferdeke promenas," Stanislav rikane diris. "Tiam oni ne kuros unue kelkajn fojojn per la kranio kontraŭ la feroplafonon. Oni tuj ekflugos kiel gumopilko, kaj antaŭ ol la ŝipfragmentoj sekvos, oni jam naĝos. Kiam mi vidis la felukojn, tiom suspektinde proksimajn, mi amasigis kiel freneziĝinto pro-

vizon, por ke mi havu la okazon tre ofte veni supren. Al la hejtisto mi diris, ke mi havas lakson. La venontan fojon vi devos elserĉi ion alian, ĉar ĉiufoje oni ne povas rakonti la saman kanabosemon — alie li eble mem venos supren kaj gustos la amarajn oranĝojn.”

”Pri kio temas?”

”Nu, vi estas naiva ŝafo. Ili kaŝe marĉandas ion. La ŝipestro enpoŝigas la procentojn por la asekurpoliso. Azenon tian, kia vi estas, mi ne vidis en mia tuta vivo. Sur kio ni laŭ via opinio veturas?”

”Sur ĉerkveturilo.”

”Almenaŭ tio jam klaras al vi. Sed ili ja ne sen muziko tombigos tian ĉerkon. Tion ja ne imagu. La Jorike estas finita. La mortatesto jam kuŝas ĉe la kompanio, ili nur ankoraŭ devas enskribi la daton. Nu, kaj pripensu, amiko, se oni jam ludas sur la lasta violonkordo, tiam vere ĉio estas kiko kaj kakto. La Jorike povas fari ĉion, kio plaĉas al ŝi, ŝi ne plu havas esperon, ŝi troviĝas sur la mortolisto. Ŝi povas riski ĉion, ĉu vi komprenas? Rigardu supren al la lanternkorbo. Jen pendas la maato kun la prisma tubo kaj observas, ĉu la aero estas klara. Tiam vi foje povos observi kiel Jorike ekvostumos, amiko, la olda eluzita damo en la unua kvarono de horo faros tian salton, ke vi skuiĝos pro timo ĉe tiu vaporpremo. Aŭ supren sur la lunon aŭ al la alta maro kun tridek kvin mejloj hore. En tiu stato observu Jorike. Post tridek

minutoj ŝi fajfas kaj anhelas el ĉiuj butontruoj kaj havos astmon dum kvar semajnoj. Sed ŝi eliris. Kaj tio estas la plej grava afero. Sed nun mi devas iri malsupren. Mi tuj revenos, kiam mi estos enŝovelinta kelkajn ĵetplenojn, kaj poste mi denove iom promenos ferdeke.”

Kutime ni veturis kun premo de cent kvindek, ankaŭ kun cent kvindek kvin, se Jorike devis batali kontraŭ ŝtorma vetero. Cent sesdek signifis: Atentu. Cent sesdek kvin: avertu! Cent sepdek: danĝero! Ĉe tiu premo ŝi blove elfajfis kun tia hurlado, ke la suko en la ostoj teruriĝis. Por elpeli el ŝi la ploremon, nun la larmglandoj estis fermŝraŭbitaj. Se ŝi emis, ŝi povis plori internen, povis larmi pri sia terura sorto kaj malgaje rememori tiun tempon, kiam ankaŭ ŝi estis honesta ruĝvanga virgulino. Ŝi travivis ĉiujn stadiojn de aventurema ino en sia longa, riĉa vivo¹. Ŝi dancis sur brilaj baloj, kie ŝi estis la reĝino

1. Ŝi travivis ĉiujn stadiojn de aventurema ino . . . : Georg Forster, la radikala demokrato (vidu pri ĉapitro 31) en la sama artikolo: "La homaro kuŝis kiel trovita infano ĉe la mamoj de la kompatema nutristino, kies sanaj sukoj kaj amriĉa flegado donis kreskon kaj prosperon al ĝi, sed riĉo, altrango kaj abundo flamigis la voluptajn sentojn de la juna ino; malĉastigite malĉastante la flatulino baldaŭ ludis kun kronoj, dume ŝi tenis sian duonfilinon en severa servopreteco. Lastfine, sur la lasta ŝtupo kiel senhonora oldulino misformita al monstro, ŝi fariĝis la sklavino de siaj unuaj malĉastigintoj kaj deziris diskuti kun tiuj la liberecon, la junecon kaj la senkulpecon de plenkreskinta virgulino.”

de la festo, kaj kie la plej belaj viroj klopodis svati ŝin. Plurfoje ŝi edziniĝis, forkuris de siaj edzoj, retroviĝis en aĉaj hoteloj, tridekfoje eksedziniĝis, ree havis feliĉon kaj reakceptiĝis en la societo, ŝi faris pliajn petolaĵojn, dum kelka tempo fordonis sin al la drinkemo kaj kontrabandis skotan viskion al Norvegio kaj al la krabotruoj ĉe la bordo de la ŝtato Maine², kaj nun ŝi fariĝis finfine bordelpatrino, testament-intrigulino, venenmiksistino kaj anĝelfaristino³. Tiel profunde povas sinki virino, kiu devenis el tre nobla familio, kiun oni provizis per bonega edukado, kaj kiu eniris la vivon kun silkaj jupetoj kaj robetoj. Sed la malfeliĉo de multaj belaj virinoj estas, ke ili ne scipovas morti en la ĝusta tempo . . .

La kargolukoj estis malfermitaj, kaj oni trafosis diligente la intestojn de Jorike.

La felukoj jam proksimis, kaj du el ili haltis ŝipflanke kaj tie estis firmligataj. Sur la felukoj troviĝis marokaj fiŝistoj. Tiuj grimpis kiel katoj sur la ferdekon. La kargomastoj estis starigitaj kaj komencis labori, ŝrike grin-cante. Tri marokanoj, kiuj portis la vestaĵojn de fiŝistoj, sed spite al tio ne similis al fiŝistoj, kaj kiuj aspektis prudentaj kaj inteligentaj, iris kun la Dua Oficiro al la kabineto de la ŝipestro. La oficiro ree elvenis kaj kontrole observis la kargadon. La Unua staris sur la ponto kaj

2. ŝtato Maine (angle): la usona ŝtato Maine

3. anĝelfaristino: abortistino

direktis la okulojn ĉien, al la horizonto, sur la akvon, al la ŝipo. Ventroflanke sub sia zono li portis pezan Browning-pistolon.

"Ĉu la aero klaras, maato?" li kriis supren al la masto.

"La aero klaras, *aye, aye, Sir*⁴."

"*All right! Keep on!*"⁵

La kestoj svingiĝis gaje tra la aero, kaj malsupren en la felukojn. Tie aliaj marokanoj kun lertaj manoj rapide laboris, stivante la kestojn sub la kargojn de fiŝoj kaj fruktoj. Kiam feluko estis ŝarĝita, oni malligis ĝin, kaj ĝi forveturis. Tuj alremis alia, alligiĝis kaj transprenis la kargon.

Ĉiu feluko, kiu ricevis la kargon, puŝite disiĝis de la ŝipo, hisis la velojn kaj forflugis. Ĉiu velis en alia direkto. Kelkaj en tiu direkto, kie firma tero nur estus, se ili volus veli ĝis Ameriko.

La Dua Oficiro tenis notblokon kun enŝovita karbo-papero kaj krajonon. Li kalkulis la kestojn. Poste marokano, kiu ŝajne laboris kiel kargestro, vokis nombron al li, la oficiro revokis la saman nombron kaj poste notis ĝin. Ankaŭ la kargestro priskribis paperfolion. La nombrojn ili vokis angle.

Finfine oni ne plu tiris kestojn supren kaj fermis la lukojn. La lasta feluko, kiu transprenis kargon, estis jam

4. *aye, aye, Sir* (angle): Jes ja, sinjoro

5. *All right! Keep on!* (angle): Bone! Daŭrigu!

tre fora. La unuajn oni ne plu vidis. Ili aŭ malaperis post la horizonto aŭ nebulo vualis ilin. La aliajn oni vidis ĉirkaŭflosi diversdirekte kiel pecetoj de blanka papero.

Plia feluko, la lasta, ĉi tie videbla, estis firmligita ŝipflanke. Ĝi ne transprenis kargon. Ĝi transportis nur fiŝojn.

La tri marokanoj, kiuj troviĝis ĉe la ŝipestro en la kabinejo, nun elvenis kun li. Ili ridis kaj interbabilis. Tiam la tri viroj adiaŭis lin per grandaj belaj gestoj de la brakoj kaj manoj, malsuprengrimpis per la ŝnurŝtupetaro, eniris sian ŝipeton, depuŝiĝis, kaj hisis la velojn, oni superentiris la ŝnurŝtuparon, la ankroĉeno tintadis, kaj Jorike plenrapide ekveturis.

Post proksimume dek minutoj la ŝipestro elvenis sur la ferdekon:

”Kiom da mejloj for?”

”Ses for de la bordo.”

”Brave. Ni do eliĝis, ĉu?”

”Jes, sinjoro!”

”Venu matenmanĝi. Ni lavu iom la gorĝon. Informu la stiriston pri la kurso kaj poste venu.”

Tiel la fantoma okazaĵo finiĝis.

Sed la fantoma okazaĵo postlasis ion. Ni ĉiuj ricevis grandan postŝtorman matenmanĝon. Rostitajn kolbasojn, ŝinkojn, kakaon, rostitajn terpomojn kaj po gorĝo akvoglasojn da rumo verŝitan en niajn ladotasiojn. Tiu

postŝtorma matenmanĝo estis la buŝplastro por ni. La buŝplastro por la ŝipestro aspektis alia. Tion oni ne povis manĝi, oni devis meti ĝin en la monujon.

Sed ni eĉ tiel jam kontentis. Ni estus veturintaj en la inferon kun la ŝipestro, se li estus dirinta: "Ek, viroj!" Kaj eĉ ne ŝraŭboj por poleksoj estus povintaj eltorturi el ni tion, kion ni vidis.

Ni vidis nur, ke lagro de la maŝino varmegiĝis, ke ni devis ankri ĝis la difekto estis riparita, kaj ke, dum ni ankris, felukoj alvenis, kiuj intencis vendi fiŝojn kaj fruktojn al ni. La kuiristo aĉetis fiŝojn por du manĝoj, kaj la oficiroj aĉetis ananasojn kaj freŝajn daktilojn kaj oranĝojn.

Ni povas ĵuri tion, ĉar ĝi estas la vero, jes, sinjoro.

Tiel bonan kapitanon oni ne perfidas, ne, sinjoro.

Ĉapitro 34

Se oni ne devas labori ĝis renversiĝo, oni tuj okupiĝas pri aliaj aferoj kaj ŝovas sian nazon en aferojn, kiuj tute ne interesu nin, kiuj kondukas nur al ideoj kaj pensoj, kiuj devas pereigi nin, se ni dorlotas kaj karesas ilin. Maristo, restu ĉe via rudro kaj ĉe via farbopoto; tiel vi ĉiam estos brava maristo kaj honesta viro.

La inĝeniero lasis malfermŝraŭbi karboholdon proksiman al la kaldronegoj, ĉar ĝi estu uzata por kargo. Nun ni povis plenigi bele kaj kvazaŭ lude facile la karboŝaktojn de la kaldronejo. Kaj kiam ni estis plenigintaj ilin, kiam la holdo vakis kaj Jorike transprenis la kargon, komenciĝis paradiza tempo. Ĝi daŭris nur tri tagojn, poste la ŝaktoj denove bezonis karbon, sed tamen estis belaj tagoj, tute neforgeseblaj.

La tagoj de la galersklavoj, kiam ĉiuj veloj estas hisitaj kaj oni nur boardas sencele. Ili restas alkatinitaj, por ke ili ne malkutimiĝu, ili estas plu skurgataj, por ke ili ne perdu la senton kaj ne ekpensu pri ribelo; ili devas plu labori, por ke la muskoloj ne senfortiĝu. Sed foje kaj foje ili rajtas ripozi kaj rajtas lasi fali la kapon sur la remilojn, ĉar sub la plenaj veloj la elmetitaj remiloj bremsus kaj

ne efikus laŭdirekte. Ankaŭ la plenaj kaldronŝaktoj povis bremsi, se oni ne enmetis paŭzon, kaj la karboj povis tiom ŝtopi la kaldronejon, ke la hejtisto ne povis labori kaj eble eĉ incendio ekflamus.

Ankaŭ la kargotranspreno okazis surmare. Tio certe estis ie ĉe la bordo de Portugalio; ĉar la boatistoj parolis portugale. Okazis simile kiel la kargotransdono pli sude ĉe la bordoj de Afriko.

Ankaŭ ĉifoje unue venis sur la ŝipon tri viroj, kiuj aspektis kiel fiŝistoj, sed ne estis marokanoj. Ankaŭ ili iris kun la ŝipestro en ties kabineton. Oni enkargis, oni vokis angle nombrojn kaj skribis arabe. Poste la boatoj kun siaj fiŝaj kaj oranĝaj kargoj retiriĝis ĉiudirekte. Laste ankaŭ la tri viroj eniris sian boaton kaj forveturis.

Ĉifoje ni ne ricevis grandan postŝtorman matenmanĝon, sed nur kakaon kaj kristnaskan kukon kun sekaj vinberoj. Ni ja nun ne havis ion por ĵuri.

”Ja kion ĵuri?” diris Stanislav. ”Se iu venus kaj levus la lukon, enrigardus kaj vidus la kestojn, kion vi povus ĵuri? Vi ne bone povas ĵuri, ke tie ne estas kesto, se la viro metis manon sur la keston. Sed tiam vi eĉ ne havus la okazon ĵuri. Jen la kestoj kaj fino. Tiukaze nur la ŝipestro povus ĵuri, kien li intencas veturi kun la kestoj. Kaj tiu ja ĵurus ion al ili, tio estas tiel certa kiel la skorioj en la kaldronejoj.”

Nun mi kaj kompreneble ankaŭ Stanislav havis agrablajn vaĉojn. Post la eltirado de la skorioj ni elprenis la cindron el la cindrejoj, poste mi levis la antautukon de la karboŝakto, kaj tuj la kaldronejo plenigis sin, inkluzive la rezervan provizon.

En tiu tempo en nokta vaĉo mi iom rampumis en la ŝipaj intestoj. Kelkfoje oni trovas sufiĉe agrablajn aĵojn. Nuksojn, oranĝojn, tabakfoliojn, cigaredojn kaj alion. Kelkfoje oni devas malfermi la kestojn kaj rigardi, ĉu enestas novaj ĉemizoj aŭ botoj aŭ sapo. Moralon ili ja nur tial instruas al ni, por ke tiuj, kiuj havas ĉion, plu posedu tion kaj eĉ ricevu ĉion ceteran aldone. La moralo estas la butero por tiuj, al kiuj mankas la pano.

Oni devas nur bone refermi la kestojn kaj ne tuj vesti sin per la ĉemizo aŭ la botoj. Se suspekto leviĝas, oni prefere vendas ilin en la venonta haveno. Ĉiu aĉetos. La maristo postulas malmulton. Li ja ŝparas la luprezon por la magazeno kaj tial povas vendi sub la fabrikprezoj.

Elspezojn ankaŭ ni havis. Ne estas tiel facile veni ĝis la kestoj. Oni devas esti serpentohomo. Tion mi lernis. Ĉiutage plurfoja trejnado; se oni ne plu penis, oni tuj sentis tion je la brogitaj brakoj kaj la rostita haŭto sur la dorso. Komplikaĵoj ankaŭ en la kargoholdoj ekestas, kiam oni tie barakte moviĝas kaj serĉas la varon por povi transpreni ĝin. Jen eble kesto forglitas, kelkaj aliaj postglitas, kaj jam oni sidas en la kaptilo aŭ fariĝis kaĉo.

Lampon oni ja ne havas, sed vaksalumetojn, per kiuj signalo al la varoj la ĝustan vojon.

Jorike ne transportis aŭtentikajn varojn, ĝi veturigis varojn senvalorajn. Malnovajn ŝraŭbojn asekuritajn kiel spicitan bovaĵon. Tamen, tiuj en- kaj elkargadoj ne lasis trankvila mian negocan senton. Tio ne estis malnovaj ŝraŭboj kaj ankaŭ ne cementaj plomboj. Mi konas la marokanojn, ili ne interesiĝas pri ŝraŭboj kaj bakita cemento. Krome mi vidis, ke nur unu savboato ne likas kaj, ke la oficiroj havas bonan rilaton kun la ŝipestro. La du oficiroj pretendis la boaton du; ili ne rajtis eniri en la boaton unu, ĉar tiukaze, eksciinte, pri kio temas, oni mortbatus la kapitanon kaj la oficirojn. Duan boaton ili certe devus pretigi. La du aliajn boatojn enirus ja la maato kaj la rudristoj, la kaldronobando kaj inĝeniero. Se la Dua Oficiro enirus ĉe la ŝipestro en la boaton unu, tio ne altirus ies atenton, sed ambaŭ oficiroj ne rajtis eniri. Do, ĝis la boato du ne estus riparita, al Jorike nenio malbona povis okazi. Se tamen io malbona okazus al ĝi, temus pri vera akcidento, kaj ĉiuj povus iri en la boaton unu. Kiu ne trovas lokon, tiun oni elĵetus. En tiu kazo ĉiuj manoj ekas labori. Ankaŭ ne necesus sanktigi atestantojn, ĉar ĉiu, kiu hejmenvenas, estas bonega atestanto, ĉar estis vera entombiĝo; la asekurmonon eĉ muso ne povus ronĝi.

La boato du sekve estis por mi la signalo de la entombiĝo. Ĝi estis ankoraŭ tiel seka, ke ĝi povus ekflami, sekve Jorike ankoraŭ havis aliajn, aŭtentikajn varojn surŝipe, kaj ne nur tute mortajn. Kvankam estis kamuflokestoj, mi ja volis scii, kion ĝi portis stomake. Scienco foje donas profiton.

Jen mi jam troviĝis en la kargoholdo kaj rigardis la kestojn.

”Garantiite aŭtentika ŝvaba prunkaĉo
Garantiite puraj fruktoj kaj sukero
Sen aldonita koloraĵo.
Unua ŝvaba prunkaĉa fabriko Akc. Soc.¹
Oberndorf ĉe N.”

Ni estas grandaj azenoj. Ni voras la ŝmirsapon nomatan margarino, kaj ĉi tie kuŝas tavolo staplita la plej bela ŝvaba prunkaĉo. Ho, Stanislav, mi opiniis vin inteligenta viro, sed vi estas ja la plej granda ŝtipkapulo sur nia planedo.

Tio estis mia unua penso, Stanislav ĉiufoje tiom fanfaronis, li ĉiufoje tiel saĝe parolis kaj ĉion sciis, kien Jorike iras, kaj kien ne. Sed la prunkaĉon li tamen ne malkovris.

Malfermi kestojn estas infanludo por homo kutimiĝinta. Delikataj grandaj skatoloj. Jen festeno por mor-

1. Akc. Soc.: Akca kompanio

gaŭ, dike ŝmirita sur la varma pano. La akvo fluis en mia buŝo. Garantiata puraj fruktoj kaj sukero. Neniu surogato el la germana napa tempo. Puraj fruktoj kaj sukero. La marokanoj scias ja, kio bone gustas. Tio estas pli bona ol daktiloj kaj sekaj vinberoj, la ŝvaba prunkaĉo el la unua prunkaĉa fabriko. Per la ĉizilo, per kiu mi malfermis la keston, mi nun tuj malfermis ladujon. Mi antaŭe jam rampis kun du laduoj al la karboholdo, kie mi povis lumigi senzorge mian lampon. Neniu povis suprenveni al mi, ĉar mi fortiris la tabulon, kiu kuŝis sur la du transversaj fertraboj kaj kondukis al la holdoluko. De la inĝenieroj neniukaze iu irus sur la tabulo, ĉar tio postulis kuraĝon. Tre forta la tabulo ne estis, kaj ĝi ankaŭ ne estis nova. Ĉu ĝi hodiaŭ aŭ nur morgaŭ disrompiĝos, ne estis decidite. Kaj se ĝi rompiĝus, aŭ se oni irante sur la tabulo perdus la ekvilibron pro neatendita ruliĝado de Jorike, oni falus dudek paŝojn malsupren en la kaldronejon kaj survoje rompus sin la kranion, se oni havus fortunon. Se oni havus fortunon, estus finfine egale, ĉu oni kaptis unu aŭ dek kraniajn rompiĝojn. Sed pli sekure estas pli sekure, mi pensis, kaj tial mi fortiris la tabulon. La ladujo malfermiĝis. Ne estis kamuflovaro, mil diabloj. Estis efektive garantiata pura prunkaĉo. Videble mi atendis oropolvon, ĉar mi tiel miris. Tion mi ne supozis pri la Jorike. Ĝi veturas fidindajn aŭtentikajn varojn. Kaj mi suspektis la kompatindan damon je tio, ke ĝi menso-

gas deklarojn kaj transportas kamuflovarojn. Oni neniam tro haste juĝu, se temas pri damoj. Oni ne tro haste juĝu, se temas pri . . .

Ĉu ĝi bone gustas? Gustas sufiĉe bone. Gustas . . . nu . . . nu . . . atendu iom . . . ĝi gustas iom rance. Ne, ĝi gustas kiel . . . kiel, nu, kiel ĝi gustas, fulmotondro?! Ili enmetis kuprerojn, tiuj porkoj! Ili enmetis kupromonerojn, por ke la prunoj konservu la koloron. Garantiante sen aldona koloraĵo. Ne estas koloraĵo, sed gustas tiel. Mi foje gustumu. Ja diable, ĝi gustas kiel verdigro, tute kiel latuno. Tion mi ne povas manĝi surpane. Mi ne povus liberigi min de la gusto. Ĝi tiel acidas, ke ĝi penetras la langon kaj gluiĝas al la palato.

Eble ĝi nur supre tiel aĉas. Mi metu la fingron pli profunden en la marmeladon! Kio tio estas? Jen ankoraŭ enestas ĉiuj prunkernoj. Tio estas ja stranga marmelado. Ŝajnas esti laŭ la aŭtentika ŝvaba maniero, ke oni lasas ĉiujn kernojn interne.

Nu? Kaj kio tio estas? Tio estas ja kuriozaj prunoj, tiuj veraj ŝvabaj prunoj. Ili havas tre misterajn kernojn. La kernoj estas ja el plumbo, efektive el plumbo. Kaj por ke la plumbon ne trafu damaĝo, ĝi havas blankan ŝtalkingiron. Kaj ĉiu kerno sidas sur latuna ingo. Pro tio do la latuna gusto. Kaj en la ingoj, kio enestas? Sukero. Delikata sukero. Ĝi certe estas ŝvaba sukero. Nigra kaj tute

sale gustanta. Garantiata puraj fruktoj kaj sukero. Delikata kamuflovaro. Oni ne tro haste juĝu, Jorike . . .

Poste mi entreprenis mian duan vojaĝon. Muskaptiloj. Ke la marokanoj estus tiel avidaj je muskaptiloj, tion mi ne kredis. Estis efektive muskaptiloj en la kestoj. Sed kiam mi serĉis la kernojn, mi trovis ne muskaptilojn sed musojn kun "r" je la fino. Germane: Mauser².

Jen estis kestoj kun infanludiloj. "Ladaj aŭtomobiloj kun restreĉeblaj risortoj." Mi ne serĉis la kernojn kaj ŝparis al mi la penon, ĉar la ladaj aŭtomobiloj kun restreĉeblaj risortoj venis el "la plej olda ludilfabriko de Suhl."³ Sed Anglio estis multe pli bone kaj pli komplete reprezentita ol Belgio kaj la najbaraj regionoj. Belgio kontribuis sukeraĵojn kaj Anglio kaserolojn el stanita ferolado. La marokanoj tute pravas. Hispanio al la hispanoj. Francio al la francoj kaj Ĉinio al la ĉinoj. Ni ne enlasas ĉinojn. Sed, se tiuj ne enlasas nin, tiukaze nia ruĝa-blanka-blua hura-hura-hurao! estas makulita, kotŝmirita, surfekita kaj oni devas ellavi ĝin per sapo kontraŭ sangomakuloj, jes, sinjoro.

Hej, ŝipestro, vi povas fidi al mi. Vi faras la profiton, kaj mi havas la favoron de Dio.

2. Mauser (germane): germana pistolo

3. Suhl: malgranda urbo en Turingio, kiu havas famon pro la produktado de ĉas- kaj sportarmoj

Ĉapitro 35

Stanislav, diru foje, kial vi ĉiam tiel avide voras la margarinon? Ĉu vi tute ne hontas?"

"Kion fari, Pippip? Unue mi malsatas, kaj due mi ja ne povas boligi miajn ĉifonojn kaj dikigi la sukon, kaj poste ŝmiri ĝin kvazaŭ marmelado sur la panon. Ion alian mi ja ne havas por ŝmiri. Kaj ĉiufoje gluti nur la sekan panon, amiko mia, de tio oni ja tute obtuziĝas en la kapo. De tio oni ricevas ja betonfundamenton en la stomako."

"Vi estas efektive stulta," mi nun diris, "ĉu vi scias, ke ni enkargis marmeladon?"

"Kompreneble mi scias tion," diris Stanislav, trankvile plu maĉante.

"Kial vi ne konfiskas keston?" mi demandis.

"Tio ne estas marmelado por ni."

"Sed kial ne?"

"Tiu taŭgas nur por marokanoj, hispanoj kaj francoj, kaj kompreneble por la liverantoj. Sed por ni, por vi kaj por mi, tio ne estas marmelado. Vi ne povas digesti ĝin. Tiun vi povas digesti nur, se oni pafas ĝin tra viaj ripoj. Sed tiam vi kaptos laksan kuremon, vi tuj kuros tiom

rapide, ke vi ankoraŭ sufiĉe frue atingos vian praavon kaj kuniros kun li.”

Ĉu li eble jam . . . ?

Tuj elkrevis el mi: ”Ĉu vi eble jam scias, kio tie enestas? Vi ja ne eble jam . . . ?”

”Enrigardis, ĉu? Kia granda azeno vi supozas min? Diru. La tri nobeloj ankoraŭ troviĝis ĉe la ŝipestro en la kabineto kaj supre oni ankoraŭ fermis la lukon, por ke neniu povu observi, kaj jen mi jam malfermis keston. Mi devas ja nur legi prunkaĉo aŭ marmelado aŭ dana butero aŭ spicita bovaĵo aŭ olesardinoj aŭ ĉokolado, kaj jam mi ekzamenas la kazon.”

”Sed tie vere prunkaĉo enestas,” mi rediris.

”Ĉiam io enestas. Sed tion vi ne povas manĝi. Tio gustas tro verdigre. Vi mortus pro toksiĝo de via sango. En la lasta veturo, antaŭ ol vi alvenis, ni havis spicitan bovaĵon. Kompreneble same kamuflovaro, sed mi detiris la haŭton ĝisfine, tion mi povas diri al vi. Estis vera ĝojo. Neniu manko. Ĝi enestis en grasita pergameno. Foje oni ja havas fortunon. Bonaj usonaj varoj. Ili iris al Damasko aŭ al ie tie.”

”Kaj kiel la ostoj estis?”

”La ostoj, ĉu? En la spicita bova . . . ? Ha, tiel, la ostojn vi celas. Estis kraboj, karaboj. Karabenoj. *Made in USA*. Altkvalita modelo. Jen la ŝipestro fiŝis pezan predon. Jen ni ricevis konjakon, bovaĵon, kokaĵon kaj

freŝajn legomojn. Jen ne nur la buŝo, sed ankaŭ la gapi-
loj kaj la flarilo bezonis plastron. Franca ĉasŝipo atingis
nin antaŭ ol ni elestis. Ili spionis, abunde disdonis ciga-
redojn kaj frankojn. Sed ili devis retiriĝi, riverencante al
la ŝipestro.”

”Ĉu neniuj elfajfis ion pro la subaĉetaĵoj?”

”Ĉe ni? Sur Jorike? Ni ĉiuj estas koto kaj ne plu havas
ion por diri. Ni estas mortaj. Ankaŭ vi. Nu, pripensu
foje, rigardi en ies monujon aŭ en ies vitroŝrankon aŭ
malfermi kestojn en remizo aŭ sur Jorike, kaj krome ĵeti
martelon al la kranio de la Dua kaj Unua, ĉio ĉi estas
afero pri honoro. Tiel vi ĉiam tenas supre vian kapon,
tiel vi ĉiam konservas vian grumblon, vian fieron. Sed
fajfi ĉe la polico aŭ helpi ĝin eĉ nur per fingropinto, tio
estus fia. Tiukaze vi ne plu povus rigardi en la proprajn
okulojn. Se ili volas ion, lasu ilin fari. Sed vi estas ja kna-
bo honesta, tia ne purigas la okulvitrojn de tiuj uloj. Pre-
fere mi mizere mortos kun kaj sur Jorike, ol interŝanĝi la
lokojn kun policisto.”

Ni troviĝis sur rodo de la portugala bordo por enpreni
alibian kargon kaj por liberiĝi de la tiklaj varoj. Jorike
estis subite trafita de suspekto. Tial la ŝipestro akceptis
nur aŭtentikajn varojn kaj deklaris ilin tiel precize, ke eĉ
punkteto ne estis pridubebla. La kargo preskaŭ nenion
kostis, ĉar neniuj konfidis multekostan kargon al Jorike.
Ne tiu, kiu konis ĝin. Sed ekzistas ja tiom da varoj, kiuj

en si mem ne prezentas apartan valoron, kiuj tamen estas transportendaj kaj tamen tro bonaj por veturi nur kiel balasto. Valoron tia kargo ekhavas nur tiam, se ĝi atingis la celon.

Post la kvina posttagmeze ne plu estis laboro por ni, kaj la laboro rekomenciĝis nur je la sepa en la posta mateno. Jen la labortempo, kiam ni troviĝis rode aŭ kaje en haveno. La laboro en tiuj kazoj plej ofte estis malagrabla, sed ne tiom peniga kiel dum la veturo.

En tiuj tempoj okazis, ke ni povis foje kunsidi kelkajn horojn por babili trankvile. Ŝipo estas ĉiam sufiĉe granda por tio, ke oni povas sidi ie sen alpuŝiĝi kubute unu al la alia.

Kiom da personoj estis sur la Jorike, tiom da nacioj estis reprezentataj. Ĉiu nacio havas siajn mortulojn, kiuj vivas kaj spiras, sed por la nacio tamen estas mortaj por eterne. Kelkaj ŝtatoj tute malkaŝe havas siajn mortulajn ŝipojn. Tiujn mortulajn ŝipojn oni tiukaze nomas Fremdula Legio. Kiu transvivas ilin, eble per tio aĉetis novan vivon por si. Li akiris novan nomon, kiun oni konfirmas al li, kaj trovis novan lokon en nacio, kiel bebo ĵus naskita tie.

Ĉiujn komandojn sur Jorike oni ordonis angle, kaj ĉiuj interparoladoj okazis angle, ĉar alie neniu interkompreniĝo estus imagebla. Ĝi estis tre stranga angla lingvo. Nur la ŝipestro parolis puran seneraran anglan. Ĉiuj

ceteraj parolis ion, kio havis neniun rilaton al la angla lingvo. Ĝi estis la jorika. Lingvo por si mem¹.

Kiel la lingvo sonis kaj aspektis, estas nur pene pri-skribebla. Ĉiu maristo scias kelkdek anglajn vortojn. Kaj ĉiu scias tri ĝis ses vortojn, kiujn la aliaj ne konas, sed lernas pro la kunvivo surŝipe, se nur la angla estas parolata. Tiel ĉiu dum ioma tempo lernas ducent vortojn. Ducent vortoj, tiumaniere, sed nur tiumaniere lernitaj, kaj aldone la nombroj, la nomoj de la tagoj kaj monatoj en la angla, ebligas al ĉiu homo klare kaj certe esprimi ĉion, kion li volas diri en tiu rondo. Tutajn romanojn li povas rakonti per tiu vorttrezoro. Kompreneble li ne povas legi anglan libron kaj eĉ multe malpli anglan gazeton. Neniu alia lingvo en Eŭropo povas doni tiun avantaĝon al siaj lernantoj, ke oni tiel facile kaj rapide povas ekuzi ĝin en la vivo.

Sed antaŭ ol mi komprenis la jorikan kaj povis esprimi jorike min, pasis kelkaj tagoj. Se mi estus uzinta vortojn kaj vortkombinojn tiel, kiel mi aŭdis kaj postbabilis ilin ekde la tempo de miaj unuaj malsekaj vindoj, neniu sur Jorike, krom la ŝipestro, estus kompreninta min, kaj certe oni ne kredus al mi, ke mi parolas la anglan.

1. Lingvo por si mem: Ĝi havis sian propran lingvon . . . : "La laboristoj parolas aliajn dialektojn, havas aliajn ideojn kaj imagojn, aliajn morojn kaj moralprincipojn, alian religion kaj politikon ol la burĝaro. Estas du tute diversaj popoloj . . ." (F. Engels)

Kiel la jorika angla ekestis, kaj kiel la angla sur aliaj mortulaj ŝipoj ekestis?

La lingva konfuzo inter la anoj de diversaj nacioj veturantaj sur Jorike necesigis komunan lingvon. Ĉar ĉiu, kiu veturas eĉ nur kelkajn semajnojn, lernas kelkajn anglajn vortojn kaj tuj kunprenas aliajn, tial tute per si mem el tio sekvas la uzado de la angla kiel komando-lingvo kaj komuna lingvo.

Jen la vorto *First-Mate*, Unua Oficiro, kiun scias la plej multaj, kaj jen la vorto *money*², kiun scias ĉiuj.

Sed nun sekvas la vivanta evoluo, lingva evoluo tia, kia ĝi montriĝis ne nur sur Jorike, sed kia ĝi montriĝas en tutaj popoloj en ĉiuj tempoj.

La vorton *mate* oni prononcas en la okcidenta Londono tute alie ol en la orienta Londono, kaj la usonanoj prononcas okdek procentojn de la vortoj tute alie ol la angloj, kaj tre multajn ili ankaŭ tute alie skribas kaj uzas en tute malsamaj nociaj kombinoj.

La ĉarpentisto neniam aŭdis la vorton *First-Mate* en Anglio, sed de svedo, kiu aŭdis la vorton de maristo el la oriento de Londono. Jam la svedo mem ne povis elparoli ĝin ĝuste, krome li aŭdis ĝin en la aĉa *Petty-coat-lane*- aŭ *Cockney*- dialekto³, kiun li devis supozi la ĝusta

2. money (angle): mono

3. Pettycoat-lane aŭ Cockney dialekto: londona urbodialekto de la laboristoj.

kaj sole valida prononco, ĉar li aŭdis la vorton ja de anglo. Kiel la vorton nun elparolis la ĉarpentisto, tion oni eble povas imagi. Hispano kunportas la prononcon de la vorto *money*, dano kunportas *coal*, nederlandano *bread*⁴, polo *meal*⁵, franco *thunder*⁶ kaj germano *water*⁷.

La vorto *First-Mate* trairas ĉiujn fonetikajn evolustadiojn, kiujn homo povas produkti: *Feist-Moat*, *Fuerst-Meit*, *Forst-Miet*, *Fisst-Meet* kaj tiel plu laŭ la nombro de la homoj sur Jorike. Sed post ioma tempo la diversaj prononcaj nuancoj tiel ŝlifas unu la alian, ke ekestas unueca prononcmankado, en kiu ĉiuj sonnuancoj en malpli intensa formo retroviĝas. Nova alveninto, eĉ se li tute precize scias kiel ĝuste elparoli la vorton, ja eĉ se li estus profesoro de fonetiko en Oxford, devas elparoli ĝin jorike, se li devas porti al iu la ordonon, ke la *First-Mate* deziras vidi lin, ĉar alikaze la viro tute ne scius pri kio temas. La profesoro post ioma tempo tute ne rimarkus plu, ke li elparolas la vortojn jorike, ĉar li nur tiel aŭdas kaj encerbigas ilin. Se temas pri la vokaloj ne restas multo de la ĝusta prononco, sed de la konsonantoj restas sufiĉe, por tamen kompreni la vorton post plurfoja aŭskultado. Tiel do la lingvo skelete ĉiam restas la

4. bread (angle): pano

5. meal (angle): manĝo

6. thunder (angle): tondro

7. water (angle): akvo

angla kaj oni povas transpreni ĝin sur ĉiun alian ŝipon. Se ne estus la presarto, ekzistus tiom da tute memstaraj lingvoj kiom da dialektoj. Se la usonanoj ne havus la saman skriban lingvon kiel la angloj, la lingvo de tiuj du popoloj hodiaŭ tiel malsamus kiel la lingvoj de la nederlandanoj kaj germanoj.

La maristoj, se temas pri lingvo, neniam embarasiĝas. Al kiu ajn bordo ili estas ĵetitaj, ili ĉiam trovas vojon kaj kapablas komprenigi sin. Kaj tiu, kiu povas trasuferi kaj transvivi ŝipon kiel Jorike, tiun nenio plu povas terurigi, por tiu nenio maleblas.

Ĉapitro 36

Stanislav nur de mi kaj de la hejtistoj estis vokata Stanislav aŭ Lavski. Ĉiuj ceteraj, ankaŭ la oficiroj kaj inĝenieroj vokis lin polo, kelkaj polaĉo. La plimulton de la ŝipanaro oni vokis laŭ la nacieco: Hej, hispano aŭ ruso aŭ nederlandano. Kaj tio estis ironia ŝerco de la sorto. Ilia nacio kontestis kaj forpuŝis ilin, sed sur Jorike ilia nacieco estis ilia tuta individueco. Ĉiun, kiun oni intencas dungi por ŝipo, oni kondukas al la konsulo, al la konsulo de tiu ŝtato, sub kies flago la ŝipo veturas. La konsulo devas konfirmi kaj registri la dungon. Li kontrolas la paperojn de la maristo, kaj se la paperoj ne plaĉas al li, li rifuzas la registradon, kaj la viro ne povas dungiĝi. La dungiĝo antaŭ la konsulo devas okazi have, antaŭ ol la viro komencas la laboron.

Jorike tiumaniere neniam povintus dungi viron, eble eĉ ne inĝenieron kaj oficirojn; ĉar tiu, kiu havis laŭordajn paperojn, laŭ granda arko ĉirkaŭiris Jorike. Jorike fuŝis la plej bonajn paperojn de viro, kaj viro, kiu maldungiĝis sur Jorike, devis veturi dum unu aŭ du jaroj ŝipojn, kiuj trikvarone aŭ duone jorikecas, antaŭ ol li povis montri sin denove ĉe la ŝipestro de honesta ŝipo,

se efektive li sukcesis dungigi sur trikvarona Jorike. Eĉ sur tia ŝipo la ŝipestro estis suspektema. "Sur Jorike vi veturis? Kie oni serĉas vin? Do, kiun pekon vi krimis?" Tion diras la ŝipestro.

Kaj la viro diras: "Dungiĝo sur alia ŝipo ne sukcesis al mi, kaj tial mi akceptis Jorike por unu veturo."

"Mi ne emas al iu kaĉo kun la polico aŭ la konsuloj. Mi vere ne deziras, ke oni diru, ke sur mia ŝipo ili arestis el la ŝipanoj rabmurdiston serĉatan en Buenos Aires," tion diras la ŝipestro.

"Sed, ŝipestro, kiel vi povas diri tion? Mi estas tute honesta viro."

"Jes ja. Sed de Jorike. Mi ja ne povas postuli de vi, ke vi antaŭmetu al mi polican ateston pri bona konduto de ĉiu lando de la terglobo, kiu malnovas ne pli ol kvar semajnojn. Jen du ŝilingoj, por bona vespermanĝo, sed dungi vin? Tiun riskon mi prefere ne transprenos. Eble vi sukcesos sur alia ŝipo, jen ja amaso da ili ankras ĉi tie. Iru al la itala tie. Povas esti, ke ili ne tiel severe kontrolas."

La ŝipestro de Jorike povis iri kun neniuj el siaj ŝipanoj al la konsulo, verŝajne eĉ ne kun sia Unua Oficiro, kaj mi ne mirus, se li mem ne povus montri sin ĉe la konsulo sen tio, ke la konsulo tuj prenis la aŭskultilon kaj dirus al la ŝipestro: "Bonvolu sidiĝi, kapitano, nur momenton, poste mi estos je via servo."

Tiujn servojn la ŝipestro eble ne ĝisatendus, sed farus alion, for en la aŭton, supren sur Jorike, la ankron alten kaj forsagite per cent naŭdek kvin kaj fermŝraŭbitaj larmoglandoj.

Jorike kaptis ĉiujn ŝipanojn helpe de la Leĝo pri kazoj de urĝeco. Ili surŝipiĝis, kiam la Blua Petro estis entirita kaj la piloto jam ferdeke troviĝis. Neniu konsulo de la tero en tiu kazo postulus, ke la ŝipestro nun denove haltu kaj iru kun la viro al la konsulo. Tion eĉ multe malpli postulas iu havena instanco. Ja pli frue oni ne povis dungi la viron, ĉar neniu troveblis kaj ĉar oni ne sciis, ke iu maristo drinkis ĝis ebrio kaj elsaltis pobe. Tion oni rimarkis nur tiam, kiam la pilotsignalo estis fajfata, ke la viro ne estas sur la ŝipo.

Malofte sur Jorike iu rivelis sian ĝustan nomon¹ kaj sian ĝustan naciecon. Same malofte oni eksciis, sub kiu nomo kaj sub kiu nacieco iu dungiĝis. Se novulo alvenis, tiam aŭ la oficiro demandis lin aŭ la inĝeniero aŭ viro, do iu ajn, kiu la unua okupiĝis pri li: "Kiun nomon vi havas?" Al tio la demandito diris: "Mi estas dano." Tiel li respondis du demandojn kaj de nun oni nomis lin la

1. Nomoj: B. Traven estis eksperto pri la serĉado de taŭgaj nomoj. En la romano "Troza" li skribas: "Se oni havas nomon, kiu sufiĉe ofte aperas en policaĵ raportoj, juĝaj dokumentoj kaj prizonulaj listoj, oni, jam el la instinkto de memkonservo, agas certe bone, se oni deskuas la nomon kaj serĉas alian, kiu estas malpli konata kaj malpli eluzita."

dano aŭ nur Dano. Meti pliajn demandojn oni opiniis superflua. Oni sciis plej ofte aŭ supozis plej ofte, ke la daneco jam estas mensogo, kaj pliajn mensogojn de la viro oni ne celis. Se vi ne deziras, ke iu mensogu al vi, ne demandu lin.

Por pasigi tempon dum iu pigra vespero, kiam ni ne laboris, ĉar ni troviĝis en rodo kun la ŝipo, Stanislav rakontis al mi sian vivon kaj mi la mian al li. Mi rakontis ne mian veran vivon al li, sed nur iun rakonton. Ĉu li rakontis sian veran vivon, aŭ ne, tion mi ne scias. Kiel mi sciu tion? Mi eĉ ne scias, ĉu herbejo estas verda, eble ĝi estigas en miaj okuloj nur iluzion pri verdo.

Sed bonaj kialoj igas min kredi, ke la vivraporto, kiun Stanislav rakontis al mi, estas tute vera, ĉar ĝi tre similas al la rakontoj de ĉiuj vojaĝantoj sur mortulaj ŝipoj.

Lia nomo, kiun mi, kune kun lia tuta rakonto, ne rajtis elbabili sur la ladokesto, estis Stanislav Koslovski. Li estis naskita en Posen kaj tie ĝis la dekkvara jaro frekventis lernejon. Rakontoj pri indianoj kaj la maro forlogis lin, li fuĝis el la hejmo, venis al Stettin, kaŝis sin tie sur dana fiŝkutro kaj veturis sur ĝi al Fünen. Tie la fiŝistoj trovis lin preskaŭ morta pro frido kaj malsato en sia kutro. Li diris, ke li venis el Danzig, li prunteprenis de la librobindisto, ĉe kiu li kutime aĉetis la marrakontojn, la nomon kaj asertis ek de nun, ke ĝi estas lia nomo. Li rakontis plu, ke li estas orfo, ke la homoj lin adoptintaj,

tiel fie traktis kaj tiom multe batis lin, ke li saltis maren por dronigi sin. Sed ĉar li povas naĝi, li eknaĝis kaj kaŝis sin sur la kutro. Li finis sian rakonton kun larmoj en la okuloj: "Se mi devas reiri al Germanio, mi kunŝnuros miajn manojn kaj piedojn kaj tuj saltos en la maron. Sed al la adoptaj gepatroj mi ne reiros."

La edzinoj de la fiŝistoj ĉiuj kordisŝire larmis pri la malĝoja sorto de la germana knabeto kaj akceptis lin hejme. Ĵurnalojn ili ne legis, kaj certe oni ne skribis en danaj gazetoj, ke la knabo estas serĉata en la tuta Germanio, kaj ke la plej teruraj rakontoj rondiras pri tio, kio al la knabo verŝajne okazis.

Ĉe la fiŝistoj en Fünen li devis multe labori, sed tio plaĉis al li centoble pli bone ol en la stratoj de Posen; kaj se li pensis pri tio, ke oni intencis fari lin metilernanto ĉe tajloro, forlasis lin la lasta emo sendi eĉ signeton al siaj gepatroj, ke li plu vivas. La timo fariĝi tajloro estis pli granda ol la amo al la patro kaj la patrino, kiujn li ne malmulte hatis pro tio, ke ili intencis fari diligentan tajloron el li.

Deksepjara li forlasis la fiŝistojn kun ties benaj deziroj, por iri al Hamburgo kaj dungiĝi je granda veturo. En Hamburgo neniu ŝipo bezonis lin, kaj li laboris kelkajn monatojn ĉe velfaristo. Li registrigis sin laŭregule je sia vera nomo, ricevis sian invalidokarton kaj lasis finfine pretigi por si bonan germanan maristodokumenton.

Poste li komencis la grandajn veturojn sur honestaj germanaj ŝipoj. Tiam li ŝanĝis al nederlanda ŝipo. Kaj tiam sekvis la sanga danco ĉirkaŭ la ora bovideto. Kiam tio komenciĝis, li troviĝis kun la nederlanda ŝipo en Nigra Maro. En la hejmveturo la ŝipo pasis la Bosporon, kie la turkoj kontrolis ĝin, kaj lin kaj plian germanon ili kondukis el la ŝipo, kaj servis ilin en la turka militfloto, sub alia nomo, ĉar ili ne diris siajn ĝustajn.

Poste venis al Konstantinopolo du germanaj militŝipoj, kiuj antaŭe ankris en itala haveno kaj tie eskapis de la angloj, kiuj embuskis ilin. Stanislav venis nun sur unu el tiuj ŝipoj kaj servis plu sub la turka flago, ĝis li trovis oportunan okazon adiaŭi la turkojn.

Li trovis laboron kiel maristo sur dana ŝipo. La danan ŝipon traserĉis germana submarŝipo, kaj svedo veturanta sur la ŝipo, al kiu li rakontis, ke li ne estas dano, sed germano, perfidis lin al la oficiroj de la submarŝipo. Stanislav sendiĝis al Kiel, kaj tie oni metis lin sub falsa nomo en la germanan militfloton, kie li servis en la artillerio.

En Kiel renkontis lin alia kulio, kun kiu li veturis pli frue sur germana komerca ŝipo. Pro tiu la ĝusta nomo riviĝis, kaj Stanislav servis nun sub sia ĝusta nomo en la germana militfloto.

Stanislav ĉeestis, kiam proksime de Skagen du interbatalantaj nacioj, la angla kaj la germana, samtempe

venkis, kaj la angloj pli da ŝipoj perdis ol la germanoj kaj la germanoj pli ol la angloj. Danaj fiŝistoj en siaj boatoj elfiŝis lin el la maro kaj venigis lin en sian vilaĝon. Ĉar li scipovis rilati kun danaj fiŝistoj, kaj ĉar tie estis frato de tiu virino, kiu en Fünen hejme akceptis lin, la fiŝistoj ne transdonis lin al la dana registaro, sed kaŝis lin kaj fine helpis al li dungiĝi kiel dano sur bona dana ŝipo en Ejsberg, sur kiu Stanislav denove iris sur granda veturo. Ĉifoje li bridis sin kaj ne elbabilis, ke li estas germano, kaj tiel li povis priridi ĉiujn submarŝipojn, anglajn kaj germanajn, se ili venis antaŭ lian vizaĝon.

La registaroj interpaciĝis, la grandaj rabistoj ĉiuj sidiĝis ĉe grasa repaciga bankedo, kaj la laboristoj kaj simplaj homoj en ĉiuj landoj devis pagi la akcidentajn kostojn, la hospitalfakturojn, la entombigajn kostojn kaj la repacigan bankedon. Kompense ili rajtis svingi flagetojn kaj nazitukojn al la hejmenrevenantaj armeoj, kiuj "venkis batale", kaj al la ceteraj armeoj, kiuj "ne estis venkitaj batale", ili rajtis voki kun muĝanta entuziasmo: Ne ĉagreniĝu pri tio! La venontan fojon! Kaj kiam la laboristoj kaj simplaj homoj ekhavis kapturnojn pro la grandaj sumoj de la pagendaj fakturoj, ĉar la grandaj rabistoj ne gajnis profiton kaj eĉ oferdonis por la karitata helpo, oni kondukis ilin al la tombo de la "nekonata soldato", kie ili tiel longe staris kaj kie oni tiel longe agitis kaj agitis ilin, ĝis ili kredis je sia pagodevo kaj je la aŭtentike-

co de la nekonata soldato. Tie, kie oni ne povis starigi nekonatan soldaton, ĉar oni ne havis iun, oni endormigis la pensadon de la laboristoj per tio, ke oni montris al ili la ponardon en la dorso kaj lasis ilin diveni kaj kvereli pri to, kiu enpuŝis ĝin.

Tiam venis en Germanio la tempo, kiam alumeto kostis kvindekdu bilionojn da markoj, dume la produktado de tiuj kvindekdu bilionoj da markoj en nebilionaj monbiletoj pli kostis ol trajnvagono plena de alumetoj. Tiu-tempe la dana kompanio decidis, ke venis la ĝusta tempo por sendi siajn ŝipojn al doko en Hamburgo, por kompleta riparo. La maristojn oni maldungis kaj sendis hejmen. Stanislav venis per la ŝipo al Hamburgo kaj nun tuj estis en sia hejmlando.

Ĉapitro 37

La dana marista libro ne multe valoris. En Danlando tiom da ŝipoj devis ankri, ke espero pri dungigĝo ape-naŭ estis. Kaj Stanislav nepre volis rehavi veran maristodokumenton.

Li iris al la maristoficejo¹, ĉar li pensis, ke tie li ricevos la dokumenton.

”Tiukaze unue alportu ateston de la polico.”

”Mi kunhavas mian malnovan maristodokumenton.”

”Tio estas dana. Ĉi tie ni ne estas en Danlando.”

La dana marista libro entenis alian nomon, ne la ĝustan nomon de Stanislav.

Li iris al la polico, diris sian ĝustan nomon kaj petis ateston, por ke li povu ricevi maristodokumenton.

”Ĉu registrita ĉi tie?” oni demandis lin.

”Ne. Mi nur hieraŭ alvenis, sur dana ŝipo,” diris Stanislav.

1. maristoficejo: Jam en la jaro 1902 la Germana Marista Regularo estis leĝigita. Kun la fondo de marista oficejo, kiu eksterlande estis reprezentata fare de konsulejoj, oni samtempe establis oficejon, kiu decidis pri konfliktoj sur la ŝipoj. Ĉi tie oni skribis kaj disdonis ankaŭ la maristodokumentojn.

”Tiukaze unue zorgu por tio, ke oni sendu al vi vian naskiĝateston, alikaze ni ne povas doni al vi ateston,” diris la polico.

Stanislav skribis al Posen por ricevi sian naskiĝateston. Li atendis semajnon. La naskiĝatesto ne venis. Li atendis du semajnojn. La naskiĝatesto ne venis.

Nun Stanislav skribis registritan leteron kaj enpakis kvindek bilionojn da markoj por kompensi la kostojn.

Stanislav atendis tri semajnojn. La naskiĝatesto ne venis. Li atendis kvar semajnojn. La naskiĝatesto ne venis. Kial oni zorgu en Pollando pri la naskiĝatesto de viro loĝanta en Germanio? Ili havas aliajn zorgojn. La unua el ili estas Supra Silezio. Kaj jen Danzig. Kaj kiu sciu, kie la naskiĝo estis registrita? En tiu kaŝo ni ne povas trovi la fadejon. Ĉio ĉi ne estas nia afero. La mono, kiun Stanislav portis ĉe si, bela fasko da danaj kronoj, jam delonge estis trans la montoj. Ĉu montoj? Ne, ĝi estis elspezita jam delonge en St. Pauli. En St. Pauli oni konas danajn kronojn kaj estimas ilin, ili preskaŭ estas tiel bonaj kiel dolaroj. ”Kion fari, se tie estas la knabinoj? Vi ja ne bone povas rifuzi ilin per mangesto. Tio ja aspektus kvazaŭ vi ne plu . . . nu, kaj tiel do la kronoj estis en . . .”

”Nur ŝtipkapuloj kaj idiotoj ne manĝas kaj malsatmortas, ĉar la mono mankas,” diris Stanislav, ”honestameto ĉiam nutras viron.”

En la kargostacidomo ja foje kesto falas el varvagono, ĉar la pordo tro facile malfermiĝis. "Necesas nur esti tie, kiam ĝi falas, kaj ne lasi ĝin kuŝi. Jen la tuta sekreto de la afero," diris Stanislav.

Krome kelkaj sukersakoj foje malfermiĝas en la haveno. "Se vi tie iras kun malplena dorsosako," diris Stanislav, "kaj tie malligiĝas tia sukero- kaj kafosako tute per si mem, kaj la tuta enhavo ŝutiĝas en vian dorsosakon, tiam vi ja ne demetas la dorsosakon kaj elŝutas la kafon kaj foriras. Tio estus provoko al Dio. Se vi elŝutus la kafon kaj alia vidus tion, li eble eĉ pensus, ke vi ĝin ŝtelis, kaj li denunciĝus vin."

Ankaŭ salvarsano kaj kokaino estis havigeblaj. "Por la kompatinda suferanta homaro oni devas havi koron, tiun devon vi ne povas preteriri. Vi ne scias kiel fartus vi, se vi bezonus salvarsanon, kaj ne ricevus ĝin. Ne zorgu ĉiam nur por vi mem, pensu foje ankaŭ pri aliaj, se vi volas, ke vi mem bone fartu."

"Pripensu, Pippip," Stanislav kompletigis sian rakonton, "ĉiu afero havas sian tempon². Iam venas la tempo, kiam oni devas diri al si, ke nun oni celu ion alian. Tio estas la eraro, ke la plej multaj ne povas diri ĝustatem-

2. ĉiu afero havas sian tempon: "Por ĉio estas sezono, kaj tempo difinita estas por ĉiu afero sub la suno; estas tempo por naskiĝi, kaj tempo por morti; estas tempo por planti, kaj tempo por elŝiri la plantitaĵojn . . ." La Predikanto 3.1-9)

pe: Sed nun for de la Elinjo³, alie vi ne plu elvenos, kaj la belulino kaptos vin. Kiam tia tempo venis, mi diris al mi, ke mi nun nepre bezonas ŝipon, eĉ se mi devus ŝteli ĝin, ĉar alie mi sidus en la kaptilo.”

Kiam Stanislav ekhavis tiun konvinkon, li iris denove al la polico kaj diris, ke la naskiĝatesto ne alvenis.

”Tiuĵ malbenitaj polaĉoj,” diris la inspektoro, ”tion ili faras pro nura malico. Ni ja ankoraŭ hejtos la inferon por ili, atendu nur ĝis la francoj en Afriko kaj la angloj en Hindio kaj Ĉinio havos la manojn plenaj de tera koto, tiam ni fajfos la marŝon al ili.”

Stanislav, kiun la politika konvinko de la inspektoro ne interesis, sed kiu ĝentile aŭskultis, kapjesis kaj la pugnon sur la tablon draŝis, diris: ”De kie mi nun ricevos mian maristodokumenton, sinjoro inspektoro?”

”Vi jam foje loĝis en Hamburgo, ĉu ne?”

”Kompreneble. Antaŭ la milito.”

”Dum longa tempo?”

”Pli ol ses monatojn.”

”Ĉu registrita ĉi tie?”

”Klare.”

3. sed nun for de sur la Elinjo: estas esploristoj, kiuj asertas, ke B. Traven estas la eksteredzeca filo de la germana imperiestro Vilhelmo la Dua kaj ties nobela amatino, de iu certa Elisabeth, kiu havis la kromnomon Ella; la karesnomo Elinjo ankoraŭfoje aperos en ĉapitro 38. Vivraporto de nobla damo, kiu memorigas pri tiu Elisabeth, troviĝas en ĉapitro 33.

”En kiu kvartalo?”

”En tiu ĉi kvartalo. En tiu ĉi policejo.”

”Do iru rapide al la ĉefa registrejo kaj diru, ke ili donu al vi registran konfirmilon. Poste revenu kun ĝi ĉi tien, kaj kunportu du aŭ tri fotojn, por ke mi povu stampi ilin.”

Stanislav ricevis la konfirmilon kaj rapidis reen al la inspektoro. La inspektoro diris: ”La konfirmilo estas en ordo, sed se mi nur klare scius, ke vi vere estas tiu, kiu estas mencita en tiu konfirmilo?”

”Tion mi povas pruvi. Mi povas konduki al ĉi tie la velfariston Andresen, ĉe kiu mi laboris. Sed tie staras ja serĝento, kiu eble ankoraŭ konas min.”

”Mi? Koni vin?” demandis la serĝento.

”Jes, al vi mi dankas naŭmarkan disciplinan punon, kiujn vi kroĉis al mi, pro pugnokverelo. Tiam vi havis ankoraŭ barbeton kiel Chaplin, kiun vi forrazis,” diris Stanislav.

”Jeees! Nun mi rememoras vin. Pravas, vi laboris ĉe tiu Andresen. Ni ja ankaŭ havis la problemon kun vi. Posen serĉis vin, ĉar vi kiel knabo forkuris de hejme. Ni fine lasis vin ĉi tie, ĉar vi ĉi tie honeste laboris.”

”Tiukaze tio estas ja en ordo,” diris nun la inspektoro. ”Nun mi povas doni al vi la ateston kaj stampi la fotojn.”

La venontan tagon Stanislav iris kun la atesto al la oficejo.

”La atesto estas en ordo. La inspektoro konfirmas, ke li konas vin persone. Sed. Sed la regnan ŝtatanecon ni ankoraŭ pridubas. Jen estas skribite, ke vi havas la germanan regnan ŝtatanecon. Tion vi devas pruvi al ni.” Tion oni diris al li en la oficejo.

”Mi ja servis en la Imperiestra Militfloto kaj oni vundis min ĉe Skagerrak.”

La oficisto suprenlevis la brovojn kaj faris geston, kva-zaŭ de tio, kion li nun diros, dependas la plua ekzisto de la terglobo. ”Kiam vi servis en la I. M. kaj vundiĝis ĉe Skagerrak, kie ni sufiĉe draste tradraŝis tiujn hipokritajn hundojn, tiam vi estis germana regnano. Tion ni ne pridubas. Sed ĉu vi ankoraŭ nun estas ŝtatano de Germanio, tion vi devos pruvi. Tiom longe, kiom vi ne povas pruvi tion, ni ne povas pretigi por vi maristan dokumenton.”

”Kien mi iru en tiu kazo?”

”Jen vi devas iri al la polica prezidejo. Al la sekcio por ŝtataneco.”

Ĉapitro 38

Stanislav tamen devis reiri al sia honesta metio, por ke li ne mortu pro malsato. Alia eblo ne restis. Ne estis lia kulpo. Eĉ la plej modesta laboro ne haveblis. Ĉiuj suĉis je la senlaborula mono.

Stanislav ne provis ricevi ĝin. Li preferis la honestan metion.

”Tio tiel premas la animon, se oni staradas inter senlaboruloj kaj tie devas atendi en vico dekdu horojn pro la ridindaj sumetoj, kaj se oni ĉiutage devas iri tien. Tial mi prefere nokte kaŝas min sur la strato aŭ atentis, ĉu jukas al iu la monujo,” diris Stanislav. ”Mia kulpo tio ne estas. Se ili estus donintaj maristan libron al mi, kiam mi petis ĝin unuafoje, mi delonge estus for. Iun keston mi ja estus trovinta.”

En la polica prezidejo oni demandis lin: ”Ĉu vi naskiĝis en Posen?”

”Jes.”

”Naskiĝateston?”

”Jen la kvitanco por la registrita letero. Ili ne sendas ĝin.”

"La konfirmilo de la inspektoro en via kvartalo sufiĉas al mi. Temas nur pri la ŝtataneco. Ĉu vi opciis por Germanio?"

"Ĉu mi kion faris?"

"Ĉu vi opciis por Germanio? Ĉu vi, kiam ni devis transdoni la polajn provincojn, persone protokoligis antaŭ germana rajtigita instanco la deklaron, ke vi volas daŭrigi la germanan ŝtatanecon?"

"Ne," diris Stanislav. "Tion mi ne faris. Mi tute ne sciis, ke mi devas fari tion. Mi kredis, ke mi, kiel germano, kiu ne ŝanĝas la ŝtatanecon, estas germano por ĉiam. Mi estis ja en la I. M. kaj kunbatalis ĉe Skagerak."

"Tiam vi estis germano. Tiam la provinco Posen ankoraŭ apartenis al Germanio. Kie vi do estis, kiam la homoj devis opcii?"

"Mi veturis sur ŝipo, sur la maro."

"Tiukaze vi devintus iri al germana konsulo por protokoligi tie vian opcion."

"Sed mi ja nenion sciis pri tio," diris Stanislav. "Se oni veturas sur la maro kaj faras sian malbenitan ege streĉan laboron, ne estas tempo por pensi pri tiaj stultaĵoj."

"Ĉu do via kapitano diris al vi nenion?"

"Mi veturis sur dana ŝipo."

La oficisto meditis kelkan tempon kaj tiam diris: "Jen vi estas sen ŝanco. Ĉu vi havas proprietaĵon? Ĉu vi havas bienon aŭ domon?"

"Ne, mi estas maristo."

"Nu, kiel mi jam diris, estas nenio plu farebla. Ĉiuj limdatoj, eĉ la limdatoj por malfruiĝintoj pasis. Kaj vi eĉ ne povas pretendi, ke iu neinfluebla cirkonstanco malhelpis vin opcii. Vi ne estis ŝiprompulo en iu lando, kiu situas ekstere de la kutima trafiko. Vi ĉiam povis viziti germanan konsulon aŭ konsulon de alia ŝtato, kiu havis la rajton reprezenti nin. La ordonon por la opcio oni anoncis en la tuta mondo, kaj tio okazis plurfoje."

"Ni ne havas la eblon legi ĵurnalojn. Germanajn oni ne vidas kaj aliajn oni ne komprenas. Kaj se oni vere foje ricevas ĵurnalon, la ordono ne enestas, ĉar ĝi ja ne en ĉiu numero aperas."

"Mi povas fari nenion, Koslovski. Mi tre bedaŭras. Mi ja volonte helpus al vi. Sed mi ne havas la kompetentojn. Vi povus turni vin ankoraŭ al la ministerio. Sed tio daŭrus longe, kaj ĉu vi sukcesus, tion mi tre pridubas. La poloj neniel helpas nin. Kial ni do elbalau iliajn ĉambrojn? Eble eĉ ankoraŭ okazos, ke ili deportos ĉiun el Pollando, kiu opciis por Germanio, kaj tiam ankaŭ ni kompreneble faros la samon."

Ĉie oni rakontis al la kompatinda Stanislav politikajn opiniojn anstataŭ efektive helpi. Se iu oficisto ne volas

helpi al iu, jen li diras, ke li tre dezirus helpi, sed ke li havas nek la povon nek la kompetentojn.

Sed, se oni parolas laŭte al oficisto aŭ mediteme rigardas lin, oni devas iri en prizonon pro ofendo al ŝtata oficisto kaj pro rezisto kontraŭ la ŝtata regpovo. En tiu kazo li estas subite mem la ŝtato, provizita per ĉiuj kompetentoj kaj ĉiuj povoj. Lia frato diras la verdikton, kaj lia alia frato metas vin en la ĉelon aŭ batas vin per la bastono sur la kranion. Kiun valoron havas la ŝtato, se ĝi ne povas helpi al vi, se vi bezonas ĝin?

”Mi povas doni al vi nur la jenan konsilon, Koslovski,” diris la oficisto, dum li lasis knari la seĝon, ”iru al la pola konsulo. Vi estas polo. La pola konsulo devas pretigi por vi polan pasporton. Tio estas lia devo. Vi estas naskita en Posen. Se vi havos la polan pasporton, tiam ni povos fari escepton kaj doni al vi germanan maristan libron, ĉar vi loĝas en tiu ĉi loko kaj jam pli frue loĝis ĉi tie. Tio estas ĉio, kion mi povas konsili.”

Stanislav iris la postan tagon al la pola konsulo.

”Vi estas naskita en Posen, ĉu?”

”Jes. Miaj gepatroj ankoraŭ loĝas tie.”

”Ĉu vi loĝis en Posen aŭ en iu el la provincoj, kiujn Germanio, Ruslando aŭ Aŭstrio devis cedi, en la tempo de la transdonoj?”

”Ne.”

"Ankaŭ ne inter mil naŭcent dekdu kaj la tago de la transdono?"

"Ne, mi veturis surmare."

"Kion vi faris kaj kie vi veturis, tion mi ne volas scii jam nun."

"Stanislav, jen la ĝusta tempo por tiri lin trans la tablon."

"Tion mi scias, Pippip, sed antaŭe mi ja volis havi la pasporton, poste mi ja estus boksinta lian nazon, horon antaŭ la ekveturo de la ŝipo."

"Ĉu vi en Pollando, ĉe pola instanco rajtigita por tio, ene de la fiksita tempo kaj persone protokoligis, ke vi plu volas esti polo?"

"Sed mi jam diris al vi, ke mi ne estis en Posen aŭ en Okcidenta Prusujo dum la lastaj jaroj."

"Tio ne estas respondo al mia klara demando. Ĉu jes, ĉu ne?"

"Ne."

"Ĉu vi antaŭ laŭleĝe enoficigita pola konsulo en ekstera lando, kiu eksplicite ricevis la kompetenton akcepti tiajn voldeklarojn, persone protokoligis, ke vi volas esti plu pola ŝtatano?"

"Ne."

"Kial vi do venis ĉi tien? Vi estas germano. Foriĝu al la germanaj instancoj kaj neniam plu molestu nin."

Stanislav tion rakontis ne kolere, sed iom malĝoje, ĉar li, pro alispecaj kaŭzoj ne povis diri sian opinion al la konsulo laŭ la deca maniero de maristo.

”Tio estas ja interesa,” mi diris, ”kion tiuj novaj ŝtatoj permesas al si. Pli ol oni supozus. Ili ankoraŭ atingos multon. Konsideru nur foje, kiel multe Usono jam atingis en tiu rilato kaj kiel streĉe ili sklavlaboraĉas, por eĉ multe pli atingi kaj por ke ili superu je mucideco kaj mensa limigiteco la plej mucidan kaj polvokovritan prusan imperiestran oficistan cerbeton. Iru al Germanio aŭ al Pollando aŭ al Anglio kaj helpu vian Elinjon el la pomosaŭco per ruĝvino kaj cinamo kaj kariofiloj, jen vi tuj kaptus tutan jaron, sen iu ’sed’ kaj ’tamen’. La ŝtato ne perdu homon. Sed, se vi plenkreskiĝis, neniu volas havi vin. Vi ja ne havas proprietaĵon, ne bienon, ne domon. La ŝtatoj elspezas milionojn da dolaroj, milfoje prelegas, faras filmojn kaj presas librojn, por ke la junuloj ne iru en Fremdulan Legion. Sed se junulo venas kaj ne havas pasporton, ili piedtretas lin sur la pugon. Tiel li devas iri en Fremdulan Legion, aŭ multe pli terure, sur mortulan ŝipon. La popolo, kiu la unua nuligos la pasportojn kaj ree enkondukos kondiĉojn kiel antaŭ la Liberiga Milito, kiu damaĝis al neniu kaj faciligus la vivon por ĉiuj, tiu popolo, kiu la unua entreprenos tiun paŝon, redonos la vivon al la mortuloj de la mortulaj ŝipoj kaj fuŝos la plezuron al la posedantoj.”

"Eblas," diris Stanislav. "Sed de Jorike neniŭ povas foriri. Ne en la nuna tempo. Oni havas nur unu perspektivon, tio estas, ke ĝi sinkus al la fundo, kaj oni mem ne kunsinkas. Sed tiel certa ankaŭ tio ne estas. Povas facile okazi, ke oni fine alvenus sur alia Jorike."

Stanislav iris nun denove al la polica prezidejo. Al la sekcio por ŝtataneco.

"La pola konsulo ne akceptas min."

"Tio antaŭvideblis. Kion ni nun faru, Koslovski? Vi ja devas havi paperojn, alie neniŭ ŝipo dungos vin."

"Certe, sinjoro komisaro."

"Bone, mi donas al vi ateston, iru do kun ĝi morgaŭ matene je la deka al la pasportoficejo. Ĝi troviĝas ĉi tie, en la ĉambro tricent tridek kvar. Tie vi ricevos pasporton. Kun tiu pasporto vi poste ricevos maristan dokumenton."

Stanislav ĝojis, kaj la germanoj pruvis, ke ili estas homoj, kiuj malpli ol ĉiuj aliaj meritas la nomon burokratoj. Li iris al la pasportoficejo, transdonis sian ateston kaj siajn fotojn, subskribis sian belan pasporton, pagis kvardek trilionojn da markoj kaj ricevis sian pasporton.

1. Ellis Island (angle): 'La insulo de Ellis' en Nov-Jorko, la 'ora pordo' estis la sojlo por multaj enmigremuloj en la jaroj de 1892 ĝis 1932. Hodiaŭ ĝi estas Nacia Monumento. La muzeo sur Ellis Island montras multajn trezorojn kaj objektojn el tiu tempo.

En la pasporto ĉio estis en ordo. Estis bona papero. Stanislav neniam en sia tuta vivo havis tian bonan pape-ron. Kun tiu pasporto li povintus veturi rekte ĝis Nov-Jorko. Eĉ *Ellis Island*¹ li ne devintus trapasi.

”Ĉio en ordo, la nomo, la naskiĝdato, la profesio, la naskiĝloko. Sed kio tio estas? ’Sensŝtata’. Ne gravas, mi ne bezonas. Mi ricevos maristodokumenton. Kaj tio, kion tio signifas? ’Valida nur enlande’. Verŝajne la ofi-cistoj pensas, ke oni veturas vaporŝipojn ankaŭ sur la erikejo de Lüneburg aŭ, ke mi volas remi sur transport-ŝipoj de Elbo.”

Plia tago pasis, kaj Stanislav troviĝas en la maristofi-cejo.

”Maristan dokumenton? Tion ni ne povas pretigi por vi. Vi ja ne havas ŝtatanekon. Kaj la ŝtataneco, la rajto je hejmlando estas la plej grava afero por marista doku-mento, por la ceteraj aferoj sufiĉas ankaŭ la invalidokar-to.”

”Kiel mi tiukaze dungigu sur ŝipo? Diru tion.” Stani-slav estis je la fino de sia saĝo.

”Vi ja havas pasporton, per ĝi vi povas dungigi sur ĉiu ŝipo. La pasporto montras ja, kiu vi estas, kio vi estas, kaj ke vi loĝas ĉi tie en Hamburgo. Vi estas ja viro lerta kaj marsperta, do estos infanludo por vi dungigi sur ŝipo. Sur ĉiu eksterlanda ŝipo vi povus dungigi je pli alta sa-lajro ol sur germanaj ŝipoj, pro la valorfalo de la marko.”

Stanislav sukcesis dungigi sur ŝipo. Sur bela nederlanda. Bona salajro. Kiam la dungomastro vidis la pasporton, li diris: "Ĝi ja noblas." Kaj kiam la ŝipestro vidis la pasporton, li diris: "Bonaj paperoj, tion mi ŝatas; ni iru nun al la konsulo por dungi kaj registrigi vin, por la lego de la aktoj."

La konsulo registris kaj enskribis la nomon Stanislav Koslovski.

Tiam li diris: "Maristan dokumenton?"

Kaj Stanislav respondis: "Pasporton."

"Same tiel bone," la konsulo rediris.

"La pasporto estas nova, de la ĉtiea prezidejo, pretigita antaŭ du tagoj. Ĉio estas en ordo. La viro estas ĝusta." Tion diris la ŝipestro kaj bruligis cigaron.

La konsulo prenis la pasporton, foliumis en ĝi, plaĉe kapjesis, ĉar ĝi estis majstroverko de bone lubrikita burokratio. Tiajn aĵojn ŝatas la konsulo.

Subite li ĉesis foliumi kaj glaciigis.

"Mi ne povas dungi vin."

"Kion?" vokis Stanislav.

"Kion?" vokis la ŝipestro kaj mirigite lasis fali la alu-metskatolon.

"Mi ne dungos lin," diris la konsulo.

"Sed kial ne? Mi ja persone konas la oficiston de la prezidejo, kiu subskribis." La kapitano senpacienciĝis.

"La pasporto estas certe sen manko. Sed mi ne povas

dungi lin. Li ja ne havas ŝtatanecon,” ekscitiĝis la konsulo.

”Tio min absolute ne interesas,” la ŝipestro diris je tio. ”Mi volas havi la viron, mia Unua konas lin, kaj la ŝipoj, kiujn la viro veturis, estas la plej bonaj referencoj. Tiajn virojn mi volas havi ĉirkaŭ mi.”

La konsulo frape fermis la pasportlibreton kaj klakadis per ĝi sian maldekstran manplaton.

Li diris nun: ”Vi nepre volas havi tiun viron, sinjoro kapitano, ĉu? Ĉu vi volas adopti lin?”

”Sensencaĵo!” bojis la ŝipestro.

”Ĉu vi persone transprenas la respondecon liberiĝi de li, se necesos?”

”Mi ne komprenas,” grumblis la ŝipestro.

”Tiu viro en neniuj landoj rajtas alboridiĝi. Li ne povas forlasi la ŝipon, dum la ŝipo estas en haveno. Se la ŝipo forveturus kaj oni kaptus lin, la kompanio aŭ vi, kapitano, havus la devon konduki lin el la lando. Kien vi volas konduki lin?!”

”Li ja ĉiam ajn povas reveni ĉi tien al Hamburgo,” diris la ŝipestro.

”Povas. Povas. Ne, li ne povas. Germanio rajtas rifuzi lin kaj lin transdonas al la kompanio aŭ al vi. Germanio ne plu devas reakcepti lin, tuj kiam li transpaŝos la limon. Jen vojo por li. Li povas havigi al si ateston, ke li kiam ajn rajtas reveni al Hamburgo aŭ Germanio, kaj, ke

li rajtas loĝi ĉi tie. Sed tian ateston nur la ministerio rajtas pretigi, kaj la ministerio sen neceso apenaŭ faros tion, ĉar tiu atesto estas egalvalora al la germana ŝtatanecon. Kaj tiam ni troviĝas denove je la komenco. Se li povus ricevi ŝtatanecon, li havus ĝin, li estas ja germano, naskita en Posen. Sed nek Germanio nek Pollando agnoskas lin. Nur se vi aŭ via kompanio plene transprenus la respondecon por la viro . . .”

”Ja kiel mi faru tion?” la kapitano vokis malvole.

”En tiu kazo mi ne povas dungi la viron,” la konsulo diris trankvile, elstrekis la nomon el la libro kaj donis al Stanislav la pasporton.

”Aŭskultu,” la ŝipestro ankoraŭfoje turnis sin kaj diris al la konsulo, ”aŭskultu, ĉu vi eble tamen povus fari escepton? Mi volonte volus havi la viron. Li estas bonega rudristo.”

”Mi bedaŭras, kapitano, sed por tio miaj kompetentoj ne sufiĉas. Mi devas agi laŭ la direktivoj. Mi estas nur servisto.”

La konsulo levis la ŝultrojn ĝis la oreloj, kiam li diris tion, liaj brakoj samtempe leviĝis, kaj la antaŭbrakoj pendis perpendikulare kaj pendolis de la kubutoj. Tio aspektis, kvazaŭ oni senplumigis lin kaj stucis liajn flugilojn.

”Malbenita feko, damnita!” la ŝipestro kriis, ĵetis sian cigaron kolere sur la plankon, tretadis ĝin kiel freneziginto, iris al la pordo kaj krake fermĵetis ĝin.

Ekstere sur la koridoro staris Stanislav.

”Kion mi nun faru kun vi, amiko,” diris la olda ŝipestro. ”Mi ja tiel volonte kunprenus vin. Sed nun mi eĉ ne povus dungi vin per la leĝo de urĝeco, ĉar la konsulo konas vian nomon. Jen du guldenoj, pasigu plezuran vesperon. Mi nun devas rigardi pro alia rudristo.”

La ŝipestro kaj la bela nederlanda ŝipo malaperis.

Ĉapitro 39

Sed ŝipon Stanislav nepre bezonis. "Honesta metio estas tute bona, por certa tempo. Sed ne tro longe. Iu kesto aŭ iu sako, tio damaĝas neniun. Tio estas ripetigantaj kostoj en granda domo. Kesto povas ankaŭ disrompiĝi, se oni kargas ĝin. Sed la ĝojo pri la honesta metio baldaŭ perdiĝas."

Mi diris nenion kaj lasis trankvile paroli lin.

"Jes, la ĝojo perdiĝas," Stanislav daŭrigis, "iam vi komencas senti, ke vi vivas je la kostoj de aliaj. Dum certa tempo estas en ordo, sed tiam naŭzas vin, ke vi devas vivi je la kostoj de aliaj. Vi volas fari ion, krei ion. Vi volas vidi kiel la afero funkcias, kiun vi faras. Ja Pippip, stari ĉe la rudro en ŝtorma vetero, kaj teni la kurson . . . Tio estas tasko! Kompare al ĝi la tuta honesta metio estas nenio. Fulmotondro kaj diablo, eĉ malpli ol nenio! Vi do

staras kaj staras kaj la kesto volas ruliĝi kaj elsalti el la kurso. Sed vi bridas ĝin. Vidu, tiel.”

Stanislav kaptis min je la zono. Li provis min turni, kvazaŭ li havus la rudron en la mano.

”Hej, mi ne estas rudro, delasu de mi!”

”Kaj tiam, se vi eltenas en la ŝtormo, kaj la rudro deglitas eĉ ne kvaronan rumbon, Pippip, mi diras al vi, jen vi povus krei kaj tumulto pro plezuro, ĉar vi tiel povas teni la gigantan keston, tiel, ke ĝi devas fari laŭ via volo, kiel juna ŝafido blanka kiel neĝo. Kaj se tiam la Unua aŭ eĉ la ŝipestro rigardas al la ventkompaso kaj diras: ’Kos-ĉjo, amiko, vi brile tenas la kurson, bonega laboro, mi mem ne povus fari tion pli bone. Tiel ni tenos la belulilon en la ĝusta tempo! Tiele!’

Jes Pippip, jen via koro tiel ridas, ke vi tuj povus eklarmi kaj ekhurli ĝis la akvo gutas laŭ la vangoj, pro pura plezuro. Ĉu vi nun komprenas? Tion la honesta metio ne kaj neniam ebligas. Vi ja ridas, se vi fiŝis predon, sed vi ne ridas tiom, vi ridas pli hipokrite kaj dume vi ĉiam turniĝas por vidi, ĉu jam iu persekutas vin.”

”Dikajn kestojn mi ja ne rudris ĝis nun, sed jam malgrandajn, kaj mi pensas, ke vi pravas,” mi diris. ”Sed, se vi farbas ion, vi sentas la samon. Se verda aŭ bruna linio bele kaj delikate sukcesas al vi, sen fari superflujajn makulojn kaj sen elgliti el la linio, vi sentas la saman ĝojon.”

Stanislav silentis dum iom da tempo, kraĉis trans la balustradon, ŝovis plian dikan cigaron inter la dentojn, kiun li aĉetis antaŭ tridek minutoj de komercisto alreminta en boato, kaj diris: "Vi eble ridos. Ŝoveli karbojn, se oni estas sperta rudristo, kaj pli bona rudristo ol tiuj rabistoj ĉi tie, tio ja eble estas honto. Sed tamen ne. Ankaŭ tio povas ĝojigi. Sur tia kesto ĉio gravas. Se oni ne ŝovelas karbojn, la hejtisto ne povas teni la vaporpremon, kaj se li ne tenas la premon, la kesto staras kiel ramo en argilo. Kaj se vi foje ĵetas fulmrapide ĉirkaŭ kvincent ŝovelplenojn sen interrompo el la distanco de dek paŝoj tra la ŝaktluko kaj amasigas krake tian provizon, ke la hejtisto preskaŭ ne povas moviĝi, nur por observi, kion vi povas atingi, se vi foje streĉas la muskolojn, kaj poste rigardas la monton, kiun vi amasigis, ankaŭ tiam la koro ridas en via brusto. Vi efektive povus ŝmaĉe kisi la monton pro plezuro, se ĝi tie tiel dike amasigite kuŝas kaj algapas vin tiel mire, ĉar ĝi troviĝis ja antaŭ momento ankoraŭ en iu supra holdo kaj nun subite ĉi tie antaŭ la kaldronegoj. Jes ja, kompare al laboro, kompare al ĝusta laboro, vi povas forgesi eĉ la plej belan honestan metion.

Kaj kial oni praktikas la honestan metion? Ĉar oni ne havas laboron, ĉar oni ne ricevas laboron. Vi ja devas fari ion, vi ja ne povus kuŝi dum la tuta tago en la lito aŭ vagi en la stratoj, vi ja tute konfuziĝus en la kapo."

”Nu, kaj kio sekvis, kiam la nederlanda ŝipo forveturis sen vi?” mi demandis.

”Laboron mi nepre bezonis, kaj ŝipon mi bezonis, ĉar alie mi estus freneziĝinta. La bonan pasporton, la fajnan paperon mi vendis por dolaroj. Tiam denove krevis sako, kaj mi havis kelkajn arĝentajn monerojn en la mano. Kun kelkaj danaj fiŝistoj mi faris sukan negocon per alkoholaĵoj, kiun mi pilotis tra la doganzono, nu, kaj tiam mi havis sufiĉe da mono. Mi tuj sidiĝis en trajnon kaj ek al Emmerich. Mi glate travenis. Sed post la limo, kiam mi volis aĉeti bileton al Amsterdamo, ili kaptas min, kaj nokte ili kondukis min al la limo kaj ŝovis min al la alia flanko.”

”Kion?” mi demandis. ”Vi ja ne eble volas diri, ke la nederlandanoj nokte kondukas homojn trans la limon, tute kaŝe, ĉu?”

Mi volis aŭskulti, kion Stanislav travivis.

”Ili? Ili?” Stanislav diris kaj ŝovis sian kapon pli antaŭen kaj fiksnajlis min per siaj okuloj. ”Ili faras eĉ tute aliajn aferojn. Nokte ĉe la landlimoj okazas la plej vigla interŝanĝa negoco de homoj. La germanoj puŝas siajn maloportunajn eksterlandanojn kaj bolŝevistojn trans la nederlandan, belgan, francan kaj danan limojn, kaj tion ankaŭ la nederlandanoj, la belgoj, la francoj kaj la danoj faras. Mi certas, ke la svisoj, la ĉeĥoj kaj poloj tion tute same faras.”

Mi kapneis kaj diris: "Tion mi ne kredas. Tio estas tute neleĝa."

"Sed ili faras. Ili ja faris tion al mi, kaj mi renkontis ĉe la limo kaj en Nederlando kelkdek homojn, al kiuj oni faris tion de ĉiuj flankoj.

Ja kion alian ili faru? Mortbati kaj enfosi tiujn homojn ili ja ne povas. Ili ja ne krimis ion. Ili nur ne havas pasporton kaj ne povas ricevi pasporton, ĉar ili ne naskiĝis aŭ ne opciis. Ĉiu lando provas liberiĝi de siaj senpasportuloj kaj senŝtatanoj, ĉar tiuj personoj ĉiam denove kaŭzas problemojn. Se oni forigus la pasportojn, ankaŭ tiu varkontrabando finiĝus. Do, ĉu vi kredas, aŭ ne, min ili traktis tiel."

Sed Stanislav ne lasis sin timigi, nek per la minacita labordomo nek per la minacita prizono, nek per la minaco internigejo. Tuj en la sama nokto li denove transiris al Nederlando, faris ĝin pli inteligente kaj venis ĝis Amsterdamo. Li dungiĝis sur itala ŝipo, kiu estis tute hontinda mortula ŝipo, kaj veturis per ĝi ĝis Ĝenovo. Tie li elsaltis pobe, denove dungiĝis sur mortula ŝipo, ĉifoje sur tia mortula ŝipo, kiu tuj faris kadavrojn, kaj veturis kun ĝi sur rifon. Li kaj kelkaj aliaj transvivis. Petante almozojn, li vagadis ĝis alia haveno. Kaj post plia mortula ŝipo, sur kiu li devis fuĝi pro terure brutala pugnobatalo, li alvenis sur Jorike.

Kie li restos? Kie mi restos? Kie ĉiuj mortuloj iutage restos? Sur rifo. Pli aŭ malpli frue. Iam okazos. Oni ne povas veturi mortulajn ŝipojn eterne. Iutage oni tamen devos pagi tiujn veturojn, eĉ se oni havus mi ne scias kiom da feliĉo. Kaj ĉiufoje oni devas reiri sur mortulan ŝipon. Alia vojo ne plu eblas. La firma tero estas ĉirkaŭata per netransgrimpebla muro, pundomo por tiuj interne, mortula ŝipo aŭ Fremdula Legio por tiuj ekstere. Estas la sola libero, kiun ŝtato, kiu volas kaj devas disvolviĝi ĝis la ekstremo de sia senco, povas proponi al la individuo, kiu ne povas esti numerita, se la ŝtato ne volas murdi lin per fridsanga gesto. Tiun fridsangan geston la ŝtato ankoraŭ devos uzi. Ĝis nun Cezaro Kapitalismo ankoraŭ ne havas esencan intereson je tia murdo, ĉar li ankoraŭ povas uzi la rubaĵon ĵetatan trans la prizonmurojn. Kaj Cezaro Kapitalismo delasas de nenio, se ĝi ankoraŭ promesas profiton. Ankaŭ la rubaĵo, ĵetita de la ŝtatoj trans la murojn, havas ankoraŭ valoron kaj enspezigas bonajn profitojn, kiujn rifuzi estus peko, nepardonebla peko.

”En la litbenko super mi,” mi diris iutage al Stanislav, ”jen iu mizere mortis, oni rakontis al mi. Ĉu vi scias ion pri tio, Lavski?”

”Kompreneble, mi scias tion. Se tiel diri, ni ja estis fra-toj. Li estis germano, venis el Mulhaŭzo en Alzaco. Lian ĝustan nomon mi ne scias. Tiu cetere ne interesas min.

Li diris, ke li nomiĝas Paul. Oni vokis lin 'franco' aŭ pli bone 'French'. Li estis subhejtisto. En iu nokto, sidante kun mi en poba kajuto, li rakontis al mi, plorante kiel knabeto, kion li travivis.

Paul estis naskita en Alzaco kaj lernis la metion de kuproforĝisto, se mi ne eraras, en Strasburgo aŭ en Metz. Mi ne plu scias tion precize, ĉar li menciis ĝin nur preterire.

Li tiam migris al Francio kaj Italio. En Italio li troviĝis en internigejo, kiam la kaĉo tie komenciĝis — sed atentu momenton, estis alie. Li estis en Svislando, kiam la milito ekis, li ne havis monon, oni transŝovis lin al Germanio kaj tie lin metis en la armeon. Tiam, je patrolado la italoj arestis lin. Li fuĝis, ŝtelis civilajn vestaĵojn, enfosis siajn grizajn malnovajn ĉifonojn kaj vagis en la sudo kaj mezo de Italio. Li ja konis la regionojn, ĉar li jam laboris tie.

Fine ili kaptis lin. Ke li estis fuĝinta militkaptito, oni ne sciis, oni opiniis lin germano, kiu tie vagadis la tutan tempon, kaj tial oni metis lin en internigejon por civilkaptitoj. Tiel la rakonto estis.

Antaŭ ol la civilkaptitoj estis interŝanĝitaj, li jam denove eskapis kaj migris norden tra Svislando. Oni translimigis lin al Germanio, kaj tie li laboris en bierfarejo. Poste li envolviĝis en revoluciaj aferoj, oni arestis kaj deportis lin, ĉar li estis franco. La francoj ne akceptis lin,

ĉar li jam eterne forestis de Mulhaŭzo kaj opciis nek por Francio nek por Germanio. Kial laboristo zorgu pri tiaj stultaĵoj? Kiel laboristo oni devas pensi kaj zorgi pri aliaj aferoj, precipe, se oni ne havas laboron kaj devas kuri kiel frenezulo, por havigi al si almenaŭ ion manĝeblan por la stomako.

Sed pro la bolŝevismaj aferoj, kiujn li tute ne komprenis, oni pelis lin el la lando. Oni lasis al li ĝis du tagoj por malaperi, je minaco de ses monatoj en labordomo. Se li elvenus el la labordomo, li denove ricevus du tagojn, kaj se li ne foriĝus en tiu tempo, atendus lin ankoraŭfoje labordomo aŭ prizono aŭ internigejo. Labordomon ili ja ne plu havas, aŭ tiuj domoj havas nun alian nomon, li diris al mi. Sed anstataŭ tio ili havas similajn instituciojn. Tiuj uloj trovas ĉiufoje novan ĉikanon, se ili brue ĉesigas malnovan pro iuj kaŭzoj. Kion tiaj uloj scias pri homaj motivoj? Por ili ekzistas nur krimuloj kaj nekrimuloj. Kiu ne povas pruvi, ke li tute certe ne estas krimulo, estas krimulo.

Sekve li devis forlasi la landon. Jam ses fojojn li vizitis la francan konsulon, sed tiu volis scii nenion pri li, elĵetis lin kaj malpermesis al li la eniron en la konsulejon.

Paul migris nun al Luksemburgio, li majstris la landlimojn kaj venis al Francio. Kiam ili kaptis lin, diris tiu azeno, ke li estas franco. Alian eblon li ja ne havis. Oni

esploris lian kazon kaj eltrovis, ke li tiel neleĝe volis trompe akiri la francan ŝtatanecon. Tio estas granda krimo. Suka rompŝtelo kompare kun tio estas bagatelo. Ili estus ŝarĝintaj lin per kelkaj jaroj.

Nu, koncize kaj precize, oni prezentis musotruon al li, por ke li povu elturni sin. Dungiĝo ĉe la Fremdula Legio. Tiel li ja povus perlabori al si dekonon de la franca ŝtataneeco, se li eltenus tion.

Sed li ne eltenis ĝin kaj devis fuĝi.

Kiel li rakontis al mi, estas ja tiel, se oni fuĝas kvazaŭ leporo. Kien iri? Transen al la hispana teritorio? Bone, se nur la vojo ne estus tiel longa. Sed tiam venas marokanoj, kiuj volas enspezi la kaptopremion. Oni ja ne vidas tion je iliaj nazpintoj, kiam oni petas kiel almozon de ili kelkajn daktilojn aŭ gluton da akvo. Kaj reveni kiel dizertinto? Tiukaze prefere esti morte trapikita per pintigita lignopeco.

Tiam vi iam renkontas marokanojn, kiuj forprenas de vi la ĉemizon kaj lasas vin kuŝi sub la ardanta suno kaj en la sablo.

Tiam vi renkontas kelkajn, kiuj ne elrabas, sed kiuj mortbatas aŭ ĝismorte turmentas vin, ĉar vi estas de la malamata Fremdula Legio aŭ unu el tiuj malamataj kristohundoj.

Tiam estas ankaŭ kelkaj, kiuj rabas kaj vendas vin en la interno de Afriko kiel sklavon por la kapstanaj mue-

lejoj. Ankaŭ tio estas plezuro, sed prefere lasi elŝiri la intestojn el la korpo.

Sed Paul havis feliĉon, eksterordinaran feliĉon. Li renkontis marokanojn, kiuj volis lin mortbati aŭ ligi al ĉevalvosto kaj senhavigi. Sed li sukcesis klarigi al ili, ankoraŭ sufiĉe frue, kvankam ili kutime ne lasas sin entiri en diskuton, ke li estas germano. Nu, la germanoj estas ja ankaŭ kristohundoj, sed ili batalis kontraŭ la francoj, pro kiu merito oni alte estimas ilin, kiel oni en Hispanio kaj en Meksiko estimas la germanojn pro tio, ke ili sendis kvindek mil usonanojn en la transmondon. Sed ĉe la marokanoj la germanoj havas eĉ plian krediton, ĉar ili batalis flanke de la turkoj, flanke de la mahometanoj kontraŭ la angloj kaj francoj, kaj ili traktis la mahometanajn samkredanojn, batalintajn flanke de la angloj kaj francoj kaj kaptitajn de la germanoj, ne kiel militkaptitojn, sed kvazaŭ ili estus trikvaronaj amikoj. Tion ĉiu scias, kiu alvokas Alahon kaj la profeton, egale ĉu tiu loĝas en Maroko aŭ en Hindio.

Estas nur tiel nekredeble malfacile komprenigi al ne-turka mahometano, ke oni estas germano. Li supozas, ke la germanoj tute alie aspektas ol la malamataj francoj kaj angloj, kaj se li rigardas germanon kaj rimarkas, ke tiu aspektas preskaŭ kiel ili, li ne kredas ties germanecon kaj pensas, ke la viro volas trompi lin. Se la viro kiel germano eĉ servas en la Fremdula Legio por batali kontraŭ

la mahometanoj, tiam eĉ tiu ne plu kredas ion al li, kiu komence eble akceptis lian germanecon. Ĉar Germano tute ne batalas ĉeflanke de la francoj kontraŭ mohametanoj, kiuj batalas por sia libereco, ĉar la germanoj mem scias, kion tio signifas, devi batali por la libereco kaj sendependeco de sia lando kontraŭ francoj kaj angloj.

Kiel tio okazis, neniuj povus diri. Pro nekomprenebla sento, kiu subite ekaperis en la marokanoj, ili kredis kaj lian germanecon kaj, ke li neniam batalis kontraŭ la marokanoj. Ili akceptis, flegis kaj bone nutris lin, transdonis lin de parencaro al parencaro kaj de gento al gento, ĝis li alvenis la mabordon, kaj tie li kun la prunkaĉaj komercistoj venis sur Jorike.

La ŝipestro akceptis ĝin kun gjojo, ĉar li bezonis subhejtiston, kaj Paul radiis pro feliĉo, ke li estas inter ni. Sed jam post du tagoj, kvankam li havis feliĉon rilate al la kradoj kaj la karboj tiutempe kuŝis kvazaŭ ĉemane, li diris: 'Mi dezirus, ke mi ne fuĝis de la Fremdula Legio. Tiu ĉi ŝipo estas dekoble pli fia ol la plej aĉa kompanio en nia divizio. Kompare al ĉi tie ni vivis ja kiel la princoj. Ni ricevis homindan manĝon kaj havis homindajn kvar-tirojn. Tion mi ne longe eltenos.'

"Lasu la plendojn, Paul," diris Stanislav por kuraĝigi lin. "Sed Paul, kies korpo eble jam de la streĉoj de la fuĝo estis trafita, komencis kraĉi sangon. Pli kaj pli. Tiam li vomis grandajn flakojn da sango. Kaj en nokto, kiam mi

venis por transpreni la vaĉon, li kuŝis sur karbomonto en supra holdo en sia dika sango. Morta li ne estis. Mi trenis lin en la kajuton kaj pakis lin en lian litbenkon tie supre. Matene, kiam mi volis veki lin, li estis morta. Je la oka oni ĵetis lin en la maron. La ŝipestro eĉ ne deprenis la ĉapelon, li nur tuŝis per fingro la randon. Oni eĉ ne envolvis lin. Li surhavis nur ĉifonojn makulitajn de sango. Al unu el liaj kruroj oni ligis dikan karbobulon. Mi pensas, ke la ŝipestro translasis eĉ tiun dikan karbobulon nur kun oblikva buŝo. En la ŝiplibron oni ne skribis la nomon de Paul. Li estis aero, forblovita aero.”

Ĉapitro 40

Paŭl ne estis la sola subhejtisto, kiun Jorike glutis kaj digestis, dum Stanislav veturis sur ĝi. Jen Kurt, juna viro el Memel, ankaŭ li ne opciis. En tiu tempo li vagabondis en Aŭstralio, sed neniam oni kaptis lin, kaj tial ne eblis meti Kurt en internigejon. Finfine Kurt trasuferis nedireblan hejmsopiron kaj volis reiri Germanion. Ie en Aŭstralio li rompis la leĝon. Estis afero kun tradraŝitaj strikrompantoj. Unu el tiuj friponoj kuŝiĝis kaj ne plu ekstaris. Kurt ne povis iri al la konsulo por elveni helpe de la leĝo. Se temas pri striko aŭ pri aferoj, kiuj odoras je komunismo, tiam ĉiuj konsuloj tuj komune obstaklas, eĉ se ili antaŭ monatoj ankoraŭ volis kraĉi sur la vizaĝon unu al la alia. La konsulo certe tuj estus flustrinta lin al la polico, kaj tiel por Kurt dudek jaroj estus certaj. Konsulo ĉiam troviĝas flanke de la ŝtatideo, flanke de tiu

granda majesta vorto, kiu estigas nenion alian krom stultaĵojn kaj faras numerojn el la homoj. Kaj tiu ĉi ŝtatideo tiel forte disvolviĝis en la konsuloj, ke ili favorante la ŝtatideon vendas la proprajn filojn, nur por ke la ŝtato restu prava. Striko estas ja ago kontraŭ la ŝtato. Foje kaj foje, se estas honesta kaj ne subvendita striko. Kurt sukcesis veni sen paperoj ĝis Anglio. Sed Anglio estas malica loko. Insulo ĉiam malicas.¹ Oni povas sursalti ĝin, sed poste ne povas desalti. Kurt ne povis desalti. Li devis iri al la konsulo. La konsulo volis scii, kial li forlasis Brisbane en Aŭstralio, pro kio li tie ne vizitis la germanan konsulon, kaj kial li venis sur neleĝa vojo al Anglio. Kurt ne povis kaj ankaŭ ne volis rakonti tion, ĉar Anglio por li ne estis pli sekura ol Aŭstralio. La angloj tuj estus transdonintaj lin al Aŭstralio, por ke tie oni povu verdikti lin.

En la konsulejo en Londono aŭ en Southampton, aŭ en kiu ajn urbo en Anglio okazis, Kurt ekhavis tiel superfortan hejmsopiron, ke li komencis amare plori, ĉar tie ĉio rememorigis lin pri lia hejmlando. Sed la konsulo kriis al li, ke li ne ludu teatraĵon, ĉar alie li elĵetos lin, ĉar li konas jam sufiĉe da tiaj vagabondoj. Kurt donis la so-

1. Insulo ĉiam malicas: Laŭ FBI-dokumentoj Ret Marut estis arestita la 30-an de novembro 1923 en Londono, ĉar li kiel eksterlandano ne registrigis sin ĉe la polico. Juĝisto sendis lin en la prizonon de la londona urbokvartalo Brixton, kie oni ellasis lin la 15-an de februaro 1924.

lan respondon, kiun kuraĝa viro retenas por tiaj okazoj, kaj por sufiĉe emfazi tiun 'kisu mian postaĵon' — respondon, li kaptis sabloŝutilon aŭ ion tian kaj ĵetis ĝin al la kapo de la konsulo. Tiu tuj eksangis kaj kriis, sed Kurt malaperis rapide kiel fulmo.

La vizito ĉe la konsulo estis tute superflua. Ĉar li nas-kiĝis en Memel kaj ne opciis, la konsulo efektive ne povis helpi lin, ĉar lia kompetento por tio ne sufiĉe vastas. Kiel kutime. Li estis ja nur la servisto de la idolo.

Tial Kurt nun definitive estis morta kaj ne povis revidi la hejmlandon. Konfirmis ja oficeja persono al li, ke lia hejmsopiro estas nur teatraĵo. Kion oficiala persono scias pri tio, ke ankaŭ vagabondo, ke ankaŭ ĉifonula mondvaganto subite povas senti hejmsopiron? Tiaj sentoj estas rezervitaj nur por tiuj, kiuj havas blankan tolaĵon kaj ĉiutage povas preni puran nazitukon el la komodo. Jes, sinjoro.

Mi ne havas hejmsopiron. Mi lernis, ke tio, kio estu hejmlando, kio estu la patrio, estas peklita kaj enfiksita en dosierojn, kaj, ke ĝi estas reprezentata en la formo de ŝtataj oficistoj, kiuj elpelas tiel certe la honestan hejmsopiron, ke eĉ ne spuro de ĝi postrestas². Kie mi estas hejme? Tie, kie mi troviĝas kaj kie neniuj min ĝenas. Tie, kie neniuj volas scii, kiu mi estas kaj kion mi faras. Kie neniuj

2. patrio: Manifesto de la Komunista Partio: "La laboristoj ne havas patrujon. Oni ne povas preni de ili, kion ili ne posedas." (eldonejo progreso 1990, tradukis Detlev Blanke)

volas scii, de kie mi venis, tie estas mia hejmo, tie estas mia patrujo.

La juna viro el Memel povis dungigi sur hispana ŝipo kaj finfine venis al Jorike kaj fariĝis subhejtisto.

Protektaj instalaĵoj sur Jorike ne ekzistis, ĉar tio unue kostus monon kaj due estus ĝenaĵo ĉe la laboro. Mortula ŝipo ne estas azilejo por beboj. Uzu viajn okulojn, kaj se io perdiĝas de vi, jen estas nur pigra karno aŭ pigra fingro, kiu jam antaŭe ne emis labori.

La vitrotubetoj ĉe la kaldronejoj, indikantaj la akvoni-velon, havis nek protektan vitron nek dratkradon. En iu tago unu el ili krevis, kiam vaĉis Kurt. Oni ankaŭ ne havis longan stangon, per kiu fermŝraŭbi el sekura distanco la tubon, kiu kondukis al la akvonivela tubeto. La bolanta akvo elsiblis, kaj la kaldronejo plenigis sin per densa varmega vaporo.

Necesis fermŝraŭbi la tubon. Necesis fari tion. Sed la fermkrano troviĝis rekte sub la rompita vitrotubo, du colojn for de la truo, kie elsagis la vaporo. Necesis fermŝraŭbi ĝin, ĉar alie la kesto ne plu povus veturi eĉ duonon de tago, kaj se leviĝus ŝtorma vetero, oni ne povus manovri la ŝipon. La ŝipo estus tiel skuata, ke eĉ splito ne restus sen difekto.

Kiu fermŝraŭbu la kranon? Kompreneble la subhejtisto. La vagabondo oferis sian vivon, por ke Jorike povu

manovri plu, por ke ĝi iru nur tiam al la fiŝoj, kiam oni ordonos tion.

Kurt do fermŝraŭbis ĝin. Poste li renversiĝis kaj la inĝeniero kaj la hejtisto portis lin al lia litbenko.

”Kiel li kriis,” rakontis Stanislav, ”vi ne povas imagi tion. Li ne povis kuŝi sur la dorso kaj ne sur la ventro kaj ne sur la flankoj. La haŭto pendis kiel disŝirita ĉemizo de li malsupren, la tuta korpo estis kovrita de blazoj, dikaj kiel kapoj, apud ĉiu blazo troviĝis alia. Se oni estus transportinta lin en hospitalon, mi ja ne scias — helpo per transplantado de haŭto verŝajne eblus. Sed tiukaze oni devintus preni la tutan haŭton de bovido, por kunfliki lin. Kaj li kriis kaj kriis kaj kriis! Mi dezirus nur, ke la konsulo en la dormo aŭskultus lin, li neniam povus liberiĝi de la krioj. Ili sidas ĉe tabloj kaj plenigas formularojn, cent mejlojn for de la batallinio de la efektiva vivo.

Kuraĝo en la milito, ĉu? Idiotaĵo! Kuraĝo sur la batal-kampo de la laboro! Sed tie vi ne ricevas ordenon. Tie vi ne estas heroo. Li kriis, ĝis li estis morta. Vespere oni ĵetis lin en la maron, la junan viron el Memel. Nu, Pip-pip, mi devas demeti la ĉapon, ne gapu tiel strange. Jen vi kvazaŭ devas prezenti la fusilon. Vi ne povas eviti tion. En la maron, kun karbobulo sur kruro. Li aspektis kiel punkaptito. La Dua Inĝeniero postrigardis lin kaj tiam diris: ’Malbenita afero, nun ni denove ne havas

subhejtiston. ' Tio estis ĉio, kion li diris. Kaj ĝuste li estis la viro, kiu havas la devon fari ĝin, ĉar tio estis ja riparo, kaj tiaj riparoj tute ne estas la afero de subhejtisto. Jes ja, jen Kurt. Ankaŭ lin oni ne enskribis en la ŝiplibron. La Duan Inĝenieron oni enskribis. La kuiristo vidis tion, kiam li ŝtelis sapon en la kabineto de la ŝipestro. Nu, sed kion aĉeti por tiaj saĝoj?"

Ĉapitro 41

Kun la aliaj ŝipanoj mi konversaciis nur tre malofte. Plej ofte ili grumblis, fihumoris kaj duondormis, se ili ne estis ebriaj, kio okazis en ĉiu haveno. Sed, por diri la veron, estis ja ili, kiuj ne parolis kun ni. Mi estis ja nur subhejtisto, kiel Stanislav. Kaj la subhejtisto ne samrangas, tute ne samrangas kun rudristo, li eĉ ne havas la rangon de ferdeklaboristo. Ili ĉiuj estas grandaj moŝtoj kompare al subhejtisto. La subhejtisto metas la fingrojn en koton kaj cindron, kaj tial li des pli estas nur koto kaj cindro. Se oni tuŝus tiun subhejtiston, povus okazi, ke oni malpurigus la fingrojn. Kaj nun imagu la ĉarpentiston aŭ, kiel ekzemplon, eĉ pli altan rangon, la maaton. Kompare al ili oni estas nur vermo. Neniu kapablas tiel bone fari fajnajn kaj superfajnajn rangodiferencigojn kiel la laboristo.

Sed nun ekzemple fabriko. Tiu, kiu rajtas torni la ŝraŭbojn, po mil kaj ĉiujn laŭ ŝablono, kia granda homo

tiu estas rilate al tiu, kiu devas forporti la ŝraŭbojn per korbo. Kaj tiu, kiu rajtas forporti la ŝraŭbojn, kia neatingebla gravulo li estas kompare al tiu, kiu rajtas nur balai la laborhalojn. Kaj tiu, kiu rajtas balai, frapas sian bruston kaj diras: "Ha, tiu traserĉas ja nur la rubaĵon, li devas traserĉi la latunsplitojn, kune kun li mi ne povas montri min. Kiel tio aspektus?"

Inter la mortintoj la rangodiferencoj ne finiĝas. Ili eĉ pli grandiĝas. Tiu, sur kiun oni kungratis nur iom da tero ĉe la malantaŭa muro, ĉar ie li devas kuŝi, estas nenio. Tiu, kiu estas entombigita en abia ĉerko, jam pli gravas. Nokte, kiam ili dancas, li atentigas la terkovriton eĉ ne per rigardo, sed sopire transrigardas al tiuj, kiuj kun siaj kverkaj ĉerkoj dancas. Kaj al tiuj, kiuj promenas majeste kun siaj metalaj kaj angule orumitaj ĉerkoj, li tute ne kuraĝas suprenrigardi; tion tiuj cetere malpermesas al li kun emfazo. Por povi klare kompreni ĉion ĉi jam antaŭe, kelkaj el ili estas ja entombigitaj en metalaj ĉerkoj kun orumitaj anguloj kaj la aliaj estas kovritaj per iom da tero en kvarangulaj lignokestoj en iu aĉa loko de la tombejo. Nur la vermoj kaj la raŭpoj, tiuj revoluciaj ordigantoj kaj radikalaj ŝanĝantoj, ne akceptas rangodiferencojn. Ili ĉiuj egale blankas kaj egale grandas, kaj ili volas manĝi; kaj la manĝon ili prenas al si tie, kie ili povas

1. donkey-man (slanga angla): vinĉomaŝinisto, parte hejtisto, suboficiro; donkey estas en la angla azeno

preni ĝin; ili prenas ĝin el metala ĉerko kun orumitaj anguloj same rapide kiel el kesto.

La sinjoro ĉarpentisto kaj la sinjoro maato kaj la sinjoro *donkeyman*¹ estis *petty*-oficiroj, suboficiroj. Ili precize tiel malpure aspektis kiel ni, ili ankaŭ ne pli longe veturis ol ni, por la regula veturado de Jorike ili multe malpli gravis ol ni, sed la subhejtistoj devis priservi la sinjoron *donkeyman*. Ili devis alporti el la kuirejo la manĝon por li, devis surtabligi ĝin kaj poste detabligi. Por ke la rangodiferenco ne estu tuŝata. La *donkeyman* estas la vinĉomaŝinisto, kaj kiam la ŝipo enhavenas kaj la hejtistoj kaj la subhejtistoj taglaboras, li devas hejti la kaldronegojn, ankaŭ nokte. Dum la veturo li nur fuŝe kaj tuŝe laboras. Jen li iom purigas la maŝinojn, jen li lubrikas lagron, jen li devas dismunti kaj ellavi iun memlubrikantan maŝinparton, kaj jen li devas preni de ie iun koton kaj demeti ĝin ie aliloke. Tial li ne devas dormi en la grandaj kajutoj, sed en malgrandaj, kie estas nur du aŭ tri litbenkoj, kaj tial li ricevas dimanĉe grian pudington kun frambo-suko kaj en la semajno dufoje bakitajn prunojn en blua amelo. Sed, se ni dufoje semajne ricevis bakitajn prunojn kun ŝtoniĝintaj salfiŝoj, tiam li ricevis trifoje bakitajn prunojn. Li, la maato, la ĉarpentisto, la suboficiroj. Pro tio li devis ĉiam kontroli nin kaj atenti pri tio, ke ni ne ekzemple malfermŝraŭbu kaldronholdon dum ŝtorma vetero, kiam la pobaj holdoj ankoraŭ enhavas kel-

kajn kilogramojn da karbo. Kion Cezaro farus kun siaj armeoj, se li ne havus suboficiojn, kiuj staras sur la unua ŝtupo de la kariero al generalfeldmarŝalo? Suboficioj, kiuj venas de supre ne uzeblas; ili devas veni de sube, ankoraŭ hieraŭ batitaj, tiuj bone uzeblas, tiuj plej bone povas tradraŝi iun.

Poste sekvis la rudristoj kaj la ferdeklaboristoj. Stanislav havis pli da kapabloj ol ĉiuj tri rudristoj kune, sed li estis nur koto. Ili efektive nur tiam bone fartus, se estus ordonite, ke la subhejtistoj, kiam ili intencas preteriri iun *donkeyman*, devas demandi, ĉu estas permesate preteriri.

Kaj tamen ili ĉiuj estis mortuloj, kaj tamen ili ĉiuj troviĝis sur la vojo al la fiŝoj.

Se oni ne ĝuste tuŝis ilian majestecan senton, harmonia vivo kun ili eblis, kaj ili sentis kiel ni, ke ni sidas en la sama merdo. Tiuj ferdeklaboristoj, kiuj ne tiom ofte marveturis kiel la aliaj, ankoraŭ tro malcertis pri ni ol-daj marhundoj, por evoluigi iun rangosenton. Dum la paso de tempo tamen ekestis sento de kuneco, kies kaŭzo estis nia komuna sorto. Ni ĉiuj estis forblovitoj, spite tion, ke neniu el ni volis koncedi tion kaj eĉ plu esperis, ke li iam povu forsalti. Nin ĉiujn minacis la sama sorto de gladiatora oferiĝo, kion ni ĉiuj sciis sen sincere diri ĝin. Maristoj ne parolas pri ŝiprompo kaj ne pri ŝipdrono, tio ne estus bona. Tio nur logus la skeletulon

sur la ŝipon. Sed ĝuste tiu anticipanta scio, tiu dentkalkulado de la tagoj de haveno al haveno, tiu memgarda neparolado pri la fakto, ke, kiom ajn longe daŭros, ni tamen proksimiĝas tagon post tago pli certe al la lasta tago, kiam temos pri la brutala batalo por la nuda vivo, interligis nin per stranga bendo.

Neniam iu el ni iris sola en la havenon, ni ĉiam iris duope aŭ triope. Marrabistoj ne je kvarono tiel aĉe aspektis kiel ni. Ni neniam eniĝis en kverelojn kun la maristoj de aliaj ŝipoj. Ni estis tro kotaj kaj tro ĉifonitaj, kaj ili ne reagis al provokoj. Ni povis diri, kion ajn ni volis, ili kondukis, kvazaŭ ili ne aŭdus tion, ili eltrinkis sian vinon aŭ brandon kaj tiam foriris. Ili estis la honesta laborista klaso², la kvara socia rango; ni estis la kvina, kiu tiom longe ne estos en la vico, ĝis kiam la kvara ankoraŭ sidos ĉe la manĝokribo. Eble ni estis eĉ la sesa kaj devis atendi ankoraŭ kelkajn jarcentojn.

Tiuj de la kvara, de la honesta rango, ankaŭ tial evitis nian societon, ĉar ili rigardis nin banditoj. Tio ni ja

2. honesta laborista klaso: K. Marks kaj F. Engels skribis en la 'Manifesto de la Komunista Partio: "La ĉifonproletaro, tiu pasiva putraĵo de la plej malaltaj tavoloj de la malnova socio estas parte entirata en la movadon per la proleta revolucio. Laŭ sia tuta vivsituaĵo ĝi inklina esti subaĉetebla por reakciaj intrigoj." (Eldonejo Progreso 1990, tradukis Detlev Blanke)

vere estis. Al ni ĉio estis egala. Kio ajn okazus, pli aĉa ne povus okazi al ni. Ek do, murdu lin.

Se ni envenis en maristan tavernon, la mastrumanto ĉiam timeme klopodis, por ke ni tiom rapide kiom eblas foriru, kvankam ni ĵetis ĉion sur la tablon, kion ni havis en la poŝo aŭ en la buŝo, ĉar la poŝoj estis disŝiritaj, aŭ ankaŭ en ĉapoledo, se ĝi ekzistis ankoraŭ. Ni estis bonaj klientoj, sed tiom longe, kiom ni troviĝis en la taverno, la mastrumanto rigardadis al ni kaj li observis ĉiun nian paŝon kaj mienon. Se ŝajnis al li, ke unu el ni okule tikis kaj tro okulfrape rigardis al iu el la honesta rango, la mastrumanto iris tuj al la alrigardato kaj persvadis lin, ke li forlasu la tavernon. Li devis lin trakti memgarde kaj delikatsente. Estis ja tiel, ke, se la viro rimarkus pri kio temas, li eble tamen ion dirus tra la dentoj. Kaj tiam la tumulto komenciĝus.

Verŝajne pro la troa laboro, kiun ni devis fari, pro la stranga, senespera situacio, en kiu ni ĉiuj troviĝis, pro la seninterrompa nervostreĉa atendado de la krakonta krio de la surrifiĝonta Jorike, kiu ne volas iri al la fiŝoj, enfosiĝis en niajn vizaĝojn iom post iom io, kio plenigis ĉiujn homojn, kiuj ne veturis sur Jorike, per nedirebla hororo. En niaj vizaĝoj kaj en niaj okuloj certe io videblis, kio foje paligis kaj kriigis virinojn, kiam ni neaten-dite enpaŝis ilian vidkampon. Eĉ viroj nin rigardis time-me kaj turnis sin al alia direkto por iri alian vojon, por

ne devi preteriri nin. La polico tiom longe sekvis nin per la okuloj, kiom ili ankoraŭ povis vidi ion de ni. Strange estis rilate al infanoj. Kelkaj komencis krei, kiam ili ekvidis nin, kaj forkuris kiel ĉasate, male aliaj ekstaris, vaste malfermis la okulojn, kiam ni peteriris, kaj kelkaj sekvis nin senspire, kvazaŭ ili vidis materiigintajn sonĝofigurojn, kaj kelkaj, kio estis sufiĉe kurioza, proksimiĝis al ni, mansalutis nin, alridetis nin kaj diris: "Bonan tagon, viro!" aŭ "Bonan tagon, maristo!" aŭ ion tian. Sed inter tiuj, kiuj mansalutis nin, estis denove kelkaj, kiuj, post sia mansaluto suprenrigardis per grandaj okuloj kaj algapis nin kun vaste malfermaj buŝoj, poste subite forkuris kaj ne plu turnis sin.

Ĉu ni estis tiel mortaj, ke la infanaj animoj vidis la morton en ni kaj sentis ĝin? Ĉu ni aperis antaŭ la infanoj, kiam ili ankoraŭ sonĝis sub la koro de siaj patrinoj? Ĉu kunligiĝis sekreta bendo ĉirkaŭ ni, la forirantoj kaj mortontoj kaj la infanaj animoj, kiuj ĵus transpaŝis la sojlon de la vivo kaj ankoraŭ portis la ombron de la nekonata regno en sia konscio? Ni, la forirantoj — ili, la alvenantoj, la parenceco enestis en la kontrasto.

Pure laviĝintaj ni neniam estis. Per sablo kaj cindro oni ne povas lavi sin pura. Se oni ekpripensis en haveno, ke oni bezonas ankaŭ sapon, la mono jam estis elspezita por aliaj aĵoj, kiuj ŝajnis same gravaj al ni, vino kaj kantado kaj ĉio cetera. Ankoraŭ ni povis kanti. Ni

kriaĉis kaj hurladis, sed neniu vokis malsupren el la fenestro, ke ni silentu. Ili memgardis. La polico nenion aŭdis kaj vidis.

Kelkfoje ni ja aĉetis sapopecon, sed oni havis ĝin nur dum kelkaj horoj. Poste ĝi estis for por ĉiam. Oni ne povas teni la sapon enbuŝe dum la tuta tago, por gardi ĝin. Kaj ĉar oni ankaŭ la monon ne ĉiam povis teni en la buŝo kaj ankaŭ ne volis, ke iu ŝtelu ĝin, oni ĝin elspezis. La plej simpla afero de la mondo.

Okazis, ke ni lasis nin razi, se ni ne forgesis tion kaj ankoraŭ havis monon, aŭ se ni hazarde rigardis sur montrofenestron kaj ne plu rekonis nin mem. Spegulon ni ja ne havis. Tio estis bona, ĉar tiel neniu sciis kiel lia propra vizaĝo aspektas. Tiu, kiu tiel terure aspektis, ke la virinoj ekkriis kaj kaŝis sin en la domoj, estis ĉiam la alia, ne raziĝinta, kun ruĝa vizaĝo kaj vundskrapita de sablo kaj cindro, kun nudaj brakoj tute kovritaj de brulcikatroj kaj kun vestaĵoj bruldifektitaj, truigitaj, disŝiritaj, ĉifonaspektaj.

Anglan, francan, germanan, danan aŭ nederlandan havenon ni neniam vizitis. Tio ne estis nia tereno. Ni vizitis havenojn ĉe la marbordo de Afriko aŭ de Sirio. Nur malofte ni enkajjiĝis en Hispanio aŭ Portugalio, plej ofte ni ankris en ekstera rodo kaj transprenis la kargon fare de malpezaj ŝipoj kaj boatoj. La ŝipestro certe sciis, kial li ne alkajjiĝis en kelkaj havenoj, sed restis en rodo. En

tiuj kazoj li signalis, ke boato venu, kaj veturis en la havenon, por ordigi la paperojn ĉe la konsulo aŭ ĉe la havenaj aŭtoritatoj.

Ni iris niajn proprajn vojojn. Ne ekzistas mortulaj ŝipoj. Tio estas aferoj el la tempo antaŭ la milito. Ili ne ekzistas, ĉar oni ne vidas ilin en haveno, en konata haveno. Ili estas tie ekstere en foraj lokoj, kie ĉiu golfo estas haveno, se oni konstruis tie remizon. En la ĉinaj teritoriaj akvoj, en la hindaj, en la persaj, en la malajaj, ĉe la bordoj de la suda kaj orienta Mediteraneo, ĉe la bordoj de Madagaskaro, ĉe la okcidentaj kaj orientaj bordoj de Afriko, ĉe borde de Sudameriko, en la Suda Pacifiko. Sufiĉe da loko por ĉiuj kaj por kelkaj pliaj miloj. Tiel certe, kiel oni neniam povos forpeli ĉiujn vagabondojn de la vojoj sur la tero, ĉar ja ankaŭ tute honestaj homoj povas troviĝi inter ili, al kiuj mankas momente nur iom da mono, tiel certe oni ne povos forpeli la mortulajn ŝipojn de la sep maroj. Tiu, kiu volus serĉi ilin, ilin ne trovus. Estas ja trioble pli da akvo sur la terglobo ol firma tero; kaj tie, kie estas akvo, estas ankaŭ vojo por ŝipo, sed tie, kie estas firma tero, tute ne devas esti vojo por vagabondo.

Neniam iu estus trovinta Jorike. Ĝi havis ŝipestron, kiu regis sian metion. Li scipovis kiel konduti antaŭ princoj, ili rigardus lin samrangulo. Se iu ion suspektis, li superruzis la plej lertajn. Liaj paperoj ĉiam estis en ordo,

se temis pri Jorike kaj pri ties stomaka enhavo. Neniu dekfoje koncesiita poŝta vaporŝipo povis montri pli bonajn paperojn. Kaj la ŝiplibro, ĉu? Ĝi precizis ĝisminute.

Jen unufoje proksimiĝis hispana militŝipeto, kiam ni ankoraŭ estis interne de la marlimo. La ŝipeto serĉis. Ĉiu infano sciis, ke spicita bovaĵo kun ostoj estas bona negoco.

La ŝipeto signalis, sed la ŝipestro fajfis pri tio. Tiam la ŝipeto pafis la haltsignalon. Jorike ekhaltis. Estis tro malfrue, ni ankoraŭ troviĝis interne. Nu, tiaj ŝipoj ion tian ja ne respektas. Ili ankaŭ ekstere de la limo provas kapti la predon. La ŝipestro antaŭ la tribunalo devas pruvi, ke li ne plu enestis, sed estis ekstera jam unu kaj duonon da marmejloj. Tion li do pruvu, tio ne estas tiel simpla. Limpaliso ne staras en la akvo. La rumĉasistoj en Usono tute ne konas marlimojn. Foje kaj foje la ŝipestro tamen sukcesas pruvi, ke li eksteris. Nu, tiukaze oni simple pagas. Kaj tridek minutojn oni jam denove provas ĝin en iu alia loko. Nur la homo, la simpla homo, devas respekti la leĝon, la ŝtato ne devas fari tion. Ĝi estas ĉiopotenca. La homo devas havi moralon, la ŝtato ne konas moralon. Ĝi murdas, se ĝi trovas konvena tion, ĝi ŝtelas, se ĝi trovas konvena tion; ĝi rabas la infanojn de la patrinoj, se ĝi trovas konvena tion; ĝi disrompas geedzecajn vivojn. Ĝi agas laŭ sia plaĉo. Por ĝi ne ekzistas tiu Dio en la ĉielo, kiun ĝi devigas la homojn kredi

helpe de korpaj kaj vivaj punoj. Por ĝi ne ekzistas ordonoj de Dio, kiujn ĝi lasas draŝi helpe de bastono en la kapojn de la infanoj. Ĝi faras mem siajn leĝojn, ĉar ĝi estas la Ĉiopotenco, la Ĉioscianta kaj la Ĉieestanta. Ĝi faras mem siajn ordonojn, kaj se ili horon poste ne plu plaĉas al ĝi, ĝi mem transpaŝas ilin. Ĝi ne havas juĝiston super si, kiu postulas klarigojn de ĝi, kaj se la homoj komencas suspekti ion, ĝi svingas zigzage antaŭ iliaj okuloj la ruĝan-blankan-bluan hura-hura-huraan flagon, ĝis la homoj tute konfuziĝas en la kapo, kaj ĝi krias laŭte en iliajn orelojn: "Hejmo kaj fajrejo — infano kaj edzino" kaj ĝi blovas en iliajn nazotruojn la fumon: Pripensu vian gloriĉan pasintecon. Kaj tiam la homoj papage rebabilas ĉion, ĉar la Ĉiopotenco en persista laboro faris el ili maŝinojn kaj aŭtomatojn, kiuj ĝuste tiel movas siajn brakojn, krurojn, okulojn, lipojn, korojn kaj cerboĉelojn, kiel la ĉiopotenca ŝtato volas havi tion. Tion eĉ la ĉiopotenca Dio ne atingis, kaj ja ankaŭ li lertis kaj spertis. Sed kompare al tiu ĉi monstro li nur estas kompatinda fuŝulo. Liaj homoj tute memstare agis, tuj kiam ili povis movi siajn brakojn kaj krurojn. Ili forkuris de li, ne respektis liajn ordonojn, pekis kiel freneziĝintoj kaj fine detronigis lin. Ĉe la nova ĉiopotenca Dio estas pli komplike por ili, ĉar tiu ankoraŭ estas tro juna kaj ĉar ili ankoraŭ ne kuraĝas treti sur liajn piedojn kaj deŝiri la pomon de la arbo.

Ni haltis. Alia eblo ja ne restis al ni. Alie la ŝipeto blovintus nin ĉielen.

Kaj tiam ili surŝipiĝis.

”Ni volas rigardi la paperojn. Bone, dankon, tiuj estas en ordo. Ni ja foje rajtas kontroli. Ni ne longe okupos vin. Nur kelkajn minutojn.”

”Bonvolu, bonvolu, sinjoroj, sed ne tro longe. Mi malfruas, alikaze mi devus postuli monkompenson de via registaro.” La ŝipestro ridas. Kiel la viro povis ridi! Per sia ridado, kiu parte tiel ironiis kaj parte tiel eksterordinare gajis, li forviŝis ĉion, kio eble ankoraŭ ŝajnis suspektinda.

La bonaj homoj aŭdis ion pri spicita bovaĵo kun ostoj. Kiel formikoj ili rampadis en la kargoholdoj kaj serĉis spicitan bovaĵon el Chikago. Kaj la ŝipestro ridis kaj ridis.

Ne estis iu spicita bovaĵo. En la kuirejo estis kelkaj laduoj, por la propra uzo de la mezŝipo.

Sed jen estis kakao. Nederlanda, garantiata pura, senolea, Van Houtens. Kestoj kaj kestoj, ĉiuj plenaj. La tuta kakao en laduoj, por ke la aromo ne perdiĝu.

La kontroloficisto fingrotuŝis keston, kiu kuŝis meze de la aliaj. La kesto venis supren. Li ordonis malfermi ĝin.

Kaj la ŝipestro ridis. La oficiro nervoziĝis. Li volis kaŝi tion, sed li ne povis. La ridado duonfrenezigis lin.

Belaj grandaj laduoj. Ĉiuj fermgluitaj per etikedoj. La ŝipestro iris al la kesto, elprenis ladujon kaj transdonis ĝin al la oficiro, kun tre sarkasma tono en sia ridado. La oficiro rigardis al la ŝipestro, poste rigardis la ladujon, kaj nun per decida paŝo proksimiĝis al la malfermita kesto kaj mem elprenis ladujon, kiu estis apud la vaka loko. Li haste forŝiris la etikedon kaj malfermis la ladujon. Estis . . . kakao.

La ŝipestro tiel ridis, ke lia tuta korpo skuiĝis.

Subite la oficiro rememoris pri la spicita bovaĵo kun ostoj, kaj li elŝutis la tutan kakaon el la ladujo.

Jen kakao. Nenio alia enestis. Nenio alia krom garantiata pura senolea Van Houtens kakao.

Sed la oficiro, kiu tremis pro nervozeco, forprenis nun ladujon el la mano de la ŝipestro, forŝiris la etikedon, levis la ladan kovrilon, kaj jen estis . . . kakao. Li refermis la ladujon per la kovrilo kaj redonis ĝin al la ŝipestro, dirante "Dankon!"

Kion la ŝipestro sentis, kiam la oficiro prenis la ladujon el sia mano, tion nur li mem scias. Sed li ridis tiel, ke oni povis aŭdi tion ĝis sur la militŝipeto, ĉeflanke de ni.

La oficiro pardonpetis, transdonis la manifeston, la revizian dokumenton, en kiun li enskribis la signon de la malfermita kesto, kun la kvitanco por ambaŭ difektitaj kakaoladuoj, li eniris kun siaj subuloj en la ŝalupon kaj reveturis al sia ŝipo.

Kiam li depuŝiĝis, la ŝipestro kriis transen al la kuirejo: "Kuiristo, hodiaŭ vespere kakaon por la ŝipanaro kaj kukon kun sekaj vinberoj."

Tiam li pli proksimiĝis al la kesto, serĉis dum iom da tempo, ĝis li trovis la deziritan ladujon, elprenis kaj transdonis ĝin al la kuiristo. Poste li ordonis per najloj refermi kaj stivi la keston.

Mi staris sur la ferdeko, kiam tio okazis. Kaj ĉar oni neniam preterlasu bonan okazon, mi tuj nokte provis flankenigi kelkajn kakaoladujojn. En la sekvonta haveno ili ĉiam enspezigas kelkajn ŝilingojn, oni ankaŭ povas interŝanĝi ilin kontraŭ tabako.

Kvin da ili mi flankenmetis kaj stivis en holdo.

Ĉe la transdono de la vaĉo mi diris al Stanislav: "Ĉu vi jam foje pensis pri la kakao? Honesta metio. Eblas enspezi kelkajn ŝilingojn.

Jen eĉ ne ŝilingo enspezeblas. Ja, se estus kakao! Sed estas ja kakaokugloj, kaj se vi ne povas vendi aldone la ĝustajn kakakaomuelilojn, vi ricevus eĉ ne unu pencon por tio."

Tion mi trovis suspektiga. Stanislav do jam pripensis pri la honesta metio. Verŝajne li jam malfermis keston, kiam la dua ankoraŭ pendis ĉe la gruo.

Mi tuj grimpis supren en la holdon kaj malfermis ladujon. Stanislav pravis. Estis kakaokugloj. Tre duraj, kun latunaj ingoj. En la dua ladujo troviĝis la samaj. En la

tria, kvara, kvina, la samaj. Mi bele refermis kaj remetis ilin en la kestojn. Por arabaj kaj marokaj kakaokugloj mi ne interesiĝis; la ĝustajn muelilojn, se ni estus havintaj ilin sur la ŝipo, mi ja tamen ne povis kaŝi sen risko.

Nur la ŝipestro kapablis transformi kakaokuglojn en kakaopulvoron. Li kapablis fari tion per du manieroj. Li povis plenumi la miraklon per tio, ke li lasis la ladujon en la kesto, sed li povis fari ĝin ankaŭ per tio, ke li prenis la ladujon sur la manon. Li estis majstro de la nigra magio³. Jes, sinjoro.

3. Li estis majstro pri la nigra magio: Agrippa von Nettesheim (1486–1535), filozofo, magiisto, kuracisto, juĝisto, soldato kaj verkisto, rigardis la nigran magion "aĉa arto", kiu funkcias "nur pere de la trompo de la okuloj". Ne estis vero por li, sed nur imago. "Ĉar tiu arto ne kreas ion". "Sed ĝi donas gajnon, donas honoron. Ne estas la vero de la scienco."

Ĉapitro 42

Ni veturis al Tripolo kaj la ondegoj ruliĝis kvazaŭ la diablo sendis ilin. En la kaldronejo ni estis ĵetataj ĉien. Kaj en la karboholdoj estis eĉ pli danĝere. Se mi foje iom sidis sur karbomonto por ripozi, mi rigardis de tempo al tempo la vitrotubeton, kiu povas turmente gluti plenkreskan mariston, se ĝi emas kaprici. Mi prezentis al mi la demandon, ĉu mi fermŝraŭbus la tubon, se la vitrotubeto ĵus adiaŭis la deĵoron?

Kompreneble mi diris, ke ne. Sed kiu antaŭscias sian faron, kiam la demando ne nur prezentiĝas, sed se oni tuj devas decidi ĝin, kaj tute ne pensas pri tio, ke temas pri demando. Ja povas okazi, ke la hejtisto kuŝas sub la tubo, kaj jam ne povas foriri sen helpo. Ĉu tiumomente lasi mian hejtiston en la kaĉo?¹ Ke li postkrias min

1. Ĉu lasi mian hejtiston en la kaĉo?: Kropotkin en Etiko I, eldonita en Esperanto de SAT-broŝurservo Laroque Timbaut: "Darwin, kiu konis la naturon, kuraĝis diri, ke el la du instinktoj — la socia kaj la individua — la socia estas pli forta, pli persista kaj pli konstante propra instinkto ol la dua."

dum mia tuta plua vivo: "Pippip! Pippip! La vaporo brogas min! Eltiru min, Pippip! Mi ne povas vidi ion, miaj okuloj estas brogitaj, Pippip, rapidu, mia fino proksimas! Pip-pip-p—"

Nu, tiam lasu do kuŝi vian hejtiston. Sed vi iros al li, ankaŭ se vi scias, ke transvivos tion neniue el vi.

Eble mi tamen ne iros. Ja kial? Ankaŭ mia vivo havas valoron. Mia vivo . . .

"Pippip, subhejtisto, saltu baborden, ne rigardu, baborden al mi!"

La hejtisto tion tiel laŭte kriis, ke li superkriis la marteladon de la maŝino.

Sen suprenrigardi mi faras salton baborden kaj falas sur la genuojn, ĉar mi stumblis je la fajrostango, kiu baris la vojon. Samtempe bruas kaj la ĉenoj tintegas orelsurdige.

Tra la nigra dika karbopolvo sur la vizaĝo de la hejtisto mi vidas, ke li tute palas. Ankaŭ mortuloj ankoraŭ paliĝas. Mi leviĝas pene kun vundbatitaj tibioj kaj sangantaj genuoj kaj turnas min.

La cindrokanalo, la kruĉokondukilo, falis malsupren.

Tiu kondukilo estas ronda ladotubo, simila al granda lada kamentubo, ĉirkaŭ metron larĝa diametre. Tra ĝi oni levas la cindrokruĉojn tiel, ke ili ne povas svingiĝi dekstren aŭ maldekstren, sed iras supren al la elirŝakto, kie oni malkroĉas ilin.

La kruĉokanalo pendas profunde en la kaldronejon, ĝis ĉirkaŭ naŭ futojn super la planko. Supre oni fiksas la kanalon per nitoj al fera krono. Certe tiuj nitoj trarustiĝis, kaj nun la kanalo en la ŝtorma vetero tute malfiksiĝis kaj derompigiĝis. Kien ĝi falu? Ĝi devas fali en la kaldronejon. Ĝi estas vertikale falanta, tre dika ferolado kaj pezas cent kilogramojn aŭ eĉ pli. Ĝi tratanĉas kapon kaj tutan korpon laŭ la longo, kiel razotranĉilo. Aŭ ĝi detranĉas brakon kaj aldone ŝultron. Se ĝi indulgas, nur piedan duonon. Kiu supozus tion pri la cindrokanalo, ke ĝi iam povus trarustiĝi je la ferkrono. Ĝi pendas tie ekde la detruo de Jerusalemo kaj neniam falis. Ne dum tiuj multaj jarcentoj. Kaj nun subite ĝi ekhavas la ideon fali.

Jen la sorto de maristo. Jen la sorto de laboristo. Estas via kulpo. Ĝustatempe iru flanken, tiam malbono ne povas okazi al vi.

Hola, hejtisto, jen mi ankoraŭfoje feliĉe eskapis per salto. Tuj ĉe la unua krio: "Subhejtisto, baborden!" mi rapidis kiel simio. Mi ne longe pripensis, pri kio temas. Jorike evoluigis instinktojn, ĝi zorgis por tio, ĝi tenis homon sporta.

"Jes ja, hejtisto, ĉe la diablo, tio estis salto en la ĝusta tempo." Ĉu danki pro tio? Tion ne. Kial? Morgaŭ eble trafos min, postmorgaŭ Stanislavon. Kiu sciu, kiun trafos la sekvonta kuglo . . . Ni troviĝas en milito. For la kapon. Sed antaŭ ol oni aŭdas ion, la kapo jam forestas.

La restaĵo ne plu leviĝas. Por tio oni ne pagas. En la maron. Kun karbobulo ĉe la kruro. Tuŝado de la ĉapelo. La entombiga muziko: "Nun ni jam denove ne havas subhejtiston."

La vitrotubeto estas riparita. Ĝi havas sian viktimon. Al la cindrokanalo la hejtisto fuŝis la plezuron. Sed tio provokas venĝon. Kiam la vitrotubeto denove krevos? Kiu estos la sekvonta viktimo? Amiko, mi diris al mi, fermtiru la zonon. Jen estas averto en la aero. Avertito por vi. La skeletulo vagas ĉi tie, li enrampas mallumajn lokojn kaj embuskas en anguloj. Venontan fojon li faros pli bonan laboron, kaj li ne lasos la hejtiston hazarde suprenrigardi ĝuste en tiu momento, kiam duono de la krono malfiksiĝas kaj poste la alia. Venontfoje eble estos tiu tabulo supre, sur kiu ni transbalancas al la karboholdo.

Karulo, mi diris al mi, plej bone estos forlasi la ŝipon en Tripolo. Eĉ kiam vi estas morta, vi ja tamen volonte faros promenon for de la tomboj, kaj rigardos, kio okazas ekstere, ĉar tiel rapide ne eblas kutimiĝi al la sufoka aero en la tombo. Vi ja tamen devos reiri en la tombon aŭ sur mortulan ŝipon, sed nazplenon da freŝa aero vi almenaŭ enspiros, kaj la duan fojon la afero jam pli bone sukcesos. Sed en Tripolo ne eblis forlaso. Eĉ paŝon ni ne povis iri negarditaj. Ĉe la plej eta provo forkuri ili kaptus kaj rekondukus nin. Ili fakturus siajn elspezojn al

la ŝipestro, kaj tiu minusus ĝin de la salajro. Ankaŭ en Sirio ne eblis. Ni ne povis forsalti. Ni estis liberaj viroj, liberaj maristoj.¹ Ni rajtis eniri en la havenojn, rajtis di-boĉi en la tavernoj, rajtis danci kaj forludi nian monon aŭ lasi rabi ĝin el niaj poŝoj. Ĉion ĉi ni rajtis fari, ĉar ni estis liberaj maristoj kaj ne punkaptitoj. Sed tuj, kiam Jorike flirtigis la Bluan Petron kaj ni vagabondis en suspektinda distanco for de la kajo aŭ de la moleoj aŭ eĉ en arabeskaj stratetoj kaj obskuraj anguloj, jen jam iu nin tenis ĉe brako: *"Monsieur, s'il vous plait"*³, via ŝipo atendas, ni akompanos vin, por ke vi ne maltrafu la vojon."

Kaj se oni tiam denove troviĝis sur Jorike, ili rajtis stari ekstere sur la kajo kaj rajtis malpermesi al vi forlasi la ŝipon plian fojon, ĉar la Blua Petro flirtis, kaj tio signifas, ke la libero nun denove finiĝis.

2. Ni estis liberaj viroj, liberaj maristoj: "La tuta diferenco rilate al la antikva, senkaŝa sklaveco estas nur tiu, ke la hodiaŭa laboristo ŝajnas liberi, ĉar li ne estas vendata per unu fojo, sed pecon post peco, po tago, po semajno, po jaro, kaj ĉar posedanto ne vendas lin al alia, sed ĉar li mem tiumaniere devas vendi sin, ĉar li ja ne estas la sklavo de unu persono, sed de la tuta posedanta klaso. Por li la afero fakte restas la sama, kaj ankaŭ, se tiu ŝajno de libereco unuflanke devas doni kelkajn liberojn al li, li havas aliflanke la malavantaĝon, ke neniuj garantias al li lian vivtenon, ke de lia mastro, de la burĝaro, li ĉiutempe povas esti forpuŝata kaj lasata al la malsatmorto, se la burĝaro ne plu havas intereson pri li, pri lia ekzisto." (F. Engels)
3. Monsieur, s'il vous plait (france): sinjoro, bonvolu

Stanislav efektive pravis: "Vi ne povas forsalti de la ŝipo. Kaj se vi tamen forsaltas, ili kaptas vin kaj metas vin sur alian mortulan keston, kiu eble eĉ pli aĉas. La mortuloj ja ĉiam akceptas vin, ankaŭ el la manoj de la polico. Dankante. Al la anĝelofaristo ili eĉ enmanigos dek ŝilingojn. Ili eĉ nutras vin, ĝis ili povas vendi vin sur alian mortulan ŝipon, kiu alvenas. Ili ja devas liberiĝi de vi. Ili ja ne povas deporti vin al via hejmlando, ĉar vi ne havas hejmlandon."

"Sed tiukaze mi ne devas iri sur la ŝipon."

"Vi devas suriri ĝin. La ŝipestro diras, ke li dungis vin, per manpremo. Al vi oni kredas nenion, kion la ŝipestro diras, tion oni kredas. Li estas ŝipestro kaj havas hejmlandon, eĉ se ĝi estas nur mensogita, kaj li mem ne rajtas reveni hejmen. Sed li estas la ŝipestro. Vi devas suriri, li dungis vin. Li neniam vidis vin, sed dungis vin per manpremo. Vi devas suriri. Vi estas dizertinto."

"Sed, Stanislav, nun parolu klare. Ankoraŭ ekzistas leĝoj," mi diris, ĉar mi supozis, ke li troigas.

"Tio estas jam mia kvara. Por vi estas la unua. Mi scias, kion mi diras."

"Oni ja ne povas devigi vin. Mi mem venis libervole al Jorike," mi sedis.

"Vi pravas, la unuan fojon vi venas kvazaŭ libervole. Sed se viaj personaj aferoj estus en ordo, vi ne estus veninta libervole. Se viaj personaj aferoj estas en ordo, ne-

niu povas kapti vin per tia cinamo, kia manpremo, dizertinto kaj tiel plu. Tiukaze vi diras, ke vi volas iri al la konsulo. Tiam ili devas lasi iri vin kaj povas vin nur akompani. Se la konsulo diras, ke li akceptas vin, ke li agnoskas vin, ili devas retiriĝi. Jen tute ne plu temas pri manpremo, kaj la konsulo diras al la ŝipestro: 'Kiu vi estas? Kiam oni inspektis lastfoje la ŝipon? Kiujn bezonaĵojn havas la maristaro? Kiajn manĝon, salajrojn, kajutojn?' Jen la ŝipestro fortrotas kaj nenion plu diras pri la manpremo. Ĉu vi povas iri al la konsulo? Ĉu vi havas paperojn? Ĉu vi havas patrion? Do, tiukaze ili povas trakti vin laŭ sia volo. Ĉu vi ne kredas tion? Forlasu la ŝipon, provu."

"Ĉu vi ne plu havas vian danan maristan libron?"

"Kia demando! Kia stulta demando! Se mi ankoraŭ havus ĝin, mi ja ne estus ĉi tie. Mi ja tuj vendis ĝin kontraŭ dek dolaroj, kiam mi ricevis la belan pasporton en Hamburgo. Sur dana ŝipo la aĉetinto ne povas dungiĝi, ankaŭ al dana konsulo li ne povas iri. Tiu tuj forprenus ĝin de li, ĉar ĝi estas registrita; ĝi estas nur papero por la fiŝoj. La viro de la marista dokumento jam ne vivas. Sed por simplaj cirkonstancoj ĝi valoras cent dolarojn. Se mi ĝin nur havus. Sed mi tute fidis mian elegantan pasporton. Ĝi estis kvazaŭ fortikaĵo por mi, tiel bona kaj sekura. Ĝismedole sana. Aŭtentika ĝis la pupiloj. Pli bona ol dek ĵuroj antaŭ tribunalo. De la tuta mondo oni

povis telefoni pro ĝi en Hamburgo, sen grumblo. Oni devus nur diski la numeron. Kaj tuj la respondo venus: La pasporto estas klara kiel diamanto. Sed ĝi tamen estis nur gipsfasado. Ĝi havis nur belan vizaĝon, sed nenion aldone.”

”Sed kial vi ne provis ie aliloke?”

”Mi ja provis, Pippip. Ĉu vi eble pensas, ke mi delasus de tia eleganta mantelo, sen surmeti ĝin sesfoje kaj sen observi, ĉu ĝi eble tamen konvenas? Mi provis ja ankaŭ sur sveda ŝipo. Ni eĉ ne venis ĝis la konsulo. La ŝipestro prenis la dokumenton, enrigardis kaj tuj diris: ‘Tion ni ne povas fari. Mi neniam plu povus liberiĝi de vi.’ ”

”Sed la germanoj vin akceptus,” mi nun diris.

”Antaŭ ĉio alia ili pagas malpli ol nur avare. Almenaŭ tiam. Kion ili pagas nun, mi ne scias. Mi ja volonte prenus tian ŝipon. Estis egale al mi. Sed se oni tie alvenis, ili tuj alsaltis kaj kriis al via vizaĝo: ‘Ni ne akceptas polaĉojn. For la polaĉojn. Vi voras la ŝtonkarbon el Supra Silezio. Vi neniam povas sufiĉe ŝtopi viajn polaĉajn faŭkojn.’ Ktp, ktp. Tiel plu irus dum la tuta veturo. Ankaŭ se mi povintus dungiĝi. La aliaj, la maristaroj estas eĉ dekoble pli fiaj, dekoble pli ekscititaj de demagogoj. Tion vi tute ne eltenas. Tio tiel iradas de matene ĝis vespere: ‘Porka polaĉo. Kota polaĉo. Merdopolaĉo. Ĉu vi ne volas ensakigi ankaŭ Berlinon, polaĉporkoj, kiuj vi estas?’ Tion vi ne eltenas, Pippip. Vi saltus en la maron.

Prefere Jorike. Tie neniŭ insultas la alian pro ties nacieco, ĉar neniŭ plu havas naciecon, pri kiu li povus fanfaroni.”

Tiel pasis monato post monato. Kaj antaŭ ol mi povis mediti pri tio, mi estis jam kvar monatojn sur Jorike. Kaj mi pensis komence, ke mi tie povus vivi eĉ ne du tagojn.

Ĉapitro 43

Ni homoj faru bildon de ni, kiu samu al ni, kaj al la aliaj ni donu la kapablon kredi kaj kutimiĝi, por ke ili ne iutage detronigu nin. Jorike fariĝis eltenebla. Propre ĝi estis tute agrabla ŝipo. La manĝo ne estis tiel aĉa, kiel ŝajnis. De tempo al tempo ni ricevis postŝtorman matenmanĝon. Eĉ jam kakaon kaj kukon kun sekaj vinberoj. Kaj kelkfoje duone plenigitan akvoglason da konjako aŭ plenigitan akvoglason da rumo. Kelkfoje la kuiristo disdonis eĉ kroman pundon da sukero, se oni kungratis en la holdo kvazaŭ per bestaj ungoj belajn nukso-karbojn por la kuirejo.

La malpureco en la kajutoj estis eltenebla. Ni ja havis nek viŝbroson nek balailon. Ni balais per sakĉifono. Ankaŭ sapon ni ne havis. Kaj se ni aĉetis pecon por la persona uzo, ni kompreneble ne foruzis ĝin, por ke la kajuto estu pura. Ni ja ne frenezis.

Ankaŭ la litbenko ne estis tiel dura, kiel unue ŝajnis. Mi faris al mi kusenon el polurlano. Ĉu cimoj? Tiuj ankaŭ en aliaj lokoj ekzistas. Ne nur sur Jorike. Ili sufiĉe bone elteneblis. Aspektis neniu plu tiel kota kaj ĉifonu-

la kiel en la unuaj tagoj. Ankaŭ la manĝilaroj ne plu estis tiel priŝmiritaj.

Ĉiun tagon ĉio fariĝis iom pli pura kaj iom pli bona kaj iom pli eltenebla. Se okuloj rigardas tre longe ion, ili ne plu vidas ĝin. Se lacaj membroj ĉiutage ripozas sur la sama dura lignotabulo, ili baldaŭ dormas kvazaŭ sur lanugoj. Se la lango gustas ĉiutage la saman, ĝi ne scias, kiel povus gusti alio. Se ĉio ĉirkaŭe malgrandiĝas, oni ne vidas, kiel oni mem ŝrumpas, kaj se ĉio kotas, kio ĉirkaŭas vin, vi ne vidas, kiel kota vi mem estas.

Jorike entute elteneblis. Kun Stanislav eblis bone interparoladi. Li estis prudenta kaj inteligenta viro, kiu vidis multon, kaj kiu rigardis ĉion per klaraj okuloj, kaj ne tiel facilanime lasis dormigi sian cerbon. Ankaŭ kun la hejtistoj interparoladoj estis eblaj. Ili sciis rakonti pri tio kaj jeno. Ankaŭ la ferdeklaboristoj ne estis stultigitaj iditoj. Stultuloj neniam venis al la mortuloj kaj nur malofte kutimaj homoj. Ili ĉiuj tenas ĉion en bela ordo. Tiuj neniam povas fali trans la muron, ĉar ili neniam suprengrimpas por rigardi, kiel aspektas sur la alia flanko. Tiuj kredas tion, kion oni fabelas al ili pri tio. Tiuj kredas, ke sur la alia flanko sidas murdobruligistoj¹. La murdobru-

1. murdobruligistoj: por la nuna germana lingvouzo tre nekutima esprimo, kiun uzis Agrippa von Nettesheim (1486–1535). (Vidu pri li en 41/4) Pri la reĝa korto de la franca urbo Lyon, kie oni sufokis ribelon de prakristanismaj valdanoj, li skribis post lia foriro: "Jen kovejo por mortbatontoj. El

ligistoj ĉiam sidas sur la alia flanko de la muro. Kaj al tiu, kiu ne kredas tion kaj foje volas persone rigardi, ĉu estas vere, kaj do grimpas sur la muron kaj ĉe tio falas malsupren, okazas tute juste, ke li devas resti ekstere. Kaj se tiu tamen volas iri al la transa flanko, por vendi al la murdobruligistoj la superflujajn pantalonbutonojn, li iru almenaŭ tra la pordego, por ke oni vidu, kiu li estas, kaj por ke la noktogardisto, kiu havas super sia dompor-do la aglon kaj la flagstangon², kiuj faras lin tuj rekonebla kiel la noktogardiston de sia lando, ne perdu la trinkmonon. Tiu, kiu ne povas pagi trinkmonon kaj ne havas folieton en la poŝo, sur kiu oni konfirme stampis, ke li estas la filo de sia patrino, restu hejme. Libereco jes ja, sed konfirma stampo necesas. Libera elekto de la lando, en kiu oni volas vivi, jes ja, sed nur kun la konsento de la noktogardistoj. La ŝipestro ŝuldis al mi kvar monatsalajrojn. Cent dudek pesetojn kaj eble kelkajn pliajn mi jam ricevis antaŭpage. Restis do ankoraŭ sufiĉe granda

ambicio kaj maljusteco ekestis nomoj: generaloj, grafoj, baronoj, kavaliroj, kapitanoj, subkapitanoj, standardistoj. Sed la ĝustaj nomoj devus esti: rabistoj, rompŝtelistoj, homŝtelantoj, banditoj, ŝtelistoj, malsanktigantoj de l'templo, seksperfortantoj de virinoj, monedziĝaj svatuloj, seksdiboĉuloj, adultuloj, perfiduloj, rabistoj de l' ŝtatkaso, brutŝtelistoj, ludistoj, blasfemantoj, venenmiksantoj, patromurdistoj, murdobruligistoj.”

2. la aglo kaj la flagstango: la aglo estas la prusa aglo

sumeto. Ĝi restis sufiĉe granda sumeto, eĉ se oni transkalkulis ĝin al pundoj.

Por nenio mi ja tamen ne volis labori kaj donaci la monon al la ŝipestro. Kaj tial li retenis min des pli firme. Sed kie kaj kiam kaj kiel maldungiĝi? Tio ne eblis. Oni ne konfirmis la maldungiĝon en kiu ajn haveno. Neniu paperoj, neniu hejmlando. Ni ne povas liberiĝi de la viro. Li ne povas maldungiĝi.

Estis nur unu okazo maldungiĝi. La gladiatora maldungiĝo. La kontraktnuligo sur rifo. La kontraktnuligo ĉe la fiŝoj. Se oni eskapus, oni naĝus al marbordo. Tie ili ne tuj povas reĵeti vin en la maron. Ŝiprompulo. Ekflagras la kompato de la homoj, precipe de tiuj, kiuj loĝas en bordaj regionoj. Mortulojn oni ne kompatas, ĉe ŝiprompuloj estas iom alie.

Tiam devas veni ankaŭ la noktogardisto de tiu flago, kiu flirtis sur la ŝipo, kiam ni surrifiĝis. Li ne pagas por la viro, li pagas por la raporto, por ke la asekuro estu pli bone oleita. Ĉar se la raporto ne alvenas, komenciĝas la atendotempo por la perdiĝinta ŝipo, kaj tio signifas gravan interezoperdon. Se la raporto jam alvenis kaj la kompato al la ŝiprompulo elsekiĝis, oni migras ree al la mortuloj. Unue tre lante, tiam pli kaj pli rapide. La kompanio estas kompensodeva pro la viro, kaj ĝi respondecas pro lia forkonduko. Sed kien konduki lin? Neniu ŝipestro volas havi lin. Li neniam povus liberiĝi de li. Sek-

ve sur mortulan ŝipon. Li ne volas suriri ĝin, ĉar li ankoraŭ estas sata pro la lasta fojo. Manpremo, provita dizerto, dek ŝilingojn en la manon, la Bluan Petron supren. Bonan matenon, nu ni estas denove kune.

La fiŝoj povas atendi. Li venos. Iam li venos. Li venos, aŭ pro vitrotubeto aŭ pro cindrokanalo aŭ pro karbo-lavango en la karboholdo aŭ pro rifo. Sed li venos. Pension li ne povas ricevi, kaj ne geedziigi, kaj ne komenci modestan komercon de boatoj. Ĉiam denove li devas eniri la arenon, ĝis li forgesas, ke li troviĝas en la areno, jes, sinjoro . . .

Nun ni ankris en Dakaro. Certe honesta haveno. Oni ne povas nei tion.

Jen la purigado de kaldronegoj³. Purigado de la kaldronegoj, kiam la fajro sub la purigenda kaldronego

3. la purigado de kaldronegoj: povus esti kaŝita priskribo de veraj bataloj en kaj apud Munkeno la 30-an de aprilo en 1919, kiam la civitana milito kondukas al masakroj kontraŭ ruĝarmeanoj kaj al nepartoprenantaj loĝantoj, pli ol mil mortintoj, Ret Marut, cenzuristo de la Centra komitato de la konsilia respubliko post aresto kaj pridemando en la militministerio fuĝas la unuan de majo.

En la biografio de Chris Hirte pri Erich Mühsam, eldonejo "Neues Leben Berlin", 1985, mi trovis foton sur la kovrila paĝo el tiu tempo, sur kiu Marut staras inter aliaj batalantoj kun fusilo, kun bantkravato kaj proletoĉapo, apud mitralo. Ankaŭ O. M. Graf, Irene Mermet kaj Max Hoelz rekoneblas tie. Hoelz kun sia ruĝa armeo ankoraŭ post la okazaĵoj en Munkeno plu batalis.

estingiĝis antaŭ nur unu tago, kaj kiam la najbara kal-dronego ankoraŭ produktas vaporon. Kaj tiun plezuron oni havas en regiono, kie oni diras: "Rigardu tien, kie staras la verdaj palisoj kun la granda E antaŭe, tio estas la ekvatoro, kiun vi povas nomi ankaŭ tagmeza linio, sed tiam vi devas malŝtraŭbi la E-on kaj pendigi latunan ŝildon kun la granda T sur ĝi. Sed, ĉu vi do diras 'tagmeza linio' aŭ 'ekvatoro' aŭ tute nenion, estas ĉiam egale varmege kaj arde. Se vi mantuŝas la ekvatoron, la mano tuj deiĝas, kvazaŭ forrazita, kaj restas nur kelkaj floketoj da cindro. Se vi metas feropecon sur la ekvatoron, ĝi fandiĝas kiel butero. Se vi kuntuŝigas du pecojn, ili vel-diĝas aŭtogene. Glate, sen junto, vi devas nur premi."

"Mi scias," diras Stanislav, "ni foje transveturis la ekvatoron, kiam estis ĝuste kristnasko⁴. Tiam ankoraŭ tiom varmegis, ke oni povis trabori la dikajn ferajn ŝipvandojn per nura fingro. Oni eĉ ne devis bori. Nur tuŝo perfingre, kaj jam truo enestis⁵. Se oni kraĉis kontraŭ la

4. kristnasko: ĉirkaŭ kristnasko de la jaro 1918 en Munkeno, la revoluciaj laboristoj kun Erich Mühsam kaj la spartakistoj atakas la social-demokratatan registaron de Kurt Eisner, kiu januare de 1919 arestigis 12 el la plej radikalaj kontraŭuloj.
5. kaj jam truo enestis: temas pri la truo de Jeĥezkel (8.7-18), pri kiu Thomas Müntzer (1489?- 1525), unu el la revoluciaj gvidantoj en la Germana Kamparana Milito, skribas la jenon: "Karaj kamaradoj, ni ankaŭ plivastigu la truon, por ke ĉiuj en la mondo vidu kaj kvazaŭ per manoj kaptu, kiaj estas niaj grandaj sinjoroj, kiuj tiel blasfeme faris pentritan vireton el nia

feran ŝipvandon, la kraĉaĵo traflugis ĝin kvazaŭ nenio, kaj tuj denove estis truoj. La ŝipestro vidis tion de la ponto kaj kriis: 'Ĉu vi volas fari kafokribrilon el la ŝipo? Tuj fliku la truojn.' Kaj jen ni viŝis nur iom permane aŭ kubute, kaj jam la truoj estis flikitaj. Ĝi estis tiel mola kiel kukopasto. La feraj mastoj⁶ tute kurbiĝis, kiel longa vakskandelo metita sur fornon. Estis porka afero, kiom longe daŭris, ĝis ni ree rektigis ilin. Pri la ekvatoro oni ne faru ŝercojn."

"Tute certe ne," mi koncedis, "tial oni ja ambaŭflanke de la ekvatoro faris ĉirkaŭ la tero palison kun avertaj ŝildoj⁷ sur ĝi. Vi povas vidi ĝin jam sur la mapo, la palison. Vi faris la stultan eraron, ke vi transveturis ĝin sur la akvo. Ni pli ruzis. Ni sube traveturis ĝin tra la subak-

Dio." Thomas Müntzer, tiu radikala kaj anarkiema pracomunisto kaj verkisto, kiu, kiel la anabaptistoj antaŭ li, celis forigi ĉiun registaron post la venko de la kamparanoj, estis unu el la voĵpretigintoj por Marut/ Traven.

6. La feraj mastoj tute kurbiĝis: 'feraj' germane estas 'eiserne', aldudo pri Eisner, Kurt (vidu punkton 4)
7. latbariloj kun avertaj ŝildoj: Traven skribis al la legisto de la Librogildo, ke tiu ekkonos en la romano "La Mortula Ŝipo" "kelkajn naciajn kaj filistrajn limpalisojn, kiuj ŝanceliĝos. Espereble ne alvenos tiuj homoj, kiuj same asertas, ke ili laboras en la moderna socia spirito, kaj firmitenas la ŝanceliĝantajn naciajn kaj filistrajn limpalisojn, ĉar ili timas, ke ankoraŭ tute aliaj aferoj povus ekŝanceli."

vaj tuneloj. Tie estas agrable friske. Oni tute ne rimarkas, ke oni transveturas sub la ekvatoro.”

”La ekvatorajn tunelojn mi konas. Sed la kompanio ne volis pagi la tunelajn traveturstojn⁸. Kiel tunelimploston ili postulas po ŝilingo por ĉiu tuno. Cetere, kiel oni envenas en la tunelon?”

”Amiko mia, tio estas ja tute simpla,” mi respondis, ”Jen estas granda truo en la maro, kaj en tiun la ŝipo do eniras, la pruo antaŭe, ĝi traveturas kaj poste elvenas sur la alia flanko, ankaŭ tie estas tia truo en la akvo.”

”Efektive tre simpla afero,” Stanislav konsentis, ”tion mi imagis multe pli komplika. Mi pensis, ke oni metas la ŝipon en iuspecan skafandron kaj poste tiras ĝin mal-supren. Sube troviĝas maŝino, kiu tiras, kaj tiam la ŝipo sube moviĝas sur dentradaj reloj⁹, kaj sur la alia flanko oni poste suprentiras la ŝipon.”

”La afero kompreneble funkcias ankaŭ tiel,” mi diris, ”sed tio estas tro komplika metodo. Ili ne povus fari tion po ŝilingo por tuno.”

”Fulmotondro, mi tuj eksplodos, ĉu la babilaĉo tie en la kaldronego nun baldaŭ finiĝos, aŭ ne?” kriis la Dua

8. La tunelaj traveturstoj: povus esti aludo pri la sekreta fervoja traveturo de Lenin tra Germanio. Tiujn traveturstojn pagis la germana imperiestro Vilhemo la Dua.
9. dentradaj reloj: aludo pri Lenin, kiu uzis tiun komparon al dentrado por la sindikatismo

Inĝeniero en la kaldronegon, dume li trametis la kapon tra la homlukon . . . "Se vi tie seninterrompe interrakontas, la kaldronego ne povas puriĝi."

"Envenu do, hundo, se ni draŝu per la martelo vian kranion." Mi kriis tion kiel sovaĝulo, preskaŭ duonfreneza pro la varmego. "Skrapu mem la kaldronegon, ĉevalŝakristo, malbenita kia vi estas. Al vi mi ankoraŭ rakontos tekston."

Mi ja deziris, ke li raportu min, kaj ke oni min elĵetu. Tiukaze mi devus ricevi kvitanolibron kaj mian monon. Sed okaze de io tia ili multe tro ruzis. "Tiel kiel la oficiroj en la milito. Kiom ajn oni ofendas kaj draŝas ilin sur la grimacon, ili ne raportas vin," diris Stanislav, "ili prefere lasas vin ekstere, ke vi ne sidu seka en prizono."

Purigi kaldronegojn ĉe la ekvatoro, kiam la fajro estas estingita apenaŭ tagon, kaj kiam oni plu hejtas la najbaran kaldronegon. Sinjoroj! Kiu neniam manĝis ploranta sian panon, tiu trinkas ĝin nun kvazaŭ kiel frambolimonadon. Ni sidis nudaj interne, sed la vandoj tiel ardis, ke ni devis surmeti vestaĵojn kaj ŝovis dikajn kusenojn el sakĉifonoj sub la genuojn, por ke ni ne bruliĝu.

Tiam frapi. Kaj kiom da polvo desolviĝas de la kaldronkrusto! Estas kvazaŭ oni priskrapus la pulmojn, la faringon kaj la laringon per vitro. Se oni movas la buŝon, grincas inter la dentoj, kvazaŭ oni muelus sablon, kaj laŭ

la tuta spino suprenrampas terura percepto, kvazaŭ iu elborus la spinan medolon.

Jam la kaldronego mem ne estas vasta. Sed aldone ja kuŝas la fajrokanaloj interne, kaj oni devas kuŝi sur la dorso kaj ventro, por povi atingi ĉiun angulon. Kiel serpento oni turniĝas en la kanaloj. Ĉie, kien oni tuŝas per la nuda mano, estas tiel varme, kvazaŭ oni metus la manon sur varmegan fornoplaton.

Krome saltas ŝtonetoj de la kaldronego en la okulojn. Kaj tia dura akra grajno kaŭzas tiajn dolorojn, ke oni timas freneziĝi. Tiam oni eltiras ĝin per kotaj kaj ŝvitaj manoj, kaj la okulo ruĝiĝas de la suferitaj turmentoj. Dum iom da tempo la afero bone funkcias, kaj klak — jam denove enestas akra splito, kaj la turmentoj rekomenciĝas.

Protektaj okulvitroj, ĉu? Tiuj kostas monon. Por tiaj stultaĵoj Jorike ne havas ĝin. Tiel oni faris antaŭ mil jaroj, kaj tiel oni faras nun. Plej ofte tiaj okulvitroj ne tre taŭgas. Aŭ oni ne povas vidi tra ili, aŭ ili premas aŭ la ŝvito torentas tra la hermetikaj pluŝoringoj kaj ronĝas je la okuloj.

Se ni havus elektraĵajn lampojn, tio iom plifaciligus la laboron. Sed jen la lampoj el Kartago. Post kvin minutoj la kaldronego estis nigra kaj dika de la fumo. Sed ni devis frapi.

Kaj la marteloj interne de la kaldronego sonoregas, kvazaŭ mil tondroj senpere tamburas la timpanojn. Ne estas elastaj resonoj, sed metale vibrantaj akre kriĉantaj frapoj.

Kvin minutojn, sed tiam ni devas iri eksteren, por kapti aeron. Ni bolas en la ŝvito, la varmegaj pulmoj flugas kaj flagras, la koro tumultas, kvazaŭ ĝi volus eksplodigi la bruston, kaj niaj genuoj tremas.

Aeron, nur aeron. Kostu kiom ajn. Kaj ni staras en la marbrizo, kiu efikas al ni, kvazaŭ neĝoblovado en Saskatchewan. Larĝa dura glavo puŝiĝas per sia tuta longo tra nia korpo. Ni tremas de frosto kaj resopiras al la varmega ardo de la kaldronego.

Pliajn kvin minutojn, kaj ni krias: Aeron! Ĉiuj tri, kiuj enestas, premas nin al la malgranda homluko, tra kiu ni devas ŝovi nin. Nur unu povas trapasi en la sama tempo, kaj li devas turniĝi kaj barakti kiel kato, por elveni. Dum la tempo, dum kiu li trapuŝiĝas tra la eniro, envenas eĉ ne buŝpleno da aero en la kaldronegon. Estante la dua je la lukto mi pene trapuŝas miajn brakojn kaj trude ŝovas min eksteren. La hejtisto en la kaldronego kolapsas kaj falas dure teren. Li estas senkonscia.

”Stanislav, ni devas eltiri la hejtiston, la fortoj forlasis lin,” mi vokis per mia lasta spiro. ”Se ni ne eligos lin, li estas finita kaj sufokiĝos.”

”Uuu-nu miiiinuuu-ton, Pip . . . mi ankoraŭ estas tute senspira.”

Ne daŭras longe ĝis la glavo sidas jam denove en niaj korpoj, kaj ni sopiras la bolantan varmegon de la kaldronego.

Ni prenas ŝnuregon. Baraktante mi denove enŝovas min kaj firme ligas la hejtiston. Kaj nun ni laboras por eligi lin. Tio estas plej komplika. Enangili kaj elangili mem oni povas. Sed tratiri tie homon sen vivo, tio postulas senfinan paciencon kaj lertecon kaj anatomiajn sciojn. La kapo rapide travenas. Sed la ŝultroj!

Finfine ni kunligas la ŝultrojn kiel paketon, tute firme, kaj tiam ni povas tiri lin, kaj li elvenas.

En la neĝoblovadon ni ne portas lin, sed ni lasas lin kuŝi en la kaldronejo, ni kuŝigas lin eĉ proksime de la fajro de la najbara kaldronego. Ni malligas liajn ŝultrojn.

La spiro forestas. Tute forestas. Sed la koro frapas. Mallaŭte, sed regule. Ni verŝas akvon sur lian kapon kaj premas malsekan sakon sur lian koron. Poste ni ventumas lian vizaĝon, alblovas lin kvazaŭ li estus lignokarbo kaj finfine portas lin sub la ventkanalon.

Stanislav devas iri supren kaj direkti la ventkanalon al la vento, por ke freŝa aero atingu la hejtiston.

Nun la hundo de ĉevalŝakristo kompreneble ne montras sin; sed sufiĉas, ke ni iom interparolas en la kaldronego, kaj tuj lia naŭza grimaco aperas en la homlu-

ko kaj lia kruda ostokapo tiel ŝtopas ĝin, ke ne envenas aero. Iam ni ja tamen ĵetos pintan martelon sur tiun kadavron. Se li almenaŭ alportus akvoglason da rumo por la hejtisto, tiu fripono. Ni ja eĉ ne volas trinki ĝin. Nur gluteton, por forigi la vitropolvon el la laringo kaj el la dentoj.

La hejtisto troviĝas sub la ventkanalo, kaj mi komencas movi liajn brakojn. Iom post iom li reviviĝas. Kaj li reviviĝas pli kaj pli. Kiam ni starigis lin kaj sidigis sur karbomonton kaj premas lin en angulon, por ke li havu apogon, venas la Dua Inĝeniero.

"Kio tio estas, je la infero," li tuj krias, "ĉu oni pagas vin, por ke vi pigru aŭ por kio?"

Stanislav kaj mi aŭ ni ambaŭ certe tiam estus povintaj diri: "La hejtisto estis . . ."

Sed ni ambaŭ havis la saman senton, kaj nia instinkto refoje pravis. Laboristoj devas nur sekvi sian instinkton, kaj jam ili agas tute ĝuste. Samtempe, sen diri vorton, ni kliniĝis, en ĉiun manon prenis belan dikan pecon da karbo kaj ankoraŭ en la sama sekundo per nia tuta forto ĵetis ĝin al la Dua, al lia ostokapo kaj al lia kadavro.

Tenante la brakojn ĉirkaŭ sia kapo, li forkuris. Stanislav postkuris kelkajn paŝojn kaj kriis: "Vi venena bufo, se vi minusos eĉ nur ŝilingan duonon pro la pipro, kiu ĵus trafis vin, ni ŝtopos vin en la venonta veturo en la

fajrokanalon kaj poste en la cindrokruĉon, kaj vi rajtos kraĉi sur mian vizaĝon min, se mi ne ŝovos vin en la fajron. Bestaĉo, nomata inĝeniero.”

La bestaĉo ne raportis ĉe la ŝipestro. Tio cetere estus estinta tute indiferenta al ni. Kun plezuro ni estus irintaj en prizonon en Dakaro. Li vere ne minusis eĉ pencon je puno. Dum ni ankoraŭ purigis kaldronegojn, kaj tio daŭris kelkajn tagojn, li neniam revenis proksimen. Ekde tiu tago li traktis nin kiel nekuiritajn ovojn kaj alproprigis al si pli da diplomaciaj kapabloj ol la Unua havis. Estas miraklofare, se oni havas ĉemane karbobulon aŭ martelon aŭ ferstangon, kaj se oni scipovas uzi tiujn en la ĝusta loko.

Kiam la kaldronego estis pura, ni ricevis du plenajn glasojn da rumo kaj antaŭpagon. Ni tuj iris en la urbon kaj ĉirkaŭrigardis. Oni ĉiam pensas, ke oni eble renkontos iun neatenditon. Mi povintus veturi kiel kaŝpasaĝero sur franca ŝipo, kiu estis veturonta al Barcelono. Sed mi ne volis donaci mian kvarmonatan salajron al la ŝipestro. Kial mi laboru por nenio? Tiel mi lasis la afablan francan ŝipon. Stanislav povintus veturi kiel sinkaŝinto sur norvega ŝipo veturonta al Malta. Sed li havis la saman kialon. La salajron. Li rajtis pretendi multe pli da ĝi ol mi.

Tiel ni vagadis en la haveno. Stanislav iris sur la norvegan ŝipon, kaj mi trotis sola plu.

Ĉapitro 44

En la malproksimo ankris la *Empress of Madagascar*¹, la Imperiestrino de Madagaskaro, angla ŝipo, kiu pezis naŭmil tunojn, eble eĉ pli. Tio estus tia kesto por provi surhopi kaj releviĝi el la tombo dum certa tempo kaj promeni. Fajna nova boateto. Kvazaŭ lakita, tiel pure ĝi aspektis. Eĉ la oro ankoraŭ ne delaviĝis de la haŭto. Ĝiaj novaj koloroj ankoraŭ brilas. Sed tie dungiĝo ne eblas, tie ne estas posteno, sur tia persike mola marjunulino. Ŝi tiel kokete ridetas trans la akvon, palpebrumas per la kolorigitaj okulharoj kaj tikas per la substrekitaj

1. *Empress of Madagascar*: Tielnomataj piratoj en la nordo de la insulo Madagaskaro fondis fine de la 17-a jarcento en Diego Suarez respublikon kun la nomo Liberta, komunumo, kiu celis efektiviĝi liberecon kaj justecon. Eble "Empress of Madagascar" ankaŭ estas sinonimo por la komunisma insulo Sovetunio, kiu same ne tiel rapide progresis, kiel atendite de la bolŝevistaj gvidantoj. En la libro "La germana ideologio", eldonita nur en la jaro 1932, Marx kaj Engels skribis pri la loka komunismo: "3. ĉiu plivastigo de la interrilatoj ĉesigus la lokan komunismon. La komunismo estas empirie ebla nur kiel la ago de la regantaj popoloj 'per unu fojo' kaj samtempe, kio premias la universalan disvolviĝon de la produktiva forto kaj la mondan trafikon, ligitan kun ĝi."

okulgloboj al mi, ke estas vera plezuro. Mi devas iri al ŝi kaj rigardi la ĉarman belulinon el la proksimo.

Mil diabloj, se nur la salajro ne estus, mi vere tie sonorilus pro dungigo. Sed de la salajro mi ne delasas. Se mi nur iel atingus, ke la Dua elĵetus min el la ŝipo. Ĉu mi eble iom agitu kiel bolŝevisto? Sed ili nur ridus pri tio. Agitu kiom ajn, vi ne povas forlasi la ŝipon. Kaj se vi troigus la spektaklon, li minusus la salajron por du semajnoj. Vi laborus por nenio.

Se la Imperiestrino ekveturus pli frue ol Jorike, kaj mi surestus sur ŝi, dungita pro urĝeco, jen oni jam ne povus ŝanĝi tion. Sed kie la Imperiestrino poste elŝipigus min? Al Anglio ili ne povus kunpreni min, ili ne povus liberiĝi de mi. Sed liberiĝi de mi ili devas. Sed kie? Ili puŝus min sur mortulan ŝipon, ie survoje aŭ en iu haveno, kie staras remizo.

Sed demandoj kostas ja nenion.

"Hola!"

"Hola! *What is up?*" Sur la kapo de la vokinto troviĝas blanka ĉapo.

"*Ain't no chance for a fireman, chap?*" Ĉu vi havas postenon por hejtisto?" mi vokas supren.

"Paperojn?"

"Ne, sinjoro."

2. "*Ain't no chance for a fireman, chap?*": "Ĉu vi eble bezonas hejtiston, amiko?"

”*Sorry*. Mi bedaŭras, mi ne povas helpi al vi.”

Tion mi ja sciis. Ŝi estas pura fraŭlino. Jen ĉio devas esti en ordo. Geedziĝa licenco necesas. Ŝi havas patri-non, kiu ankoraŭ gardas ŝin propramane. La patrino Lloyd en Londono.

Mi iradas laŭlonge de la kesto. Sur la poba ferdeko sidas kelkaj maristoj, ili ludas kartojn. Fulmotondro, kian anglan ili parolas? Tio estas ja la jorika lingvo. Kaj tio sur glatlakita angla ŝipo, de kies haŭto eĉ la oro ankoraŭ ne defalis? Jen io ne estas en ordo. Ili ludas kartojn, sed ne kverelas kaj ne ridas.

Mi foje rigardu. Sonorilfiŝo kaj ŝarknaĝilo! Ili sidas tie kaj ludas, kvazaŭ ili sidus sur sia propra tombomonteto kaj ludus pri la propraj vermetoj. Ilia manĝaĵo estas bona, ili aspektas bone grasigitaj. Sed la malgaja kartludado kaj la tristaj vizaĝoj, kaj ĉio ĉi sur tute nova angla ŝipo, ĉu? Jen io ne estas en ordo. Cetere, kial la ŝipo venis ĝuste ĉi tien, al la haveno de Dakaro? Kaj kiun kargon ĝi enprenis?

Feron. Malnovan feron. Ĉe la okcidenta bordo de Afriko? Tuj apud la ekvatoro? Malnovan feron? Nu bone, la damo *Empress* veturas hejmen kun balasto kaj kunprenas la malnovan feron. Al Glasgovo. Tiu fero pagas almenaŭ duonon de la veturo. Malnova fero estas pli bona ol sablo kaj ŝtonoj.

Kaj tamen. La bela nova ŝipeto *Empress* ne povas ricevi kargon de Afriko al Anglio, kial?

Se mi ĉi tie devus atendi sur la plaĝo, mi eltrovus ene de tri horoj, pri kio temas ĉe la brile pura Imperiestrino. Ŝi ja ne eble vere estas . . . ? Nu, ankaŭ mi jam entranciĝas, nun ankaŭ mi vidas fantomojn en ĉiu angulo. La *Empress of Madagascar*, tiu persike mola kaj vivokreva marjunulino el Glasgovo ĉi tie jam prostituu sin sur la strato? Sin ŝminkinte?

Ne, ŝi ne ŝminkis sin. Estas ŝia natura aspekto. Ŝi estas pli ol tri jarojn juna. Ŝi estas absolute aŭtentika. Eĉ nito ankoraŭ ne estas forsmirgita de la jupeto. Kvazaŭ lekita kaj bone odora, supre kaj sube. Sed la ŝipanaro, tiu ŝipanaro. Jen io ne estas en ordo.

Kial tio min interesus? Ĉiu infano volas havi siajn plezurojn.

Mi reiras al la norvega ŝipo.

Mi lasas min suprentiri. Stanislav ankoraŭ ĉeestas. Li sidas en kajuto kaj babilas kun kelkaj danoj. Li havas ladujon da bona dana butero kaj pecon da luksa fromaĝo en poŝo.

"Pippip, vi venas ĝustatempe, vi povas vespermanĝi kun ni, bonan danan vespermanĝon, plenvaloran kaj originalan," diras Stanislav.

Ni ne longe lasas peti nin kaj kunvespermanĝas.

”Ĉu vi vidis tie transe la anglan ŝipon, la Imperiestri-
no?” mi demandas, kiam ni ĉiuj sidas en la salono kaj
diligente manĝas.

”Tiu ankras jam sufiĉe longe ĉi tie,” iu el ili diras.

”Fajna knabino, ĉu?” mi nun explore demandas.

”Ekstere pompe kaj interne trompe,” diras unu el la
danoj.

”Nu,” mi demandas, ”trompe, ĉu? Kial trompe? Ĝi es-
tas ja tute bona ŝipo.”

”Kompreneble ĝi estas bona ŝipo,” alia intervokas.

”Vi povas dungigi vin laŭ la leĝo pri urĝeco, se vi
emas. Por mielo kaj ĉokolado. Ili ĉiutage ricevas ekzeku-
tan manĝon. Pudingon kaj rostaĵon.”

”Fulmotondro, la diablo prenu vin, parolu fine klare,”
mi nun diras. ”Kio tio estas? Mi ja mem demandis pro
posteno, ili ne povis helpi al mi.”

”Kara amiko, propre vi ne aspektas kvazaŭ vi hieraŭ
glutis marakvon unuafoje. Ĝi estas mortulĉaro.”

”Ĉu vi estas freneza kaj per peĉo priŝmirita?” mi vo-
kas.

”Estas mortulĉaro, tion mi diras al vi,” la dano ripetas
kaj enverŝas kafon por si. ”Ĉu ankaŭ vi volas havi plian
kafon? Ni ne devas ŝpari la lakton, la sukeron kaj la bu-
teron. Ni povas diboĉi. Vi povas preni laktladujon por
hejma uzo. Ĉu vi emas?”

”La nura demando min tiom kortuŝas, ke mi tuj ekploros,” mi diras kaj plenigas mian tason per kafo, per aŭtentika kafo el grajnoj.

Mi forgesis kiel ĝi gustas, ĉar Jorike disdonis nur kafosurogaton dudekprocentan, por ke ne difektiĝu niaj koroj.

”Jen kadavroŝipo, mi diras al vi plian fojon.”

”Kion vi volas diri per tio? Ĉu kadavroj de Francio al Usono, por ke la patrinoj tie povu planti ilin en florpotojn, por ĝui la honoron, kaj entuziasmiĝi pri la milito, kiu finos ĉiujn militojn?”

”Ne parolu tiel fremdule, amiko.”

”Ĝi transportas kadavrojn, sed ne militistajn kadavrojn el Francio.”

”Sed?”

”Malgrandajn anĝeletojn. Maristajn anĝeletojn. Maristajn kadavrojn, vi segofiŝo, kiu vi estas, se vi ne finfine ekkomprenas.”

”Ĉu la Imperiestrino havas ilin surŝipe?”

”Dio mia, kun vi oni devas trakuri holdovandon, antaŭ ol vi komprenas. Kompreneble la onklino enkargis ilin. Sep okonoj pretas. Hejme en ilia vilaĝa preĝejo oni jam povas trankvile engrati la nomojn sur la memortabulon por maristoj³. Korektado ne necesos. Se ankaŭ vi

3. memortabuloj por maristoj: Ekzistas ankoraŭ kelkaj el la malnovaj maristaj preĝejoj. Unu el ili estas tiu de Tersato,

volas havi vian nomon sur la memortabulo de via vilaĝo, jen vi nur devas kuniri. Tio aspektas cetere efektive tre noble, se apud via nomo legeblas *Empress of Madagascar*. Tio ja sonas impone. Tio pli bone aspektas, ol se tie nur legeblas Berta aŭ Emma aŭ Norda Kabo. Oni devas pensi ankaŭ pri tio, kiun najbaron oni havos sur la tabulo. *Empress of Madagascar*, hoj, jen enestas muziko, amiko mia.”

”Kial ŝi jam veturu por la poliso?”

Tion mi nun vere ne povis kompreni. Tio ja jam denove estis nura babilaĉo. La pura envio, ĉar ili ne veturis mem sur la nova kesto.

”Tion eĉ infano komprenas.”

”Ŝi ja maksimume antaŭ tri jaroj eliris el la vindoj,” mi kontraŭdiris.

”Finfine vi pravas, ke vi eliĝis jam pli frue el viaj vindoj. Ŝi havas ekzakte tri jarojn. Oni konstruis ŝin por granda veturo. Orienta Azio kaj Sudameriko. Kun la celo veturi dekdu nodojn. Jen la kondiĉo. Kiam ŝi ekplugis, ŝi veturis kvar nodojn, kaj se ŝi rapidis, kvar kaj duonon. Tion ŝi ne povas elteni. Tiel ŝi bankrotas.”

miksaĵo el kastelo kaj kapelo, sub la signoj de kruco kaj ankro. Ĝi troviĝas ĉe la plej norda etendiĝo de la Mediteraneo proksime de Fiume. Apud aliaj tre belaj ŝipaj objektoj videblas tie ankaŭ lignaj memortabuloj, kiuj montras buntkolorajn ŝipojn kaj ŝipkatastrofojn. Krome piratojn kaj fiŝistojn.

”Ili povus rekonstrui ŝin.”

”Tion ili jam dufoje provis. Ŝi malboniĝis pli kaj pli. Komence ŝi veturis eĉ ses nodojn, sed post la rekonstruo jam nur kvar. Ŝi devas forlasi la akvon, devas enspezigi la asekuron. Ili certe bone knedis la asekuron, por ke ŝi povu pasi tra Lloyd. Sed oni povas knedi ĉion.”

”Kaj nun ŝi sinku kun muziko, ĉu?”

”Ŝi jam dufoje sidiĝis. Sed tio ne sukcesis. La unuan fojon ŝi sidis sur sablo. Elegante, kiel cigno. Ili certe jam pridrinkis tion en Glasgovo. Sed leviĝis ŝtorma vetero kun monstra alta tajdo, ĝi levis la ĉarman damon supren de la sablo, kiel ĉe ĉieliro, kun trompetoj kaj timbaloj. Kaj ŝi turniĝis gaje sur la maron. Tiam la ŝipestro certe suke sakris. La duan fojon, en la ĵus pasinta semajno, kiam ni jam ankris ĉi tie, ŝi rapidis kiel sago inter rifojn. Ŝi perfekte firmpinĉiĝis. Sed la sendrata stacio estis frakasita. Kompreneble. Jen la ŝipestro devis hisigi la flagojn. Pro la bona konduto, ĉar ĉiam ĉeestas atestantoj. Jen alvenis franca patrolŝipo, ĝuste kiam la ŝipestro jam kun gaja humoro kaj sen hasto lasis surakvigi la boatojn. La patrolo flagsignalis ’Atendu. Helpo survoje!’ Jen la ŝipestro sakris. Mi volonte scius kiel li reordigis la taglibron. Li jam tiel perfekte manipulis ĝin. Li certe multe skrapis per la gumo, amiko mia. Li eraris. Tio estas, verŝajne ne alie eblis. Li sidigis en basa tajdo la ŝipon. Nun tri trenŝipoj venis kaj levis ŝin de la rifoj en la alta

tajdo. Tute elegante. Eĉ grato ne postrestis. Fatalaĵo! Nun li devas pagi ankaŭ la savkostojn. Ĉion tion oni minusos de la asekursumo. Estas plia demando, ĉu la asekurokompanio transprenos la tutajn kostojn. Tio dependas de la ŝipa taglibro.”

”Kaj kiel plu?”

”Nun li riskos ĉion. Tion li devas fari. Trifoje li ne povus eltiri sin. Tiukaze la asekurokompanio farus enketon kaj nuligus la asekuron. Ĝi postulus alian ŝipestron sur la ŝipo, iun, kiu veturas sen trukoj. Tio estus la fino. Tiam la Imperiestrino devus iri al vrakejo. Veturi ŝi ja ne plu povas.”

”Kial ŝi tiel longe ankras, se ŝi ne estas riparata?”

”Ŝi ne povas elveturi. Ne havas hejtistojn.”

”Tio estas sensencaĵo. Tiukaze ili almenaŭ min povus dungi. Mi ja diris al ili, ke mi estas hejtisto.”

”Ĉu vi havas paperojn?”

”Lasu la ŝercojn, knabo.”

”Se vi ne havas paperojn, li ne dungas vin. Li devas gardi sian noblan vizaĝon. Mortuloj farus lin suspektinda. Sed ĉu vi estas zulukaŭro aŭ hotentoto aŭ surdmutulo, tio estas indiferenta. Vi devas havi nur paperojn kaj marspertojn. Uloj, kiuj ne marveturis, ne estas bonaj, la asekurokompanio povus reteni la pagon kaj kaŭzi multajn ĝenojn. La hejtistoj elvenis el la ŝipo. Ili brulvundiĝis kaj kuŝas en hospitalo, alie ili ja ne povintus forlasi la

ŝipon. La hejtistoj estas en la plej malica situacio en tiaj okazoj. Ili ne elvenas, se la ŝipo surrifiĝas, riskante ĉion. Jen tuj estas akvo antaŭ la kaldronegoj, kaj la kaldronegoj kutime tuj eksplodas, se ili tiel subite troviĝas sub frida duŝo. Ili tuj malsanas je eksploda pneŭmonio.”

”Ĉu li nun atendas, ĝis la hejtistoj fine elvenas el la hospitalo?”

”Tio ne helpus al li. Ili ne plu devas surŝipiĝi, se ili ne emas. Ili povas maldungiĝi sen sed kaj tamen. Ili havas perfektajn paperojn kaj povas trankvile atendi alian ŝipon.”

”Kiel la onklino do formoviĝu?”

La uloj ridis kvazaŭ interne de si, kaj tiu, kiu ŝajne plej bone studis tiun kazon, diris: ”Tiuj intencas infanforrabon, ŝanhajadon. Tion mi povas flustri al vi, knabo. Jes, ŝi estas nobla kaj eleganta damo, la Imperiestrino de Madagaskaro. Ekstere pompa kaj sub la masko trompa. Evitu ŝian proksimon, por ke ŝi ne trompu vin.”

Kompare al ŝi Jorike estas tre estiminda damo. Ŝi ne pretekstas ion. Tiel, kiel ŝi aspektas, ŝi estas. Honeste ĝis la skeleto.

Preskaŭ mi komencas ami Jorike.

Jes ja, Jorike, mi devas konfesi al vi: Mi amas vin. Mi sincere amas vin pro vi mem. Mi havas je miaj manoj ses nigre bluajn ungojn kaj je la piedoj kvar nigreverde bluajn. Ĉion ĉi por vi, amata Jorike. Sur la piedajn

ungojn batis falintaj kradoj kaj ĉiu fingra ungo havas sian propran dolorplenan historion. Mia brusto, mia dorso, miaj brakoj kaj piedoj havas cikatrojn de malicaj brulvundoj. Ĉiu el la cikatroj naskiĝis kun dolorkrio, eligita pro vi, amata. Via koro ne hipokritas. Via koro ne larmas, kiam ĝi ne sentas ploremon, ĝi ne jubilas, kiam ĝi ne sentas ĝojon.

Via koro ne hipokritas, ĝi estas pura kaj perfekta kiel pura oro. Kiam vi ridas, koramata, ridas via animo, ridas via korpo kaj ridas via gaja ciganrobo. Kaj kiam vi ploras, plej kore amata ino, ploras eĉ la frida rifo, kiun vi preterveturas.

Neniam plu mi volas forlasi vin, amata, ne por ĉiuj trezoroj de la mondo. Mi volas migri kun vi, kanti kun vi, danci kun vi kaj dormi kun vi. Mi volas morti kun vi, elspiri en viaj brakoj mian lastan suspiron, kun vi, ciganino de la maroj. Vi ne fanfaronas pri via gloriĉa pasinteco kaj pri via praa genealogia arbo ĉe la onklino Lloyd en Londono. Vi ne fanfaronas per viaj ĉifonoj, kaj vi ne ludas per ili. Ili estas via plenrajta vestaĵo. Vi dancas en viaj ĉifonoj ĝoje kaj fiere kiel reĝino kaj kantas vian cigananton, vian ĉifonulan kanton:

La danckanto de l' Mortula Ŝipo

*La aĉa vest'? Forgesu ĝin.
Jen ĝoj' kaj ploroj kroĉis min.
Estu sen zorg' pri mia stat'.
Mi bone vivas sen kompat'.*

*Estu sen zorg' pri vagabond'!
Mi vivas min, ne vin, en tiu mond'.
La paradizo estus stulta fin',
prefere kaptu la Satano min.*

*Mi viajn benojn ne bezonas,
eĉ se mortuloj en mi dronas
kaj fia fam' ĉirkaŭas min.
afero mia, notu ĝin.*

*Mi fajfas pri la juĝ' de Di'.
Pri releviĝ' ne kredas mi.
Pri dioj estas mi sen sci'.
Inferajn punojn ridas mi.*

*Hola hej, sur alta mar',
hola, mortular'!*

TRIA LIBRO

*Veturas strangaj ŝipoj
sur maroj preter ni;
fifamas neniuj tiom,
ke ne aliaj fias pli.*

Ĉapitro 45

Povas esti, ke oni ne tro amu sian edzinon, se oni ne volas perdi ŝin. Alikaze ŝi enuas kaj forkuras al alia por ricevi batojn.

Estis suspektinde, tre suspektinde, ke mi subite tiel arde komencis ami la damon Jorike. Sed, se oni ĵus aŭskultis la hororigan rakonton pri rabistoj de infanoj, kaj havas en unu el la poŝoj ladujon da lakto kaj en la alia ladujon da bona dana butero, jen tre bone eblas, ke oni ekpensas pri la amo kaj amas tiun, kiu en siaj ĉifonoj pli amindas ol rabistoj de kadavroj en silkaj vestoj.

Sed tamen, suspektinda estis tiu ĝermanta amo. Io ne estis en ordo. Jen la afero pri la cindrokanalo. Kaj nun ankoraŭ aldoniĝis eĉ Jorike, kiun mi amis per pasia ardo. Tio ne povis plaĉi al mi. Jen io ne estas en ordo.

En la kajuto ne estis elteneble. La aero estis dika kaj peza kaj premis sur la cerbon.

"Ni eliru," mi diris al Stanislav, "ni promenu iom laŭ la akvo, ĝis friskiĝas. Post la naŭa certe ekblovos brizo. Tiam ni iros hejmen kaj kuŝigos nin sur la ferdeko."

”Vi pravas, Pippip,” Stanislav konsentis. ”Ĉi tie oni povas nek dormi nek sidi. Ni foje suriru la nederlandan ŝipon, kiu ankras tie supre. Eble mi renkontos konaton.”

”Ĉu vi ankoraŭ nun malsatas?” mi demandis.

”Ne, sed eble mi povos preni sapopecon kaj mantukon de ili. Tiuj sufiĉe bone enpoŝigeblas.” Lante ni ektrotis. Intertempe noktiĝis. La havenaj lampoj ĵetis nur ŝpareme lumon. Oni nenie enkargis ion. La ŝipoj briletis dormeme tra la vespera malheleco.

”Cetere, la tabako, kiun la norvegoj donis al ni, ne estas eksterordinara,” mi diris.

Apenaŭ elparolinte tion kaj turnante min al Stanislav por peti fajron, mi ricevis monstran baton sur la krani-on. Mi sentis la baton tute precize, sed mi ne povis moviĝi, miaj kruroj strange plumbiĝis kaj dikiĝis, kaj mi falis teren. Ĉirkaŭ mi karuselis kaj zumis terure, mi sentis premantajn dolorojn.

Sed tio ne daŭris longe, ŝajnis al mi. Mi releviĝis el mia narkozo kaj intencis iri plu. Sed mi puŝiĝis je vando, je ligna vando. Kiel tio eblas? Mi iris maldekstren, sed ankaŭ tie estis vando. Kaj dekstre estis vando kaj post mi estis vando. Kaj ĉie mornas.

Mia kapo zumis kaj muĝis. Mi ne kapablis pensi, laciĝis kaj ree kuŝiĝis min sur la plankon.

Kiam mi vekigis plian fojon, la vandoj ĉeestis plu. Sed mi ne povis stari trankvile. Mi ŝanceliĝis. Ne, tiel ne estis, sed la planko ŝanceliĝis.

Fulmotondro, mil diabloj, mi nun scias, pri kio temas. Mi estas sur ŝpipeto, sur kesto, kaj tiu troviĝas ie sur la maro. Ĝi veturas gaje antaŭen. La maŝinoj stamfas kaj frapas.

Per ambaŭ pugnoj kaj fine ankaŭ per la piedoj mi marteladas la vandojn. Ŝajnas, ke neniue aŭdas ion. Sed post sufiĉe longa tempo, kiam mi ree kaj ree estis prilaborinta la vandojn kaj ankaŭ per krioj akompanis miajn tamtamojn, oni malfermas lukon, kaj iu lumigas per elektra poŝlampo internen.

"Ĉu vi nun eldorminte sobriĝis?" oni nun demandas min.

"Ŝajnas, ke jes," mi diris.

Neniu devas rakonti al mi, mi jam scias, pri kio temas, infanforrabo, ili ŝanhajis min. Mi troviĝas sur la *Empress of Madagaskar*.

"La ŝipestro vokas vin," la viro diras.

Ekstere taghelas. Mi suprengrimpas la eskalon, kiun la viro traŝovas tra la lukon, kaj baldaŭ mi staras surferdeke.

Oni kondukas min al la ŝipestro.

"Noblaj homoj vi estas, tion mi devas diri," mi tuj krias, envenante la kabineton.

”Bonvolu, kiel?” l a ŝipestro diras tute trankvile.

”Rabistoj de infanoj, ŝanhajuloj, anĝelfaristoj, priŝtelistoj de kadavroj, jen, kio vi estas,” mi krias.

La ŝipestro restas netuŝita, trankvile ekbruligas cigaron kaj diras: ”Ŝajnas, ke vi ankoraŭ ne tute sobriĝis. Ni devos trempi vin en fridan akvon, por ke la fumo forvaporigu.”

Mi rigardas lin kaj diras nenion.

La ŝipestro premas butonon, la stevardo envenas, kaj la ŝipestro diras du nomojn.

”Sidiĝu,” la ŝipestro rimarkas post iom da tempo.

Envenas du naŭzaj uloj, krimulvizaĝaj.

”Ĉu li la viro estas?” demandas la ŝipestro.

”Jes, li estas,” ambaŭ konfirmas.

”Kion vi faras sur mia ŝipo?” diras nun la ŝipestro al mi per voĉo, kvazaŭ li estus la estro de asiza tribunalo. Antaŭ li kuŝas papero, sur kiu li zigzagigas krajonon.

”Tion mi volonte de vi scius, kion mi faras sur tiu ŝipo,” mi respondas.

Nun parolas unu el tiuj krimuloj. Ŝajnas, ke ili estas italoj, se oni juĝas laŭ la maniero, kiel ili prononcas la anglajn vortojn.

”Ni ĝuste intencis purigi la kargoholdon dekunu, kaj tiumomente ni trovis la viron ebria en angulo, kie li firme dormis.”

"Sekve," la ŝipestro diris, "la afero estas ja tute klara. Vi intencis kaŝiĝi sur mia ŝipo inter la kargo, por veni al Anglio. Tion vi nun certe ne plu intencos nei. Bedaŭrinde mi ja ne rajtas ĵeti vin en la maron, kion mi devus fari. Efektive vi meritis, ke mi ordonu sesfoje treni vin per la aragano, por iom deskrapu la haŭton al vi, por ke vi ne forgesu, ke angla ŝipo ne servas eskapigi krimulojn persekutatajn de la polico."

Kial tiukaze longe babili? Li estus ordoninta al tiuj italaj punkaptitoj rompi miajn ostojn, se mi dirus, kion mi pensas pri li. Tion li jam farus pro tio, kion mi tuj komence diris. Sed li interesiĝis nur pri miaj sanaj ostoj kaj ne pri la rompitaĵ.

"Kio vi estas?" li demandis nun.

"Simpla ferdeklaboristo."

"Vi estas hejtisto."

"Ne."

"Vi hieraŭ ĉi tie proponis vin kiel hejtiston, ĉu ne?"

Jes, tion mi faris, kaj tio estis mia eraro. De tiam ili ne plu lasis min el siaj okuloj. Se mi tiam estus dirinta ferdeklaboristo, ili eble ne interesiĝus pri mi. Hejtistojn ili bezonis.

"Ĉar vi do estas hejtisto kaj havas feliĉon, ke du el miaj hejtistoj malsaniĝis, vi rajtas labori kiel hejtisto. Vi ricevos la anglan hejtistosalajron, dek pundojn kaj dek momente. Sed mi ne rajtas dungi vin. Kiam ni alvenos

Anglion, mi devos transdoni vin al la ŝtataj instancoj; kaj laŭ la grado de la favoro, kiun la juĝisto montros al vi, vi kaptos du ĝis ses monatojn, kaj poste kompreneble sekvos la deportado. Sed ĉi tie, kiom longe ni veturos, ni traktos vin kiel laŭleĝan membron de la maristaro de nia *Empress of Madagascar*. Ni povos bone harmonii, se vi plenumos vian laboron. Se ni ne harmonios, ne estos akvo, kara amiko. Mi do pensas, ke ni prefere harmonios. Je la dekdua komencigos via vaĉo. Vi vaĉos ses kaj ses horojn; por la du kromhoroj de ĉiu vaĉo ni pagos al vi ŝilingon kaj ses pencojn.”

Tiel mi do estis hejtisto sur la *Empress of Madagascar*, veturanta al la memortabulo en la vilaĝa preĝejo. Mi ne havis vilaĝan preĝejon, sekve eĉ tiu honoro ne restis al mi.

La salajro estis bona kaj ebligis ŝpari monon. Sed en Anglio atendus min prizono pro kaŝiĝo sur ŝipo, kaj poste mi eble eĉ dum jaroj atendus en prizono la deportadon. Sed tio estis ĝuste la problemo. La salajron mi ne ricevus, ĉar la fiŝoj ĝin ne pagus al mi. Se mi elvenus sana, mi ricevus eĉ ne nikelon da salajro, ĉar mi ne estis dungita laŭleĝe. Neniu angla konsulo agnoskus ĉi tiun pundungiĝon. La prizono kaj la deportado ne ĝenis min. Ni ne alvenos Anglion. Pri tio zorgoj ne necesas. Mi foje rigardu la boatojn. La boatoj pretas. Sekve, la dan-

co post kelkaj tagoj komenciĝos.¹ La unua tasko, ĉion pretigi por povi nepre elveni el la kaldronejo. Ĉe la plej eta grincanta sono for de la kaldronego kaj supren kiel la Satano!

1. Sekve, la danco post kelkaj tagoj komenciĝos: temas pri la "danco de l' skeletulo", ofte en bildserioj, el la tradicio de la 15-a jarcento. Pri la vizito en Lübeck H. C. Andersen skribis: "En la Maria-preĝejo de Lübeck mi vidis la faman astronomian horloĝon kaj la eĉ pli faman ciklon de pentraĵoj, nomatan 'la danco de l' skeletulo'. Ŝajnis al mi, kvazaŭ la pentristo desegnis ironian rideton sur la vizaĝon de la dancanta skeleto, kiu al mi kaj al la tuta societo farantaj rimarkojn pri li, kvazaŭ volis diri: "Vi pensas nun, ke vi staras senmove aŭ maksimume ĉirkaŭpromenas kaj rigardas la malnovajn pentraĵojn. Vin la morto ankoraŭ ne petis al la danco, kaj tamen vi ĉiuj jam dancas kun mi! Ekde la lulilo jam komenciĝas la granda danco. La vivo estas kiel lampo, kiu jam komencas estingiĝi, tuj kiam ĝi estas ekbruligita! Kiom ajn aĝa ĉiu el vi estas, tiom da jaroj mi jam dancas kun vi, ĉiu havas siajn diversajn vojojn, kaj kelkaj eltenas la dancon pli longe ol la aliaj, sed ĉirkaŭ la matenhoru la lampoj finbrulas, kaj tiam vi ĉiuj sinkas en miajn brakojn; tion oni nomas morti." La danco de l' skeletulo", tiu bildociklo, estas kreita de la majstro Bernt Notke el Lübeck en la jaro 1463. En la jaro 1701 Anton Wortmann kopiis ĝin. Tiu danco de l' skeletulo forbrulis en bombonokto en 1942. Partoj de la originalo ankoraŭ hodiaŭ videblas en Talino. La fotita kopio de la kopio estas videbla en la Maria-preĝejo de Lübeck.

Ĉapitro 46

La kajutoj aspektas kiel salonoj, puraj kaj novaj. Ili nur fetoras neelteneble pro la freŝaj farboj. Matraĵoj kovras la litbenkojn, sed nek kuseno, nek kovrilo, nek littuko. Imperiestrino de Madagaskaro, vi ne estas tiel riĉa, kiel vi aspektas de ekstere. Aŭ ili eble jam forludis kaj monerigis ĉion, kion ili povis savi.

Ankaŭ manĝilaro ne estas. Sed eblas jam pli facile kunkolekti ĝin, ĉar iu manĝilo superfluas kaj aliloke iu alia neutile kuŝas. La manĝon alportas itala knabo, sekve tio ne estas nia problemo. La manĝo estas eksterordinare bona. Kompreneble, kiel ekzekutan manĝon mi imagas ion pli bonan.

Rumo ĉi tie tute ne haveblas, kiel iu rakontis al mi. La ŝipestro abstemas, tio jam suspektindas.

Ŝipoj sen rumo fetoras kiel sterko.

Mi sidas en la manĝoĉambro de la kaldrona personaro.

La kuireja knabo vokas la ŝipanojn el la litbenkoj por la manĝo.

Envenas du pezaj negroj, la subhejtistoj. Kaj tiam envenas hejtisto, kiu ne vaĉas.

La hejtiston mi konas. Lian vizaĝon mi jam vidis ie. La vizaĝo estas ŝvelinta, kaj ĉirkaŭ la kapo la hejtisto portas bandaĝon.

”Stanislav, vi?”

”Pippip, ankaŭ vi?”

”Kiel vi vidas. Kune kaptite, kune katenite,” mi diris.

”Kompare kun mi vi sufiĉe bone elvenis el la afero. Mi kaj ili draste interdraŝis nin. Mi tuj denove surpiedigis min, kiam la unua bato min trafis. Vi kuŝis sen vivo, vi kaptis tuj krudan baton. Sed kiam vi tiel subite renversigis, mi kliniĝis al vi, kaj tial la bato trafis min nur duone. Tuj mi denove ekstaris. Kaj nun la boksbatalo ekis. Kvar el ili tuj ĉirkaŭis min. Damne, ili marteladis mian kranion per duraj pugnoj.”

”Kaj kiun historion ili al vi rakontis?” mi demandis.

”Ili diris, ke mi interbatiĝis kun aliaj kaj mortpikis iun, kaj poste kaŝiĝis sur la kesto pro polica persekuto.”

”Al mi ili rakontis ion similan, tiuj rabistoj de infanoj,” mi diris, ”ankaŭ nian salajron de Jorike ni nun perdis, kaj ĉi tie ni ricevos eĉ ne cendon.”

”Tio daŭros ja nur kelkajn tagojn. Mi pensas, ke la afero finiĝos jam postmorgaŭ. Pli bonan lokon li ne povus deziri. Ĝi povas elegante subakviĝi flanken, kiel sur pentraĵo. Neniu venos kaj kovros la vizaĝon. Ili ordonis ekzercadon ĉe la boatoj je la kvina. Ĉu vi rimarkas ion, he? Ni ne ĉeestos, ĝuste tiam ni vaĉos. Ni apartenas

ambaŭ al la boato kvar, la hejtistoj de la vaĉo de noktomezo ĝis la kvara. Mi rigardis la listojn, ili pendas en la ferdeka trairejo.”

”Ĉu vi jam scias, kio atendas nin ĉe la kaldronegoj?” mi demandis.

”Dekdu fajroj. Kvar hejtistoj. La du aliaj estas negroj. Ankaŭ la subhejtistoj estas negroj. Jen la du, kiuj sidas ĉe la tablo.” Stanislav signis transen al la fortaj uloj, kiuj indiferece maĉis sian manĝon kaj ŝajne apenaŭ rimarkis nin.

Je la dekdua ni komencis nian vaĉon. La antaŭan vaĉon la vinĉomaŝinisto faris kun la negroj.

La fajroj aspektis malice. Preskaŭ du horojn ni devis labori kiel sovaĝuloj, ĝis ĉio ree estis laŭorda en ili. Ĉiuj estis plenaj de skorioj; la nigraj hejtistoj ankaŭ ne sciis kiel nutri la fajron. Ili krake enŝovelis la karbojn, kaj tio jam sufiĉis por ili. Ke la hejtado estas arto, kiun kelkaj ellernas neniam, pri tio ili ŝajne sciis nenion, kvankam ili jam kelkajn jarojn laboris antaŭ la kaldronegoj kaj certe jam servis sur atendinda kvanto da ŝipoj.

Pro la kradoj ni havis ĉi tie nur malmulte da laboro. Se iu trabrulis, ĝi rapide lasis sin remeti, sen fali aŭ eĉ kunŝiri aliajn. La subhejtistoj, gigantaj negroj, kun brakoj kiel femuroj kaj korpokonstruo tia, ke oni supozis ilin kapablaj forporti tutan kaldronegon sur la ŝultroj, damne lante alportis la karbojn. Ni devis tre energie blovi la

marŝon al ili, ĝis ili fine degnis eklabori. Ili ĝemis seninterrompe, ke estas tro varmege, ke la aero mankas al ili, ke ili ne povas gluti pro la polvo, kaj ke ili certe mortos pro soifo.

”Nu, Pippip,” diris Stanislav, ”ni ja multe pli devis streĉi nin sur la olda Jorike. Kion tiuj uloj faras per siaj ostoj? Antaŭ ol ili alportis duonon de tuno, mi alportas ses kaj eĉ ne anhelas ĉe tio. Kaj ĉi tie la karboj kuŝas rekte antaŭ iliaj nazoj.”

”Ĝuste nun sur Jorike dum semajno estos bela tempo,” mi diris. ”Ili ĵus stivis novajn karbojn, la ŝaktoj kaj kaldronejaj holdoj estas tiom ŝtopitaj, ke la venonta veturo devus esti pura plezuro. Finite. Merdon al Jorike Ni nun devas pensi pri aliaj aferoj.”

Mi ĉirkaŭrigardis.

”Ankaŭ mi jam ĉirkaŭrigardis,” diris Stanislav. ”Ni devas serĉi aerotruojn. La eskalon oni ne ĉiam atingas. Ĝi plej ofte forrompiĝas, se ĝi forte falas kun krako. Kaj se aldone eĉ la kaldronegoj kaj la tuboj komencas zumi kaj sputi, tiam la eskalo estas damnita ratkaptilo. Vi povus grimpi nek supren, nek malsupren.”

”La supra holdo havas lukon al la ferdeko,” mi diris. Mi ĵus estis supre kaj esploris. ”La lukto devas esti ĉiam libera, kiam ni vaĉos. Plie mi konstruos latan eskalon, kaj tiun ni lasos stari ĉi tie ĉe la ŝaktoluko. Se io ekgrincos, tuj for, supren kaj elen tra la ferdekluko.”

Ni ne tro laboris. Tio ŝajne tute ne interesis la inĝenierojn. Tiom longe, kiom la maŝino marŝis, ili kontentis. Ĉu la ŝipo veturas rapide aŭ ne, oni ne konsideris.

Ĉio estus povinta iri tute laŭ la regularo. Necesintus nur bori sube kelkajn truojn tra la ŝipŝelon, ne pli grandajn ol colduonon, kaj la Imperiestrino kun sia ĉerka enhavo da malnova fero kviete kaj beate ekdormus kaj sinkus kiel ŝtono. Aldone necesintus nur delikata frapo al la pumpilo. Sed antaŭ la martribunalo tio foje kaj foje ne funkcias, kaj se la tuta ŝipanaro eskapis sana, tio ĉiam provokas suspekton. Pasis nur du tagoj. Ni ĵus transprenis la vaĉon kaj elskoriigis duonon, kiam mi aŭdis teruran knalon kaj krakadon. Mi flugis unue kontraŭ la kaldronegojn kaj tiam malantaŭen en karbomonton.

Tuj poste la kaldronegoj staris vertikale super mi, kelkaj fajropordoj elrompiĝante malfermiĝis, kaj la ardaĵkarboj falis en la kaldronejon. Surgrimpi la latan eskalon mi ne devis, mi povis iri sur ebena surfaco al la ŝaktoluko.

Stanislav jam estis ekstere. Ĝuste, kiam mi envenis en la holdon, li grimpis tra la luko.

En tiu momento ni aŭskultis hororan krion el la kaldronejo.

Ankaŭ Stanislav aŭdis la krion kaj turniĝis.

"Tio estis Daniel, la subhejtisto," mi vokis al Stanislav.

"Mi supozas, ke li estas kaptita."

”Damne, malsupren, sed rapide,” kriis Stanislav.

Mi jam denove estis en la kaldronejo. La kaldronegoj eĉ nun plu staris surkape, kaj ĉiusekunde unu el ili povus eksplodi. La elektra lumo ne plu funkciis, ĉar evidente la kablo traŝiriĝis. Sed la fajro donis sufiĉe da lumo, kvankam ĝi aspektis fantomece.

Daniel, unu el la negroj, kuŝis senmove, kaj lia maldekstra piedo estis firmpinĉita de derompiĝinta fera platon. Li kriis kaj kriis, ĉar la ardaĵ karboj rostis lin.

Ni provis levi la platon, sed sen sukceso, ni ne povis levi ĝin kaj ankaŭ ferstangon ni ne povis enŝovi sube, por levi la platon.

”Ne funkcias, Daniel, la piedo ne moveblas.” Mi kriis tion al Daniel freneze rapide.

Kion fari? Ĉu ni lasu lin ĉi tie?

”Kie estas la martelo?” Stanislav kriis.

Jam la martelo estas enmane, dum la sama sekundo ni platigis ŝovelilon, kaj sen hezito Stanislav forhakis la piedon de la negro. Tri batoj necesis. Ni trenis Danielon al la ŝaktoluko, poste tra la holdo kaj ŝire eltiris lin tra la ferdekluko.

Ekstere la alia negro de nia vaĉo, kiu sin ankoraŭ ĝustatempe savis, lin tuj kaptis. Ni lasis Danielon ĉe li kaj zorgis nun por ni mem.

La kajuto jam subakviĝis.

La Imperiestrino per la pobo alte elstaris el la akvo. Tion oni ne elprovis je la boatekzercado. Ĉio staris tute alie ol ni estis kutimigintaj. Dum iom da tempo la lumo ankoraŭ funkciis. La inĝeniero transkonektis ĝin al la akumulatoroj. Nun ĝi lante febliĝis pli kaj pli, ĉar la akumulatoroj verŝajne komencis elflui, aŭ ĉar la kabloj ie kolektis rezistancojn. Poŝlampoj kaj provizoraj lanternoj devis helpi.

El la kajuto mi vidis neniun. Ili estis mortkondamnitaj, jam ne povis elveni. Kontraŭ la pordon premis kelkaj tunoj da akvo.

La boato du deŝiriĝis kaj tuj la maraj ondoj forfloris ĝin, sed neniun ŝipano enestis.

La boato kvar ne disponeblis. Ĝi firmingiĝis.

La boato unu estis preta veturi, kaj la ŝipestro komandis la membrojn de la boato. Poste ĝi restis flanke de la ŝipo kaj ili atendis la kapitanon, ĉar li pro deco restis sur la ferdeko. La martribunalo ŝatas tian sintenon kaj laŭdas ĝin.

Nun ankaŭ la boato tri veturpretiĝis. En tiun boaton Stanislav kaj mi post rapida kuro ensaltis, krome du inĝenieroj, la sana negrosubejtisto kaj Daniel kun la forhakita piedo, nun bandaĝita per ĉemizo; plie aldoniĝis al ni la Unua Oficiro kaj la stevardo.

La kaldronegoj ŝajne fidele eltenis kaj eble trankviliĝis pro la elfalintaj fajroj. Prunkaĉo ĉi tie ja ne estis.

Ni depuŝiĝis. La ŝipestro intertempe saltis en la boaton unu, kaj ankaŭ tiu boato sukcese ekveturis.

Sed antaŭ ol ili ekremis, la ondoj ĵetis la boaton per forta puŝo kontraŭ la ŝipŝelon. Denove kaj denove ili provis forremi . . .

Jen subite derompiĝis ia objekto de la ŝipo kaj trafis rompe kaj splitige kun muĝanta bruo la boaton. Ni aŭdis kriojn de multaj voĉoj, kaj tiam ĉio kvietis, kvazaŭ la krioj, la boato kaj la boatanoj subite estus glutitaj de granda faŭko.

Ni depuŝiĝis sukcese kaj gaje remis antaŭen. Kurse al la bordo.

Rapide ni ne veturis, pro la malmultaj remiloj. La ondoj leviĝis diable grande, kelkfoje ni ŝvebis sur kruta akvovando, kiu altis du boatlongojn. Kelkfoje la remiloj pikis diversdirekte en la aeron kaj ne lasis sin enakvigi, kaj ni estis kirle ĵetataj tien kaj ĉi tien. La inĝeniero, kiu remis kun ni, tiam diris subite: "Ni preskaŭ grundas. Apenaŭ tri futojn. Sur rokoj."

"Neeble," rediris la Unua Oficiro. Li palpserĉis remilon, sondis kaj tiam diris: "Vi pravas. Elen! Elen!"

La komando ankoraŭ ne tute eliris lian buŝon, kiam ni kun la boato jam krute estis levitaj sur akvovando. La ondo prenis nin kiel etan subtason kaj draŝis la tutan boaton kun tia forto sur la rokon, ke ĝi dissplitiĝis je mil pecoj.

”Stanislav!” mi elkriis en la muĝadon de la ondoj. ”Ĉu vi havas ion por teni vin?”

”Eĉ ne magran pajlotigon,” li kriis al mi. ”Mi renaĝos al la kesto. Ĝi tiel plu staros certe kelkajn tagojn. Tro rapide ĝi ne falos sur viajn piedfingrojn.”

La ideo ne estis malbona. Mi provis teni la kurson al la nigra monstro, kiu klare konturiĝis antaŭ la nokta ĉielo.

Je Satano, ni ambaŭ ĝin atingis, kvankam la ondoj kelkdekfoje reĵetis nin.

Ni surgrimpis kaj provis veni ĝis la mezŝipo. Tio ne estis facila. La poba vando estis nun la ferdeko aŭ la tegmento por la mezŝipo. La du koridoroj fariĝis nun profundaj ŝaktoj, en kiujn malsuprengrimpi en la nokto ne bone estis entreprenebla, kaj kio eĉ en la tago ne estus ebla sen komplikaĵoj. La ondoj leviĝis eksterordinare alte kaj ŝajne eĉ pli potenciĝis. Evidente ni rokpuŝiĝis antaŭ la alta tajdo, ĉar la akvo komencis altiĝi.

La Imperiestrino staris firme kiel turo, enpinĉita en fendo de rifo. Kiel povis okazi, ke ĝi envenis en tiun nekutiman ŝippo-zicion, verŝajne nur ĝi mem sciis. Ĝi apenaŭ tremis kaj ne moviĝis, tiel firme ĝi staris. Nur kelkfoje, kiam eksterordinare forta ondo furioze atakis ĝian kirason, ĝi levis la ŝultrojn, kvazaŭ ĝi volus forskui ĝin. Ŝtormo tute ne estis. Nur la fortaj marondoj ribele furiozis. Ankaŭ ne aspektis, kvazaŭ ŝtormo leviĝos. Ne dum

la ses venontaj horoj. Tiam la ĉielo griziĝis! La suno leviĝis. Freŝe laviĝinte ĝi eliris el sia marbanejo supren en la altan ĉielon.

Unue ni rigardis observe trans la maron. Nenio videblis. Ŝajne neniun viro postrestis. Ke iu estis elfiŝita, mi ne kredis; ankaŭ Stanislav pridubis tion. Ni ne vidis preterpasi ŝipon. Krome ni troviĝis ekstere de la kutima ŝipvojo. La ŝipestro eliris el ĝi, por ke patroloj aŭ preterpasantoj ne vidu la ŝipon plian fojon. La gaja entreprenado fariĝis multekosta por li. Komence li pensis pri trankvila kaj paca realigo de la negoco. Ke li povos kunpreni el la kajutoj neniun membron, li ne atendis. Se la du boatoj estus veturintaj kun ĉiuj membroj, la forremado certe estintus plezuro.

Ĉapitro 47

Kiam tute heliĝis, ni provis malsuprengirmi la kordoran ŝakton. Ĉar ni tre atentis, tio efektive sukcesis. Ni uzis la pordojn de la diversaj kajutoj kaj la ŝelajn ripojn kiel ŝtupojn, kaj tiel ni multe pli rapide moviĝis antaŭen ol ni atendis.

Sur la fundo de la ŝakto troviĝis la du kajutoj de la ŝipestro. Mi trovis poŝan ŝipkompason, kiun mi tuj alpropiigis, sed tiam konfidis al Stanislav, ĉar mi ne havis poŝon por konservi ĝin. Estis ankaŭ du malgrandaj cisterno en unu el la kajutoj, unu por lavakvo kaj la alia por trinkakvo. Pri akvo ni do dum kelkaj tagoj ne devis cerbumi. Ĉu la pumpiloj en la kuirejo pumpas aŭ ne pumpas la akvon, tion ni ankoraŭ devis elprovi. Eble la trinkakvo jam tute elfluis el la cisterno.

Sur Jorike ni konis ĉiun lokon, kie ni povis ŝovi ion en niajn poŝojn. Ĉi tie ni ankoraŭ devis antaŭe serĉi ĉion. Sed Stanislav havis bonan nazon kaj trovis la kameron por la nutroprovizoj jam en la momento, kiam sin prezentis la demando pri la matenmanĝo. Malsatmorti ni ne povis en la sekvontaj ses monatoj. Kaj se ni havus ankoraŭ sufiĉe da akvo, ni povus elteni kelkan tempon.

En la kamero troviĝis diversaj kestoj kun minerala akvo, biero kaj vino. Tute malbone do ne povis fariĝi.

La fornelon ni restarigis, kaj tial ni povis ankaŭ kuir. Ni elprovis la pumpilojn por la trinkakvo. Unu el ili ne suĉis, sed des pli bone la alia. La akvo ankoraŭ estis iom malklara pro la ekkirlita ŝlimo, kiu surfundiĝis en la cisterno. Sed atendeblis, ke ĝi klariĝos post tago.

Naŭzosento ekkaptis mian korpon, kaj ankaŭ Stanislav aspektis malbonsenta.

"Amiko mia," li diris nun subite, "kion vi diras pri tio? La maro vomemigas min. Fulmotondro, tio ĝis nun vere ne okazis al mi."

Mi ne povis trovi klarigon, kial mi sentis min pli kaj pli mizera, kvankam la kesto staris preskaŭ senmova. La furioze alrompiĝantaj pezaj ondoj kaj la ĉeokazaj ekstremoj de la fera koloso efektive ne povis elvoki tian mizeran senton.

"Nun mi povas diri al vi, pri kio temas, Stanislav," mi respondis post kelka tempo. "Estas la freneza pozicio de la kajutoj, kiu vomemigas nin. Ĉio staras oblikve kaj krute. Al tio oni devas kutimiĝi."

"Mi supozas, ke vi pravas," li diris. Post la eliro sub la liberan ĉielon, la aĉa sento tuj estis for, kvankam nian ekvilibran senton konfuzis ankaŭ la pozicio de la ŝipo, tiel freneze staranta antaŭ la horizonto.

”Rimarku,” mi diris nun al li, kiam ni ekstere sidis kaj fumis la bonajn cigarojn de la ŝipestro, ”estas nur la imago, nenio alia. Mi estas certa, ke tiam, kiam ni estos eltrovintaj, kio en nia vivo estas imago kaj kio fakto, ni lernos ankoraŭ tre strangajn aferojn kaj rigardos la tutan mondon el alia vidpunkto. Kiujn sekvojn tio eble havos, scias neniu.”

Kiom ajn atente ni observis la maron, ni ne vidis ŝipon. Eĉ fumkolonon ni ne vidis. Ni estis tro ekstere de la kutimaj marvojoj.

”Ni povus vivi ĉi tie la plej belan vivon, pri kio ni iam songis,” Stanislav filozofis, ”ni havas ĉion, kion ni povas deziri al ni, ni povas manĝi kaj trinki, kion kaj kiom ni volas, neniu homo ĝenas nin, kaj ankaŭ labori ni ne devas. Kaj tamen ni volas foriri de ĉi tie, ju pli frue des pli bone, kaj se ne venos kesto por kunpreni nin, ni baldaŭ devos entrepreni ion, por forlasi la ŝipon kaj por provi atingi la bordon. Ĉiam kaj ĉiutage la samon, jen tio, kion oni ne eltenas. Mi pensas de tempo al tempo, se vere ekzistus paradizo, kion mi ne kredas, ĉar mi ne povas imagi, kien tiukaze la riĉuloj irus, ke mi post tri tagoj terure blasfemus, nur por ke mi elvenu kaj ne devu seninterrompe kanti piajn kantojn kaj sidi inter oldaj preĝinoj kaj pastroj kaj pietistoj.”

En tiu momento mi efektive devis ridi: ”Ja ne zorgu pri tio, Stanislav, ni, vi kaj mi, tie ne rajtos eniri. Ni ja ne

havas paperojn. Kaj vi sankte povas fidi tion, ke ankaŭ tie supre ili postulos paperojn de vi, pasportojn kaj baptajn atestojn, kaj se vi ne povos montri tiujn, ili fermos la pordon antaŭ via nazo. Demandu pastron, li tuj konfirmos tion al vi. Vi devas montri la ateston pri geedziĝo, la preĝejan geedziĝan paperon, la baptan ateston, la konfirmacian paperon, la komunian stampon kaj la konfesnoton. Se la afero tie supre irus tiel glate, kiel vi ŝajne supozas, ili ĉi tie surtere ja ne devus pretigi iujn. Al tio, ke Dio scias ĉion, ili ŝajne ne fidas. Jam pli bone estas, se oni posedas ĝin nigre skribitan sur blanka fono kaj laŭorde stampite. Tion ĉiu pastro rakontos al vi, ke la pordogardisto tie supre havas grandan faskon da ŝlosiloj. Por kio? Por fermi la pordojn, por ke ne tamen iu iam traglitu la ĉielan limon sen vizo.”

Stanislav sidis muta dum iom da tempo kaj diris tiam: ”Strange, ke tio ĝuste nun envenas en mian kapon, sed la tuta afero ĉi tie ne tre plaĉas al mi. Ni multe tro bone fartas. Kaj, se oni escepte tiel bone fartas, io ne estas en ordo. Mi ne povas elteni tion. Tio estas ĉiam tiel, kvazaŭ ili sendus nin en sanatorion por grasiga kuracado, ĉar nin atendas eksterordinare malfacila tasko, kiu ne estus plenumebla sen tiu bona antaŭpreparo kaj ripozo. Tiel estis ankaŭ en la mararmeo de la imperiestro. Ĉiufoje, se proksimis io eksterordinara, ni havis antaŭe kelkajn

bonajn tagojn. Tiel estis ankaŭ antaŭ ol ni glitis al Skagen.”

”Nun vi sendube parolas galimation,” mi diris al li. ”Se rostita kokineto flugas en vian buŝon, vi tuj elsputas ĝin, nur por ke vi ne fartu bone. La malfacila tasko venos tute per si mem, fidu tion. Des pli bone, se vi antaŭe feris kelkajn somertagojn. Se vi ŝtopis vin per manĝo en sanatorio, vi povas subigi la malfacilan taskon, alie ĝi eble subigos vin.”

”Damne, vi pravas,” Stanislav nun denove bone humore vokis. ”Mi estas naiva ŝafo. Neniam mi havis tiajn stultajn pensojn. Nur hodiaŭ. Ili trudiĝis iel al mi, kiam mi pensis, ke tie antaŭe en la kajutoj, aŭ ĝustadire tie sub niaj piedoj la knaboj ĉiuj drivas mortaj malantaŭ la pordo, sur la sama kesto kiel ni. Vi ja scias, Pippip, oni ne veturu kun kadavro¹ sur kesto, tio allogas la gaston². Ŝipo estas vivanta. Ĝi ne ŝatas kadavrojn en la proksimo. Kiel kargo jes, tion mi konsentas. Tio estas io alia. Sed ne tiajn ĉirkaŭe kuŝantajn aŭ ĉirkaŭe drivantajn kadavrojn.”

1. kadavroj: Laŭ marista superstiĉo mortaj maristoj kaŭzas malfeliĉojn. En ĉiu kazo ili ĝenas la veturon, do necesas kiel eble plej rapide ĵeti ilin maren. Se oni ne tuj en la unua tago entombigas maren ilin, la ŝipo malfruiĝos.
2. gasto: Stanislav kaj Pippip intence ne uzas la vorton 'morto' aŭ 'skeletono'.

”Tion ni ja ne povas ŝanĝi,” mi diris.

”Ĝuste tio estas, kion mi volas diri,” respondis Stanislav.

”Ni ne povas ŝanĝi tion, kaj tio estas la terura. La aliaj ĉiuj iris al la fiŝoj. Nur vi kaj mi postrestis. Io ne estas en ordo en tiu afero.”

”Nun mi volas diri ion al vi, Stanislav, se vi ne tuj ĉesigos tiujn stultajn lamentojn, tiukaze . . . ne, el la ŝipo mi ja ne volas ĵeti vin, tion vi certe ne allasus. Sed mi ne plu interparolos eĉ silabon kun vi, eĉ se mi forgesus pro tio mian lingvon. En tiu kazo vi loĝos en la triborda ŝakto kaj mi en la baborda, kaj ĉiu el ni elektos vojon laŭ sia plaĉo. Tiom longe, kiom mi vivos, mi ne akceptos, ke iu ploure hurlos pri la gasto al mi.³ Por tio mi havos, se la tempo iam venos, sufiĉe da tempo. Kaj se vi nun volas aŭskulti mian opinion, kial ĝuste vi kaj mi postrestis, tiam mi devas diri al vi, ke estas tute klare kaj ke montros plian fojon, kiel juste ĉio statas en la mondo. Ni ne apartenis al la ŝipanaro. Ni estis ŝtelitaj. Ni neniam faris iun malbonon al la *Empress of Madagascar*, kaj ni ankaŭ neniam intencis fari tion. Neniu tion scias tiel

3. Tiom longe, kiom mi vivos, mi ne akceptos, ke iu ploure hurlos pri la gasto al mi: ”Ĉar tiom longe, kiom ni estas, la morto ne estas, kaj tuj, kiam ĝi ĉeestas, ni ne plu estas.” (Epikuro, ”letero al Menoikeus”)

bone kiel ŝi. Tio estas la kialo, pro kio ŝi ne kunprenis nin.”

”Kial vi ne tuj diris tion, Pippip?”

”Kion vi pensas pri mi, mi ja ne estas via reĝa konsilanto. Ion tian oni scias per si mem kaj sentas tion.”

”Nun mi iros por ebriiĝi,” Stanislav nun diris. ”Estas tute egale al mi. Nu, mi ne diru ebriiĝi, sed tamen mi bone tralavos la gorgon. Kiu sciu, eble tamen venos baldaŭ kesto kaj kunprenos nin. Dum mia tuta plia vivo mi ne povus pardoni al mi, se mi lasus ĉion tion ĉi tie, sen tragustumi foje ĝin.”

Kial Stanislav ĝuu la plezuron sen mi?

Komenciĝis nun tia luksa bankedo, kian eĉ la ŝipestro mem ne estus permesinta al si ĉe unu sidado.

Ĉio tiel alloge ĉemane kuŝis en laduoj. Salmoj el Brita Columbio, kolbaso el Bologna, koketoj, kokinetaj frikasaĵoj, pasteĉoj, ĉiuspecaj langoj, dekduo da diversaj konfitaĵoj, biskvitoj, legomoj el la plej bonaj elektoj, likvoroj, brandoj, vinoj, eloj⁴, maltbieroj, pilzenaj bieroj. La kapitanoj, oficiroj kaj inĝenieroj scias kiel agrabligi la vivon al si. Sed nun ni estis la posedantoj kaj manĝuloj, dume la antaŭaj manĝuloj dravis en la akvo kaj grasigis la fiŝojn.

Dum la sekva tago la vetero estis pluvema kaj nebula. Ni apenaŭ vidis ion en distanco ĝis mejloduono.

4. elo: speco de biero

"Leviĝos ŝtorma vetero," diris Stanislav.

Vespere ĝi leviĝis. Pi kaj pli forte.

Ni sidis en la kajuto de la ŝipestro ĉe petrola danĝer-lanterno.

La vizaĝo de Stanislav aspektis zorgoplena: "Se la Imperiestrino adiaŭas aŭ derompiĝos de la rifo, nia lasta horo estos veninta, amiko. Ni do sufiĉe frue rigardu."

Li trovis proksimume trimetran ŝnuregon kaj ligis ĝin ĉirkaŭ sian talion, por havi ĝin ĉiam ĉemane. Mi trovis nur duone foruzitan ŝnurbulon, kies ŝnuro estis malpli dika ol krajono.

"Prefere ni suprengrimpu la ŝakton," Stanislav proponis. "Ĉi tie ni sidus en la kaptilo, se la spektaklo komenciĝos. Supre ĉiam restos eblo por savi sin."

"Se via vivo finiĝu supre, tiukaze ĝi finiĝos supre, kaj se vi iru malsupre al la fiŝoj, vi foriros malsupre," mi diris⁵. "La fino estas la sama. Se estas via destino morti sub aŭtomobilo, ĝi saltos transen al la montrofenestro, antaŭ kiu vi staras, vi eĉ ne devas postkuri la aŭtomobilon aŭ kuri sur ĝian vojon."

5. Se via vivo finiĝu supre: la filozofo Feuerbach en la oka prelego pri la esenco de la religio, eldonita en la jaro 1845, skribas: "Ja, la hindoj, kiuj atingis la plej altan gradon de religia perfekteco, foje kaj foje kuŝigas sin 'sur la relon, por lasi sin dispremegi de la ĉaro, sur kiu en festoj estas veturigata la bildo de la detruanta Dio Ŝiva. Ĉu oni povas postuli pli?"

”Vi estas kuriozulo. Se via destino estas droni en akvo, vi povas trankvile meti vian kolon sur la relojn kaj la ekspresa trajno supersaltos vin kiel aerŝipo. Tion mi ne kredas. Mi ne metas mian kolon sur la relojn. Mi iros supren kaj observos, kio okazas.”

Li suprengrimpis la koridorŝakton, kaj ĉar mi bone komprenis, ke li pravas, mi postgrimpis.

Tiam ni sidis denove supre sur la poba vando de la mezŝipo, unu apud la alia. Ni devis firme mane teni nin je la metalaj garnaĵoj, ĉar alie la ŝtormo ĵetus nin en la maron.

Pli kaj pli la vetero tumultis. Potencaj pinte rompiĝantaj ondoj furiozis kontraŭ la antaŭon de la mezŝipo, kiu troviĝis sub ni, kaj ĵetiĝis kontraŭ la ŝipestrkajutojn.

”Se tio daŭros la tutan nokton,” diris Stanislav, ”restos morgaŭ matene nenio de la kajutoj. Mi havas eĉ la fortan konvinkon, ke la ondegoj kunprenos la tutan mezŝipon. Tiam por ni restos nur la pobaj holdoj kaj la maŝinejo, kie staras la rudromaŝino. Tiukaze bonan nokton al manĝo kaj trinkado. Tie eĉ muso ne trovas ion.”

”Eble ni prefere jam nun suprengrimpu,” mi konsilis, ”ĉar ni ne plu havos tempon, se la mezŝipo adiaŭos. Tiam ankaŭ ni jam drivos.”

”Tiel subite la mezŝipo ne foriros,” nun Stanislav klarigis, ”ĝi iros pecon post peco al la diablo. Kaj se malsu-

pre vando elrompiĝos, ni havos sufiĉe da tempo por suprengrimpi.” Stanislav pravis.

Sed ankaŭ la juro ŝanĝiĝas pro ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj. Ekzistas nenio, kio ne iam konformis al la juro. Oni nur ne provu pekli la juron, kaj oni ne atendu, ke ĝi ankoraŭ post cent jaroj estos juro, eble eĉ la sama juro.

Stanislav tute certe pravis. Sed kelkajn minutojn poste, li jam ne plu pravis.

Tri gigantaj ondegoj, el kiuj ĉiu sinsekva ŝajnis dekomble pli granda kaj pli forta ol la antaŭa, furiozis kun tia tondra muĝado kontraŭ la Imperiestrino, kvazaŭ ili volus vori nian planedon.

La furioza muĝado de la ondegoj kaj de la postsekvantaj frapantaj ondoj estis minacoplena kolera hurlado al la Imperiestrino, kiu sur tiu rifo kuraĝis spiti tiom longe.

La tria ondego tangigis la Imperiestrinon, kiu krute ĵetiĝis supren. Ankoraŭ ŝi rezistis. Sed ni ambaŭ sentis, ke ŝi komencis loziĝi, ke ŝi ne plu staras kiel firma turo.

La ondegoj retiriĝis por kolekti la forton por la tri sekvaj.

La sovaĝa ŝtormo pelis la pezajn nubojn kiel paperpecojn sur la nokta ĉielo antaŭen. De tempo al tempo malfermiĝis truoj en tiu senbrida furiozado de nuboj, kaj oni ekvidis dum kelkaj sekundoj diversajn klare brilantajn stelojn, kiuj en tiu nigra, hurlanta, muĝanta kaj vipanta

tumulto de la ribelantaj elementoj vokis malsupren: "Ni estas paco kaj trankvilo por vi, sed por ni mem ni estas ĉirkaŭataj de la flamoj de la kreado, de la naskado kaj de senhalta laboro. Ne fuĝu al la steloj, se vi serĉas trankvilon kaj pacon. Kion vi ne portas en vi mem, tion ni ne povas doni al vi!"

"Stanislav," mi kriis laŭte, kvankam li sidis flanke de mi, "la ondegoj revenos. Nun ni devas agi, la Imperiestrino tuj eksinkos."

Mi vidis en la febla stelolumo la unuan ondegon proksimiĝi. Ĝi aspektis kiel nemezureble granda nigra monstro.

Ĝi suprenvipis per siaj malsekaj bestecaj manoj kaj ĵetiĝis sur nin.

Ni bone nin firmitenis, sed la Imperiestrino leviĝis kaj baraktis en la ungoj de la rifo, kvazaŭ ŝi devus elteni severajn dolorojn.

La dua ondego alvenis, forprenis nian spiron dum longa tempo, kaj mi sentis min kvazaŭ ĵetita en la maron. Sed ankoraŭ mi sidis firme.

La Imperiestrino ŝrikis kvazaŭ morte vundata. Ŝi turniĝis eĉ pli en sia doloro kaj pobe retrotangis, krakante, laŭte frapante kaj muĝante, ĝis kiam ŝi ne plu krute sed oblikve staris. Krome ŝi kliniĝis eĉ triborden.

La mezŝipo per la ondegoj nun tiom pleniĝis per akvo, ke certe ĉiuj nutraĵoj ne enlutitaj en laduoj fariĝis ne-

mangeblaj. Sed tio, kio en la mezŝipo okazis, efikis en mi nur kiel tre fora pala penso.

”Stanislav, amiko!” mi kriis.

Ĉu ankaŭ li kriis, mi ne scias. Certe ankaŭ li faris. Sed ja ne eblis aŭdi lin.

La tria ondeg, la plej peza el la ondosinsekvo, alvenis ŝturmatake.

La Imperiestrino jam elspiris la vivon, kvazaŭ ŝi mortis pro subita timo. La tria ondeg, kvankam alvenanta tre rapide kaj tondre albatante, levis facile la kadavron de la Imperiestrino de Madagaskaro, kvazaŭ ŝi estus silka vualo. Malgraŭ sia kruda furiozado ĝi faris tion delikate kaj karese. Ĝi levis la kadavron, turnis ĝin laŭ la tuta longo en cirkloduono. Ĝi ne faligis ŝin plian fojon sur la rokojn por delekti sin je la rompado de la ostoj, ĝi kuŝigis ŝin mole kaj karese sur la flankon.

”Forsaltu kaj naĝu, Pippip, alikaze la suĉo glutos nin,” kriis Stanislav.

Naĝu do, se ĝuste ĉirkaŭfluganta kargomasto, aŭ kio ajn estis, draŝis sur viajn brakojn.

Sed ĉu mi ne povis aŭ ne volis naĝi, estis tute ekster konsidero. La posta ondeg de la antaŭlasta forflorigis min al sufiĉe granda foro, tiel ke la glute suĉanta kirlado ne povis kapti min. Kelkajn minutojn la Imperiestrino ankoraŭ eltenos, antaŭ ol ŝin glutos la profundo por

ĉiam. La poban parton de la ŝipo la akvo ĝis nun ankoraŭ ne atingis.

"Hoj! Hoj!" mi nun aŭdis Stanislavon krei. "Kie vi estas?"

"Venu, ĉi tien. Mi gluiĝis bone. Sufiĉe da loko," mi kriis en la nigron. "Hola! Ĉi tien. Hoj! Hoj!" Denove kaj denove mi kriis tion, por signali la direkton al Stanislav.

Efektive li venis pli kaj pli proksimen. Finfine li kroĉiĝis kaj grimpis supren.

Ĉapitro 48

Diru al mi, kio tio estas, sur kio ni troviĝas?” de mandis Stanislav.

”Tion ankaŭ mi ne scias. Tute subite mi estis sur ĝi, mi eĉ ne scias kiel okazis. Mi pensas, ke estas vando de la rudrodomo. Ĉi tie videblas ĉie la manteniloj.”

”Certe. Estas parto de la rudrodomo,” konfirmis Stanislav. ”Bone, ke la azenoj ankoraŭ ne faras jam ĉion el fero kaj lasas de tempo al tempo kelkajn lignopecojn. En malnovaj libraĉoj oni ĉiam legas kiel la ŝipknabo firme brakumas maston, per kiu li saviĝas kaj ekflosas. Tio nun ne plu eblas. Ankaŭ la mastoj estas jam el fero, kaj se vi kroĉiĝus al tia masto, vi povus same tiel bone pendigi ŝtonon al via ventro.¹ Se vi denove iam vidos tian bildon, ne hezitu diri, ke la pentristo estas trompisto.”

”Kian parolfluon vi havas en tiuj ĉi damnitaj cirkonstancoj,” Stanislav kritikis.

1. pendigi ŝtonon al via ventro: ” . . . , estus pli bone por tiu, se granda muelŝtono estus pendigita ĉirkaŭ lia kolo, kaj se li estus subakvigita en la profundon de la maro.” (Sankta Mateo 18.6)

”Jes, vi azeno, ĉu mi ĉi tie lamentu kaj flutu funebran muzikon? Kiel mi sciu, ĉu mi ankoraŭ povos rakonti al vi post kvarono de horo, ke oni ne plu fidu al mastoj en la nuna tempo. Kaj tion mi devas diri, ĉar tio gravas.”

”Rokoj kaj rifoĵ! Jen ni ankoraŭfoje glate eskapis,” li nun vokis.

”Sankta marserpento!” mi kriis al li. ”Fermu vian blasfemantan babilbuŝon, mil sakrojn. Vi alkrias ja la tutan fibandon. Se vi sidas en seka loko, tiam ĝoju sekrete, sed ne elkriu ĝin tiel impertinente. Mi penas diri tion tiom diskrete kaj elegante kiom eblas, do nur ĝentile aludas, kion mi celas. Sed vi proleto simple elkrias tion.”

”Ne parolu tiel fanfarone. Nun ĉio estas egala, nun ni sidas tamen en la mer . . .”

Kun tiu Stanislav oni ne povas atingi ion, la parolturnoj, kiujn li uzas foje kaj foje, min certe iam devigos eviti lian kompanion.

”Ĉio estas egala, ĉu?” mi ripetis. ”Mi ja eĉ ne pensas tiel. Estas stulte, ke ĉio estu egala. Neniam io indiferentas. La plezuro nun ĝuste komenciĝas. Ĝis nun ni baraktis nur pro paperoj, poste pro la ratmanĝo, poste pro la malbenitaj kradoj. Nun finfine temas pri la lasta spiro, pro kiu ni devas barakti. Ĉio alia, kion homo povas havi, estas for. Ĉion, kion ni ankoraŭ havas, estas nia spiro. Kaj tiel rapide kaj bonvoleme mi ne lasos forpreni ankaŭ tiun de mi.”

”Sed plezuron mi imagas alia,” diris Stanislav.

”Ne estu maldankema, Lavski. Mi diras al vi, ke estas infera plezuro, batali kontraŭ la fiŝoj pro la lasta manĝomordaĵo, se oni mem estu tiu mordaĵo.

Stanislav kompreneble pravis. Ne estis plezuro. Ni devis kroĉiĝi kiel frenezuloj al la manteniloj, por ne esti forlavitaj. La ondegojn oni ne sentis tiel krude sur tiu flosanta vando kiel sur la ŝipo, ĉar la pinte rompiĝantaj ondegoj altenlevis la vandon kaj ne per la tuta forto transĵetis sin. Sed sufiĉe ofte ili plonĝis nin en la akvon, por ke ni ne forgesu, kie ni troviĝas.”

”Mi pensas, ke ni nun devas fari ion,” mi diris. ”Miaj brakoj estas tiel feblaj kvazaŭ oni traktis ilin per klaboroj. Longe mi ne plu povos firmteni min.”

”Ni alfiksu nin,” diris Stanislav. ”Mi donos mian ŝnuregon finon al vi, kaj mi prenos vian ŝnureton. Mi havas pli da forto. La ŝnureto estas sufiĉe longa, por ke oni povu uzi ĝin trioble plektita.”

Stanislav nun helpis firmigi min per la ŝnurego; per miaj lamaj brakoj mi apenaŭ povus fari tion. Poste li firmigis ankaŭ sin mem, kaj tiam ni atendis, kio okazos.

Neniu nokto estas tiel longa, ke ĝi ne pasas finfine kaj devas cedi al la tago.

Komence de la nova tago la kruda vetero trankviliĝis, sed la altaj ondoj restis.

”Ĉu vi vidas ion de la firma tero?” demandis Stanislav.

”Ne. Mi jam sciis, ke tiel facile mi ne fariĝos la trovanto de novaj kontinentoj. Se ĝi ne troviĝas ĝuste antaŭ la vizaĝo, mi ne vidas firman teron.”

Subite Stanislav diris: ”Amiko mia, mi havas ja la kompason. Estis bone, ke vi trovis ĝin.”

”Jes, kompaso estas bela afero, Lavski. Tiel ni ĉiam povas vidi, en kiu direkto troviĝas la marbordo de Afriko. Sed velon mi ŝatus pli ol dek kompasojn.”

”La velo tute ne helpus al vi sur la tabulo.”

”Kial ne? Se marbrizo direktiĝus al la firma tero, ni kunirus.”

”Ni certe kuniros al alia loko, Pippip.”

Posttagmeze denove brumiĝis, kaj delikata nebulo sternis sin sur la maro. Ĝi havis trankviligan efikon al la furiozado de la ondoj.

La nemezurebla vasto de la maro pli kaj pli malgrandiĝis. Baldaŭ nin kaptis la iluzio, ke ni troviĝas sur enlanda lago. Poste ankaŭ la lago pli kaj pli ŝrumpis, kaj fine ni supozis, ke ni flosas facilmove sur rivero. Ŝajnis, kvazaŭ ni povus kapti per la manoj la bordojn, kaj antaŭ ol ni endormiĝis, diris jen Stanislav jen mi: ”Tio estas la bordo, ni desaltu kaj naĝu transen la etan distancon. Vi povas vidi ĝin tute klare, estas eĉ ne cent paŝoj ĝis tie.”

Sed ni tro lacis por malligi nin kaj por naĝi tiujn cent paŝojn.

Poste ni apenaŭ parolis ion kaj ekdormis.

Kiam mi vekigis, estis nokto.

La bruma nebulo ankoraŭ nun etendiĝis sur la maro. Sed alte en la ĉielo mi vidis briletantajn stelojn. Ambaŭflanke mi vidis la bordojn de la rivero, sur kiu ni drivis antaŭen. De tempo al tempo la nebulo ĉe unu el la bordoj maldensiĝis, kaj mi vidis la milojn de brilantaj lumoj de la proksima haveno. Estis granda haveno. Ĝi havis altajn nubskrapulojn kaj ludomojn, kies fenestroj ĉiuj estis lumigataj. Kaj malantaŭ la fenestroj la homoj hejmece sidis kune kaj sciis nenion pri tio, ke ĉi tie sur la rivero preterglitas du mortuloj.

Kaj la nubskrapuloj kaj la altaj loĝdomoj kreskis kaj kreskis. Kia giganta haveno estis, kiun ni preterglitis. Pli kaj pli alten kreskis la nubskrapuloj, ĝis ili fine atingis la ĉielon. Kaj la miloj da glimantaj lumoj de la haveno, de la nubskrapuloj kaj de la hejmecej loĝdomoj, kie oni sciis nenion pri la preterglitantaj mortuloj, estis kiel steloj de la ĉielo. Kaj supre, krute super mia kapo, la nubskrapuloj kunpuŝiĝis, kaj mi vidis iliajn fenestrojn lumi, kaj mi esperis, ke la konstruaĵoj renversiĝe rompiĝos kaj entombigos min sub si. Estis la granda sopiro de la mortulo, ke oni entombigu lin, ke li ne devu migri plu.

Mi ektimis kaj vokis: "Stanislav. Jen granda haveno. Aspektas kiel Nov-Jorko."

Stanislav vekigis, ĉirkaŭvidis, rigardis tra la maldensa nebulo al la bordoj de la rivero, frotis la okulojn, rigardis alten super si kaj tiam diris: "Vi songas, Pippip, la lumoj de la granda haveno estas steloj. Tie ankaŭ bordo ne estas. Ni troviĝas ie sur la maro. Tion vi ja povas senti je la longaj ondoj."

Li ne povis konvinki min. Mi nun tamen volis naĝi al la bordo kaj atingi la grandan havenon.

Sed kiam mi provis malligi la ŝnuregon, miaj manoj falis sen forto malsupren, kaj mi endormiĝis.

Soifo kaj malsato vekis min. Estis jam tago.

Stanislav rigardis min per ruĝiĝintaj okuloj. Mia vizaĝo estis krustkovrita de la sala akvo. Mi rimarkis, ke Stanislav pene glutas, kvazaŭ li volus maĉi la propran langon aŭ kvazaŭ ĝi ĝenus lin kaj metus sin antaŭ lian traheon.

En liaj okuloj ekflamis kolero, kaj li vokis per raŭka voĉo: "Vi ĉiam diris, ke la akvo sur Jorike fetoras. Tio ne estas vera. Ĝi estas fontakvo, tute freŝa, klara akvo el abia arbaro."

"La akvo neniam fetoris," mi konfirmis, "la akvo estis glacia akvo. Kaj la kafo estis bona kafo. Mi neniam ion diris kontraŭ la kafo sur Jorike."

Stanislav fermis la okulojn. Sed ne longe poste li skuiĝis pro subita teruriĝo kaj kriis: "Dudek antaŭ la kvina, Pippip, alportu la matenmanĝon. Levu la cindron. La

matenmanĝon unue. Ŝelkuiritajn terpomojn kaj fumaĵitan haringon. La kafon. Multe da kafo. Kunportu akvon.”

”Mi ne povas ellitiĝi,” mi respondis. ”Mi estas rompita. Tro laca. Vi sola devas levi la cindron hodiaŭ. Diru, kie estas la kafo?”

Kiel tio okazis? Mi aŭdis Stanislavon krei, sed li foris du mejlojn. Kaj ankaŭ mia propra voĉo estis du mejlojn for de mi.

Nun aldone al ĉio alia, tri fajropordoj malfermsaltis, la varmego ne elteneblis. Mi kuris al la ventkanalo por kapti aeron. Sed la hispana hejtisto kriis: ”Pippip, fermu la fajropordojn, la premo falas.” La tuta vaporo kolektiĝis en la kaldronejo, kaj la temperaturo pli kaj pli kreskis. Mi kuris al la trogo, en kiu troviĝis la akvo por estingi la skoriojn, por forigi mian soifon, sed ĝi gustis sala kaj naŭza. Mi enspiris haste la aeron kaj trinkis denove. La fajrokanalo staris tre alte kaj vaste malferma super mia kapo sur la firmamento. Ĝi estis la suno, kaj mi trinkis marakvon.

Tiam mi denove endormiĝis, kaj la pordoj de la fajrokanaloj estis fermitaj, kaj la hejtisto elverŝis la skorian akvon el la trogo en la kaldronejon, kaj mi troviĝis ie sur la maro, kaj ondokresto ĵus ĵetiĝis sur trans la vandon.

”Tio estas Jorike!” kriis Stanislav multajn mejlojn for de mi. ”Tio estas la mortula ŝipo. La haveno. Jen la nor-

vega ŝipo. Ili havas glacian akvon. Ĉu vi ne vidas, Pippip?”

Per ambaŭ brakoj, per pugnigitaj manoj, Stanislav signis al la vasta maro.

”Kie Jorike estas?” mi vokis.

”Ĉu vi efektive ne vidas ĝin, hej? Jen ĝi ja ankras. Ses kradoj elfalis. Damne. Nun jam ok. Fulmotondro, mil diabloj! Kie estas la kafo, Pippip? Ĉu vi jam denove ĉion fordrinkis? Tio ne estas ŝmirsapo, bastardo, tio estas butero. Donu nun la teon al mi, mil sakroj.”

Stanislav kolere turnis sin, jen li montris al tiu direkto, jen al tiu ĉi. Ĉiufoje li demandis, ĉu mi vere ne vidas Jorike kaj la havenon.

Sed tio ne interesis min. Mia kapo doloris, kiam mi turnis min al la haveno.

”Ni devojiĝas! Ni devojiĝas!” Stanislav nun kriis. ”Mi devas transiri al Jorike. Ĉiuj kradoj elfalis. La hejtisto kuŝas en la kaldronego. Kie estas la akvo? Ĉu vi efektive ne lasis iom da kafo por mi? Mi devas transiri, transiri.”

Li tiris nun ŝire la ŝnureton por lozigi ĝin. Sed li ne povis malfermi la nodojn. Li turnadis nun kiel frenezulo la nodojn, sed pli kaj pli fiksnodigis ilin. ”Kie estas la ŝovelilo?” li vokis. ”Mi devas trahaki la ŝnuregon.” Sed la ŝnureto ne longe rezistis. Stanislav tiris, ŝiris kaj fro-

tis kun tia granda forto la trioble turnitajn nodojn, ke li pli kaj pli elturnis sin el ili. La lastan fadenon li disŝiris.

”Jorike forveturas. Rapidu, Pippip. La norvega ŝipo havas glacian akvon. Iu svingas la kruĉon. Mi ne restas sur la mortula ŝipo.”

Pli kaj pli sovaĝe Stanislav kriis.

Li estis alligita jam nur piede, kaj nun li ankaŭ tie disŝiris la lastan fadenon.

Mi vidis ĉion ĉi kvazaŭ el distanco de mejloj, kiel sur bildo aŭ tra teleskopo.

”Tie estas Jorike. La ŝipestro salute tuŝas la ĉapelon.” Stanislav vokis tion kaj rigardis min per rigide fiksitaj okuloj. ”Transvenu, Pippip. Jen teo kaj kuko kun sekaj vinberoj kaj kakao kaj akvo.”

Jes, jen Jorike ankris. Mi tute klare vidis ŝin. Mi rekonis ŝin je ŝia bunta arlekena vesto kaj je ŝia ponto, kiu por ĉiam ŝvebis en la aero, postlasita de iu ŝipo, kiu tute ne havis rilaton al ŝi.

Jen estis Jorike, kaj nun ili matenmanĝis aŭ vespermanĝis aŭ manĝis prunojn en blua amela kaĉo. La teo ne estis malbona. Tio estis mensogo kaj kalumnio. La teo estis bona ankaŭ sen sukero kaj sen lakto. Kaj la trinkakvo ne fetoris.

Mi komencis malnodi mian ŝnuregon. Sed mi ne povis malfermi la nodon. Tiam mi vokis al Stanislav, ke li helpu al mi malnodi. Sed li ne havis tempon. Li ne suk-

cesis ĉe sia piedo kaj laboris kiel frenezulo por povi liberiĝi la piedon. Nun aldone malfermiĝis eĉ la vundoj, kiuj devenis de la batoj sur lian kapon.

La sango fluis sur lia vizaĝo, sed tio ne ĝenis lin.

Kaj mi ŝiris kaj ŝiris je miaj ligaĵoj. Sed la ŝnurego estis tro dika. Mi ne povis trafroti ĝin kaj mi ne povis elturni miajn membrojn el ĝi. Mi ligiĝis pli kaj pli. Tiam mi serĉis la hakilon, la tranĉilon kaj finfine la ŝovelilon, kiun ni frape glatigis, por fari el ĝi lignan maston, sed la kompas falis ĉiam denove en la akvon, kaj mi devis elfiŝi ĝin per la elbruligita krado. La ŝnurego ne malstreĉiĝis. La nodo firmiĝis pli kaj pli. Tio puŝis min en nedireble grandan koleron.

Stanislav nun estis liberiginta sian piedon.

Li turnis sin duone al mi kaj vokis: "Venu transen, Pipplav. Estas nur dudek paŝoj, kiujn vi devas kuri. La kradoj ĉiuj falis, estas akvominuto antaŭ la kvina. Eliĝu. Eku, rapide. Elen! Levu la cindron."

Sed la cindrokanalo kriĉis: "Tio ne estas Jorike!"

Kaj mi kriis tiel laŭte, kiel mi kapablis: "Tio ne estas Jorike! Tio ne estas Jorike! Tio ne estas Jorike!"

Mi kroĉiĝis al la ŝnurego en terura timo; ĉar Jorike forestis, kaj mi vidis nur maron, maron, mi vidis nenion alian ol la konstantan ondadon de la maro.

"Stasinkovslov, ne saltu!" Mi kriis tion en nedireble granda timo, ĉar mi ne povis trovi lian nomon, kiu gli-

tis el mia memoro. "Stanislav, ne saltu! Ne saltu! Ne. Restu ĉi tie!"

"Ĝi entiras la ankron. Mi ne iros sur mortulan ŝipon. Mi transkuros al Jorike. Mi kuras, kuras, kuras. Venu!"

Kaj li saltis. Li saltis. Tie ne estis haveno. Tie ne estis ŝipo. Tie ne estis bordo. Ĉie maro. Ĉie ondoj.

Li faris nur kelkajn plaŭdajn brakmovojn. Poste li forsinkis por ĉiam. Mi rigide rigardis transen al la truo, en kiun li falis. Mi vidis ĝin je senfine fora distanco. Kaj mi vokis: "Stanislav, Lavski! Frato! Kara, kara kamarado, venu ĉi tien! Hoj! Hoj! Ĉi tien! Ĉi tiien!"

Li ne aŭdis min. Li ne revenis. Li ne revenis al la surfaco de la akvo. Tie ne estis mortula ŝipo. Tie ne estis haveno. Tie ne estis Jorike. Li ne revenis al la surfaco de la akvo, ne, sinjoro.

Kaj tio estis stranga. Li ne reaperis. Kaj mi ne povis kompreni, kiel tio eblas.

Li dungigis por granda veturo², por tre granda veturo. Sed kiel li povis dungigi? Li ja ne havis maristan dokumenton. Ili tuj elĵetos lin.

Sed li ne plu revenis. La granda kapitano dungis lin. Konfide li dungis lin, eĉ sen paperoj.

2. Granda veturo: La granda aŭ lasta veturo pro tio, ĉar maristo eĉ vidalvide al la morto ne parolas pri ĝi. Li "iras al la fiŝoj", "en la grandan havenon", sed ne mortas.

"Venu, Stanislav Koslovski," diris la granda kapitano, "venu, mi dungas vin konfide kaj honeste por granda veturo. Lasu nun la paperojn. Ĉi tie vi ne bezonas dokumentojn. Vi veturas sur fidinda kaj honesta ŝipo. Iru al la kajuto, Stanislav. Ĉu vi povas legi la skribon super la pordo?"

Kaj Stanislav diris: "Jes, kapitano —

*Kiu eniras ĉi tien,
liberas de ĉiuj turmentoj!"*

ALDONOJ

Resumo de la romano

La romano estas dividita en tri partojn. La kanto de maristo enkondukas la unuan parton.

Gale, kiu rakontas en la unua persono, estas unu el da du herooj de la romano, usona maristo, ferdeklaboristo, kiu pasigas kun belulino dolĉan nokton en marista taverno en Antverpeno.

Frumatene li atingas la havenon. Sed lia ŝipo, la "Tuscaloosa", jam forveturis. Kun la "Tuscaloosa" perdiĝis krom la mono ankaŭ ĉiuj siaj paperoj, tiel, ke li nun ne plu havas ŝtatanecon. La belga polico kaptas la senpasportulon kaj ŝovas lin trans la nederlandan limon. Tie Gale migras al Roterdamo.

Kaptite de la nederlanda polico, li edevas reiri al Belgio, sed nun belgaj limoficistoj denove kaptas lin, kaj pro tio li remigras al Roterdamo. Ekde tie skota ŝipo kunprenas lin kiel sinkaŝon al Bulonjo.

En la ekspresa trajno al Parizo la polico malkovras la senpasportulon kaj metas lin por dek tagoj en prizonon, pro trompo de la fervojo. Post drola tempo en la prizono li pasigas kelkajn tagojn en Parizo kaj ekkuraĝas iri al la usona konsulo por ricevi pasporton. Post la malsuk-

cesa interparolado Gale provas veturi plian fojon per eksprestrajno. Denove oni kaptas lin, kaj denove li devas eniri prizanon.

Post la eliro el la prizono li migras pli suden kaj laboras en la suda Francio dum kelka tempo ĉe kamparano, ĉe kiu li devas multe labori por ridinda salajro.

Tiam Gale migras plu kaj en la landlima regiono eniras hazarde francan limfortikaĵon, en kiu ankoraŭ ne finiĝis la sieĝa stato, kvankam la milito jam pasis. Laŭ militleĝo li estas pafmortigenda. Post diversaj bone gustantaj antaŭekzekutaj oficiraj menuoj li tamen elvenas el la zono de la morta danĝero, ĉar li, en la maniero de Ŝvejk, povas pruvi sian sendanĝerecon.

Ĉar Gale rifuzas reiri al Germanio — li ne volas kunpagi la kostojn de la milito — li asertas pri si, ke li estas germano. Franca eskorto kondukas lin al la hispana limo. Li surpaŝas la hispanan teron kvazaŭ germano, la doganoficistoj ĝojkrie salutas kaj festas lin. Ĉar li estas tre bonvena gasto, oni festas lin tiom, ke li devas fuĝi pro tiom da troigita amo, alikaze ili ne estus forlasintaj lin.

En Hispanio videble regas idiliaj homaj interrilatoj. Neniu tie demandas pri lia pasporto, pri lia de kie kaj kien. La polico eĉ atentigas, ke ne okazu, ke iu ŝtelu lin, se li dormas nokte surstrate. Finfine li petas en magazeno fiŝkaptilaron kaj poste provas kapti fiŝojn ĉe la kaja

muro de Cadiz. Tie okazas io neatendita. Kiam Gale jam kaptis fiŝojn kaj lasas ilin denove fornaĝi, ĉar ili tro etas kaj pro tio, ke li meditas pri la gajeco de fiŝoj, li preskaŭ lasas fali pro teruro la fiŝfadenon, ekvidante la arlekenan malnovan ŝipon, kiu proksimiĝas minacante.

La pramalnova "kesto", kiu lante kaj anhele alrampas, estas "Yorikke", do Jorike: la mortula ŝipo. Pro la marista superstiĉo, ke oni neniam rifuzu dungigon, se ŝipo ofertas laboron, li surgrimpas la ferdekon, dungiĝas kaj tiel eniras en la regnon de la mortuloj, de la estingitoj. Tiel finiĝas la unua parto.

La dua parto komenciĝas per la surskribo super la kajutoj de la ŝipanaro:

SURSKRIBO SUPER LA ŜIPANARAJ KAJUTOJ DE LA MORTULA ŜIPO

*Kiu eniras ĉi tien,
ties nom' kaj ekzisto estas estingitaj.
La vento forblovis lin.
De li eĉ spireto ne konserviĝis
en la vasta vasta mondo.
Li povas nek iri returne
nek paŝi antaŭen,
tie, kie li staras, anatemo lin tenas.
Lin konas nek Dio nek infero.*

*Li ne estas tago, li ne estas nokto.
Li estas la nenio, la neniam, la neniam plu.
Li estas tro granda por la senfineco
kaj li tro etas por la sablograjno,
kiu havas siajn celojn en la universo.
Li estas la neniam estinta
kaj la neniam pensita!*

La mortula ŝipo Jorike havas ŝipanojn el la tuta mondo. Estas persekutatoj el la imperiismaj ŝtatoj, estas desperuloj, senŝtatanoj, homoj sen hejmlando, sen nomoj, sen paperoj. Por la mondo ili estas mortintoj.

La vivo sur la Jorike estas vere infera. La maristo Gale, kiu ekde nun apartenas al la nigra bando, al la hejtistoj kaj subhejtistoj ĉe la kaldronegoj, laboras kun la polo Stanislav Koslovski kiel subhejtisto.

La laborkondiĉoj estas nekredeblaj, la ŝipanaro vestita per ĉifonoj. Elektra lumo ne ekzistas. Kusenoj, kovriloj kaj similaj luksaĵoj ne disponeblas, ĉar alie la kompanio ne povus elteni la konkurencon kun la aliaj kompanioj. Neniu mebloj, neniu sapo, neniu kuleroj, nenio ajn. La ŝipanaro loĝas en etaj kajutoj kaj la manĝo estas de tia aĉa kvalito, ke ĝi apenaŭ sufiĉas por transvivi.

La laboron en la kaldronejo ili faras en arda varmego. Gale kaj lia laborkamarado Koslovski laboras duoblajn vaĉojn. Ĉar ili devas fari la laboron de ses viroj, ili labo-

ras kiel piramidosklavoj. Neniu protektaj instalaĵoj, brulvundoj pro ardantaj karbopecoj, kiuj neeviteblas en la malvasta kaldronejo. Ĉie sur tiu inferoŝipo embuskas la morto. La vivo tie tiel aĉas, ke eĉ la diabloj en la infero ne povus elteni tion, sed homoj devas elteni ĝin, ĉar ili estas mortuloj.

Ĉiujn ĉi laborojn devas fari ŝipanaro, kiu konscias, ke la ŝipo estas "mortonta", por ke la posedanto povu enkasigi la asekursumon. Savjako ne ekzistas, por ke ne iuj atestantoj fuŝu la plezuron de profita enspezo. Estas jam nur demando pri tempo, kiam la ŝipo sinkos profunden. Sed ankoraŭ la tempo ne venis, ĉar la kapitano ankoraŭ devas vendi la kontrabandajn varojn, kiuj troviĝas sur la ŝipo. Ankaŭ kapitano devas enspezi kromsalajron, ĉar li ne povas vivi nur de sia salajro.

La kontrabandaj varoj venas interalie el la germana urbo Suhl, el la plej aĝa 'ludilfabriko', el la ŝvaba regiono venas marmelado, el Belgio kaseroloj kaj tiel plu. Kiam Gale kaj Koslovski pli precize kaj pli detale rigardas ĉion, ili eltrovas, ke oni ne povas ludi per la ludiloj, ke oni ne povas manĝi la marmeladon, ĉar temas pri armoj kaj municioj por la marokanoj.

Sed antaŭ ol Jorike sinkas sur la grundon de la maro, anoj de alia ŝipo ŝanhajas la hejtistojn Gale kaj Koslovski, kiam ili promenas sur la kajo de la haveno. Ili eniĝas en pugnobatalon kaj oni draŝas ilin ĝis senkonscio.

Ambaŭ vekiĝas poste sur la maro, sur la "Empress of Madagascar". Tiel komencas la tria parto. Ĝin enkondukas jena verseto:

*Veturas strangaj ŝipoj
sur maroj preter ni;
Fifamas neniuj tiom,
ke ne aliaj fiuj pli.*

La tute nova "Imperiestrino de Madagaskaro", kiu eĉ post plurfojaj renovigoj ne atingas la necesan rapidecon, kiun ĝi devus atingi por povi spiti la konkurantojn, estas miskonstruo, kaj tial tuj post la naskiĝo kondamnita je morto, elsendita por almenaŭ enspezigi la asekurmonon. Do, denove mortula ŝipo por la du herooj de la romano.

Ili nun devas labori kiel hejtistoj kaj transvivas sole la pereon de la ŝipo. Sur vando de la stirejo ili drivas kiel ŝiprompuloj sur la maro. Stanislav finfine freneziĝas, li pensas delire, ke li vidas Jorike. Li saltas maren por atingi ĝin — sed li dronas.

Li dungiĝis por granda veturo, por tre granda veturo, eĉ sen paperoj. Gale ne povas helpi Stanislavon, ĉar li ne povas malnodi sin de la ŝnuro. Tiel finiĝas la romano.

Sed Gale evidente transvivas. En Meksiko li reaperas kiel kotonplukisto kaj verkisto. Sub la nova nomo B.

Traven li rakontas al ni la harhirtigan historion pri *La mortula ŝipo*.

Hans-Georg Kaiser

Glosaro

Enestas nur malofte uzataj vortoj, kaj nur la signifoj, kiuj koncernas la libron.

(EDK): *Erich-Dieter Krause, Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch — Hamburg, Buske 1999*

(HGK): *Hans-Georg Kaiser*

(NPIV): *La Nova Plena Ilustrita Vortaro, SAT, Parizo 2002*

(PIV): represo de la dua eldono de la Plena Ilustrita Vortaro. SAT, Parizo 1981

(PV): *naŭa senŝanĝa eldono de la Plena Vortaro, SAT, Parizo 1980*

A

abiseno: ano de la gento de Abisenio. Eksa nomo de Etiopio.
(NPIV)

absceso: amaso da puso (NPIV)

acetileno: bruligebla gasa hidrokarbono, pasintece uzata por lumigado (NPIV)

akumulatoro: aparato, por amasigi provizon da elektro kaj ĝin ree liveri laŭbezone (NPIV)

amelo: blanka substanco, terpomamelo estas kuirarte uzata.
(NPIV)

anatemo: solena malbeno, per kiu la eklezio apartigas de si kulpan membron. (NPIV)

anĝelfaristino (slange): abortigstino (HGK)

arabesko: ornama desegnaĵo, laŭ la araba maniero, konsistanta el reto da kunplektitaj linioj. (NPIV)

argilo: sedimenta aŭ rezidua petro tre etgrajna, ofte en formo de glueca knedebla tero (NPIV), el kiu oni faras per bakado brikojn, tegolojn ktp.

arlekeno: gaja burleskulo, origine rolulo en la itala komedio (NPIV)

artiko: loko de kunligiĝo aŭ de kuniĝo inter du skeletaj elementoj de la vertebruloj, inkl. homon (NPIV)

asizo: kunsido de kriminala tribunalo (NPIV)

aŭtodafeo: publika punbruligo de herezuloj sur ŝtiparo (NPIV)

B

baskuli: alterne leviĝi kaj malleviĝi (PIV)

bastonulo (slange): por policisto, por la angla vorto "cop" (HGK)

bielo: en mekanismo stango, kiu servas por transmisii movon, kun aŭ sen ŝanĝo de movspeco (NPIV)

bloko: peza, unupeca maso de malmola materio (NPIV)

boko: virseksulo de remaĉuloj, precipe de kaproj aŭ cervoj (NPIV)

bolto: kunfiksilo, konsistanta el ŝraŭbo kun kapo kaj ŝraŭbingo (NPIV)

boŝo (slange): germano, de la franca vorto 'Boche' (HGK)

breĉo: neregula malfermaĵo farita en murego aŭ remparo por ebligi la perfortan eniron en fortikigitan urbon, kastelon fortreson ks (NPIV)

brogi: tremi en, aŭ surverŝi per per bolanta akvo (NPIV)

D

dando: viro, kies precipa zorgo estas elegante observi modon (NPIV)

deporti: pune transporti al fora loko, eventuale kun submeto al trudlaboro (NPIV)

despero: profunda malespero (NPIV)

diareo: oftaj kaj likvaj fekoj (NPIV)

divizio: aŭtonoma grupiĝo, sub unu komando, de diversarmilaj trupoj (NPIV)

dizerti: fuĝi el militista servo kun la intenco ne reveni al ĝi (NPIV)

E

erikejo: nekulturata loko, kie kreskas precipe erikoj (NPIV)

eskalo: ŝtupetaro (NPIV)

F

fenico: ano de semida popolo, kies ĉefa urbo estis Tiro (NPIV)

fosforeski: lumi dum kaj post prilumigo per alia lumfonto (NPIV)

frikando: peco de bovidaĵo, trapikita per lardostrioj, kaj stufita en sia suko (NPIV)

futo: mezurunuo o de longo, diversvalora laŭ la landoj (NPIV), proksimume triono de metro

fulgo: nigra densa substanco, devenanta de nekomplete forbrulinta karbono (NPIV)

G

galimatio: konfuzega, sensenca, tute nekomprenebla diraĵo aŭ skribaĵo (NPIV)

H

Hindustano: la vasta ebenaĵo en la nordo de Hindio, kontraste al Dekkano. (NPIV)

hordeo: grenu unujara vegetaĵo el fam. gramenacoj, kies grajnoj estas uzata por fari krudan panon, por nutri bestojn aŭ por fabrikii bieron (PV)

hotentoto: ano de S-Afrika gento (NPIV)

I

interezo: kompenso, kalkulita en procentoj, kurante pagenda pro la fruktuze de fremdaj valoroj, kies kapitalo estas ankaŭ repagenda je fiksita dato (NPIV)

J

junto: la kuniga interspaco inter ekzemple du metalaj pecoj kunigitaj (NPIV)

K

kaco: penis (NPIV)

kamero: senfenestra nehejtebla ĉambreto, uzata kiel tenejo, kaŝejo ktp. (NPIV)

kamufl: maski militobjekton, donante al ĝi la aspekton, koloron aŭ formojn de la ĉirkaŭaĵoj (NPIV)

kardino: metalaĵo, konsistanta el du sendependaj partoj kun komuna akso, fiksitaj sur fosto, resp. Sur klapo (pordo, fenestro, ŝuto) kaj ebliganta ties malfermon, sed ankaŭ ties demeton per nura levo (NPIV)

komunio: dono de la konsekrita hostio resp. vino, partopreno en la eŭkaristio (NPIV)

koncesio: rajto, donita de ŝtato aŭ alia instanco pri ekspluato de teritorio, komerco aŭ alia ekonomia agado (NPIV)

kontesti: diskute malakcepti aserton aŭ establitan situacion (NPIV)

kontricio: pentro pri kulpita peko, pro sincera amo al Dio (NPIV)

konverti: alkonduki iun al alia religio ol tiu, je kiu li kredis (NPIV)

kresto: elstara longforma konturo (NPIV)

kuratoro: individuo jure nomita por zorgi pri persono kaj havo de neplenaĝa orfo, aŭ de iu, kiu ne posedas la personajn rajtojn (NPIV)

kuvo: granda nekovrita vazo, ordinare rondforma, pli larĝa ol profunda, el ligno, metalo, plasto aŭ ŝtono k. a. (NPIV)

L

lakeo: servisto ĉe riĉuloj (NPIV)

latrino: plej simpla necesejo (NPIV)

linda: alloge plaĉaspekta (NPIV)

lobo: rondforma elstara parto de organo (NPIV)

lubriki: meti substancon speciale glitemigan inter du frotiĝantajn surfacojn, por faciligi la glitadon kaj malhelpi la rajpon (NPIV)

M

maŝo: buklo, laŭvole streĉebla aŭ malstreĉebla, formita per ŝnuro kaj povanta servi por ĉirkaŭkapti, ĉirkaŭlaĉi, premsufoki kc. (NPIV)

meĉo: speco de ŝnuro el bruligebla kaj sorba materialo, kiun oni metas en lampon aŭ en mezon de kandelo por konduki bruligotan substancon ĝis la flamo (NPIV)

N

nito: cilindra metala peco, kies ekstremaĵoj estas plilarĝigataj per frapoj, por solide kunfiksi la du surfacaĵojn, lamenojn, platojn kc, tra kiuj ĝi pasas. (NPIV)

O

opcio: akirita rajto aĉeti aŭ ricevi ion je difinitaj kondiĉoj je estonta dato (NPIV)

P

parsio: ano de zoroastrismo en Hindio (NPIV)

pimpa: gaje loga; dezirekscite eleganta (NPIV)

pisti: pecetigi aŭ pulvorigi per ripetitaj batetoj (NPIV)

pluŝo: ŝtofo simila veluron, sed kun pli longaj haroj, kaj uzata por vestoj kaj tegaĵoj (NPIV)

poliso: dokumento, atestanta pri asekuro kaj entenanta ĉiujn kondiĉojn de la kontrakto (NPIV)

prohibicio: leĝa aŭ dekreta malpermeso importi aŭ eksporti tiujn aŭ aliajn varojn, fari tiun aŭ alian komercon aŭ industrion (speciale tiujn de alkoholaĵoj. (NPIV)

pupitro: mebleto prezentanta deklivon, sur kiun oni metas libron, kajeron, partituron, por pli oportune legi aŭ skribi. (NPIV)

R

ranca: ricevinta akrajn malagrablajn odoron kaj guston pro komenco de malkomponiĝo (NPIV)

rami: mane aŭ maŝine enbati fostojn ks (NPIV)

remizo: konstruaĵo aŭ tegmentita loko, en kiu oni ŝirmas veturilo(j)n, boato(j)n, fervojan materialon ks (NPIV)

remparo: tera amaso, anataŭ kiu kuŝas fosaĵo, kiu estas destinita fortikigi la muregojn de kastelo aŭ fortreso, kaj provizi platformon por la kanonoj (NPIV)

retikulo: virina mansaketo (NPIV)

ricino: laksiga oleo (HGK)

rubuso: sovaĝa ofte dorna arbeto, kun dolĉaj berofruktoj similantaj nigrajn frambojn (PV)

S

salvarsano: medikamento kontraŭ sifiliso (NPIV)

skapolo: maldika plata triangula ostro de la posta parto de la ŝultro (NPIV)

smirgi: poluri, glatigi aŭ malpoluri per smirgo (NPIV)

spino: tuto de la sinsekvaj vertebroj formantaj la dorsan parton de la skeleto ĉe la vertebruloj (PV)

stoko: kvanto da varoj, krudmaterialoj aŭ fabrikataĵoj, disponeblaj en magazeno aŭ deponejo (NPIV)

Sudfalio: ne ekzistas, male al la iama germana provinco Vestfalio, estas ŝerce uzita de B. Traven

sukuri: doni la unuan helpon kaj flegon al vunditoj (NPIV)

sukceno: malmola flava diafana fosilia rezino, el kiu oni faras diversajn objektojn, precipe buŝaĵojn de pipoj (NPIV)

Ŝ

ŝindo: ligna tabuleto, uzata kiel tegolo por kovri la tegmentojn en arboriĉaj regionoj (NPIV)

ŝvabo: ano de la ĉefa gento de Ŝvabujo (NPIV), kio estas iama germana duklando de Germanio, nun dividita inter Bavario kaj Badenio-Vurtembergo

T

tendeno: blankeca, fibreca muskolekstremaĵo, kiu alligas la muskolon plej ofte al osto (NPIV)

testiko: virseksa glando, kiu produktas la spermatozoojn kaj sekrecias hormonojn (NPIV)

tibio: longa osto inter la genuo kaj la maleolo, pli dika ol la fibulo (NPIV)

timbalo: speco de tamburo kun latuna duonsfera sonkesto (NPIV), speco de kaldroneca tamburo (EDK)

timpano: kavaĵo de la meza orelo, fermita de membrano (NPIV)

torni: rondforme tajli pecon de solida materialo, fiksitan sur speciala turniĝanta stablo (NPIV)

troglodito: homo konstante loĝanta en kaverno, uzata speciale pri la prahomoj (NPIV)

trombono: granda latuna blovinstrumento (NPIV)

V

verdigro: kupra oksido (NPIV)

Malgranda marista terminaro

Enestas nur la signifoj, kiuj koncernas la lingvouzon de la libro.

(EDK): *Erich-Dieter Krause, Wörterbuch Deutsch-Esperanto, Langenscheidt 1993*

(HGK): *Hans-Georg Kaiser*

(MT): *Marista Terminaro, de Komandanto Peter Clissold (1949), Universala Esperanto-Asocio*

(PB): *Peter Benson Comprehensive English-Esperanto Dictionary (1995 by the Esperanto League for North America)*

(PIV): *reprezo de la dua eldono de la Plena Ilustrita Vortaro, SAT Parizo 1980.*

(PV): *naŭa senŝanĝa eldono de la Plena Vortaro, SAT Parizo 1981*

A

argano: gruo (NPIV)

asekuri: pagi monon, premiumon periode por havigi difinitan sumon se ŝipo rompiĝis aŭ fundeniĝis (MT)

B

baborda: la maldekstra flanko de ŝipo, kiam oni rigardas antaŭen (MT)

balasto: io peza uzata por stabiligi ŝipon (MT)

balustrado: ĉia analoga barilo aŭ apogilo, starigita por eviti defalon (NPIV)

Blua Petro: la signalflago P (blanka ortangulo sur blua fono); de ŝipoj hisataj, kiuj ene de dudek kvar horoj elveturos. (HGK)

Blua Rubando: insigno de la plej rapida transnavigado de iu oceano (PIV)

boardi: vele veturi alvente kiel eble plej multe (MT)

boato: tia flosilo, kia estas kutime pelata per maŝino aŭ vapora aŭ disela motoro (laŭ MT); slange: ŝipo (HGK)

bordŝipo: ŝipo kutime vojaĝanta apud la bordo (MT)

bovokulo: ronda hermetika fenestro sur la ŝelo de ŝipo (EDK)

brizo: regule okazanta vento, vertikale ascenda kaj kaŭzata de la varmigo de la malsupra tersurfaco (indico 4-6 de la Boforta skalo) (NPIV)

brumo: malklariĝo de la atmosfero kun vidodistanco de pli ol unu kilometro (NPIV)

bukaniero: pirato de la 17-a jarcento el la insuloj de Mez-Ameriko (EDK)

C

cisterno: rezervujo por akvo aŭ oleo (MT)

D

deklari: oficiale, publike, formale sciigi ion (NPIV)

doganistoj: devas traserĉi alvenintan ŝipon pro kontrabando; trovinte nenion riproĉinda, ili vizas la manifeston. Oni endoganigas ŝipon ĉe la doganejo. (MT)

doko: Havena baseno, kun kluzpordoj kaj kajoj, en kiu ŝipoj povas esti ŝargataj, malŝargataj aŭ riparataj (NPIV)

drivi: flosi laŭ la puŝo de fluo aŭ de vento, deviante el al difinita vojo (NPIV), pro maŝina difekto aŭ senmastiĝo ŝipo drivas (MT)

E

ekvatoro: ĉefa cirklo de la tero egaldistanca de la polusoj (MT)
elsalti pobe (slange): fuĝi de la ŝipo, germane: achtern abkanten (HGK)

F

feluko: boato de Mezmara speco kun latina velo (MT)
ferdeko: planko, el ligno aŭ ŝtalo kc, etendiĝanta de unu flanko de la ŝipo al la alia kaj kovranta la tutan kavon de la ŝipo, aŭ formanta unu el la diversaj etaĝoj (NPIV)
floto: kelko da eskadroj sub la komando de admiralo, la tuta ŝiparo de regno (NPIV)
fluo: movado aŭ rivero pli aŭ malpli konstanta, fluanta tra la maro (MT)
frajti: kolekti aŭ fari aranĝojn pri la komercaĵoj por enŝarĝo (MT)
fuko: aro de diversspecaj brunalgoj (HGK)

G

galero: Longa, mallarĝa kaj malalta ŝipo, movata ĉefe per remiloj, kun unu aŭ du mastoj, uzita en Mediteraneo de la antikva tempo ĝis 18-a jc (NPIV)
gamelo: metala manĝovazo uzata de soldatoj aŭ ŝipanoj (NPIV)
golfo: parto de maro, situanta interne de larĝe malfermita entranĉo en kontinento (NPIV)
grundi: estis ĵetita sur ne sufiĉe profundan grundon, kaj resti tie senmoveble (NPIV)
grundo: tera supraĵo, natura aŭ pretigita, sub tavolo da akvo (kanalo, rivero, maro) (NPIV)

H

holdo: ĉambrego aŭ fako en ŝipo, kien oni metas kargon (MT)
horizonto. *Videbla horizonto*: la malĉefa horizonto ĉirkaŭ la observanto, kie ĉielo kaj maro ŝajne renkontiĝas (MT)

Ĵ

ĵonko: barko de ĉina speco kun veloj kaj multaj stangetoj (MT)

K

kabo: pli-malpli altnivela pinto de terlando, kiu elstaras en la maro, terkapo (NPIV)

kajo: terbenkego, firmigita per muro laŭlonge de rivero aŭ ĉe la marbordo, uzata kiel strato aŭ en- kaj elŝipiĝejo (NPIV)

kajuto: ĉambreto sur ŝipo, aviadilo aŭ alia veturilo por kondukistoj aŭ pasaĝeroj (NPIV)

kaldronego: granda ujo, en kiu oni vaporigas akvon, por funkciigi vapormaŝinojn (NPIV)

kaldronejo: loko en domo, ŝipo, k. a. , kie staras vaporkaldronegoj (NPIV)

kapitano: ŝipestro (NPIV)

kargo: frajto sur ŝipo (HGK)

kaŝpasaĝero: kaŝiĝinta ŝippasaĝero sen valida bileto (HGK)

kesto (slange): ŝipo (HGK)

kilo: malsupra ĉeftrabego aŭ trabkunaĵo, kiu etendiĝas de la antaŭo ĝis la malantaŭo de kareno, kaj sur kiu sin apogas la tuta ligna aŭ ŝtala strukturo de la ŝipo (NPIV)

kompasso: nordon- kaj sudon-montra ilo per kiu oni vidas la kompasan direkton. (MT)

konsulo: reprezentanto de ŝtato en fremda lando (MT)

kontrabando: sekreta importado de varoj aŭ objektoj, leĝe malpermesitaj aŭ pri kiuj oni ne pagis la doganimpostojn. (NPIV)

kranko: fera aŭ ligna peco, dufoje ortangule fleksita, fiksita je la fino de akso kak servanta por doni al ĝi turnomovon (NPIV)

krozi: navigi tien kaj reen en unu regiono, por kontroli kaj observi la navigadon, protekti komercajn ŝipojn dum milito, aŭ simple por plezuro, celante nenian difinitan havenon (NPIV)

kurso: vojlinio, uzata aŭ intencata, por regule kunigi du punktojn, ekzemple ŝiplinio (NPIV)

kutro: ŝipo kun unu masto (MT)

L

lago: maŝina peco, kiu portas akson, ebligante kaj gvidante ĝian rotacian moviĝon (NPIV)

liki: enlasi akvon, se paroli pri ŝipo, kies kareno estas ial difektita (NPIV)

litbenko: marista lito sur ŝipo (PB)

luko: fermebla per pordo aŭ tabuloj, en la ferdeko de ŝipo, por ebligi penetron en holdon (NPIV)

M

maato: ŝipano de rango varianta laŭ la epokoj kaj ŝtatoj, de ŝipsubestro ĝis ĉefmaristo (NPIV)

manifesto: dokumento, kiun vizas la doganisto sur ŝipo, se li ne trovas ion riproĉindan (laŭ MT)

mesbubo (slange): kuireja servistknabo, derivita de la E-vorto

meso: en katolika preĝejo kaj de la angla vorto "mess" por manĝejo aŭ manĝosalono sur ŝipo (HGK)

moleo: ligna aŭ ŝtona digo konstruita antaŭ enirejo de haveno por ŝirmi ĝin kontraŭ la ondoj kaj sendanĝerigi la ŝipojn (NPIV)

N

nacia flago: kutime portata ĉe la posta flagstango aŭ ĉe la pinto de gafo sur la postmasto (MT)

navigi: vojaĝi, per tiucela veturilo, sur maro, lagoj, riveroj aŭ en la aero (NPIV)

nodo: rapideco de unu marmejlo dum horo. Tiel nomata pro nodo en la logŝnuro, per kiu oni mezuris la rapidon. (MT)

P

pasaĝera ŝipo: ŝipo, kiu portas pasaĝerojn (MT)

piloto: maristo, komisiita gvidi la ŝipojn en malfacilaj trairejoj ĉe eniro aŭ eliro de haveno, rivero ks (NPIV)

pobo: la malantaŭa parto de ŝipo, boato ks, kontraste al la pruo; la plej malantaŭa kaj supera ferdeko (NPIV)

ponto/komandejo: transversa supra platformo, sur kiu oni komandas la manovron de ŝipo (MT)

polusoj: la veraj aŭ teraj polusoj estas la norda kaj suda punktoj ĉe la fino de la tera akso. (MT)

prouo: la plej antaŭa parto de ŝipo (MT)

R

ripo: ĉiu el la kurbaj, transversaj, al la kilo alfiksitaj traboj, kiuj formas la skeleton de ŝipo (NPIV)

rodo: eksterhavena parto de maro, nature aŭ arte ŝirmita kontraŭ la ventoj, kie ŝipoj povas sendanĝere haltadi (NPIV)

rudro (direktilo): vertikala plato aŭ tabulo, ordinare ĉarnirfiksitaj al la posta steveno, per kiu la ŝipo estas direktata (MT)

ruliĝi: ŝipo ruliĝas, se ĝi ricevas ŝvelon de flanke (MT)

rumbo: unu el la 32 gradoj de la kompasa skalo (NPIV)

rungo: lateto ligna aŭ metala kun ronda aŭ ortangula sekco, kiu servas por rigidigi piedon aŭ la apogilon de seĝo, tablo aŭ alia meblo, aŭ kiel ŝtupeto de eskalo. (NPIV)

S

salono: plej granda ŝipĉambro por manĝado k. s. (MT)

savboato: larĝa boato kun pinta postaĵo kaj aerplenaj kestoj por pli granda flospovo (MT)

savjako, savzono: flospova vestaĵo, plenigita de aero (MT)

septo: interna maldika mureto, dividanta ejon (NPIV)

siriuso: blueta ĉefstelo (alpha Canis majoris), la plej hela en la ĉielo, en la konstelacio Granda Hundo. (NPIV)

skafandro: hermetika vesto, garnita per vitra kaj metala kapujo kaj regule provizata per freŝa aero, per kiu oni povas iri kaj labori subakve (NPIV)

skorio: vitreca siliciatoriĉa brulrestaĵo, kiu per fandiĝo apartiĝas de metalminaĵoj (PIV)

sondi: mezuri per tiucela aparato la profundecon de io (NPIV)

staplo: konstruaĵo, kie oni konservas varojn, atendante ilian vendon aŭ reekspedon; vartenejo (NPIV)

stevardo: oficisto, zorganta pri la komforto de la pasaĝeroj en ŝipoj aŭ aviadiloj (NPIV)

stivi: fiksaranĝi la kargon de ŝipo, por ke ĝi ne moviĝu sub la ago de la tangado aŭ ruliĝado (NPIV)

subhejtisto: en la germana originalo 'Kohlenzieher' (karbotirulo), kiu rekondukas al la angla vorto 'coal-drag' (HGK)

submarŝipo: ŝipo, kiu povas naĝi tute submergiĝinte (MT)

Ŝ

ŝafto: longa horizontala akso, kiu portas helicon aŭ alian ĉefan parton de maŝino kaj kiu transmisias la movon (NPIV)

ŝalupo: malgranda ŝipo aŭ barko por ĝenerala laboro en havenoj aŭ riveroj (MT)

ŝanhaji (slange): rabi personon aŭ personojn por ŝipo, de mi formita laŭ la homŝtelanto Ŝanhajo-Brown el Nov-Jorko, kiu precipe famiĝis en la velŝipa epoko pro tiaj personrabo. (HGK)

ŝelo: (mar.) la tuta korpo de ŝipo aŭ flugboato tia, kia ĝi aperas ekstere (NPIV)

ŝnuro: kun tri aŭ pli da ŝnureroj (MT)

ŝnurego: por fiksi ŝipon ĉe kajo aŭ al trenŝipo k. s. (MT)

T

tajdo: la ĉiutaga movado de la maro, alta tajdo kaj basa tajdo (MT)

tangi: ŝipo tangas, se ĝi ricevas ŝvelon de antaŭe aŭ deposte (MT)

Tiele!: Rudra ordono; daŭrigi laŭ la direkto nun montrata (MT)
trenŝipo: malgranda potenca ŝipo por trenadi aliajn ŝipojn kaj gabarojn k. s. (MT)
triborda: la dekstra (kiam oni rigardas antaŭen) flanko de ŝipo rigardante al la pruo. (MT)

V

valvo: ĉia movebla peco, destinita enlasi likvon aŭ vaporon en tubon, ujon ks, aŭ malhelpi ĝian ellasiĝon, aŭ inverse (NPIV)
vaĉo: garda deĵoro sur ŝipo, ordinara vaĉo daŭras kvar horojn (NPIV)
vando: interna ŝipmuro el ŝtalo aŭ ligno, dividas la ŝipon en ofte netraflueblajn fakojn. (MT)
vapormetro: manometro por vaporo (PIV)
vinĉo: levmaŝino kun horizontala akso (MT)
vrako: ruino de ŝipo, aviadilo aŭ alia veturilo, kuŝanta sur la grundo (NPIV)

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-137-2